

IVO LAPENNA

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO

DUA KOMPLETIGITA ELDONO

Eldonejo »Horizonto«
Kopenhago
1977

Unua eldono: Saarbrücken 1975

Kopirajto

Reprodukto, ekstrakto aŭ traduko en kiun ajn lingvon
nur kun la permeso de la aŭtoro.

© Ivo Lapenna 1977

Kun permeso de s-ino Birthe Lapenna 2001

www.kehlet.com

AL INTERPOPOLA KUNLABORADO EN AMIKECO
AL PACO EN LIBERECO KAJ LIBERECO EN PACO
KONFORME AL LA TUTHOMARA
ZAMENHOFA HUMANECA INTERNACIIISMO
NEDISIGEBLE LIGITA AL LA INTERNACIA LINGVO
DEDIĈITA



Foto: Torben Kehlet

Ivo Lapenna

Noto de la eldonisto de la elektronika eldono:
 Ĉar la libro uzas romiajn ciferojn I-X vi devas aldoni
 10, se vi deziras viziti rekte iun paĝon.
 Cetere ni pardonpetas pro la ne tro bona skanado de
 la paĝoj, - sed tamen ja ĉio legeblas.

ENHAVO

	Paĝo
0. ANTAŬPAROLOJ	VII
0.1 Antaŭparolo al la Unua Eldono	VII
0.2 Antaŭparolo al la Dua Eldono	IX
1. ENKONDUKO	1
1.1 Klariga noto	2
1.2 Ankoraŭfoje pri neŭtraleco	3
1.3 Inter amboso kaj martelo	4
2. PRECEDENCOJ INSTRUAJ POR LA NUNTEMPO ...	12
2.1 SAT kaj IPĖ	12
2.2 Plena perdo de memstareco	15
2.3 Inter Scila kaj Karibda	22
3. POLITIKA KAJ KONTRAŬNEŬTRALECA PROGRAMO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO	25
3.1 Instrumento de soveta politiko	25
3.2 Proleta internaciismo kontraŭ humaneca internaciismo kaj neŭtraleco	26
3.3 MEM, paco kaj neŭtraleco	29
3.4 Junularo	33
4. UNUPARTIA POLITIKIĜO DE TEJO	35
4.1 Deklaracio de Tyresö (1969): komenciĝo de la fino .	35
4.2 Kontraŭneŭtraleca ofensivo	37
4.3 Kontraŭneŭtralecaj agadoj	39
4.4 Reagoj de la Estraro de UEA	43
5. DE KONSPIRO AL LA PUĈO	49
5.1 Akriĝo de la »ideologia klasbatalo«	49
5.2 Kernaj aspektoj de la komploto	51
5.3 Realigoj de la interkonsentita taktiko	58
5.4 La puĉo kaj ĝiaj sekvoj	67

6. RESUMA KONKLUDO	83
7. ALDONOJ	90
7.1 Aprila Artikolo	90
7.2 Kongresa parolado kaj rezolucio	98
7.3 Pliaj kontraŭneŭtralecaj dokumentoj	106
7.4 Intensigo de la nigriga kampanjo	110
7.5 Eksiĝo el UEA post 45-jara membreco	122
7.6 Deklaro de la Prezidanto de la Akademio	124
7.7 La Malespero	125
7.8 Deklaro de principoj	126
7.9 Kondiĉoj de unueco	128
8. LASTMOMENTE	138
8.1 Malkreskoj ĉie	138
8.2 BEA reŝanĝis sian statuton	139
8.3 Soveta jura periodaĵo pri ekkapero de NRO-j	139
9. MANIFESTO 77 DE LA ESPERANTO-MOVADO: POR PACO EN LIBERECO – POR LIBERECO EN PACO	142
10. INDEKSO PERSONA	147

O. ANTAŬPAROLOJ

0.1 Antaŭparolo al la Unua Eldono

Antaŭ ol komenci la legadon oni bonvolu atenti jenajn informojn:

(1) Pro la kaŭzoj menciitaj en la Enkonduko, mi decidiĝis publikigi dokumenton pri la politika konspiro en UEA. La origina ideo estis verki tekston de 20-30 paĝoj. Dum la preparlaboro, kiu postulis relegon kaj reordigon de centoj da paĝoj de dokumentoj kaj aliaj materialoj, fariĝis tute klare, ke bedaŭrinde mi devos ellasi multon, prezenti kaj pritrakti nur la plej esencajn aspektojn de la afero, kaj ke tamen la dokumento fariĝos multe pli longa. Tiel okazis. En la nuna formo ĝi fakte estas malgranda libro.

(2) Oni ne riproĉu, ke mi traktas la aferon politike: estas maleble prezenti kaj analizi politikan konspiron – nepolitike. En ligo kun tio mi ankoraŭfoje forte emfazas, ke, kompreneble, ĉiu rajtas havi siajn proprajn politikajn konvinkojn, uzi Esperanton ankaŭ por politikaj celoj, eĉ formi politikajn Esperanto-organizaĵojn. Tio estas unu afero. Tute alia afero estas enkonduki partipolitikon en la Asocion, detrui ĝian neŭtralecon kaj, sekve, universalecon. Nur pri tio temas.

(3) Pro pli ol kompreneblaj kaŭzoj, mi ne nur ne indikis la nomojn de la personoj en Orienta Eŭropo, kiuj liveris multnombrajn absolute fidindajn informojn, sed ankaŭ, se iel eble, la landon de la sendinto. Por malebligi aŭ maksimume malfaciligi ilian eblan identigon laŭ la sekso fare de la policaj aŭtoritatoj, mi ankaŭ uzis la neŭtralan »persono« aŭ eĉ pekis iom rilate la gramatikon: »esperantisto« povas esti aŭ viro aŭ virino. La elstara esperantisto, kiu sendis la kvar pli ol instruajn konfidencajn raportojn, prezentitajn en la sekcio 2.2, bedaŭrinde jam forpasis. En kelkaj kazoj mi ne malkovris la nomojn de konataj esperantistoj kaj estintaj funkciuloj de TEJO en okcidentaj landoj por ne kaŭzi al ili personajn embarasojn. Ili rekonos sin laŭ la propraj citaĵoj kaj, espereble, post la legado de tiu ĉi dokumento, ili iam diros publike sub sia propra nomo, kion ili skribis al mi persone.

(4) En ĉiuj citaĵoj la stilo, kelkloke eĉ la gramatikaj malglataĵoj de la originalo, estas fidele reproduktitaj. Nur en kelkaj kazoj de eblaj miskomprenoj de iu citaĵo, mi korektis la lingvaĵon aŭ komentis en rektaj krampoj [...]; ĉiukaze citaĵoj estas rekoneblaj pro la uzado de *alia tipo de literoj*. En unusola kazo mi plene konservis la sencon, sed iom ŝanĝis la stilon, tro karakterizan por la koncerna orienteŭropano, por malebligi lian identigon laŭ lia sufiĉe unika persona esprimmaniero.

(5) Piednotoj komplete forestas. La diversaj fontoj estas indikitaj en la teksto mem en rondaj krampoj (...). Tio simpligis la skribadon kaj faciligos la legadon.

(6) Por ricevi klaran bildon, necesas legi la tuton, ĉar ĉio estas grava kaj ĉiuj partoj estas tiel kunligitaj, ke ili kompletigas unu la alian. Tamen, se iu pro tempomanko ne povas tuj legi ĉion ekde la komenco ĝis la fino, do en la lasta sekcio li aŭ ŝi trovos la kvintesencon de la kaŭzoj, pro kiuj la posthamburga UEA, precize ekde 27.07.1974, ne plu estas neŭtrala organizaĵo. La bildon kompletigas mia hamburga inaŭgura parolado kaj la adiaŭa parolado, siavice abunde misprezentitaj en kelkaj periodaĵoj (ekzemple en *Heroldo*, *Starto* eĉ *Esperanto*, 9/1974, p. 150) kaj en »privataj« leteroj. Ambaŭ paroladoj estas nun havegeblaj de Magnetofona Servo, Rüdiger Eichholz, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario L5H 3N6, Kanado. Personoj, kiuj inklinas kredi al kia ajn misprezento aŭ nigrigo, eĉ la plej fantazia, havas nun la eblecon kontroli mem absolute ĉion laŭ pli ol abunde cititaj fontoj.

(7) Per tiu ĉi dokumentaro mi plenumis mian devon al la neŭtrala Esperanto-Movado. Ne sen multe da peno kaj eĉ pli da doloro. La tuta esperantistaro, ankoraŭ fidela al la koncepto de la ĝishamburga, politike neŭtrala UEA, nun posedas ĉiujn faktojn, nekontesteble pruvitajn, kaj scias la veron. Ĝi agu laŭ sia konscienco. Mi mem agis laŭ la mia kaj havas nenion plu por diri.

18-06-1975

Ivo Lapenna

0.2 Antaŭparolo al la Dua Eldono

La unua eldono de *Hamburgo en Retrospektivo* estis disvendita en iom pli ol unu jaro. Dank' al la ĵus fondita *Eldonejo »Horizonto«* nun ĝi aperas presite en la sama formato kiel miaj aliaj verkoj en la Internacia Lingvo, tiamaniere kompletigante ilin ankaŭ laŭ la ekstera aspekto. Aldone al informoj entenataj en la Antaŭparolo al la Unua Eldono, ĉi tie utilas fari kelkajn pliajn rimarkojn:

(1) La teksto de la unua eldono reaperas preskaŭ senŝanĝe. Estas ĝustigitaj nur 2-3 eraretoj pri faktoj. Ekzemple, en 1.3 ne estis menciita la korekta starpunkto, kiun havis Pola Esperanto-Asocio, precipe Mag. I. Dratwer, rilate la senspinan kliniĝon de la oficiala neŭtralisma Esperanto-Movado antaŭ la naziismo; aŭ en la fino de 4.3 troviĝis aserto, ke T. Jansson, vicprezidanto de TEJO en la tempo de la konspiro, estis »minimume forta simpatianto«, dum efektive, laŭ sia propra rekono, ankaŭ li estis aktiva membro de la Komunista Partio. Kompreneble, estas korektitaj la multnombraj preseraroj, plurloke ŝanĝintaj la sencon, kiuj enŝteliĝis en la unuan eldonon pro la rapidega pretigo de la stenciloj.

(2) En la Antaŭparolo al la Unua Eldono mi esprimis la esperon, ke la aŭtoroj de diversaj citaĵoj, anonime publikigitaj en la verko, »iam diros publike sub sia propra nomo, kion ili skribis al mi persone«. Kelkaj fakte agis tiel; aliaj, unuavice estintaj funkciuloj de TEJO, silentis. Unu el ili, kies nomo estis menciita, ĉar mi plene fidis je lia integreco, poste publike negis sin mem. Do, mi konservis la citaĵon, sed ellasis la nomon. Ankaŭ tia senprincipeco estas nur plia ekstera manifestiĝo de la intelekta marĉo, en kiu sufokiĝas la etikaj valoroj de la zamenhofa esperantismo. Kaj sen ili la Internacia Lingvo perdas sian sencon kaj la Esperanto-Movado sian inspiro, kiel reliefigas la poemo de Salvador Gumá en 7.7.

(3) La naŭ aldonoj ĵetas plian lumon sur la tutan aferon kaj kompletigas la verkon. Ne necesas komenti ilin, ĉar ili parolas por si mem, dum la enkondukaj notoj donas la plej esencajn klarigojn pri ĉiu el ili.

(4) La informoj pri faktoj estis ĝisdataj en la momento de la finredakto. Tamen, la malobservado de la Statuto, la misprezentoj, prisilentoj, blufoj kaj malkonstruado plu daŭras kun provizoraj haltoj jen rilate unu erecon, jen rilate alian. Ekzemple, evidente pro la dokumentaro publikigita en *HeR* kaj la lastmomenta diskonigo de faktoj pri la partipolitika karaktero de la t.n. Centra Laborrondo Esperanto en GDR, la Komitato en Kopenhago (1975) ne kuraĝis akcepti ĝian aliĝpeton, sed prokrastis la decidon (v. 7.3.2). Kompense, verŝajne kalkulante pri sukcesa endoktriniĝo de la membraro dum tuta jaro, la Komitato en Ateno (1976) akceptis ne nur tiun partipolitikan Laborrondon (kiu, krome, tute ne estas landa asocio en la senco de art. 13 de la Statuto), sed ankaŭ la Asocion de

1. ENKONDUKO

1.1 Klariga noto

Dum la 59-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Hamburgo de 27.07. ĝis 03.08. 1974, mi ekŝiĝis el ĉiuj funkcioj en UEA: komitatano B, fakdelegito pri juro, honorofica direktoro de CED, membro de la redakta komitato de LMLP, k.a. Mi ne nur rifuzis la proponitan honoran prezidantecon, sed sentis min devigita ekŝiĝi el honora membreco kaj de UEA kaj de TEJO. En la fino de la inaŭgura parolado mi informis la kongreson pri mia decido. La kompleta teksto de tiu parto de la parolado troviĝas en la septembra numero de *Esperanto*, 1974, p. 146. En la adiaŭa parolado de 31.07.1974 mi eksplikis al la kongresanoj en plenŝtopita salonego la ĉefajn principajn kaj personajn motivojn, kiuj morale-intelekte devigis min al tiu paŝo. Kun la escepto de 2-3 misgvidaj komentoj, pri tio aperis nenio en la oficiala organo de la Asocio.

En tiaj kondiĉoj mi opiniis, ke estas mia devo koncize resumi la adiaŭan paroladon kaj tion mi faris en »Esencaj kaŭzoj de mia ekŝiĝo« (en la plua teksto »Esencaj Kaŭzoj«). Tiun tekston mi sendis al la redakcio de *Esperanto*, sed la nuna gvidantaro rifuzis publikigi ĝin. Tio siavice devigis min sendi ĝin al la redakcioj de pluraj Esperanto-periodaĵoj. Rezulte, »Esencaj Kaŭzoj« aperis en la hispana *Boletín*, en cirkulero de Sarlanda Esperanto-Ligo, *Brazila Esperantisto*, *Novzelanda Esperantisto*, *L'Esperanto* (itala), *Israela Esperantisto* kaj eble aliaj.

Pro la senprecedencaj intrigoj, kiuj kondukis al la hamburgaj eventoj, ankaŭ aliaj elstaraj esperantistoj tuj ekŝiĝis el siaj diversaj funkcioj en UEA: la Honora Prezidanto s-ro H.W.Holmes, Prof. G. Waringhien, s-ro R. Bernard, la ĵus elektitaj komitatanoj B s-ro Jean Thierry, Prof. J. Régulo Pérez kaj f-ino M.H. Vermaas, s-ino E. Lapenna. Pluraj el la ekŝiĝintoj sendis siajn ekŝiĝajn leterojn al la nuna gvidantaro, sed neniu el ili aperis en la oficiala organo de la Asocio. Eĉ ne tiu de la estinta Honora Prezidanto, samtempe dumviva membro de UEA, multjara komitatano de la Asocio, ĝia vicprezidanto kaj du fojojn aganta prezidanto ekde 1956 ĝis 1964, kiam la Komitato elektis lin Honora Prezidanto. La sola escepto

estas la eksiga letero de Prof. J. Régulo Pérez, kiun la redakcio de *Esperanto* publikigis en reviziita formo, do ne kun la originala enhavo. Pri tio la hispana *Boletín* (februaro, 1975, p. 20) skribis: »Kial, s-ro redaktoro, vi ne raportis al viaj legantoj, ke vi, kaj aliaj en gvidaj postenoj en UEA, ĉiamaniere petegis, repetegis, flatis kaj kaĵolis profesoron Régulo, ke li retiru sian UNUAN demisian leteron? . . . Mi ne scias, kiel prof. Régulo reagos ĉe via absolute sentakta kaj senkonsidera komento, sed espereble li scios rebati tiel basan frapon al sia konsekvenca esperantismo«. En la sama numero (p. 11) Prof. Régulo skribis: »Mi legis iom rapide la lastan kajeron de *Boletín*, kie vi (la redaktoro de *Boletín*, mia rim.), F.de Diegō kaj S.Gumá bele draŝas la hamburgajn komplotintojn . . . Mi dankas kaj gratulas vin, Fernandon kaj Salvadoron por la kuraĝo elpaŝi kaj prezenti al la mondo vian komprenemon de la situacio post kiam la komplotintoj kaperis la gvidadon de UEA . . .«

En »Esencaj Kaŭzoj« mi mem skribis:

»Se persono, kiu dediĉis 47 jarojn de sia vivo al ĉiutaga laboro por Esperanto kaj 36 jarojn seninterrompe al UEA kiel ĝia estrarano, decidiĝas ekŝigi el ĉiuj funkcioj kaj rezigni pri ĉiuj honorigoj, tiam, evidente, malantaŭ la decido troviĝas escepte gravaj kaŭzoj. Mi rigardas kiel mian elementan devon informi pri ili, almenaŭ koncize, la tutan membraron, precipe la ĉefdelegitojn kaj delegitojn, kiuj denove ĵus elektis min komitatano B per granda plimulto de pli ol 83% malgraŭ la kontraŭaj nete politikaj instrukcioj de la funkciuloj en 4 orienteŭropaj landaj asocioj, harmoniigitaj kun la kampanjo de iliaj politikaj samopinianoj en la gvidantaro de TEJO«.

Sekvis la prezento de tiuj kaŭzoj, el kiuj la ĉefa, principa, estus kaj restas la kruda malobservado de neŭtraleco de UEA. Kvankam la nuna gvidantaro de la Asocio klopodegis silentigi la veron, tamen almenaŭ parto de la esperantistaro povis sciigi pri la tuta graveco de la nuna situacio. Multaj esprimis al mi sian ŝokiĝon pro la hamburgaj eventoj kaj petis, ke mi publikigu kiel eble plej baldaŭ la promesitan ampleksan dokumentaron »kun multaj detaloj pri tiu senprecedenca komploto, inkluzive pliajn aŭtentikajn informojn ricevitaĵojn el Orienta Eŭropo post la kongreso«.

Tion ĉi mi nun faras. En la sekvantaj sekcioj mi pritraktos laŭvice ĉiujn punktojn, kiujn mi tuŝis en »Esencaj Kaŭzoj«. Antaŭ ol prezenti la dokumentitajn faktojn pri la abundaj malobservadoj de la neŭtraleco, necesas, tamen, diri kelkajn vortojn pri la koncepto de neŭtraleco kiel difinita en la Statuto de UEA. Tio estas des pli grava, ĉar montriĝis, ke ankaŭ tiurilate regas iom da konfuzo en kelkaj medioj.

1.2 Ankoraŭfoje pri neŭtraleco

La neŭtraleco kaj universaleco de la Internacia Lingvo, same kiel la graveco de la principo de neŭtraleco por la universaleco de

UEA, estas amplekse priiraktitaj en ĉap. 18.2.1 de *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo* (en la plua teksto *EeP*). Estas konsilinde, ke ĉiu leganto, kiu deziras ricevi pli kompletan bildon pri la demando, atente legu tiun tutan parton de la verko, ĉar ĉi tie eblas prezenti nur ĝiajn plej esencajn trajtojn.

La neŭtraleco de UEA estis jene formulita okaze de ĝia fondiĝo en 1908: »UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco«. Post la t.n. Interkonsento de Kolonjo de la 4-a de aŭgusto 1933, la principo estis reformulita en nova art. 4 de la Statuto: »UEA estas neŭtrala rilate al religio, nacieco, politiko kaj sociaj demandoj. . .«. Identan formulon enhavis art. 4 de la Statuto de Internacia Esperanto-Ligo de 1936, reviziita en julio 1940. Ĝi restis senŝanĝa ĝis 1947, resp. ĝis 1948 en la Statuto de la Asocio. La aldono pri neŭtraleco rilate sociajn demandojn okazis en Kolonjo, en la tempo de jubilanta ekstreme reacia naciismo, kiam multaj el la tiamaj gvidantoj de la neŭtrala Esperanto-Movado timis eĉ la vortradikon *soci-*, ĉar »en la publika imago kaj ankoraŭ pli en la sekretaj policaĵ dosieroj ĝi iel povus esti ligita al socialismo kaj similaj 'subversaj' movadoj« (*EeP*, p. 558). Necesis, do, eksplicite distanciĝi por »savi la aferon«, kvankam – tute kompreneble por ĉiuj, kiuj komprenas la interkomprenigan kaj pacigan rolon de la lingvo – tio neniel influis la naziajn kaj similajn tiranecajn reĝimojn. Nur la senespera deziro eviti malagrablojn por la Movado kaj por si mem povas eksplicite tiun absolute maltaŭgan aldonon. Pretervido kaŭzis, ke en 1947, dum la UK en Bern, kiam la Komitato reformulis la principon en atmosfero de sufiĉe granda streĉiteco, tiu ereto restis en la Statuto. En ĉiu okazo la vortoj »rilate al politiko« ja abunde kovras la neŭtralecon koncerne kian ajn apartan partipolitikon, ĉu socialisman, ĉu nesocialisman. Kaj tio estas esenca. Dum la sama Kongreso la principo de neŭtraleco estis precizigita. Al art. 4 estis aldonita nova alineo, kiu tekstas:

»UEA deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Ĝia sinteno estas diktata de la ideoj celoj de la Esperanto-Movado. Ĝi rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur nepolitika bazo klopodas efektivigi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio«.

Tiu grava aldono, proponita de mi mem, fekundigis la neŭtralecon per humaneca enhavo. Tio estis des pli necesa, ĉar en la antaŭmilita periodo la Movado »plurloke estis devigita proklami sian absolutan neŭtralecon resp. indiferentecon en la lukto inter faŝismo kaj demokratio (rimarkinda escepto estis la neŭtrala Jugoslavio Esperanto-Ligo, kiu alprenis firman kontraŭfaŝisman pozicion), rezigni pri ĉia serioza iniciato cele al interpaciĝo tutmonda. . .« (U. Lins en *EeP*, p. 437). Post la proklamo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj la 10-an de

decembro 1948, la dua alineo de art. 4 ricevis eĉ pli konkretan enhavon kaj pli grandan valoron. Principe, la neŭtraleco de UEA devus ĉesi tie, kie komenciĝas la malobservo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kiel formulitaj en la Universala Deklaracio. Kompreneble, la neŭtraleco de UEA necese ĉesas tie, kie komenciĝas atakoj kontraŭ Esperanto, kontraŭ UEA kaj ĝiaj organizaĵoj.

La difinon de neŭtraleco kompletigas aliaj reguloj de la Statuto. Ekzemple, art. 13 preskribas, ke ĉiu landa Esperanto-organizaĵo povas aliĝi al UEA, se estas plenumitaj difinitaj kondiĉoj, interalie »se vidiĝas klare el ĝia statuto, ke temas pri asocio neŭtrala laŭ la senco de art. 4«. La Statuto ebligas ankaŭ kontraktojn kun neneŭtralaj organizaĵoj »... kondiĉe ke tiuj rilatoj ne estu en kontraŭeco kun la principo de art. 4« (art. 16). La principo de neŭtraleco estas ligita al la celoj de la Asocio, el kiuj unu estas plifaciligi ĉiaspecajn intelektajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo«, kreskigi inter la membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por ĉiuj popoloj. Du jarojn post la amendo de art. 4 de la Statuto, en la inaŭgura parolado dum la UK en Parizo (1950), mi tuŝis ankoraŭfoje la demandon de neŭtraleco kaj diris interalie: »La neŭtraleco, plue, signifas ke en eksteraj rilatoj ni ligas nin al neniu politika koncepto, al neniu alia movado, al neniu fremda ideologio. Kiel esperantistoj ni estas memstaraj kaj sendependaj, kaj ni iras nian propran vojon« (Retoriko, tria eldono, p. 269; aŭ *Elektitaj Paroladoj*, p. 16).

Mi citis tiujn kelkajn vortojn, ĉar ankaŭ la ideoj esprimitaj en pluraj miaj inaŭguraj paroladoj – laŭ mi absolute konformaj al la koncepto de aktiva neŭtraleco kiel formulita en la Statuto – estis menciitaj en korespondaĵoj el Orienta Eŭropo kiel kaŭzoj, pro kiuj necesis »faligi la bastionon de neŭtraleco«.

1.3 Inter amboso kaj martelo

Jes, precize tiel: Esperanto ĉiam troviĝis inter amboso kaj martelo, atakata de multaj flankoj, sed precipe de la ekstremaj dekstro kaj maldekstro. En ĉap. 21 de *EeP* (p-oj 697-747) estas detale priskribitaj kaj analizitaj la persekutoj kontraŭ Esperanto, kontraŭ Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj, en amaso da kazoj eĉ pro la nura scio de la lingvo, sen kia ajn aktivado por Esperanto. La plej barbaraj atakoj okazis en nazia Germanio kaj en stalinisma Soveta Unio. Dum en la Tria Regno de Hitler Esperanto estis persekutata kiel »lingvo de judoj kaj komunistoj«, samtempe en Soveta Unio de Stalin Esperanto estis detruata kiel »lingvo de cionistoj kaj kosmopolitoj«. Dum la misfama Dekreto de Martin Bormann, la anstataŭanto de *Führer*, de la 18-a de februaro 1936 (n-ro 29/36) nomis Esperanton »internacia

mikslingvo«, kiu »kontraŭas al la bazaj konceptoj de nacisocialismo kaj finfine povas servi nur al supernaciaj potencoj« (post kio sekvis la likvido de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj en nazia Germanio), *samtempe* en internaj instrukcioj de NKVD (soveta sekreta polico) la esperantistoj estis klasigitaj kiel »kontraŭsovetaĵ kaj socie fremdaj elementoj« kaj troviĝis en la grupo (5) de personoj detruendaj en la »granda purigo« (kun la rezulto, ke miloj da esperantistoj, inter kiuj N. Rytjkov, estis arestitaj kaj deportitaj, dum tre multaj estis ekzekutitaj aŭ »malaperigitaj«, inter kiuj E. Drezen, N. Nekrasov, N. Incertov, P. Gavrilov, J. Gurov, E. Miĥalski, ktp., ktp.). En *Gulag Arkipelago* A. Solĵenicin skribis pri la sama afero: »Estis tie la esperantistoj: sendanĝera grupo, kiun Stalin decidis forblovi en la jaroj, kiam Hitler estis faranta la saman aferon« (angla broŝurita eldono, 1974, p. 59). Pretere dirite: estas utile memori la nomon de Solĵenicin ankaŭ tial, ĉar ĝi reaperos en tiu ĉi dokumento lige kun la kaŭzoj, pro kiuj necesis »faligi la bastionon de neŭtraleco«

Ĉu, do, fakte, la Internacia Lingvo kiel tia, per si mem, estas ia »danĝera lingvo«, kiun necesas neniigi?

Jes, *el la vidpunkto de ambaŭ ekstremoj ĝi estis kaj restas »danĝera«*. Ne nur tial, ĉar pro sia facileco ĝi ebligas senperajn personajn internaciajn kontaktojn, kiuj glitas el sub la kontrolo de la diktatorecaj politikaj policoj (v. sube rilate la nunan situacion), sed ankaŭ pro la monde proksimiga kaj solidariga rolo de Esperanto, kiun Zamenhof nomis »interna ideo« kaj mi mem prefere nomas »humaneca internaciismo«. Ekde kiam mi ellernis la lingvon en 1928 ĝis nun, mi vaste pritraktis ankaŭ tiun aspekton en multnombraj artikoloj, paroladoj, prelegoj, laste en *EeP*, precipe sur p-oj 554-556. Ĉar tiu koncepto nete kontraŭas la nuntempan oficialan koncepton de »proleta internaciismo«, kiel vidiĝos en la postaj partoj de tiu ĉi dokumento, estas necese citi ĉi tie almenaŭ kelkajn eretojn.

Ekzemple, en la menciita pariza parolado (1950) estis prezentita la signifo de Esperanto »kiel esprimo kaj antaŭeniganto de universalismaj tendencoj«, kies konsistaj elementoj estas »egaleco de ĉiuj homoj, spirita libereco, socia justeco kaj interpopola paco«. La konkludaj vortoj de tiu parto estis:

»Tiu ĉi vere revolucion ŝanĝigon en la pensomaniero kaj sentado, kiujn kreas la Internacia Lingvo; tiun ĉi transformigon de mallarge nacia konceptado al universale homa konceptado, kaŭzitan de la Internacia Lingvo, komprenis same bone, aŭ eĉ pli bone, la malamikoj de universalismo, ol ĝiaj adeptoj, ol, kelkfoje, eĉ la esperantistoj mem!«

»Ne estas hazardo, geamikoj, ke ĉiuj tiranecaj kaj despotecaj reĝimoj levis sin kontraŭ Esperanto, malpermesis la lingvon, persekutis esperantistojn! Se Esperanto estus ia infanludilo, se pere de ĝi oni ne povus interkompreniĝi, se ĝi havus nenian idean signifon, kredis al mi, ke ili grandskale propagandus ĝin. Sed ĉar la Internacia Lingvo havas grandegan spiritan forton, ĉar ĝi troviĝas ĉepinte de universalismo kaj tuthomeco, ĝi estis kaj estas atakata de ĉiaspecaj ŝovinistoj. Tiu

atakoj ne devas nin timigi nek senkuraĝigi. Kontraŭe, ni fieru pri ili! Ni fieru, se tiraneco nin kontraŭstaras, ĉar tiraneco ĉiam kontraŭstaras noblecon kaj veran progreson. Tiuj atakoj konvinku nin ankoraŭ pli firme pri la praveco, vereco kaj grandeco de nia afero». (*Retoriko*, p. 267-8; *Elektitaj Paroladoj*, p. 13).

La brusela inaŭgura parolado (1960) estis plene dediĉita al humaneca internaciismo kaj al la Internacia Lingvo. Ĝi estis eldirita en la tempo de la granda kampanjo por la t.n. kunekzistado. En tiu parolado estis dirite:

»Kompreneble, oni povas kunekzisti diversmaniere. Ankaŭ sovaĝaj bestoj, ekzemple, kunekzistas unuj apud la aliaj en ŝtalaj kaĝoj en zoologiaj ĝardenoj. Kaj tio eble estas bona – eble por sovaĝaj bestoj en zoologiaj ĝardenoj. Sed ni esperantistoj opinias, ke la mondo ne estas zoologia ĝardeno; ni fidas, ke la homoj ne estas sovaĝaj bestoj kaj tial ni preferas internacian kunlaboradon de la homoj en frateco kaj libereco, ol la nuran kunekzistadon en la kaĝoj de politikaj limoj kaj lingvaj baroj».

En la sama parolado estis dirite:

»Evidente, interkompreniĝi oni povas – pli aŭ malpli bone – ankaŭ per la naciaj lingvoj kaj eĉ per signoj kaj gestoj. Sed estas esenca diferenco el vidpunkto de internaciismo kiu lingvo estas uzata. La instrumento utiligata por iu celo devas esti konforma precize al la bezonoj de la celo. Oni povas ludi serenadojn per mandolinoj kaj gitaroj, sed la simfoniojn de Beethoven oni kree reproduktas per aliaj instrumentoj. Kaj tie – precize tie – troviĝas la ĉefa kaŭzo de la provizora malsukceso de la moderna internaciismo. Ne la ideo estas utopia, sed utopie estis kaj estas esperi, ke sen komuna, neŭtrale homa lingvo, sen la Internacia Lingvo, humaneca internaciismo estas entute realigebla». (*Elektitaj Paroladoj*, p-oj 66 kaj 68-9).

La samajn ideojn mi esprimadis jam longe antaŭ la milito en la tiama diktatoreca kaj polica Jugoslavio. En *La Suda Stelo* de 1937 mi skribis, ke »la esperantistoj estas persekutataj kaj eĉ mortigataj nur tial, ĉar ili en alinacianoj rigardas homojn kaj ne malsuperajn estaĵojn, homojn, kun kiuj ili deziras interŝanĝi ideojn, kontaktiĝi, amikiĝi kaj kunlabori anstataŭ reciproke detruigi».

Tio rekondukas min al la antaŭmilita situacio. Kion faradis la tiama neŭtralisma Esperanto-Movado fronte al tiuj sovaĝaj atakoj kontraŭ Esperanto kaj krimaj persekutoj de esperantistoj?

Kun kelkaj esceptoj (inter kiuj Lidja Zamenhof, pereinta poste en germana koncentrejo), ĝi ne nur tombe silentis, sed eĉ provis »flati« al la nazioj – interalie per la hontinda elpelo de judaj esperantistoj el niaj societoj en Germanio kaj per perfida kreo de naziaj Esperanto-organizaĵoj – parte pro konvinko (ekzemple A. Vogt, aktiva membro de la nazia partio) kaj parte por »savi la aferon«, kiun, kompreneble, ili ne »savis« nek povis »savi« pro la ĵus prezentitaj kaŭzoj, sed humilige kompromitis. Fakte, laŭ mia scio, nek Germana Esperanto-Asocio, nek la Esperanto-instancoj en GDR ĝis la nuna momento kiam ajn oficiale kondamnis tiujn hontindajn barbarajn en ilia iama komuna ŝtato.

La solaj voĉoj de protesto venis jam antaŭ la milito el Pollando (precipe Mag. I. Dratwer, I. Lejzerowicz, J. Sapiro) kaj el

Jugoslavio. Pri la sinteno de la tiama Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL.) U. Lins skribis en *EeP*:

»Ĝiaj funkciuloj kaj aliaj gvidantoj (D-ro Lapenna, B. Borjan, D-ro Ŝkatarić, Turković, Grandja, k.a.) avertis en *La Suda Stelo* kontraŭ la kliniĝo de la gvidantoj de la Esperanto-Movado en la faŝismaj landoj kaj kontraŭ la pasiveco de UEA kaj IEL antaŭ faŝismo. Ili postulis revizion de la tiama komprenado de neŭtraleco, kiu fakte identis kun senprotesta akcepto de la persekutoj, en kelkaj kazoj eĉ kun laŭdado de la persekutitaj reĝimoj... Analizante la karakteron de la tiamaj persekutoj, *La Suda Stelo* konkludis: se ni ne povas redoni la ricevitan vangofrapon, ni almenaŭ ne humiliĝu antaŭ tiuj, kiuj nin batis. Kontraŭe, ni fieru, ke ili – ne konsentas kun ni« (p. 711).

U. Lins komentis: »La senkompromisa kaj firma sinteno de la Jugoslavia Esperanto-Movado estas honorinda ekzemplo de rezisto en la tiama pasiveco de la neŭtrala Esperanto-Movado« (p. 713). Memore kaj omaĝe al miaj tiamaj amikoj kaj kunlaborantoj, mi deziras nur aldoni, ke Borjan, Ŝkatarić, Turković, Grandja kaj tuta aro da aliaj estis murditaj de la »*ustaŝoj*« dum la milito (»*ustaŝoj*« = kroataj nazioj).

Por meti la aferon en ĝustan perspektivon, mi ne povas ne diri, ke estis mi mem la sola, kiu dum la UK en Londono (1938) plej forte protestis en la sama senco. Tuj post la milito, dum la UK en Bern (1947), apogita de deko da landaj asocioj, mi proponis Rezolucion kondamnantan la krimojn de la nazioj, kies viktimoj estis multaj esperantistoj, inkluzive preskaŭ la tutan familion Zamenhof. Post la malkuraĝa malakcepto de la Rezolucio per ĉ. 2/3 de la berna kongreso, mi sukcesis atingi, ke almenaŭ la parto pri la homaj rajtoj eniru en la Statuton de UEA. Dum la pariza kongreso (1950) mi denove publike protestis »pro la malpermeso de la Internacia Lingvo, tute egale de kiu flanko ĝi venas«. En la parolado de 1956 mi ankoraŭfoje emfazis, ke »la Esperanto-Movado ne estas kaj ne povas esti neŭtrala rilate tiujn tendencojn, kiuj kontraŭas la Internacian Lingvon kiel tian, aŭ detruas la bazajn principojn de egaleco, solidareco kaj libereco, sur kiuj sole povas kreski kaj prosperi Esperanto«. Kaj mi finis per jenaj vortoj: »Esti indiferenta koncerne la rektajn atakojn kontraŭ Esperanton kaj kontraŭ tiujn ideojn, kiuj estas esence ligitaj al ĝi, ne estas neŭtraleco, sed malkuraĝo kaj stulteco« (*Elektitaj Paroladoj*, p. 42). En la *Nefermita Letero al Stalin* de majo 1952, iniciatita kaj finredaktita de mi mem, la Estraro de UEA kaj la Plenumkomitato de SAT firme defendis Esperanton kaj »nete atribuis la kontraŭesperantan politikon de Soveta Unio al lingva imperiismo« (*EeP*, p. 742). La letero aperis kiel Dok. A/VI/3 de CED kaj estis poste publikigita ne nur en *Esperanto* kaj *Sennaciulo* (Junio, 1952), sed ankaŭ en multaj nacilingvaj gazetoj, interalie en la fama pariza *Le Monde*. Dum la inaŭguro de la budapeŝta UK (1966) mi devis reagi ĝentile, sed plej energie por protekti la neŭtralecon de UEA, kiun grave malobservis la ambasadoro de

GDR (Orienta Germanio) en sia longa politika alparolo, plena de plej akraj atakoj kontraŭ Usonon kaj aliajn okcidentajn »imperialismojn«. Mi finis tiun intervenon per esprimo de espero, ke ankaŭ en GDR, kie Esperanto ne havas vivorajton ekde kiam Hitler malpermesis ĝin, la aŭtoritatoj fine ebligos liberan disvastigon de la lingvo kaj importadon de niaj periodaĵoj. Ĉiu partopreninto de tiu kongreso – certe pli ol 4000, plejparte el Orienta Eŭropo – verŝajne rememoros la tondrajn aplaŭdojn, kiuj sekvis ĉiun mian frazon, precipe la finan. En ĉiu okazo, la nunaj politikaj konspirintoj, kiel vidigis poste, sendube ne forgesis tion.

Esperable tiuj kelkaj ekzemploj de multnombraj kazoj sufiĉas por montri la faktan situacion de Esperanto inter la du ekstremoj, la pozicion, kiun devus oficiale havi UEA, kaj la starpunkton, kiun en ĉiu okazo mi mem konsekvence alprenis kaj aplikis jam longe antaŭ la hamburga puĉo: *kontraŭbatali kiam ajn misuzon de UEA por partipolitikaj celoj kaj samtempe senkompromise defendi la principon de aktiva neŭtraleco de UEA.*

Pro tiu principa starpunkto mi devis suferi multajn personajn ĝenojn kaj persekutojn, unue en la diktatoreca antaŭmilita Jugoslavio; poste, ekde 1947 kaj precipe ekde 1949, fare de ekstreme dekstraj elementoj en Usono (helpataj de similaj individuoj en kelkaj aliaj landoj), kiuj lanĉis mondskalan kampanjon de kalumnioj ĉefe pro la Berna Rezolucio kaj la pariza parolado, kaj ne hezitis eĉ denunci min al aŭtoritatoj de multaj ŝtatoj; fine (ĉu fakte fine?) la nuna kampanjo de la ekstrema maldekstro kaj ĝiaj aliancanoj. La ekstreme dekstra atako kontraŭ la neŭtralecon de UEA kaj min persone kiel ĝian »bastionon« ĉesis nur en 1956, kiam UEA fine eksigis el siaj vicoj s-ron G.A. Connor, la ĉefon de la tiama intrigo.

Tiu tuta afero Connor estas menciita en *ErP* nur en du piednotoj, verkitaĵ de mi mem (p-oj 551 kaj 582-4), kaj en unu alineo, verkita de U. Lins (p. 719). Ni intence limigis nin sole al la plej esencaj partoj, ne dezirante eniri en la detalojn de tiu plia profunde nigra makulo en la historio de UEA, makulo konsistanta el centoj da presitaj paĝoj en la tiama *Amerika Esperantisto*, pamfletoj, ĉirkuleroj, »privataj« leteroj, falsaj denuncoj. Nu, la konate »verama« gazeto *Heroldo*, kiu sub la nuna redakcio publikigis verŝajne tricenton da ĉiaspecaj falsajtoj, inkluzive intencajn prisilentojn, en sia t.n. »recenzo« pri *ErP* absolute superis sin mem en falsado de faktoj, ĝuste kaj objekte prezentitaj en *ErP*. Lasante flanke ĉiujn aliajn multnombrajn falsajtojn en tiu »recenzo«, mi nur citu la jenan pri la afero Connor:

»Relegante ĉiujn dokumentojn pri la afero Connor kaj EANA, inkluzive de la Komitataj Protokoloj, ni trovas nenium pruvon pri »denuncado al sekurecaj servoj«, akcepteblan de iu ajn kortumo en la mondo. Ankaŭ en tiu-ĉi kazo, kiel tre ofte tra

la libro, ni staras antaŭ troigoj kaj fantaziaj asertoj, tiom danĝeraj, ke se A.G. Connor ankoraŭ vivus, li povus procesi kontraŭ UEA».

Estas amuze konstati kiel malico povas kontraŭdiri sin mem: dum en la ĵus citita parteto temas pri »fantaziaj asertoj«, en la sama »recenzo« la sama »recenzinto« nur kelkajn liniojn poste skribis pri *EeP*, ke ĝi, »kun escepto de la kvina parto« ne estas »historia verko«. La komentoj de Lins pri la afero Connor troviĝas ĝuste en la kvina parto! Tamen, la afero estas tro serioza kaj la kalumnio tro grava por amuziĝi per tiaj »glitoj« de la »recenzinto«.

Do, laŭ la »verama« *Heroldo*, la viktimoj ne estis ELNA, tuta aro da honestaj usonaj esperantistoj, UEA, mi mem, Tibor Sekelj kaj multaj aliaj, sed la kompatinda Connor, kiu jen, se li vivus (fakte nur nun mi eksciis pri lia forpaso), povus eĉ akuzi UEA! Kial ne min, aŭ Lewine, aŭ Sekelj, aŭ Malmgren kaj aliajn en la tempo, kiam li vivis? Li kaj liaj komplicoj ja bone konis la enhavon de ĉiuj dokumentoj, precipe de la protokolo de la kunsidoj de la Komitato de aŭgusto 1956, kiam Connor estis eksigita el la Asocio. Li ankaŭ bonege konis la Rezolucion de la Komitato, per kiu ĝi preskaŭ unuanime deklaris »sian indignon pro la atakoj, insultoj, misprezentoj, kalumnioj kaj fiaj karikaturaj, aperintaj en *Amerika Esperantisto* rilate UEA, ĝiajn gvidajn instancojn kaj speciale ĝian ĝeneralan sekretarion [en tiu tempo mi mem, *mia rim.*], al kiu la Komitato esprimas siajn simpatiojn kaj solidarecon«. Kaj tiun Rezolucion, kompreneble, ne proponis mi, sed E. Dahl, en tiu tempo membro de la Sveda Parlamento (p. 19 de la Protokolo). Ĉiu interesiganto povas havigi de la CO de UEA la tutan Protokolon kun la aldonoj E kaj F por facile kompari la veron kun la falsajoj de *Heroldo*. Jen kelkaj eltiraĵoj el la letero de 17.07. 1956 de J. L. Lewine, tiama prezidanto de ELNA, al E. Malmgren, tiama prezidanto de UEA (Aldono E):

»En monato aprilo 1956 min vizitis oficeiro de la usona militistaro kaj petis min sciigi lin pri ELNA. Li demandis al mi ĉu ELNA kaj UEA estas organizoj komunismemaj, ĉu Esperanton uzis la komunistoj kun la celo detrui la registaron usonan, ĉu samideano Lapenna estas komunismema, ĉu SAT estas organizo revoluciema, ĉu oni povas esti samtempe esperantisto neŭtrala kaj lojala Amerikano. Li diris al mi, ke iu estis akuzinta ELNA-n kaj UEA-n, samideanon Lapenna kaj min mem esti aŭ komunismemaj aŭ almenaŭ nekapablaj malpermesi la komunistojn 'kapti' la Esperanto-Movadon kun la celo detrui la registaron usonan«.

La dokumento eksplikas, ke la samajn akuzojn li estis aŭdinta unu jaron antaŭe de »registaraj enketistoj«. J.L. Lewine daŭrigas:

»Tiam ili diris al mi, ke tiujn akuzojn kontraŭ la Esperanto-Movado estis farinta jurinte s-ro Connor al la registaraj instancoj usonaj. Tial ke mi estas samtempe prezidanto de ELNA kaj oficeiro, la Ministrejo pri Nacia Defendo decidis enketi pri la afero. Poste mi preparis raporton 50-paĝan por la registaro usona klarigante kio estas Esperanto, kion signifas la 'neŭtraleco' de l'movado esperanta, kio estas UEA ktp.«.

S-ro Lewine informis pri la »enketo« s-ron Smart, kiu estis membro de EANA. La dokumento finiĝas per jenaj vortoj: »S-ro Smart sciigis al s-ro Connor pri la enketo, kaj respondinte al s-ro Smart, s-ro Connor agnoskis, ke li estas farinta, ĵurinte, atakojn kontraŭ ELNA, kontraŭ UEA kaj kontraŭ esperantistoj unuopaj al la usona registaro«.

Tibor Sekelj estis denunciata ĉe la greka politika polico, pri kio li ricevis plurajn informojn el Grekio. En sia letero de 24.07.1956 al E. Malmgren (Aldono F) li citis la leteron de s-ro S. Sakellaropulos al EANA, en kiu estis dirite: »La vero estas, ke tute hazarde ni estas informitaj de du policistoj, ke oni skribis de EANA, ke s-ro T. Sekelj kalumniis Grekujon«. T. Sekelj konkludis sian leteron: »La esenca aserto en mia letero estas, ke s-ro Connor agis kontraŭ mi por malhelpi mian vojaĝon kaj mian poresperantan laboron. Tio estas mia akuzo, kaj s-ro Connor eĉ ne klopodis nei ĝin«. T. Sekelj ne ricevis la grekan enirvizon, kvankam en pli frua okazo li estis glate ricevinta ĝin.

UEA kaj mi mem estis la ĉefaj celoj de tiu kampanjo de kalumnioj kaj falsaj denuncoj ne nur al usonaj aŭtoritatoj, sed ankaŭ al tiuj de aliaj landoj. Rezulte, oni rifuzadis al mi, kiu tiutempe estis rifuĝinto sen ŝtataneco, la enirvizojn por Skandinavio, Germanio, Italio . . . Nur post la energiaj intervenoj de E. Malmgren en Stockholm kaj Prof. Canuto en Italio (al li la itala polico komunikis la denunciojn), la aŭtoritatoj vidis la falsecon de la denuncio kaj mi denove povis ricevi enirvizojn. En Britio la afero estis eĉ pli hontinda kaj pli danĝera por mi persone, ĉar, pli ol bedaŭrinde, kelkaj britaj esperantistoj aliĝis al la kampanjo kaj false denuncis min al la britaj aŭtoritatoj. Rezulte, du fojojn miaj petskriboj pri ŝtataneco estis rifuzitaj, kaj mi povis facile eĉ esti elpelita el la lando. Nur post pluraj jaroj, kiam unu el la konspirintoj estis mortonta pro grava malsano, li subite havis konscienciproĉojn kaj konfesis en tre longa letero al mi la tutan fi-konspiron kun ĉiuj detaloj. Dank' al tiu konfeso kaj al plia energia interveno de Harry Holmes, kiu scias ĉiujn detalojn pri la afero same bone, kiel mi, fine mi povis ricevi la britan ŝtatanecon.

Ankaŭ tiu hontinda afero kaj pluraj similaj eventoj estis inkluzivitaj en la tre milda esprimo »abscesoj sur la organismo de UEA«, kiun mi uzis en la fino de la artikolo »UEA en danĝero de malintegriĝo«, publikigita en la aprila numero de *Esperanto*, 1974 (en la plua teksto: *Aprila Artikolo*), sed kiun esprimon s-ro U. Moritz kaj liaj geamikoj en la nuna komploto insiste kaj ripete aplikas al si mem, kontraŭ la klara senco en tiu artikolo.

Kiel dirite, necesis plurfoje interveni kaj interne de la Movado kaj ekstere pro malobservoj de neŭtraleco fare de la alia ekstremo. Tial la atakoj kontraŭ la principon de neŭtraleco ĉi-foje venis de tiu alia flanko. Ili komenciĝis longe antaŭ la hamburgaj eventoj.

intensiĝis ekde la fino de 1973 kaj atingis sian kulminon en Hamburgo mem. Sed tio apartenas al la sekvantaj sekcioj, en kiuj mi donos la parolon unuavice al fidindaj informoj kaj aŭtentikaj dokumentoj.

2. PRECEDENCOJ INSTRUAJ POR LA NUNTEMPO

2.1 SAT kaj IPE

Ne estas ĉi tie la loko por prezenti, eĉ ne supraj, la historion de SAT, IPE kaj aliaj politikaj Esperanto-organizaĵoj. Pri tio troviĝas detalaj informoj en ĉap. 19 de *EeP*. Pliaj abundaj materialoj estas troveblaj en la verkoj menciitaj en la Bibliografio al tiu ĉapitro. Interese estas mencii nur tiujn faktojn, kiuj rekte koncernas nian demandon.

Kiel konate, E. Lanti kritike rilatis al la tiama neŭtrala Esperanto-Movado, kiun li rigardis saturita de »burga spirito«, kontraŭa al la klasaj interesoj de la laboristaro. La kvintesenco de lia doktrino estis klasbatalo, sennaciismo kaj kleriga laboro por eduki »konsciajn revoluciulojn«. Sekve »*For la neŭtralismon!*« kaj plena apartiĝo disde la neŭtrala Esperanto-Movado, kiu fakte en tiu periodo praktikis la koncepton de pasiva neŭtraleco, laŭ Lanti »neŭtralismo«. Rezulte de tiu agado de Lanti, dum la 13-a UK en prago (1921) okdedo da samopiniantoj okazigis kunvenon (unua kongreso de SAT), kiu akceptis Rezolucion pri fondo de *sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT). La Rezolucio lojale rekonis, ke »UEA estas la sola organizo, kiu en la praktiko montriĝis fruktodona«, sed tuj aldonis, ke »ĝia politika neŭtraleco malpermesas, ke ĝi povu efike labori sur nia proletara kampo«. La Rezolucio finiĝis per la vortoj: »*For la hipokritan neŭtralismon, for la kapitalismon, vivu SAT*«.

Estas akcentinde, ke la fondintoj de SAT tute ne klopodis ekkaperi la neŭtralan UEA por transformi ĝin en politikan instrumenton de siaj celoj, sed lojale rekonis la meritojn de UEA kaj honeste – sen kiaj ajn »strikte sekretaj« cirkuleroj kaj kunvenoj, komplotoj kaj politikaj intrigoj en la kadro de UEA – aperte kreis sian propran organizaĵon. Ne enirante en la demandon pri la ĝusteco aŭ neĝusteco de la ideologio de SAT, oni ne povas nei, ke SAT havis kaj plu havas konsiderindajn meritojn por la Internacia Lingvo: eĉ se estus nenio alia, do certe ĝia eldona aktivado, kiun kronas plena *Ilustrita Vortaro* de G. Waringhien. Pro tiu honesta pozicio de SAT – honesta en la prezentita senco, sen falsa masko de neŭtraleco – UEA ĉiam povis etendi al ĝi sian manon de kunlaboro en la intereso de Esperanto, kondiĉe ke tiu kunlaboro ne estu kontraŭa al la neŭtraleco de UEA (v. supre en 1.2).

Efektive plurfoje tio okazis. La *Nefermita Letero al Stalin* (v. supre en 1.3), la helpo donita por la eldono de *PIV*, mia persona partopreno kiel prezidanto de UEA en la kongreso de SAT en Augsburg (1970) estas kelkaj ekzemploj de tiu kunlaboro.

Baldaŭ SAT mem spertis politikan skismon en sia propra sino. Sub la premo de stalinismo, ĝiaj elstaraj sovetaj membroj lanĉis atakojn kontraŭ la gvidantaron de SAT, kiun ili nomis oportunisma, kontraŭmarksisma, kontraŭsoveta, etburga, eĉ »socialfaŝisma« (*EeP*, p. 647). Tiu tuta kampanjo kondukis al fondo de *Internacio de Proleta Esperantistaro* (IPE) dum kongreso en Berlino fine de aŭgusto, 1932. Ĝia ideologia bazo estis la t.n. marksismo-leninismo-stalinismo, ĉar tio estis la oficiala nomo de la soveta tipo de »marksismo«. Pro la identeco de ĝia politika starpunkto kun tiu de la nuna MEM kaj de la 4 orienteŭropaj landaj asocioj, necesas ĉi tie laŭvorte citi la p-ton 6 de la Gvidrezolucio de IPE, akceptita en 1932:

»6. La laboristaj esperantistoj plene subtenas la devizojn de la proleta internaciismo, batalas kontraŭ imperialismo kaj faŝismo, subtenas la liberigan batalon de la subpremataj nacioj kaj koloniaj popoloj, kontraŭ la subpremantaj kaj sialandaj burĝaroj...«

Diference de SAT, en kiu povis kaj plu povas esprimiĝi ĉiuj socialismaj fluoj (pro kio la agado de SAT eĉ hodiaŭ estas malpermesita en la orienteŭropaj landoj kun la escepto de Jugoslavio), IPE estis strikte ligita al *soveta, stalinisma* koncepto de komunismo kaj »proleta internaciismo« (pri »proleta internaciismo« v. sube en 3.2 de tiu ĉi dokumento). Al IPE tuj aliĝis Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) kaj pluraj laboristaj Esperanto-organizaĵoj. En la komenco SEU ludis la ĉefan rolon, sed jam en 1935 la rilatoj inter IPE kaj SEU malfortiĝis pro la politika situacio en Soveta Unio, kaj fine tute rompiĝis, kiam la sovetaj esperantistoj »estis metitaj en kategorion de danĝeraj kosmopolitoj kaj SEU denunciita kiel 'internacia spiona organizaĵo' kontraŭsoveta« (*EeP*, p. 650). La plia sorto de la soveta esperantistaro, malgraŭ ĝia »proleta internaciismo«, estas menciita supre en 1.3: miloj estis enkarcerigitaj kaj granda nombro fizike ekstermitaj.

Denove necesas emfazi, ke la fondintoj kaj ĉefaj aktivuloj de IPE *eĉ ne venis al ideo enfiltriĝi en la neŭtralan UEA kaj ekregi ĝin por misuzi la Asocion por siaj politikaj celoj*. Sed IPE estas ege instrua por pli bona kompreno de la nuna krizo en UEA, ĉar la revivigo de la memoro je la ekzisto de IPE en la Esperanto-periodaĵoj de Orienta Eŭropo kaj, eĉ pli, *la komentoj pri la proponoj denove ekfunkciigi ĝin, ĵetas plian lumon sur la veran karakteron de la nuna politika komploto en UEA*.

Komence de junio 1974, do du monatojn antaŭ la UK en Hamburgo, okazis en Orienta Berlino »granda renkontiĝo« de esperantistoj en GDR. Ĉeestis 200 esperantistoj, el kiuj 100 devis

pagi nenion, ĉar ĉiujn kostojn por ilia partopreno (veturo, tranoktoj, manĝoj, programoj) pagis la oficiala Kulturligo (en kies kadro kaj sub kies absoluta kontrolo ekzistas la Esperanta Centra Laborrondo), dum la 100 gastoj pagis mem siajn kostojn. Almenaŭ tiel informas *der esperantist*, n-ro 3-4/1974. Dum tiu kunveno parolis ankaŭ d-ro H. Eichhorn, estinta vicprezidanto de TEJO en la tempo, kiam ĉiuj publikaĵoj de UEA estis kaj verŝajne plu estas (?) konfiskataj en GDR, kaj unu el la ĉefaj roluloj en la politikigo de TEJO, pri kio poste. Pri lia interveno *der esperantist* skribis:

»Anakronismajn konceptojn li krome vidis en certaj klopodoj revivigi la historie sendube tre meriitan *Internacion de Proletaj Esperantistoj* (IPE), kvankam la fortoj starantaj malantaŭ tiuj konceptoj ekster ĉiu dubo atentigas plenguste pri la neceso Esperanton uzi ankoraŭ pli bone por la komunista mondmovado«.

Multe pli eksplicite esprimis sin Detlev Blanke el Orienta Berlino en *Paco* (1974), bulteno, fakte luksega 40-paĝa kajero de la MEM-sekcio de GDR. Temas pri la sama Detlev Blanke, kiu sub la nuna gvidantaro de UEA publikigis en *Esperanto* (februaro 1975) unu el la recenzoj pri *EeP*. Do, en la pacama *Paco*, en kiu troviĝas amaso da malpacigaj politikaj atakoj, interalie en la artikolo »Pekina sabota pafado kontraŭ la malstreĉiĝo« (ĉu ankaŭ ĝi estas sur la linio de »proleta internaciismo«?), D. Blanke aperigis longan artikolon pri IPE. En ĝi li laŭdegas la rolon de IPE, sed komplete prisilentas la sorton de SEU kaj de la soveta esperantistaro per jenaj vortoj: »Tamen, la historiaj kondiĉoj fine de la tridekaj jaroj malebligis la pluekziston de IPE. Ĝi [en] 1939 dissolviĝis.« (!) Li eĉ aŭdacas aserti, ke IPE »savis la honoron de la Esperanto-Movado«!

Rilate la demandon »ĉu revivigi IPE«, li respondas jene:

»Hodiaŭ regas tute aliaj historiaj kondiĉoj. Tio ne signifas, ke ankaŭ mankas klasbatalo. Sed revivigo de IPE en malnova formo tamen fariĝus anakronismo. Ja multaj idealoj de IPE eniris en la agadon de MEM, fariĝis elementoj en la politiko de la *Esperanto-asocioj en socialismaj landoj* ... Tio ne signifas, ke ni devas plene kontenti pri la nuna agado de MEM, sed ĝi estas aktuale la plej progresema internacia Esperanto-organizaĵo, kiu siavice post la dua mondmilito savis la honoron de la *Esperanto-Movado*, ĉar ĝi ĉiam staris sur la historie prava flanko de la internaciaj konfliktoj kaj porpacaj iniciatoj. Kvankam laŭ ekesto, strukturo kaj esenco IPE kaj MEM estas du diversaj aferoj ..., tamen ja en gravaj celoj estas identeco. Sed same kiel la internacia komunisma kaj laborista movado ne eĉ pensas pri kreo de nova kominternio (komunista internacio), simile restarigo de esperantista internacio nur signifus izoligon kaj apartigon de la ĝenerala *Esperanto-Movado*, en kiu devus kunlabori ĉiuj diverstendencaj movadoj kaj organizoj. Tamen, ke estas utila la aktivado de esperantistoj en la sino aŭ en kunligo de komunistaj partioj, pri tio ne povas esti iu ajn dubo«. (*Rim.*: la substrekoj estas de mi).

D. Blanke donas konsilon ankaŭ al »ne-SAT-emaj laboristaj Esperanto-asocioj en nesocialismaj landoj«: »Tiuj ne-SAT-emaj laboristaj asocioj aŭ komunistaj grupoj devus kunlabori kun la 'neŭtrala' landa asocio, kun la neŭtrala internacia movado, kun MEM

ktp. kaj tamen sekvi sian propran specifikan vojon. *La historio ne ripetiĝas. Sed lerni el ĝi oni devas*».

Oni notos, ke la aŭtoro metis la vorton 'neŭtrala' en citosignojn. En la nunaj kondiĉoj, tute prave laŭ mi. Konsentite ankaŭ, ke el historio oni ja devas lerni. Se almenaŭ la vere neŭtrala Esperanto-Movado, sen citosignoj, povus iom lerni el la historio. Se ne el la historio, do almenaŭ el tiu ĉi artikolo de D. Blanke, kiu per si mem, eĉ se ekzistus neniu alia el la abundaj dokumentoj, klare montrus en kies manoj troviĝas UEA sub la nuna gvidantaro. Kompreneble, ke IPE kiel aparta organizaĵo ne estas necesa en la »nunaj historiaj kondiĉoj«, *se en tiuj »kondiĉoj« oni povas multe pli sukcese agadi sub la masko de »neŭtraleco« en la kadroj de la neŭtrala Esperanto-Movado por siaj partipolitikaj celoj.*

2.2 Plena perdo de memstareco

La vivo de la Esperanto-asocioj kaj societoj en Orienta Eŭropo, renaskiĝintaj post la milito kiel relative memstaraj organizaĵoj, estis tre mallonga. Kun la escepto de Asocio de Esperantistoj en Pollando kaj de Jugoslavia Esperanto-Ligo, kiuj seninterrompe konservis relativan memstarecon, ĉiuj aliaj eksilentis en 1949 kaj 1950. Nur la Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko iel eltenis ĝis la 6-a de septembro 1952, kiam ĝi »libervole« likvidiĝis laŭ la decido de sia komitato. Ili ĉiuj komencis reaperadi sur la scenejo nur post 1954; tamen, nun ne plu kiel memstaraj asocioj, sed kiel partoj de aliaj t.n. »amasaj organizaĵoj«, aŭ alimaniere sub firma kontrolo de la partio. Ankaŭ PEA estas nun plene sub kontrolo de la partio. La fakto, ke dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo, Soveta Unio kaj la orienteŭropaj delegacioj ne voĉdonis kontraŭ la konata Rezolucio favore al Esperanto de la 10-a de Decembro 1954, sed sin detenis (v. *EEP*, p-oj 730-773), certe estis unu el la faktoroj, kiuj ebligis al la Esperanto-organizaĵoj en tiuj landoj aliĝi al UEA: la pola aliĝis jam en 1955; sekvis la bulgara, hungara kaj, fine, nur en 1970 la ĉeĥa.

La kazo de Esperanto-Asocio en ĈSR kaj de la posta sorto de la Esperanto-organizaĵoj en Ĉeĥoslovakio havas aparte gravan instruan valoron por la nuna situacio. Post la milito EAĈSR aliĝis al UEA, kaj ĝia prezidanto, la misfama Adolf Malík (iaspeca orienteŭropa Connor), partoprenis la UK en Bournemouth (1949) kiel reprezentanto de la Ministerio de Informado. Pro mia nura membreco en la Estraro de UEA (cetere tute ne nova, ĉar mi fariĝis estrarano en 1938), Malík komencis disfamiĝadi kaj false denunciadi, ke UEA estas sub influo de »Titoismo kaj de reaktia imperiista politiko«. Oni ne forgesu, ke en tiu tempo la tuta t.n. »monolita stalinisma bloko« unuanime kaj plej akre atakadis la t.n. »Titoismon« ne nur kiel »perfidon de socialismo«, fakte

eoligus la registradon de la abonantoj. Ambaŭ proponoj estis rifuzitaj. Unu el la esperantistoj diris: »Oni devas havi veran komprenon por nia laboro. Se la partio eldonas en konfidencaj direktivoj devizon: *Kiel internacia lingvo estas Esperanto nedezirinda, kiel rimedo de propagando kaj porpaca batalo ĝi estas uzebla* – tion de kompartiano ekscias nepartianoj kaj certe tio influas konfidon kaj opinion de esperantistoj«. D-ro Jermář »demandas sub kia titolkapo ni korespondos kaj prezentiĝos, ĉu sub Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato aŭ Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato ĉe la Kleriga Instituto en Prago. K-do Konečný: pro la okcidento, kie oni povus kalumnii, ke la Komitato ne havas mandaton [konfidon] de la ĉeĥoslovaka esperantistaro, estus rekomendinde uzi nur ĈEK«. Do, evidente, se en la okcidento oni scias la veron, tiam el vidpunkto de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj ĝi estas »kalumnio«. Laŭ la raporto: »Oni konkludas, ke por enlando eblus uzadi la plenan titolon kaj por eksterlando nur ĈEK«.

(iii) *Ankaŭ la tria konfidenca raporto estas sen dato.* Ĝi rilatas al »la dua kunsido de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato la 12-an de marto 1958 en kafejo Waldek, Praha 12 je la 13.30 horo«. La raporto informas: »Unu horon antaŭe je la 12.30 h kunvenis samloke la komitatanoj-kompartianoj: D-ro J. Jermář, Adolf Malík, Josef Ambrož, Th. Kilian, D-ro Lud. Izák, D. Kočvara, Václav Špur. Je la 13.30 estis allasitaj la nepartianoj Josef Vitek, D-ro Magda Šaturova, Jiří Kořínek«. Mia komento: oni notu, ke unue sekrete kunsidas la kompartianoj (= membroj de la komunisto partio) kaj nur poste oni havas komunan kunsidon kun la nepartianoj. Dum tiu kunveno oni definitive rekomendis uzi nur la nomon Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (ĈEK) sen la kompletiga »ĉe la Kleriga Instituto en Prago«. La reprezentantino de la Ministerio de Instruado kaj Kulturo »k-ino Jiřina Mansfeldová konigas, ke la titolo ĈEK estas donita de la Ministerio; en enlando oni povus uzadi la kompletan titolon..., sed oni atentigas, ke ankaŭ alilande, ekz. en Hungario, ekzistas 'komitatoj' neelektitaj«. Efektive, kiel konate, la titolo ĈEK estis uzata por eksterlando.

Dum la kunveno estis pritraktita la demando de oficialaj rilatoj kun eksterlando, *precipe kun UEA*. Tiun parton meritas citi komplete:

»Adolf Malík rimarkigas, ke UEA ne invitis al la lasta UK Popolan Ĉinion [en tiu tempo PR Ĉinio troviĝis en la t.n. 'socialisma bloko' kaj estis rigardata kiel 'socialisma lando', *mia rim.*] sed nur ĉankajŝekan registaron.)* *Ni ne mistifiku la Ministerion pri la vera karaktero de UEA* [nome neŭtrala, v. supre, *mia rim.*], kaj oni ne veku impreson, ke oni en Ĉeĥoslovakio politike malmobilizas, male oni mobilizos. Kořínek atentigas pri la graveco de UEA, kiu estas la sola serioza kaj vere neŭtrala

*) Tiu informo estas malĝusta: fakte UEA invitis ambaŭ registarojn, tiun de PR Ĉinio pere de ĝia reprezentantaro en Ĝenevo.

kiu sin jam vidas ĉiopova prezidanto, lia buŝego preskaŭ ne fermiĝis... Ĉian sian parolon li direktas kontraŭ nia laboro, kontraŭ la klubo [rilatas al la Esperanto-Klubo en Prago, *mia rim.*] kiu laŭ li estas reakcia, ktp.« En la protesto de la klubo en Prago »oni dankas por la kreo de la Komitato, sed energie protestis kontraŭ Malík«, ĉar »li ne estas akceptebla pro liaj malbonaj karakteraj ecoj: despotismo, akuzado, kontraŭesperanta laboro kaj nepra malhavo de konfido de esperantistaro«. La raporto finiĝas per jenaj vortoj: »Intertempe verŝajne venis protestoj el aliaj lokoj. Tute certe ni scias pri forta protesto el Ostrava... Do, jen niaj zorgoj. La afero daŭras, la traktado ĉe la Ministerio estas senfina. Ni estas jam la lastaj en Eŭropo. Hispanujo kaj Salazara Portugalujo nin jam antaŭiris.«

(ii) *La dua konfidenca raporto estas sen dato.* Ĝi rilatas al la »interkonsiliĝo ĉe Ministerio de Instruado kaj Kulturo la 19-an de februaro 1958 je la 13-a horo, tria etaĝo, pordo 91«. La kunvenon malfermis »referento k-do Zd. Buřival. Ĉeestas por la Ministerio de Instruado kaj Kulturo k-ino Mansfeldová, por Kleriga Instituto en Prago ĝia direktoro Petr Konečný kaj por la Slovaka Komisiitejo k-do Horák«. Por la esperantistoj la kunvenon ĉeestis 10 personoj, inter kiuj A. Malík, Josef Vitek, Prof. Theodor Kilian, D-ro J. Jermář kaj Drahomir Kočvara (D. Kočvara nun estas komitatano A de UEA). Dum la kunveno estis interkonsentite, ke D-ro Jaromir Jermář estos prezidanto de ĈEK kaj Josef Vitek sekretario. El tiu plurpaĝa dense tajpita dokumento estu cititaj jenaj partoj, kiuj parolas per si mem (ĉiuj substrekoj estas de mi):

»K-ino Mansfeldová klarigas, ke ĈEK havas karakteron de konsulta kaj helpa kolegaro... Demandon ĉu estos presita Esp.gazeto respondas k-ino Mansfeldová negative. Estos plu nur bultenoj stencilitaj kiuj enhavu nur sciigojn de loka signifo *kaj samdirektigu kaj orientu la esperantistojn pri la senco de ilia internacia rilato.* La opinio de esperantistoj estas ofte tre naŭva, kiel ekz. petskribo de esperantistino pri pasporto en fremdan ŝtaton, 'kien ŝi estis de eksterlanda esperantisto invitita'. *Nedezirindaj estas ankaŭ la interŝanĝvizitoj reciprokaj...*«

La demando pri registrado de ĉiuj esperantistoj kun la evidenta celo kontroli iliajn rilatojn kun la eksterlando, tre interesis la reprezentantojn de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj. Petr Konečný diris, ke »por multaj esperantistoj estas Esperanto maroto (hobio) kaj ili eĉ ne konscias la politikan respondecon kiel eluzi sian internacian Esp.rilataron«. Li eksplicite diris: »*Ni ne celos disvastigi la vicojn de esperantistoj, sed la ĝisnunajn esperantistojn eduki kaj instrukcii pri la ĝusta konceptado kaj havigi evidenton* [registron, *mia rim.*] *de ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj*«. Du esperantistoj klopodis atingi, ke estu eldonita la lernolibro de Kilian kaj ke estu publikigata malmultekosta periodaĵo. Ili emfazis, ke la »registrado«, pri kiu tiel interesiĝas la aŭtoritatoj, ne estos sukcesa, sed ke malmultekosta bona periodaĵo estas abonata, kio samtempe

eoligus la registradon de la abonantoj. Ambaŭ proponoj estis rifuzitaj. Unu el la esperantistoj diris: »Oni devas havi veran komprenon por nia laboro. Se la partio eldonas en konfidencaj direktivoj devizon: *Kiel internacia lingvo estas Esperanto nedezirinda, kiel rimedo de propagando kaj porpaca batalo ĝi estas uzebla* – tion de kompartiano ekscias nepartianoj kaj certe tio influas konfidon kaj opinion de esperantistoj«. D-ro Jermář »demandas sub kia titolkapo ni korespondos kaj prezentiĝos, ĉu sub Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato aŭ Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato ĉe la Kleriga Instituto en Prago. K-do Konečný: pro la okcidento, kie oni povus kalumnii, ke la Komitato ne havas mandaton [konfidon] de la ĉeĥoslovaka esperantistaro, estus rekomendinde uzi nur ĈEK«. Do, evidente, se en la okcidento oni scias la veron, tiam el vidpunkto de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj ĝi estas »kalumnio«. Laŭ la raporto: »Oni konkludas, ke por enlando eblus uzadi la plenan titolon kaj por eksterlando nur ĈEK«.

(iii) *Ankaŭ la tria konfidenca raporto estas sen dato.* Ĝi rilatas al »la dua kunsido de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato la 12-an de marto 1958 en kafejo Waldek, Praha 12 je la 13.30 horo«. La raporto informas: »Unu horon antaŭe je la 12.30 h kunvenis samloke la komitatanoj-kompartianoj: D-ro J. Jermář, Adolf Malík, Josef Ambrož, Th. Kilian, D-ro Lud. Izák, D. Kočvara, Václav Špur. Je la 13.30 estis allasitaj la nepartianoj Josef Vitek, D-ro Magda Šaturova, Jiří Kořínek«. Mia komento: oni notu, ke unue sekrete kunsidas la kompartianoj (= membroj de la komunisto partio) kaj nur poste oni havas komunan kunsidon kun la nepartianoj. Dum tiu kunveno oni definitive rekomendis uzi nur la nomon Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (ĈEK) sen la kompletiga »ĉe la Kleriga Instituto en Prago«. La reprezentantino de la Ministerio de Instruado kaj Kulturo »k-ino Jiřina Mansfeldová konigas, ke la titolo ĈEK estas donita de la Ministerio; en enlando oni povus uzadi la kompletan titolon..., sed oni atentigas, ke ankaŭ alilande, ekz. en Hungario, ekzistas 'komitatoj' neelektitaj«. Efektive, kiel konate, la titolo ĈEK estis uzata por eksterlando.

Dum la kunveno estis pritraktita la demando de oficialaj rilatoj kun eksterlando, *precipe kun UEA*. Tiun parton meritas citi komplete:

»Adolf Malík rimarkigas, ke UEA ne invitis al la lasta UK Popolan Ĉinion [en tiu tempo PR Ĉinio troviĝis en la t.n. 'socialisma bloko' kaj estis rigardata kiel 'socialisma lando', *mia rim.*] sed nur ĉankajŝekan registaron.)* *Ni ne mistifiku la Ministerion pri la vera karaktero de UEA* [nome neŭtrala, v. supre, *mia rim.*], kaj oni ne veku impreson, ke oni en Ĉeĥoslovakio politike malmobilizas, male oni mobilizos. Kořínek atentigas pri la graveco de UEA, kiu estas la sola serioza kaj vere neŭtrala

*) Tiu informo estas malĝusta: fakte UEA invitis ambaŭ registarojn, tiun de PR Ĉinio pere de ĝia reprezentantaro en Ĝenevo.

kaj por praktikaj servoj ekipita organizaĵo, kiu estas en konsultaj rilatoj kun Unesko. Malik rekomendas *peti la Ministerion, ke ĝi mem informiĝu pri la karaktero kaj Statuto de UEA!* Li asertas, ke li ne insistas fondi novajn organizaĵojn [post kiam liaj klopodoj fiaskis, v. supre, *mia rim.*], sed *prefere penetri la jam ekzistantajn, sed volas garantian, ke oni tie ankaŭ atingos konforman influon...* Oni parolas pri la delegitaroj al la kongresoj nunjaraj. K-ino Mansfeldová atentigas, ke financa bazo por elsendo de oficiala delegacio ne estas certigita. Tamen oni elektas por la delegacio al Mainz D-ron Jermár kaj Kočvara [ambaŭ kompartianoj, *mia rim.*]. Malik avertas pri Okcidenta Germanio, kie estas brula grundo kaj la reprezentantoj estos elmetitaj al atakoj kaj intrigaj filologoj de la kapitalistaj agentoj. Veturu prefere nur unu tien. *Por ne antaŭedukita partoprenonto povus tio fariĝi lia fato.* Oni objetas, ke des pli bone estos, se veturos du. Mansfeldová ree atentigas pri *nedezirindeco* de reciprokaj interlandaj vizitoj. S-ino Ŝaturová demandas, ĉu eblus partopreni kongreson je propraj kostoj. Mansfeldová: ne eblas toleri la *kontraŭleĝan* reprezentadon ĉe la UK«.

Ankaŭ tiu ĉi kunveno longe okupiĝis pri la plej taŭga maniero registri ĉiujn esperantistojn kun la celo kontroli iliajn ligojn kun eksterlando. La direktoro de la Kleriga Instituto en Prago, Petr Konečný, proponis, ke oni aranĝu kiel ĉe filatelistoj: »Ĉiu esperantisto ricevos plenigotan karteton, kie li indikos sian adreson, okupon kaj en kiuj organizaĵoj li anas kaj ĉu li korespondas kun eksterlando, kaj post registrado li ricevos numeron«. [Pri la simila pozicio de esperantistoj kaj filatelistoj sub stalinismo v. *EeP* ĉap. 21.4.3, *mia rim.*]. Kiam oni atentigis, ke tiamaniere ne estos atingita la celo, Konečný diris: »Sufiĉos al ni, se ni registros 2000-3000 aktivajn esperantistojn. Mansfeldová rekomendas ke Kleriga Instituto alvoku la regionajn Domojn de Kulturo, ke ili prizorgu laŭeble kompletan evidentigon [registron, *mia rim.*] de ĉiuj esperantistoj. *Ni devos fine eligi la esperantistojn el la memcela korespondado.* Malik pledas por propono de Mansfeldová... ĉar oni konstatas, *ke korespondas ankaŭ amaso de frenezuloj*«. Superflue diri, ke »frenezuloj« estas tiuj, kiuj ne estas sufiĉe »politike edukitaj« kaj »ne konscias pri sia politika respondeco«, k.s., inter kiuj sendube troviĝas la verkintoj de la nun traktataj konfidencaj raportoj, kiel ankaŭ la personoj el diversaj orienteŭropaj landoj, kiuj donis informojn pri la antaŭhamburga komploto.

Sed ni revenu al la kunveno. Denove oni diskutis pri la lernolibro de Kilian, kiu eksciis, ke la presigo estis jam la duan fojon prokrastita »laŭ ricevita instrukcio«, kvankam »ĝi ja estis relaborita kaj reviziita de la kompetenta instanco«. Mansfeldová: »Sed pro motivo politika oni nun ree malebligis ĝian presigon... Vi vane klopodus interveni ĉe la preestro Satrapa; li povas kontraŭ rekta malpermeso nenion fari«.

El tiu ĉi tre ampleksa raporto estas cititaj nur kelkaj partoj. *Se oni komparas eĉ nur la cititajn partojn kun la nun valida agadprogramo de Bulgara Esperantista Asocio, pritraktota en la sekvanta sekcio de tiu ĉi dokumento, tuj fariĝas klara la esenca identeco de la pozicio kaj altruditaj*

celoj de la Esperanto-instancoj en la du landoj, kaj simile en la du aliaj orienteŭropaj ŝtatoj.

(iv) *La kvara konfidenca »resuma raporto«, same sen dato, concernas la kunvenon de ĈEK, okazintan la 11-an de julio 1958. A. Malik reaperas kiel la ĉefa funkciulo: »Laŭ invito de la 8-a ĝis la 10-a h [horoj, mia rim.] kunsidis la kompartia frakcio de ĈEK sub prezido de Adolf Malík. Je la 10-a horo estis allasita la ĉeestanta nepartia komitatano Jiří Kořínek kaj komenĉiĝis la komitata kunveno, kiun ĉeestis: prezidanto D-ro J. Jermář, Prof. T. H. Kilian, D-ro L. Izák, Josef Ambrož, Jiří Kořínek, Adolf Malik, Dra. Kočvara [nuna komitatano de UEA, mia rim.] por la Ministerio de Kulturo kaj Instruado k-dino J. Mansfeldová, por la Kleriga Instituto Olga Hillová«. La kelkaj aliaj nepartianoj ne ĉeestis pro »familiaj kaŭzoj«. »Josef Vitek sendis leteron, ke li ekŝiĝas el la funkcio de sekretario kaj de komitatano pro entreprenataj studoj kaj malbona sanstato... La prezidanto D-ro Jermář proponas elekti novan sekretarion, kiu nepre devas esti el Prago por laboroj de agokomitato, kaj ĉar tia persono estas nur A. Malik, li estis elektita kaj transprenis tuj la funkcion.« Laŭ la propono de Jermář kaj Malík, ĈEK estis kompletigita kaj en ĝin eniris 4 pliaj personoj, ĝis tiam tute nekonataj en la Esperanto-Movado de Ĉeĥoslovakio, ĉiuj kompartianoj. Por la unua fojo aperas la nomo de František Svítak – la sama, kiu ludis decidan rolon en la antaŭhamburga komploto kaj kiu estis anstataŭanto de D. Kočvara en la Komitato dum la kunsidoj de Hamburgo.*

Dum tiu kunveno la prezidanto »Jermář informas, ke la prezidanto de la Praga Klubo kaj ĉefdelegito de UEA, *Jaroslav Šustr*, estis antaŭ kelkaj semajnoj arestita kaj estas tenata en esplorkarcelo. La motivon oni ne sciigis eĉ al lia edzino, do oni ne scias ĉu estas politika motivo aŭ delikto deviza, ĉar la nomita peris abonadon de Esperantaj gazetoj por la tuta ŝtata teritorio. Ankaŭ informas la prezidanto, ke en 2-3 lokoj estis de oficoj [= ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj, mia rim.] ĉesigita la funkciado de tiulokaj Esperanto-grupoj«. Vidiĝas el la raporto, ke diversaj preparitaj aranĝoj, ekzemple Somera Esperanto-Kolegio, estis malpermesitaj de la aŭtoritatoj pro »politikaj motivoj«. Oni parolis ankaŭ pri MEM, sed, evidente, dum tiu kunsido oni ne havis ankoraŭ sufiĉe da informoj kaj oni hezitis, ĉar montriĝis, ke Rudolf Burda, la tiama reprezentanto de MEM por Ĉeĥoslovakio, estis »anarĥistema kaj estis antaŭnelonge eksigita el la kompartio«, kvankam – estas dirite en la raporto – Burda »estis kompartiano dekomence, ekde 1921«. Tiu ĉi relative eteta incidento bone ilustras la fakton, ke MEM devas esti plene en la manoj de plej obeemaj kompartianoj, certe ne de personoj suspektataj pri kia ajn »devojiĝo«, eĉ se ili estas jam delonge membroj de la komunista partio. Tion montras ankaŭ la decido: »Oni do interkonsentas mandati la ĉeĥoslovakajn pacdefendantojn

pri ilia sinteno al MEM tuj post la Stokholma Kongreso de Pacdefenda Movado; ĝis tiam prokrastite».

Pri la lernolibro de Kilian: »Al li estis jam la trian fojon redonita lia lernolibro, kiu estis aperonta pasintaŭtune; malgraŭ [tio], ke li ĝin plurfoje laŭpostule ellaboris [prilaboris], oni ĉiam pretekstas, ke ĝi ideologie ne konformas. Precipe la enmetitaj citaĵoj pri favoro de eminentaj komunistoj al Esperanto, ekz. Gorkij, Barbusse, Lenin, Zapotocký, ktp. tre incitas la instancojn. Ne helpas ke Kilian mem estas neniel malfavora [malfavorata] kompartiano«.

Poste A. Malík prezentis vastan programon pri uzo de Esperanto por progagandaj celoj, interalie eldonadon de dufolia monatzgazeto, eventuale kun nova nomo »Esperanta Informo«. La redaktoro »fariĝus Malik kun monatsalajro de 1450 Kĉs! La gazeto estus dissendata nur al disponigitaj eksterlandaj adresoj...«

Pri radio: »Malík informas, ke en radio ne estas dume ŝanco por Esperanto. Sed grave estas proponi al la oficoj [kompetentaj instancoj, *mia rim.*] monitoradon...de ĉiuj Esperantaj eksterlandaj elsendoj por kontroli la eventualan alilandan kontraŭ-ĉeĥoslovakon propagandon de Esp. elsendoj. Posteno pagota«.

Fine, Malík »rekomendas ĉesigi tuj eldonadon de ĉiuj Esperantaj bultenoj en Ĉeĥoslovakio, inkluzive la belaspektan junularan TAGIĜO kaj la same multobligitan »Esperanto en Slovakio«.

Pri abonado de gazetoj: »Malík sciigas, ke ni devos ĉesigi abonadon de Esperanto-gazetoj el okcidento: *Heroldo* [en tiu tempo neŭtrala, sub la redaktado de T. Jung, *mia rim.*] *Esperanto*, *Nica Revuo*, *Norda Prismo*, ktp.... Abonoj estu rezervitaj por *Nuntempa Bulgario*, *Pola Esperantisto*, *El Popola Ĉinio* [en tiu tempo en la »socialisma bloko«, *mia rim.*], *Armena Esperantisto*«.

Tiu stato daŭris ĝis la »ĉeĥoslovaka printempo« aŭ »socialismo kun humaneca vizaĝo« sub A. Dubček. La ĉeĥoslovaka esperantistaro ekesperis, ke fine ankaŭ por ĝi venis nova epoko. La gazeto *Zprávy*, organo de ĈEK, n-ro 1/1968, de majo skribis sur la unua paĝo:

»NI SALUTIS LA NOVAN EPOKON« kaj daŭrigis, nun sub plena nomo:

»ĈEK ĉe Kleriga Instituto en Prago, Esperantista Klubo en Prago, Konsultiga Komitato por Esperanto ĉe Kleriga Instituto en Bratislava, sendis salutleterojn al Prezidento Ludoviko Svoboda, al la unua sekretario de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio A. Dubček kaj al la unua sekretario de kompartio en Slovakio Vasil Bilak respektive... Kiel patriotoj-esperantistoj ni esprimis nian ĝojon kaj apogon al la renaskiga procezo. La honestaj esperantistoj ekde la liberigo de nia Respubliko klopodis bone propagandi ĝiajn socialismajn atingaĵojn, kulturon kaj naturbeliaĵojn. Bedaŭrinde, komence de la kvindekaj jaroj la memstara asocio estis likvidita kaj la esperantista preso ĉesigita... Ni petis niajn ŝtatajn kaj politikajn gvidantojn pri komprenemo kaj subteno de nia ideala libervola movado por povi

forigi la obstaklojn, kiuj ankoraŭ baras la vojon al la renovigo de nia memstara esperantista organizado kun propra preso».

Oni devus legi la amason da leteroj, kiuj alvenis dum tiu »printempo«, bedaŭrinde tro mallonga, por vidi la entuziasmon kaj kortuŝajn esperojn de nia ĉeĥoslovakia esperantistaro, kiu, malgraŭ la premoj kaj spitante multajn malfacilaĵojn, *rezistis endoktrinigon kaj restis fidela al humaneca internaciismo kaj politika neŭtraleco de UEA*. La vastaj tavoloj de la esperantistaro tra la mondo flegis la samajn esperojn. Fondiĝis Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kies prezidanto fariĝis la malnova aktivulo Josef Vitek. La apogo de la esperantistaro al la ĉeĥoslovaka »printempo« kaj la indigno pro la invado de 21.08. 1968, kiam la printempo finiĝis, montriĝis dum la UK en Helsinki (1969): la tuta kongreso tondre aplaŭdis la nuran aperon de J. Vitek, antaŭ ol li eldiris unusolan vorton de sia saluto dum la inaŭguro. Kaj mi tre esperas, ke tiu tondra aplaŭdo ne kaŭzis al li pli gravajn malfacilaĵojn en Ĉeĥoslovakio (*Esperanto*, 1969, p. 139).

Post tio la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio venis denove sub plenan kontrolon de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj. Konata esperantisto el Ĉeĥoslovakio skribis jam antaŭ la hamburgaj eventoj: »La prezidanto Josef Vitek estas bona homo, sed senpova. *Ili uzas lian nomon laŭ sia plaĉo*. La situacio en la Asocio [ĈEA, *mia rim.*] estas nun, kiel kutime en nia lando, nekonata al ni ordinaraĵoj, kaj nekontrolebla de ni. *La partio decidas ĉion*«. Tia plene kontrolata Ĉeĥa Esperanto-Asocio, fondita en 1969, aliĝis al UEA en 1970 kaj pere de siaj funkciuloj, inter kiuj bedaŭrinde ankaŭ J. Vitek, partoprenis en la komploto, kvankam la rolo de Vitek ne estas tute klara: ĉu li mem konsentis ludi tiun rolon, ĉu oni sukcesis »rompi« lin, ĉu oni tutsimple utiligis lian nomon sen lia konsento?

2.3 Inter Scila kaj Karibda

La aliĝoj de la orienteŭropaj landaj asocioj ekde 1955, kvankam principe bonvenaj, kaŭzis ankaŭ problemojn kaj seriozajn zorgojn. Unuflanke, la aliĝoj kontribuis al nombra kaj reprezenta fortikiĝo de UEA, nepre utila, eĉ necesa, por ĝiaj multdirektaj agadoj interne de la Movado kaj en la ekstera mondo; aliflanke, pro la karaktero de la politika reĝimo en tiuj landoj, oni devis atendi danĝerojn el vidpunkto de neŭtraleco kaj, sekve, ankaŭ universaleco de UEA. Kvankam, okaze de aliĝo, ĉiuj organizaĵoj (landaj asocioj) devas eksplicite deklari, ke ili akceptas la Statuton de UEA kiel devigan, tamen en la kazo de la orienteŭropaj landaj organizaĵoj necesis iom elaste interpreti la principon de neŭtraleco, se temis nur pri neesencaj malobservoj *interne* de la menciitaj organizaĵoj, rigore atentante, ke la maksimume eblaj limoj ne estu transpasitaj, kaj ke ne okazu esence gravaj atencoj

kontraŭ la neŭtralecon de UEA mem. La formulo, priparolita kaj interkonsentita en multaj konversacioj kun la tiamaj gvidantoj de la menciitaj landaj asocioj, estis simpla: prezentu, se vi volas aŭ devas, en viaj periodaĵoj kaj alimaniere vian ekonomian, socian kaj politikan sistemon, laŭdu viajn atingojn, *sed ne ataku la aliajn landojn kaj la principon de neŭtraleco de UEA*. Tiu formulo povis sufiĉe kontentige funkcii almenaŭ en la rilato al la koncernaj landaj asocioj (kvankam ne rilate al MEM) proksimume ĝis la UK en Londono (1971).

Estu menciita nur unu kazo, aparte grava, de tia »interkonsento«, ĉar ĝi estis farita sur la plej alta nivelo. En aprilo 1966, okaze de profesia studvojaĝo en Hungario, mi estis akceptita ankaŭ de la Vicprezidanto de la Respubliko kaj samtempe Alta Protektanto de la UK en tiu jaro, s-ro Ödön Kisházi. Ni priparolis la kongreson kaj, tute speciale, la demandon de neŭtraleco. Li esprimis timon, ke tia amasa kongreso kun multaj eksterlandanoj povus esti misuzata por kontraŭŝtata propagando, kaj mi garantiis, ke tio neniam okazas en niaj kongresoj, sed, se hazarde iu provus agi tiamaniere, la aŭtoritatoj tuj informu min. Siavice, mi klarigis la sencon de nia neŭtraleco laŭ la supra formulo. Li plene konsentis kaj promesis, ke la hungaraj aŭtoritatoj rigore observos la neŭtralecon de UEA. Efektive, la »interkonsento« estis lojale plenumita. La parolado de s-ro Ödön Kisházi en la inaŭgura solenaĵo de la kongreso estis senriproĉa el vidpunkto de neŭtraleco. Tiel grava estis la »interkonsento«, ke en la posta likvido de la incidento pro la neneŭtrala parolado de la ambasadoro de GDR (v. 1.3), la ambasadoro senkulpigis sin, ĉar – li diris – li nenion sciis pri la neŭtraleco de UEA kaj pri la interkonsento. Siavice, s-ro Rudolf Graetz (GDR), kiu ĉeestis kaj tradukis la konversacion, rekonis sian »kulpon«, ĉar li ne informis la ambasadoron pri la neceso observi la neŭtralecon. Espereble, R. Graetz, se li iam legos tiujn ĉi liniojn, ne neos tion. Tiamaniere la incidento estis facile likvidita. Ĝi estus ankaŭ forgesita, se en la antaŭhamburga kampanjo ĝi ne estus revivigita en krude kalumnia formo (»vi ofendis la ambasadoron de GDR«) fare de tiuj, por kiuj mi fariĝis faligenda »bastiono de neŭtraleco«.

La kaŭzoj, pro kiuj la formulo povis kontentige funkcii dum multaj jaroj, estis pluraj: *ekstere*, ĝenerala politika liberaliĝado en Soveta Unio kaj Orienta Eŭropo; *interne*, sufiĉe granda nombro da sinceraj esperantistoj-kompartianoj (ne politikaj karieristoj) en la gvidantaroj de pluraj orienteŭropaj landaj Esperanto-instancoj kaj, kompreneble, amaso da sinceraj esperantistoj nepartianoj; klarvidaj aktivuloj en la gvidaj pozicioj de multaj aliaj landaj asocioj; komitatoj de UEA periode elektataj konforme al la preskriboj de la Statuto, kaj ne per kontraŭstatutaj manipuladoj;

neŭtraleco de TEJO, kiu efike agadis konforme al sia Statuto proksimume ĝis la t.n. Deklaracio de Tyresö (1969). *Tamen, la ĉefa faktoro estis la senkompromisa defendo de la neŭtraleco fare de ĉiuj sinsekvaj Estraroj de UEA al kiuj la Komitato, esprimante la starpunkton de la granda plimulto de la membraro, donis ĉiam tiurilate sian firman apogon.* Tiu senkompromisa kaj unueca pozicio ebligis sukcese konservi la principon de aktiva neŭtraleco inter Scila kaj Karibda: la ekstreme dekstra danĝero estis likvidita en 1956, la maldekstra estis tenata en respektinda distanco ĝis Londono en 1971, kaj, per grandaj fortostecoĵoj, ĝis Hamburgo en 1974, kiam la trijara konspirado sukcesis eksplodigi bombon kaj detrui la tutan strukturon bazitan sur la principo de neŭtraleco.

3. POLITIKA KAJ KONTRAŬNEŬTRALECA PROGRAMO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

3.1 Instrumento de soveta politiko

Jam antaŭ la hamburgaj eventoj sinceraj bulgaraj esperantistoj atentigis min, ke la programo de Bulgara Esperantista Asocio (en la plua teksto BEA) estas ne nur tute politika laŭ enhavo, sed ke ĝi ankaŭ forĵetas neŭtralecon kaj senkaŝe atakas ĝin. Tiujn informojn konfirmis la direktiva artikolo de la Plenumkomitato de BEA pri »ideologia laboro«, publikigita en la *bulgara lingvo* en *Bulgara Esperantisto* n-ro 5/74, p-oj 3-4. En ĝi estas donitaj multaj »ideologiaj« instrukcioj kaj, interalie, eksplicite dirite, ke BEA devas »sisteme plibonigi sian partoprenon en UEA« kaj en aliaj Esperanto-organizaĵoj, »*tamen forĵetante la ideon de neŭtraleco*«. Tiu oficiala forĵeto de la principo de neŭtraleco sufiĉus per si mem por eksigi BEA el UEA konforme al art. 13 de la Statuto (v. supre en 1.2.).

Kvankam mi tuj klopodis havigi la programon, mi ne sukcesis. Mi ricevis ĝin de iu anonima sendinto en Bulgario nur kelkajn semajnojn post la UK en Hamburgo. Temas, fakte, pri Raporto de CK de Bulgara Esperantista Asocio al la landa Esperanto-kongreso en Smoljan (julio, 1972) sub la titolo »La taskoj de la Bulgara Esperantista Movado en la tutpopola batalo por konstruo de evoluinta socialisma socio«, kio en Bulgario kaj en landoj kun simila politika reĝimo estas multe pli ol nura programo, sed en la plua teksto, por simpligi la aferon, ĝi estos nomata »Programo«.

Tiu dokumento de 41 grandformataj paĝoj estas dividita en pluraj partoj. La unua parto (10 paĝoj) pritraktas la enlandan kaj eksterlandan politikan situacion. Unuavice estas emfazita la graveco de la 24-a Kongreso de la Komunista Partio de Soveta Unio (1971) kiel »la plej rimarkinda evento de tuta tutmonda socio«, kiu havas »eksterordinare gravan signifon por la plifirmigo de la ĉiuflanka potenco de Sovetunio« (p. 5). Inter la ekzemploj de la soveta »pacama politiko« estas menciitaj »la batalo de hindoĉinaj popoloj kontraŭ la usona agreso, kiel ankaŭ la helpo al la arabaj ŝtatoj kontraŭ la agreso de Israelo« (p.6).

Komprenble, »PR Bulgario entute subtenas la energian kaj celdirektitan pacaman politikon de Sovetunio« (p. 6). Tial PR Bulgario »kune kun Sovetunio kaj la aliaj socialismaj landoj« donas ĉiuf flankan helpon al la viktimoj de usona agreso en »ilia heroa batalo por la definitiva fiaskigo de la krimaj agresaj planoj de Usono« (p. 8). Krome, »la israelaj okupantoj devas fortiri siajn armeojn el la kontraŭleĝe forrabitaj arabaj teritorioj kaj subskribi packontrakton laŭ la [decido de la] Konsilo de Sekureco ĉe UN de 1967, kaj ne fari novajn aventuremajn provokojn kontraŭ la teritorioj kaj loĝantaro de la arabaj landoj« (p. 8). Ankaŭ »la kunvoko de konferenco por sekureco kaj kunlaboro de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj« havas »eksterordinaran signifon por la estonteco de Eŭropo kaj de la tuta mondo«. Aliloke: »Kvankam la tutmonda imperialismo kaj ĝia plej danĝera taĉmento – la usona imperialismo – travivis kaj travivas seriozajn malsukcesojn, ilia agresemo ne estas frakasita« (p. 7). Kaj ankoraŭfoje sur la sama paĝo: »... la grandaj socialaj kaj ekonomiaj bataloj en la plej grandaj kapitalistaj ŝtatoj montras, ke la monopoloj neglektas la interesojn de la popoloj, je kies nomo ili proklamas sian kontraŭpopolan politikon de rabado, ekspluatado kaj agresemaj militoj«. Ktp. en simila stilo.

Kio pli natura ol ke BEA, troviĝante inter la »agresa imperialismo« kaj la »pacema politiko« de Soveta Unio kaj de la socialismaj landoj, elektis la vojon de paco: »Ni, la bulgaraj esperantistoj, vidas en la pacamo de USSR kaj en ĝia necedema batalo por paco en la tuta mondo la ĉefan garantion por la ekesto de tiu revata de ĉiuj plej grandaj intelektoj de la homaro tempo, kiam la popoloj detruos la centjarajn barojn, kiuj ilin dividas, kaj ekvivis kiel unu granda frata familio, kiel oni kantas en la internacia esperantista himno«. Kia taŭga allogilo por tiuj sinceraj esperantistoj, kiuj fidas je la zamenhofa esperantismo, sed fakte ankoraŭ ne estas sufiĉe »politike edukitaj« por distingi klare inter la humaneca internaciismo de Zamenhof kaj la »pacama politiko« de Soveta Unio, kiun apogas la »socialisma bloko«, kaj kies instrumento, inter multaj aliaj, devas esti ankaŭ la Esperanto-organizaĵoj en »socialismaj landoj«, kiel klare vidiĝas el la Programo!

3.2 Proleta internaciismo kontraŭ humaneca internaciismo kaj neŭtraleco

La dua parto de la Programo estas dediĉita ĉefe al organiza kaj ideologia laboro (p-oj 10-31). Sur la unua loko troviĝas la tasko »eduki siajn membrojn en spirito de patriotismo kaj *proleta internaciismo*, en amo al la *tendaro de la socialismo* kaj paco utiligante Esperanton por plifirmigo kaj plivastigo de la ligoj kun la aliaj popoloj; kunhelpi per ĉiuj siaj rimedoj ankaŭ por konservo de la

paco en la mondo» (p.10). La Programo ankaŭ akcentas, ke PR Bulgario starigas siajn rilatojn kun la »nesocialismaj landoj« *konforme al la soveta koncepto de t.n. »paca kunekzistado«*. Nun venas la tasko:

»La bulgaraj esperantistoj devas alproprigi al si bone la sencon kaj enhavon de tiuj ĉi principoj, por povi en sia *praktika laboro* eliri el ili [agi laŭ ili, *mia rim.*] kaj de tiuj ĉi pozicioj partopreni en la batalo por paco sur la Balkanoj], en Eŭropo kaj en la tuta mondo sen enfali jen en *abstraktan internaciismon*, jen en *neŭtralismon*, *pacifismon*, *kosmopolitismon* aŭ en *aliajn malutilajn devoĝojn* [tendencojn] ... Ni devas subteni kaj klarigi la utilan laboron, kiun faras la Bulgara Komunista Partio... por stabiligo de la pozicioj *de la tutmonda revolucia movado kaj de la tutmonda paco*» (p-oj 10-11).

Tiel do: »for la neŭtralismon!«, »for la pacifismon!«, »for la kosmopolitismon!« for ĉion kun la escepto de proleta internaciismo. Krome, nepre por monda paco en la senco de la soveta koncepto de monda paco kun *samtempa* apogo al tutmonda revolucia movado, kiu, kompreneble, estas tute ebla konforme al principo de »paca kunekzistado« de la ŝtatoj kun malsamaj politikaj sistemoj surbaze de »reciproka respektado de ŝtata suvereneco kaj teritoria tuteco, sen enmiksiĝo en la internajn aferojn de kiu ajn lando«. Bela miksaĵo de kontraŭdiroj por tiuj, kiuj preferas kredi al la vortoj ol al la faktoj.

Por ke ne estu kia ajn dubo rilate la aplikon de la »proleta internaciismo« la Programo listigas la internaciajn aranĝojn, kiujn partoprenis bulgaraj Esperanto-delegacioj. Sekvas jena parteto:

»Laŭ tiu maniero kun [per] sia partopreno en la *internacia agado* de la esperantista movado la bulgaraj esperantistoj fakte sin edukadis en spirito de *proleta internaciismo*, montris altan socialistan konsciencan, donis esprimon de sia *klasa patriotismo* rilate al la teoriaj kaj *praktikaj* demandoj *de la internacia esperantista movado*» (p-oj 38-39; ĉiuj substrekoj en tiu ĉi parto estas miaj).

Tamen, ŝajnas ke la Centra Komitato ne estas tute kontenta pri la sinteno de la bulgaraj reprezentantoj en diversaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj. Ĝi aplikas al si mem la t.n. »memkritikon«:

»Ne estas plene kontentiga la laboro de CK de la Asocio rilate la *instrukiadon de la forirantaj* [forirantoj] *al eksterlando*, kiel ankaŭ *ĉe la selektado de la personoj kaj grupoj*, kiuj faras *paŝojn por forveturo eksterlanden*. Estas ankoraŭ kion [multo por] fari por la plialtigo de la *disciplino kaj socialisma konscienco* de la esperantistaj partoprenantoj en aranĝoj kun internacia karaktero ĉe ni aŭ en eksterlando» (p. 39).

La afabla leganto estas ankoraŭfoje petata relegi 2.2 supre kaj kompari precipe la enhavon de la konfidencaj raportoj rilate la »politikan edukitecon« de esperantistoj havantaj eksterlandajn rilatojn kun la prezentitaj partoj de la Programo.

Kiel oni vidas, »*proleta internaciismo*«, kiun ni jam menciis

plurfoje en ligo kun IPE (2.1) kaj la fiasko de Malík (2.2) nun reaperas en la sino mem de la neŭtrala Esperanto-Movado, se ĝi, en tiaj kondiĉoj, povas entute esti rigardata kiel neŭtrala. Venis la momento diri kelkajn vortojn pri la koncepto de »proleta internaciismo«, ĉar multaj esperantistoj tre kredeble ne havas tiurilate klaran ideon.

El la tuta marksisma doktrino sekvas, ke Marx kaj Engels komprenis proletan internaciismon kiel internacian solidarecon de la laboristaro en ĝia klasa batalo kontraŭ la burĝaron, kontraŭ la tutan kapitalisman socion. La *Komunista Manifesto* asertis, ke pro la evoluo de la burĝaro, pro la libereco de internacia komerco, pro la monda merkato kaj unueciĝado de la produktomaniero, la naciaj diferencoj kaj antagonismoj jam tiam estis malaperantaj. La Manifesto atendis ke »la superrego de la proletaro kaŭzos, ke ili malaperos eĉ pli rapide«. El tiel komprenata klasa solidareco, kiu estis anstataŭigonta la nacian solidarecon, devis sekvi reciproka helpo de laboristoj tra la mondo, malebligo de militoj bazitaj sur naciaj interesoj kaj, fine, kreigo de monda senklasa socio. Ĉar Detlev Blanke kaj aliaj »marksistoj« en »socialismaj landoj« devas paroli la marksisman lingvon aŭ, pli precize, la marksisman-leninisman lingvon (pli frue ankaŭ stalinisman), dum mi, se necese, povas paroli ankaŭ tiujn lingvojn en debatoj, ili agus tre saĝe, se ili studus iom pli atente la originale *marksisman* koncepton de proleta internaciismo por mem konstati ĝis kiu grado ĝi estas aplikata inter la »socialismaj landoj« mem, ekzemple pli frue inter Soveta Unio kaj Jugoslavio, aŭ nun inter Soveta Unio kaj Ĉinio. Nu, ni lasu tion kaj ni vidu kio okazis al tiu koncepto en Soveta Unio.

Sub la rigardo de Stalin, internaciismo en la ordinara senco de la vorto estis nomata »burĝa kosmopolitismo« kaj rigardata kiel grava devojiĝo. Male, la »ĝusta« internaciismo estis nomata »proleta internaciismo« kaj difinita de Stalin mem jene:

»Internaciisto estas tiu, kiu senrezerve, senhezite, senkondiĉe, estas preta protekti USSR, ĉar USSR estas la bazo de la monda revolucia movado, kaj protekti, progresigi tiun revolucion movadon ne estas eble sen protekti USSR. Ĉar tiu, kiu pensas, ke li protektas la mondan revolucion movadon aparte de USSR kaj kontraŭ ĝi, iras kontraŭ la revolucion kaj necese glitas en la tendaron de la malamikoj de la revolucio« (J.V. Stalin, *Verkoj*, Moskvo, 1953, vol. X, p. 51).

Tiu koncepto restis neŝanĝita ĝis hodiaŭ, kiel vidiĝas el la tuta soveta politika kaj internaciigita literaturo.

Evidente, eĉ se forestus la eksplicita forĵeto de neŭtraleco, eĉ se neŭtraleco ne estus atakata kaj primokata, la koncepto de *proleta internaciismo* estas *absolute kontraŭa per si mem* al koncepto de aktiva neŭtraleco kiel formulita en la Statuto de UEA. Dum la Statuto celas progresigi *humanecan internaciismon* per faciligo de ĉiaspecaj intelektaj kaj materiaj rilatoj inter la homoj, sen kia ajn diferenco

pro nacieco, raso, religio, *politiko* aŭ lingvo, la *stalinisma proleta internaciismo postulas absolutan submetiĝon al la politiko de Soveta Unio*, kiel montrite en la Programo kaj en la tuta sinteno de orienteŭropaj landaj organizaĵoj.

La nuna situacio esence diferencas disde la situacio ĝis 1971, kiam, kiel montrite en la antaŭa sekcio, estis respektata la neŭtraleco de UEA. Por ke ne okazu kia ajn miskompreno, estas necese diri ankoraŭfoje, ke, kompreneble, ĉiu rajtas havi siajn proprajn politikajn aŭ aliajn konvinkojn; ĉiuj samopiniantoj aŭ samkredantoj, same kompreneble, rajtas formi siajn proprajn landajn aŭ internaciajn organizaĵojn, sed en UEA mem ili devas respekti la neŭtralecon de la Asocio. Ekzistis kaj plu ekzistas internaciaj neneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj (ekz. de katolikoj, kristanoj, kvakeroj), sed ili agas *ekster la kadroj* de UEA kaj certe eĉ ne venis al la ideo altrudi siajn konceptojn al UEA aŭ subfosadi la neŭtralecon de la Asocio el ekstere, ankoraŭ malpli interne. Nenio malhelpis, ke ankaŭ la orienteŭropaj landaj asocioj formu sian propran internacian organizaĵon laŭ la modelo de SAT, aŭ IPE, aŭ kiu ajn alia politika organizaĵo, kun kiu UEA povus havi eĉ kontraktajn rilatojn konforme al la Statuto (v. 1.2). Pri tio mi atentigis ankaŭ en la *Aprila Artikolo*, post kiam mi eksciis pri la minacanta atenco kontraŭ la neŭtralecon de UEA mem fare de la orienteŭropaj evidente politikaj Esperanto-organizaĵoj, *plene dependaj de politikaj faktoroj kaj agantaj laŭ la instrukcioj de tiuj faktoroj*. Bedaŭrinde tio ne okazis. Kaj intertempe la gvidaj instancoj ne nur de BEA, sed ankaŭ de la aliaj orienteŭropaj landaj organizaĵoj perfektigis la »disciplinon kaj socialisman konsciencon« de siaj homoj en la Komitato de UEA kaj precize »instrukciis« ilin, kiel postulis la »memkritiko« en la Programo.

3.3 MEM, paco kaj neŭtraleco

Mondpaca Esperantista Movado estis fondita en 1953 de kelkaj aŭstriaĵ esperantistaj »pacbatalantoj«. En Orienta Eŭropo, ekzemple en Ĉeĥoslovakio, en la komenco oni hezitis ĉu apogi ĝin (v. 2.2 (iii)). Baldaŭ ĝi venis plene sub la kontrolon de la gvidantoj de orienteŭropaj Esperanto-organizaĵoj, siavice sub la plena kontrolo de la komunistaj partioj en tiuj landoj. La nuna prezidanto de MEM estas N. Aleksiev, samtempe prezidanto de BEA, samtempe membro de la Monda Packonsilantaro kun formala sidejo en Helsinko, siavice *plene sub la kontrolo de la KP de Soveta Unio*. Eĉ dum la UK en Hamburgo N. Aleksiev aperte informis la kunvenon de MEM »pri la platformo *aprobata de la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj en Moskvo*« (ĉeĥa Starto, n-ro 6/74). Ĉiuj gvidantoj de la orienteŭropaj Esperanto-organizaĵoj estas samtempe la ĉefaj aktivuloj en MEM.

En la lasta parto de la Programo (p-oj 31-41) estas traktataj la

internaciaj agadoj, inter kiuj elstaran lokon okupas MEM. Tiurilate la Programo instrukas: »Speciale bona estas la efekto, kiam la fortoj de la Esperantistaj movadoj el la socialismaj landoj unuiĝas kun tiuj de la reprezentantoj de demokratiaj kaj progresemaj esperantistoj el aliaj landoj« (p. 31). Apenaŭ necesas klarigi kion signifas tiuj vortoj: »demokratiaj kaj progresemaj« esperantistoj estas tiuj, kiuj, kvankam ne membroj de la komunista partio, tamen plene apogas ĝiajn agadojn kaj estas utiligataj por ĝiaj celoj, en tiu ĉi kazo propagandado de la soveta koncepto pri paco, ligita al la soveta koncepto de »paca kunekzistado«, »proleta internaciismo« kaj kunligitaj konceptoj. Tiuj apogantoj estas kutime nomataj »kamaradoj-kunvojaĝantoj«. Tiu doktrino forĵetas »pacifismon«, kiel montrite supre, sed utiligas ĉiujn pacifismajn tendencojn por lerte subigi ilin al la *propra koncepto de paco*. Ankaŭ tiu manovro ne estas io nova. Ĝi estis ellaborita de Ĉiĉerin, tiama komisaro por eksterlandaj aferoj, kaj aprobita de Lenin en la letero de la 14-a de marto 1922 antaŭ la forveturo de Ĉiĉerin al la konferenco de Ĝenovo (ne Ĝenevo). El tiu dokumento vidiĝas, ke la ĉefa celo de la soveta delegacio estis atingi utilajn komercajn rilatojn kun la kapitalista mondo kaj havigi tiucele la apogon de ĉiuj pacifistaj kaj aliaj porpacaj fortoj, eĉ religiaj, se nur ili povas esti utilaj por la soveta politiko. Lenin skribis, ke tiu »pacifista programo estas absolute admirinda« kaj ke ĝi »senmoraligos la malamikon«. Idente: dum la Programo de BEA *oficiale* forĵetas »pacifismon, »abstraktan« *internaciismon*, kosmopolitismon, *neŭtralismon* kaj aliajn malutilajn devojiĝojn«, samtempe la Monda Packonsilantaro kaj ĝia filio MEM *lerte utiligas tiujn »devojiĝojn« por la celoj de la soveta politiko*.

La Programo daŭrigas:

»La Centra Komitato de BEA klopodis partopreni regule en la kunvokitaj dum la raportita periodo ĉiujaraj konsultaj renkontiĝoj kun reprezentantoj de la esperantistaj movadoj el la socialismaj landoj [tiuj renkontiĝoj konsiderinde multiĝis antaŭ Hamburgo, mia rim.]. Tiuj ĉi renkontiĝoj estas utila formo por *kristaliĝo de niaj pozicioj pri vico da gravaj demandoj de la internacia esperantista movado*, pli speciale – pri kunlaborado kun la Mondpaca Esperantista Movado« (p-oj 31-32).

Oni vidas, ke esence la samaj personoj kiel gvidantoj de la Esperanto-organizaĵoj en tiuj landoj diskutas kun si mem kiel reprezentantoj de MEM, alivorte priparolas la utiligon de MEM por penetrado en la neŭtralan Esperanto-Movadon, kaj aliflanke *misuzas la sinceran pacamon de la esperantistaro* por altiri ĝin al la celoj de MEM. Sekvas informoj pri pluraj kunvenoj de MEM dum la UK en Vieno, Madrido, Helsinki kaj Londono. En Madrido la ĉefa temo de MEM estis »la agreso de Israelo kontraŭ la arabaj landoj kaj la progresemaj reĝimoj en iuj el ili«. Estus interese vidi

kiel reagus la pacamantoj de MEM, se iu venus al la ideo organizi kunvenon, ni diru, en Sofio pri la invado de armeoj de socialismaj landoj (kun escepto de Rumanio) en Ĉeĥoslovakion *laŭ la principo de proleta internaciismo*. Kiel estas manipolataj la decidoj de tiuj kunvenoj de MEM, montras la daŭrigo: »Kvankam la cionistoj kaj iliaj adeptoj en aliaj landoj provis refuti la tezojn de nia raporto, post la donitaj aldonaj respondoj de la metitaj en la diskutado demandoj, la proponita de MEM deklaro estis unuanime akceptita« (p. 33). Ĉu, do, por ĝi voĉdonis ankaŭ la »cionistoj kaj iliaj adeptoj«, aŭ eble ili forkuris el la konveno?*)

En *Esencaj Kaŭzoj* mi skribis, ke la malobservadoj de neŭtraleco tra MEM estis iel tolereblaj, »ĉar la antaŭaj estraroj de UEA povis ĉiam pruvi, ke MEM ne estas UEA, kiam ajn MEM per siaj politikaj kunvenoj en la universalaj kongresoj kaj per siaj politikaj rezolucioj kaŭzis al UEA malagrablajn ĝenojn interne de la Asocio kaj gravajn malfacilaĵojn antaŭ la aŭtoritatoj«.

Tuta libreto ne sufiĉus por prezenti la menciitajn malagrablaĵojn kaj malfacilaĵojn. Almenaŭ kelkaj estu menciitaj. Post la UK en Harrogate (1961) mi estis vokita en mia tiam funkcio de ĝenerala sekretario de UEA al la Ministerio pri Eksteraj Aferoj pro la politikaj incidentoj de MEM dum la UK, kaj mi devis klarigi detale, ke MEM ne estas UEA, nek apartenas al ĝi. Dum la UK en Tokio (1965) la Honora Prezidanto de UEA kaj prezidanto de tiu kongreso, Harry Holmes, devis persone interveni por forigi el la kongresejo la Esperantan flagon kun politikaj sloganoj. Eĉ la polico devis interveni. Dum la UK en Helsinki (1969) MEM distribuadis en la kongresejo siajn periodaĵojn kun rektaj atakoj kontraŭ la neŭtralecon de UEA. En *Paco* de septembro/oktobro 1968, p. 2 aperis artikolo de Prof. Bokarev pri la homaj rajtoj, en kiu estis dirite: »Kaj ni ne povas ne kondamni tiujn agantojn de la *Esperanta Movado*, kiuj, deklarante sin 'neŭtralaj' kaj *starantaj ekster politiko* ne deziras rimarki la agresan politikon de imperiismo«. En la julia n-ro de 1969, publikigita senpere antaŭ la kongreso, aperis forta atako kontraŭ UEA sub la titolo »Sanganta vundo de la Esperanto-Movado, neŭtraleco«, en kiu, interalie, estis menciita la »perfortaĵo en Tokio, la konfisko de

*) En sia letero de 25.09.75 Mag. 1. Dratwer respondis al la demandesigno per jena klarigo pri tiu plia falsaĵo: »Vero estas, ke la Rezolucio proponita de la gvidantaro de la MEM-kunveno, spicita per la plej tendencaj, falsaj, eĉ mensogaj sloganoj pri »usona imperiismo«, »israela agreso« k.s. elvokis pasian replikadon, kiun partoprenis mi, mia edzino, ges-roj Benazet el Francujo kaj multaj aliaj, kies nomojn mi forgesis. Kiam la gvidantaro de la kunveno konstatis, ke la proponita de ili Rezolucio havas *nenian* ŝancon esti akceptita, ĝi proponis novan, tute sterilan politike Rezolucion, alvokantan ĝenerale batali por paco. Kiu ja estas kontraŭ la paco? Tiam por ĝi voĉdonis ankaŭ ĉiuj »cionistoj kaj iliaj adeptoj«. (Pri misprezento de la fakto aparte mi skribas al BEA)«.

flago kontraŭ la usona agreso». Tiuj agoj estis kontraŭaj ne nur al la Statuto de UEA, sed ankaŭ al la Kongresa Regularo, kiu malpermesas misuzon de la kongreso por politikaj celoj. El la letero de d-ro Sadler de 22.08.1959 al s-ro H. Parker, tiama komitatano de UEA en Britio, kiu protestis pro tiu malobservo de neŭtraleco, sekvas, ke d-ro Sadler ja konfiskis grandan kvanton de tiuj periodaĵoj en la kongresejo mem, sed post tio la koncernaj membroj de MEM distribuadis ilin ekster la kongresejo, precipe en la hotelo Otaniemi. Aparte interese estas, ke ankaŭ Prof. Bokarev skribis, ke la »kontraŭsoveta tendenco de la revuo *Esperanto* endanĝerigas lian kunlaborsan kun UEA« (!) Alivorte, *la neŭtraleco de UEA*, la »starado ekster politiko«, la nekondamnado de la »agresa politiko de imperiismo« *el soveta vidpunkto* endanĝerigas la kunlaboradon kun UEA eĉ por tiel eminenta esperantisto, kiel Prof. Bokarev. Kaj tio estas »kontraŭsoveta«. Aŭ, eble, la aplaŭdoj, kiujn ricevis Vítek dum tiu kongreso kaj pri kio informis *Esperanto* per 4 linioj en la septembra numero, p. 139, estis tiu »kontraŭsoveta tendenco«.

Aparte ĝena estis la politika agado de MEM dum la UK en Vieno (1970). La mondfama londona *The Guardian* de la 29-a de septembro publikigis artikolon de sia kunlaboranto Simon Hoggard. Parolante pri la kunveno de MEM, la raportisto skribis, ke »la esperantistoj estas pacama speco de homoj, kaj multaj estis allogitaj de organizaĵo, kiu fakte *dediĉas la plej parton de sia tempo por disvastigi komunistan propagandon...*« La artikolo priskribas la kunvenon de MEM en Vieno kaj la proponitan rezolucion, kiu »kondamnas la imperialistajn militincitanojn de Usono, Britio, Germanio kaj Israelo«. La raporto informas: »Kiam la ne-membroj de MEM malsukcesigis la proponon, la kunveno degeneris en viglan disputon, dum kiu la oficialuloj de MEM klopodis distribui literaturon publikigitan en Orienta Germanio kaj Bulgario«. Vidiĝas el la raporto, ke ĉi-foje s-ro H. Platt, la sekretario de la brita BEA, devis doni klarigojn pri tio, ke UEA estas neŭtrala kaj ke MEM ne apartenas al ĝi. Sed tio estis en 1970, ne en 1974!

Kaj same tiel de unu kongreso al alia, de unu malobservo de neŭtraleco al alia. Pro la neŭtraleco de UEA, la revuo *Esperanto* kaj aliaj publikaĵoj de UEA estis dum jaroj konfiskataj en GDR kaj eble ankoraŭ estas (?). La periodaĵo *der esperantist*, n-ro 3-4/1972, tute aperte skribis, ke ĝi bazas sian laboron »je la principoj de nia socialisma socio« kaj tio signifas: »plena ideologia novorientiĝo kaj *malakcepto de neŭtralismaĵoj*, anarkismaj kaj aliaj utopiaj ideoj«. Kaj la hungara *Eszperantó Magazin* de januaro 1975, do post la sukcesinta hamburga puĉo, ankoraŭfoje konfirmis:

»Ni ne faru sekreton el tio, ke ni akceptas la socialismon kun ĝiaj instruoj kaj institucioj, krome ni jam *ne* estas pacifistoj, kiuj estis niaj avoj kaj patroj, *sed ni estas pacbatalantoj*, kiuj *ne* respektas la neŭtralecon en gravaj aferoj de la vivo kaj socio«.

Tiuj vortoj estas skribitaj ne en organo de MEM, sed en la oficiala organo de Hungara Esperanto-Asocio, aliĝinta al UEA, kies komitatoj plej aktive partoprenis en la komploto. La masko de hipokriteco estas forĵetita. Fine, ankoraŭ en ligo kun MEM, estas utile menciiti la artikolon de d-ro Adolf Halbedl, publikigita en *Internaciisto*, n-ro 3/1975, en kiu la aŭtoro, membro de MEM, jubilas pro la hamburga puĉo, aperte atakas la ĝishamburgan politikon de neŭtraleco de UEA, ĉar: »Se la erara politiko de estinta UEA ne estus ankoraŭ aktuala, ĝi havus jam la potencon subtenadon de l'amaso movado por mondpaco, kiun akiris por si *kaj Esperanto sola* MEM, fondita nur pro la plendiga nesufiĉo de UEA sur ĉi tiu plej grava kampo de homa agado...« Kiel kutime, sekvas atakoj kontraŭ min pro tiu »erara politiko de UEA«.

Tre klera esperantisto, apartenanta al la pli juna generacio, skribis al mi pri tiu artikolo komence de marto 1975:

»La enhavo, verkita en delira lingvaĵo, ne meritas, ke oni pri ĝi ekscitiĝu, sed interese estas, ke Halbedl, katolika 'fellowtraveller' [kamarado-konvojaĝanto] de MEM, pli malkaŝe ol la gvidantoj de MEM esprimas la postulojn, ke UEA 'vere' neŭtraligu kaj ke ĝi rezignu la 'eraran politikon' de ne-samdirektiĝo kun MEM«.

Per sia letero de 27.01.1975, skribita en simila »delira lingvaĵo«, d-ro Halbedl eksciĝis el Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ), ĉar tiu faka organizaĵo eksciĝis el UEA pro la eventoj de Hamburgo. Siavice d-ro Röhl, la sekretario de IEAJ, kiu pro la eksciĝo ĉesis esti komitatano A de UEA, informis la membrojn kaj sendis al ili sen kia ajn scio de mi kiel prezidanto, cirkuleron en simila stilo. Efektive, oni devus ne nur ne maltrankviliĝi pro tiuj skribaĵoj, sed eĉ ne menciiti ilin, se ili ne estus interesa manifestiĝo de la ĝenerala politika infektiĝo de la neŭtrala Esperanto-Movado, parte eĉ IEAJ.

3.4 Junularo

La Programo en pluraj lokoj instrukcias pri la »taskoj« de la Junulara Sekcio de BEA. La ĉefa tasko estis »elekti stabilan estraron« konscian pri »siaj devoj rilate la altiron de junaj esperantistoj« kaj »alceligon de ilia agado« (p. 19). Pri tiu »alceligo« kaj entute pri ĉiuj problemoj »oni devas labori pli intime kun la Komsomolo« t.e. kun la komunista junularo. Kiel bonan ekzemplon de aranĝo sur alta *politika* kaj arta nivelo, la Programo mencias la Junularan Festivalon en Jambol (1971). »Kune kun la neesperantista komsomola junularo de la urbo la festivalanoj organizis grandan junularan mitingon sub la slogano 'La junularo akuzas la imperiismon'«, do la sama, *kiun havis kiel ĉeftemon ankaŭ unu el la renkontiĝoj de TEJO*.

La ŝtataj-partiaj »internaciaj komitatoj« de PR Bulgario »altrudas al la bulgaraj esperantistoj doni helpon al la esperantistoj precipe en la kapitalismaj landoj *pri ilia ĝusta orientiĝo kaj efektiviĝi ideologian reziston al la neĝustaj kaj malutilaj komprenoj kaj agoj*« (p. 31). Tradukite en ordinaran lingvon, tio signifas tutsimple fari partipolitikan propagandon. La sama »tasko« validas ankaŭ por la junulara sekcio, de kiu »la internacia junulara esperantista movado... rajte postulas pli grandan aktivecon kaj iniciatemon, des pli, ke en la medioj de la junuloj kaj studentoj, precipe en okcidentaj landoj estas iam malutilaj enlogiĝoj al modaj ekstremistaj tendencoj. La aktiveco de niaj junuloj *influas pozitive por la ĝusta orientiĝo de multaj honestaj, sed erarigitaj junuloj*« (p. 18).

Ke tiu »aktiveco« de la »politike edukitaj« gvidantoj de la junularaj sekcioj en la »socialisma bloko« estis fruktodona, klare montras la politikigo de TEJO kaj, rezulte, ĝia degenero.

4. UNUPARTIA POLITIKIĜO DE TEJO

4.1 Deklaracio de Tyresö (1969): komenciĝo de la fino

La nuna Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) estis fondita en 1957, kiam la Komitato de UEA aprobis ĝian novan Statuton, kaj TEJO fariĝis junulara sekcio de UEA (art. 2.). Laŭ tiu Statuto TEJO estas politike neŭtrala organizaĵo, kies celo estas disvastigi la Internacian Lingvon inter la junularo, labori por la enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj praktike utiligi la lingvon (art. 4 kaj 5).

La tiama kaj postaj centraj organoj de UEA donis al TEJO maksimuman helpon, interalie per tre malaltaj kotizoj por junaj individuaj membroj kaj favoraj aliĝkotizoj por la universalaj kongresoj, rektaj subvencioj, teknika helpo de la CO, ktp. Kiel ĝenerala sekretario de UEA mi mem helpis la tiamajn aktivulojn kompili la Statuton de TEJO kaj ĉiufanke kuraĝigis iliajn agadojn. Pro tiu helpo TEJO elektis min Honora Membro kaj proklamis la honorigon dum la UK en Mainz (1958). La rilatoj inter la Estraro de UEA kaj tiu de TEJO estis dum multaj jaroj viglaj kaj plej harmoniaj. Eĉ *Kontakto*, la organo de TEJO iniciatita de H. Tonkin, estis fine lanĉita en mia hejmo dum unu el la multaj interkonsiliĝoj pri kiel eble plej efika agado por Esperanto en junularaj medioj. En tiu tempo TEJO efektive atingis multajn rimarkindajn rezultojn.

TEJO ĉiam ĝuis grandan memstarecon kaj liberecon de agado, sed tiu libereco devis ne transiri la limojn de neŭtraleco. Fakte, kvankam iom elaste, TEJO lojale observadis ĝin ĝis Tyresö. Krome, necesis ne forgesi, ke TEJO ne havis kaj ne havas juran personecon, sed estas *sekcio de UEA*, kio signifas, ke *el politika kaj financa vidpunktoj UEA respondecas pri ĝiaj agadoj kaj financaj sindevontigoj*.

Ĉio-ĉi ŝanĝiĝis post la t.n. Deklaracio de Tyresö, kiun akceptis la 25-a kongreso de TEJO komence de aŭgusto 1969. En la Antaŭparolo al *EeP* mi atentigis, ke kelkajn eventojn prezentitajn en la verko mi mem »interpretas iom alie, ol tion faris unu aŭ la alia el la kunaŭtoroj en siaj respektivaj partoj«, sed ke mi neniel deziris altrudi mian opinion (p. xxx). Unu el tiuj eventoj estas la

menciita Deklaracio, kiun U.Lins, la verkinto de la ĉapitro pri TEJO, rigardas kiel »mejloŝtonon en la historio de TEJO« en pozitiva senco (*EeP*, p. 544-5), dum mi rigardas ĝin kiel mejloŝtonon en negativa senco pro kaŭzoj, kiujn mi eksplikos sube. Fakte, la Deklaracio *per si mem* ne estas malbona, nek ĝi tuŝas la neŭtralecon. Ĝi eĉ ne alportas ion esence novan (v. la tekston en *EeP*, p. 544) ĉar ĉiu serioza studanto de la lingva problemo scias jam delonge, ke »lingvo estas realaĵo ligita al sociaj kaj politikaj fenomenoj«; ke »ĉiuj ajn aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj«; ke »detruado de la kultura kaj lingva fono de multaj popoloj... estas nenio alia ol instrumento de lingva imperiismo«, k.s. Ĉiuj menciitaj sociaj kaj politikaj aspektoj de la lingva problemo, aldone al multaj aliaj, estis traktataj de CED kaj de mi persone en multaj studoj kaj artikoloj longe antaŭ la Deklaracio de Tyresö. Kaj neniu kiam ajn venis al ideo rigardi tian seriozan, science objektivan traktadon de la lingva problemo kiel ion kontraŭan al neŭtraleco. Sed en la vicoj de TEJO mem, la Deklaracio de Tyresö – verkita sub la influo de la fragila kaj mallongdaŭra t.n. »junulara ribelo«, kiun la iniciatintoj de la Deklaracio verŝajne rigardis kiel ian solidan fenomenon, en kies kadro oni povus formuli ian novan »politikon« – estis tuj interpretita kiel forĵeto de neŭtraleco kaj kiel signalo por liberaj partipolitikaj agadoj kaj luktoj, kiuj havas nenion komunan kun la politika aspekto de la lingva problemo. Jam en 1970, dum la 26-a kongreso de TEJO en Graz, okazis tre malagrablaj incidentoj pro la »maŭistoj«, kiuj faris propagandon por siaj politikaj ideoj, eĉ eksplodigis iajn bombetojn dum la balo. La gvidantaro de TEJO, kiu evidente ne atendis la utiligon de la nova politika libereco ankaŭ por aliaj politikaj konceptoj, postulis ke ili foriru. La LKK, timigita, eĉ alvokis la policon, sed ĝi rifuzis interveni, kio ebligis al la »maŭistoj« aserti: »pruviĝis, ke la LKK estas pli faŝista ol la polico«. Poste la »maŭistoj« estis fizike elpelitaj (*Kontakto*, n-ro 3/1970, p. 10). Vere bela rezulto de la nova »politiko« de TEJO! Ĉio-ĉi okazis tuj post la UK en Vieno (1970) kiam d-ro Tonkin, la nuna prezidanto de UEA, organizis demonstracion de la »junularo« kontraŭ UEA (ĉefe, ĉar la Komitato ne nuligis la ŝuldon de TEJO, sed nur transformis ĝin en seninterezan prunto; poste ankaŭ tiu prunto estis forviŝita) sur la interna ŝtuparo de la palaco kun krioj »ŭa, ŭa – UEA«. Sed ni nek alvokis la policon, nek fizike elĵetis ilin, sed simple rigardis la incidenton kiel iom infanecan eksceson – ne absceson – de ankoraŭ ne tre maturaj junaj homoj.

Multe pli gravaj estis la aliaj sekvoj: ne tiom pro la teksto mem de la Deklaracio, se ĝi estus korekte aplikata, sed pro la misuzo de la Deklaracio por unupartiaj politikaj celoj kaj por forĵeto de neŭtraleco.

4.2 Kontraŭneŭtraleca ofensivo

Jam en la unua numero de *Kontakto* post Tyresö aperis artikolo »Kuraĝe alfronti la problemojn de la nuntempa socio«, en kiu estas cititaj ankaŭ jenaj vortoj de la tiama prezidanto de TEJO d-ro H. Tonkin en ligo kun la Deklaracio:

»TEJO rajtas fieri pri sia sukceso en tiu adaptiĝo dum la jaro 1968-69. La debatoj de la kongreso larĝe pritraktis la problemojn de *propra ideologio* de la esperantista junulara movado kaj *ĉefe la sencon de ĝia neŭtraleco*« (*Kontakto* n-ro 3/1969; ĉiuj substrekoj esta miaj).

En *Kontakto* n-ro 1/1970 aperis artikolo »Neŭtraleco«, verkita de M. Dobrzyński. Multaj asertoj de la aŭtoro rilate aplikadon de la principo de neŭtraleco estas malĝustaj. Tio ŝuldiĝas aŭ al ignorado de faktoj, aŭ al misinterpretado de la faktoj. Ekzemple, en la artikolo estas dirite, ke la »neŭtraleco trovis sian *ekstreman, preskaŭ absurdan, esprimon en la Statuto de UEA kaj sekve en tiu de TEJO...*« La aŭtoro asertas: »Neŭtraleco ne montras la vojon irendan, sed montras la vojon, kiun oni ne iru... El neŭtraleco ne rezultas pozitiva programo de agado, ĝi mem estas programo de neagado... Kvazaŭ ne memorante pri la taktika signifo de neŭtraleco, oni dotis ĝin per preskaŭ sakraj ecoj, tiel ke ĝi fariĝis en la Esperanto-Movado tabuo, iu nova versio de la interna ideo« (p. 7).

Kompreneble, ĉiuj tiuj premisoj estas malĝustaj. La neŭtraleco ja ne montras »la vojon irendan«, sed difinas la politikajn limojn de tiu vasta irenda vojo, kiun indikas la Statuto, la agadprogramoj kaj okazaj laborplanoj, kaj laŭ kiu UEA kaj ĝenerale la neŭtrala Esperanto-Movado sukcese progresis ĝis Hamburgo. La aŭtoro komplete ignoras la koncepton de aktiva neŭtraleco, prezentita koncize en 1.2, kaj la defendon de la neŭtraleco kontraŭ la atencojn de la ekstremaj dekstro kaj maldekstro (v. supre 1.3). Tiuj eraraj premisoj tamen bone servis al la aŭtoro por montri la diferencon inter la koncepto de aktiva neŭtraleco kaj la ideoj de Tyresö:

»La ideoj el Tyresö staras *sufiĉe malproksime de la tradicie komprenata neŭtraleco*. Oni serĉas por esperantista junularo la lokon inter la monda junularo, kies rolo en la socio ŝanĝiĝas radikale kaj kion pruas intelekta kaj politika mobilizo de la gejunuloj. La deklaracio *ne nur ne timas enmiksiĝadon en la politikon*, sed simple akceptas politikan vidpunkton de la aprezo de la lingva problemoj... La Deklaracio starigas antaŭ TEJO novajn eblecojn, sed ankaŭ novajn danĝerojn. Estas facile *elŝiriĝi el la kasteca neŭtraleco*, sed tio ne valoras penon, se ĝi kondukos al la senelira strateto de la ŝajna revolucio« (p. 8).

Tiel, do: la aktiva neŭtraleco de UEA, kiu ankoraŭfoje ricevis amasan apogon post la debato en la londona kongreso (1970), por TEJO fariĝis »kasta neŭtraleco«, kaj la sola timo estas, ke elirinte tiel facile el tiu neŭtraleco, TEJO ne falu nur en *ŝajnan* revolucion!

Tiu »ŝajna« revolucio okazis en Graz, sed ĝi estis rapide

»likvidita« per la elŝeto de la »maŭistoj«, kiel montrite en 4.1. Okaze de tiu incidento *Kontakto* skribis, ke »ankaŭ la maŭistoj troigis«. Kial? Interalie ankaŭ tial, ĉar »ili ankaŭ neglektis la fakton, ke *TEJO ankoraŭ serĉas sian vojon el la mucida neŭtraleco, kiu tiel senefikigas la plenkreskulan movadon*«. Pro tiu ignorado la »maŭistoj« faris grandan eraron, nome »ili provis antaŭenpuŝi la propran ideologion« (p. 10 de n-ro 3/1970). Tamen, kial la »maŭistoj« ne havus tiun rajton? Se oni forigis la neŭtralecon kaj enkondukis politikon, do kial tiu politikumado devus esti monopolo nur de unu politika partio, kaj ne de ĉiuj politikaj tendencoj, ekzemple kiel en SAT, en kiu ĉiuj socialismaj fluoj povas libere esprimiĝi? (v. 2.1).

Intertempe TEJO jam trovis »sian vojon el mucida neŭtraleco«, ĉar la sama aŭtoro, R.Cash (Kaŝ), skribis en *Kontakto* n-ro 3/1973, ke »en TEJO oni jam *ne plu* malŝparas sian tempon diskutante pri '*mucida neŭtraleco*' – tiu temo estas '*morta nefito*', ĝi estas '*forgesita miozoto*'... Nur en kelkaj '*maturaĝaj*' rondoj oni ankoraŭ priŝlaras kaj *palpetas la kadavron*«.

Aliflanke, *Kvinpinto*, organo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, sub prezidanteco de Tomas Jansson (la sama, kiu partoprenis en la strikte konfidenca kunsido de Kassel), skribis en n-ro 3/1971: »La unua rimarkinda kaj ĝis nun ĉefa manifestiĝo de nova *malfido je la oficiala neŭtralismo* interne de la *neŭtralisma* movado mem estas dokumento, kiu konatiĝis kiel 'la deklaro de Tyresö'«. Oni certe jam notis, ke aldone al insultaj esprimoj pri la principo de neŭtraleco, la atakantoj ofte ĝin nomas »neŭtralismo«, kaj la movadon mem »neŭtralisma«, kvankam tiuj esprimoj povus esti aplikataj al pasiva, senvertebra neŭtraleco, sed neniel al la aktiva neŭtraleco de UEA en la postmilita periodo.

Ne sufiĉis »teoriaj« artikoloj kontraŭ la neŭtralecon kun misprezentadoj pri ĝia vera senco kaj apliko en la praktiko de UEA; ne sufiĉis insultaj esprimoj pri neŭtraleco por montri, ke, fakte, ĝi jam estas »kadavro« (eble la aŭtoro tamen pravis); necesis ankaŭ primoki la ideojn, kiujn entenas »La Espero«. Fine de julio 1972 okazis en Rabenstein (GDR) la Tria Internacia Junulara Tendaro, kiun partoprenis 100 junaj esperantistoj el 8 landoj, inter kiuj ankaŭ la prezidanto de TEJO, nun honora prezidanto de TEJO kaj komitatano de UEA, s-ro R. Corsetti. Dum unu el la amuzaj aranĝoj, oni moke kantadis la himnon laŭ la melodio de la konata rusa popoladanco »kazaĉok«. Jen la priskribo de tiu amuziĝo laŭ *der esperantist* de novembro-decembro 1972:

»Tutcerte neniam antaŭe en la historio de la E-movado dum iu ajn E-renkontiĝo oni tiom ofte himnumadis kiel ĉi-foje en Rabenstein. Laŭ nova aranĝo kaj nova rava melodio. Oni komenciĝas [komencas] per ritmaj krioj: Lud-vig Za-men-hof! Lud-vig Za-men-hof! Sekvas la originala teksto de la himno laŭ melodio de kazaĉok...« (p.16).

La artikolo daŭrigas: »En la programo de la tendaro ne nur estis amuzaj vesperoj, sed ni aŭskultis plurajn referaĵojn sub la temaro de la okazonta 1-a tutmonda festivalo: La junularo de la tuta mondo akuzas la imperiismon. Ni tuŝis la krimojn de la usonaj murdistoj en Vjetnamio...«

Esperable tio pli ol sufiĉas por montri la teorion kaj taktikon de la kontraŭneŭtraleca ofensivo.

4.3 Kontraŭneŭtralecaj agadoj

Paralele kun la taktika ofensivo kontraŭ la neŭtralecon, post Tyresö viciĝadis kontraŭneŭtralecaj agadoj kaj elpaŝoj de la gvidantaro de TEJO. En *Kontakto* aperis tuta aro da artikoloj kun nete politika karaktero laŭ la linio de la »socialisma bloko«, kiu samtempe atingadis ĉiam pli decidan rolon en la gvidado de TEJO. Tio kaŭzis protestojn kaj streĉitecojn. Ekzemple, s-ro Kenneth G. Linton skribis al la CO de UEA la 26-an de aprilo 1971:

»Lastatempe mi fariĝis iom maltrankvila pri la sinteno de *Kontakto*. Mi kaj aliaj opinias, ke ĝi jam komencis montri *komunistajn tendencojn*, kaj la lasta numero, kiun mi ricevis estas *forte mallojala al UEA*, kaj por UEA organo tio estas tute nepardonebla. Se ĝi daŭrigos laŭ la sama maniero, mi ne abonos venontan jaron, kaj aliaj faros same«.

S-ro E. Carlén sendis la 12-an de majo 1971 cirkuleran leteron al la Estraro de TEJO, redakcio de *Kontakto* kaj Estraro de UEA, en kiu li atentigis, ke pro la sinteno de TEJO »la danĝero jam estas aktuala«. Li menciis kelkajn artikolojn en n-ro 1/1971, kiuj »*vere endanĝerigas la neŭtralecon kaj donas al eksteruloj la impreson, ke la Esperanto-Movado estas komunistaj kontraŭkristana*«. (Vidu Maitzen: 'La centimetra sekso', kiu atakas Usonon). Multaj aliaj artikoloj havas klare politikan (komunistan, marksistan) tendencon. Sub la rubriko 'Mozaiko' estas ankaŭ atako kontraŭ du kristanaj organizaĵoj«. E. Carlén ankaŭ sugestis, ke *Kontakto*, se ĝi nepre volas diskuti tiajn problemojn, havu rubrikon »Libera tribunio«, en kiu ĉiu povus »elverŝi sian indignon kontraŭ la kapitalista socio, kontraŭ Usono aŭ kontraŭ la soveta perforto al Hungarujo kaj Ĉeĥoslovakio«, sed pri kiu rubriko nek TEJO nek la redakcio respondecus.

Mi mem sentis min devigita plurfoje interveni, ekzemple en ligo kun du artikoloj kaj unu citaĵo el *L'Unità*, organo de la komunistaj partio de Italio, kiujn *Kontakto* publikigis en n-ro 1/1971. D-ro Sadler komunikis tiujn protestojn al la redakcio de *Kontakto* kaj ricevis de ĝi respondon de 20.06.1971, en kiu estis dirite: »Ni estas komisiitaj de la Estraro de TEJO redakti la revuon kaj ni sentas respondecon rilate la redakcian politikon *ekskluzive al tiu Estraro*«. Tio signifas, ke la Estraro de TEJO, kompreneble, respondecis pri

la tuta linio de *Kontakto*. Eble estas utile aldoni, ke en tiu tempo H. Tonkin estis prezidanto de TEJO kaj ke S. Milojević, la nuna redaktoro de *Esperanto*, troviĝis en la redakta komitato de *Kontakto*. La granda plimulto de la Estraro de TEJO estis aŭ kompartianoj (Ĉolić, Eichhorn, F. Szabó, nun en la Estraro de UEA, M. Lassak), aŭ »kunvojaĝantoj«.

Inter la multaj kontraŭneŭtralecaj agadoj de TEJO kaj ĝiaj unuopaj sekcioj en kelkaj landoj estu menciita la *Rezolucio de la 29.12.1970, kiun akceptis la 14-a Internacia Seminario*, organizita de Germana Esperanto-Junularo en Ulm. La Rezolucion iniciatis U.J. Moritz, la sama, kiu partoprenis en la strikte sekreta kunsido de Kassel (pri kio en la sekvanta sekcio), kiu malsukcesis kiel kandidato por komitataneco B dum la lastaj elektoj (1974), sed kiu tamen eniris en la Komitaton de UEA kiel komitatano C rezulte de la hamburga puĉo. Tiu pure politika Rezolucio protestis »kun grandega indigno« pro la »verdikto en la proceso de Burgos kontraŭ la 16 vaskoj«. Samtempe okazis en Leningrado proceso kontraŭ grupo da judoj, kiuj faris preparlaborojn (jure eĉ ne atencis) por fuĝi el Soveta Unio per aviadilo, kiun ili intencis tuj redoni al la sovetaj aŭtoritatoj, se la afero estus sukcesinta. Kelkaj el la akuzitoj estis kondamnitaj je mortpuno (poste, sub la premo de protestoj de la tuta mondo, inkluzive komunistajn partiojn en demokrataj landoj, la mortpuno estis ŝanĝita al multjara karcero), aliaj je puno de multjara malliberejo. Se entute internacia kunveno de politike neŭtrala Esperanto-organizaĵo volus protesti, – kaj mi ne opinias, ke la tasko de la neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj kiel tiaj estas enmiksiĝi en tiajn politikajn procesojn – tiam ĝi devus protesti samtempe ankaŭ pro la verdikto de Leningrado, kaj entute kontraŭ ĉiujn politikajn procesojn kaj verdiktojn, kiuj abundas en la tuta mondo. *La Rezolucio de Ulm estas klara plia esprimo de la unupartia politikiĝo de TEJO.*

Konforme al la sama partipolitika linio TEJO establis intimajn ligojn kun konate komunistaj organizaĵoj, apogantaj la sovetan tipon de komunismo, kaj reprezentigis en diversaj festivaloj, renkontiĝoj k.s. en orienteŭropaj landoj. Ekzemple, TEJO estis reprezentita en la *Monda Packongreso en Moskvo* en 1973, kaj la gazetoj, kiel kutime, menciis tion kun la aldoni, ke TEJO estas junulara sekcio de UEA. Antaŭ tio, komence de novembro 1972, TEJO estis reprezentita en la *Tutmonda Renkontiĝo de Laboranta Junularo*, organizita de Komsomolo, nome Soveta Komunista Junularo. TEJO estis reprezentita de H. Eichhorn, Detlev Blanke kaj Flóra Szabó-Felső, ĉiuj tri aktivaj membroj de la komunistaj partioj de siaj landoj. TEJO estis reprezentita en la *Monda Festivalo de la junularo kaj studentoj en julio-aŭgusto 1973* en Orienta Berlino, la ĉefurbo de GDR, en kiu, mi memorigas, la publikaĵoj de UEA estis konfiskataj pro la neŭtraleco de la Asocio. Tiu reprezentiĝo

meritas kelkajn pliajn vortojn. Pri ĝi raportis n-ro 31 de oktobro 1973 de NNN (Novaĵoj de TEJO), resp. *Novaĵoj de KER* [Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO]. Tie estis dirite, ke la delegacio de TEJO estis varme akceptita. Ni ankaŭ ekscias, ke la tiama prezidanto de TEJO, nun ĝia honora prezidanto, kaj komitatano de UEA, Renato Corsetti, estis inter la honoraj gastoj kune kun Jaser Arafat, la konata palestina politikisto. Ne estas surprize, ke Junulara Esperanto-Ligo Israela protestis per letero de 12.12.1973. Ĝia vicprezidanto, J. Tilleman, skribis interalie al la redakcio de NNN:

«Tamen ŝajnas, ke tie okazis tre gravaj devioj el la oficiala politiko de TEJO, pri kiuj ni volas atentigi. Sekve ni legas [en NNN, *mia rim.*]: «...delegitanoj [delegitoj] esperantistoj estis unuavice homoj apartenantaj al aliaj junularaj kaj *politikaj organizaĵoj*, kaj agis dum la festivalo konforme al la celoj de *siaj bazaj organizaĵoj*. Oni devas sin gardi kontraŭ falsa impresoj, kvazaŭ tiuj esperantistoj agantaj en siaj bazaj kadroj, agas samtempe kiel anoj de internacia esperantista movado... Kaj ni legas plue [en NNN, *mia rim.*]: «GEJ forlasis la sterilan esperantismion...» esperu ni, ke la forlaso de la sterila esperantismo ne signifis forlason de la sterila Statuto de TEJO. Alia fenomeno, kontraŭ kiu ni akre protestas, estas la honoro kiun havis nia prezidanto Renato Corsetti, troviĝi inter tiaj honoraj gastoj kiel Jaser Arafat».

Ĉi tie necesas diri, ke s-ro Renato Corsetti estas ordinara homo kun respektinda ofico ekster la Esperanto-Movado – ĉiuj oficoj estas respektindaj –, sed ke li ĝuis tian akcepton en Orienta Berlino certe ne pro sia ekstermovada laboro de oficisto, *sed kiel prezidanto de TEJO, junulara sekcio de la prestiĝa kaj respektata (en tiu tempo) Universala Esperanto-Asocio*. En sia letero de 15.01.1974 al Junulara Esperanto-Ligo Israela d-ro Sadler konsentis, »ke la nomo de TEJO ne devas esti ligita kun la nomo de Jaser Arafat aŭ de iu ajn alia politika figuro, kiu ne estas universale admirata«. Li ankaŭ informis, ke li »havas la taskon, komisiite de la Estraro kaj Komitato de UEA, kontroli la eldonaĵojn de nia Junulara Sekcio el vidpunkto de neŭtraleco«, sed ke en tiu ĉi kazo li »bedaŭrinde pretervidis la koncernajn frazojn«. Kompreneble, ne temas nur pri pretervido de la koncernaj frazoj en oficiala bulteno de TEJO, sed multe pli pri la kontraŭneŭtraleca ago mem de TEJO en tiu ĉi kazo kaj en multaj aliaj similaj.

Eĉ pli grava kontraŭneŭtraleca ago estas la Interkonsento pri Kunlaboro inter Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ) kaj TEJO, subskribita dum la 27-a kongreso de TEJO en Edinburgo, en aŭgusto 1971. La Interkonsento konsistas el 4 punktoj kaj antaŭvidas »regulajn kontaktojn inter la superaj organoj de ambaŭ organizoj, speciale per reciproka sendado de observantoj ĉe IJK (TEJO) kaj Ĝenerala Asembleo (MFDJ); reciproke informadon kaj regulan interŝanĝadon de dokumentoj kaj artikoloj; seminariojn pri problemoj apartenantaj al la komunaj intereso de ambaŭ organizoj...« ktp. Alivorte, plena kontrolo de TEJO fare de MFDJ, se ne pro alia kaŭzo, do pro la

politika pozicio de MFDJ kaj la sampolitika dependeco de la gvidantaro de TEJO. La Interkonsenton subskribis N'Diongue Babacar, kunordiganto de la kampanjo »La Junularo Akuzas Imperialismon« por MFDJ; por TEJO ĝin subskribis R. Corsetti, prezidanto, kaj Jeanne-Marie Liouville, vicprezidentino por eksteraj rilatoj, nun edzino de R. Cash (v. supre en 4.2) kaj *ankaŭ membrino de la grupo, kiu nun reprezentas UEA en Parizo ĉe la Sekretariato de Unesko (Esperanto, n-ro 5/1975, p. 81).*

Similajn intimajn rilatojn kun la celo kontraŭbatali imperialismon (kompreneble nur de »kapitalistaj landoj«, nepre ne kiun ajn alian) TEJO havas ankaŭ kun Internacia Unio de Studentoj (IUS). KER (Komisiono por Eksteraj Rilatoj) de TEJO informas ke »pro tre bonaj kontaktoj inter la du organizoj«, TEJO partoprenis la kongreson de IUS, kiu okazis en majo 1974 en Budapeŝto.

Sed kio fakte estas tiuj »demokrataj« MFDJ kaj IUS?

Ekzistas libro, eldonata de tempo al tempo, en kiu estas priskribitaj ĉiuj t.n. »parakomunistaj internaciaj organizaĵoj«. Ĝin ricevas ĉiuj politikaj servoj en la okcidenta demokrata mondo. Siatempo, en ligo kun la afero Connor, ankaŭ Prof. Canuto estis kontaktita (v. 1.3) kaj ĝis sia forpaso ricevadis kiel prezidanto de UEA tiun libron »por ke la Asocio estu singarda«. Kelkajn monatojn antaŭ sia forpaso Prof. Canuto donis al mi kelkajn ekzemplerojn kun la sama celo. En tiu libro troviĝas ambaŭ menciitaj organizaĵoj, kun kiuj TEJO establis rilatojn. Jen kelkaj detaloj:

Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ) estis fondita en 1945 okaze de la Monda Konferenco de la Junularo en Londono. Al ĝi aliĝis multaj junularaj organizaĵoj, dignaj de konfido, ĉar ili kredis ke MFDJ estos nepolitika kaj havos la celon proksimigi la gejunulojn de ĉiuj landoj. Baldaŭ ili devis konstati, ke »la komunistoj akiris ĉiujn ŝlosilajn poziciojn ekde la komenco kun la celo transformi MFDJ en instrumenton de porsoveta propagando. La sidejo ĝis 1951 estis en Parizo, sed en tiu jaro la franca registaro elpelis ĝin pro ĝiaj subversaj (subfosaj) agadoj. Post tio la sidejo estis en Budapeŝto. MFDJ havas plej intimajn rilatojn kun IUS kaj kun aliaj parakomunistaj organizaĵoj. Ĝi organizas mondajn asembleojn de la junularo kaj kampanjas por la »monda paco« kaj »kontraŭ imperialismo«, »kontraŭ koloniismo«, ktp. laŭ la konata politika linio. Estas interese, ke en januaro 1950, rezulte de la konflikto inter Stalin kaj Tito, la plenuma Komitato de MFDJ elpelis la Jugoslavian Junularon el MFDJ per rezolucio, en kiu la jugoslaviana gejunuloj estis deklaritaj »perfiduloj de la afero de la paco kaj demokrateco« kaj »dizertintoj fuĝintaj en la tendaron de imperialistaj militistoj«!!

Internacia Unio de Studentoj (IUS) havas sian sidejon en Prago.

Ankaŭ ĝi elpelis la jugoslavian studentaron en 1960. Ĝiaj celoj estas identaj al tiu de MFDJ, sed ĝi agas unuavice inter la studentaro.

Jen, do, la internaciaj »demokrataj« organizaĵoj, kun kiuj TEJO establis formalajn kontaktojn. Ĉiuj menciitaj agoj – kaj multaj aliaj nemenciitaj pro manko de spaco – estis ne nur krude kontraŭaj al la principo de neŭtraleco, sed ankaŭ *gravege kompromitis la neŭtralecon de TEJO kaj, pere de ĝi, la neŭtralecon de UEA, al kiu TEJO apartenas kiel sekcio*. Ne povas esti ereto da dubo, ke, post Tyresö, TEJO transformiĝis en pure partipolitikan organizaĵon, kiu forĵetis la principon de neŭtraleco kaj anstataŭigis ĝin per tiu de »proleta internaciismo«, koncize prezentita en 3.1 kaj 3.2 en ligo kun 2.2 supre, ĉar ĉio ja estas kunligita en la granda tuto de la politika konspiro en UEA. Kaj ne povis esti alimaniere, se oni prenas en konsideron la konsiston de la Estraro de TEJO, ekde Tyresö ĉiam pli maldekstra por fariĝi tute partipolitika post la kongreso de TEJO en Sarajevo (1973), do funkcia en la decida jaro antaŭ Hamburgo: prezidantino F. Szabó-Felső, vicprezidantoj H. Eichhorn kaj T. Jansson, ĉiuj tri aktivaj membroj de la komunista partio; ĝenerala sekretario R. Triolle, kasisto Jeanne-Marie Liouville-Cash, ambaŭ minimume fortaj »simpatiantoj«.

4.4 Reagoj de la Estraro de UEA

Tiun tutan partipolitikan, kontraŭneŭtralecan agadon mi firme kontraŭstaris ne nur per paciencaj klarigoj, konsiloj kaj admonoj en konversacioj kun funkciuloj de TEJO, sed ankaŭ, en ekstremaj kazoj, per utiligo de la eksplicitaj laŭstatutaj rajtoj de la prezidanto. En tiaj ekstremaj kazoj, kiuj gravege kompromitis la neŭtralecon de la Asocio interne de la Movado kaj, eĉ pli grave, en la ekstera mondo, mi plurfoje starigis la demandon antaŭ la Estraron de UEA. Tamen, oni ne kredu, ke tiu kontraŭstaro estis afero simpla, kiel devus esti en normalaj cirkonstancoj. La cirkonstancoj fariĝis nenormalaj por kultura nepolitika organizaĵo kiel UEA jam en Londono (1971), kiel vidiĝos en la sekvanta sekcio.

Por doni ekzemplon de intervenoj en la Estraro de UEA, mi prezentos sube kelkajn faktojn konforme al la protokoloj de la kunsidoj de la Estraro de septembro 1971, januaro 1972 kaj aprilo 1972. Ĉiu leganto, kiu interesiĝas pri pliaj detaloj, povas espereble ricevi la menciitajn protokolojn ĉe la CO de UEA.

Tuj post la londona kongreso, la *19-an de septembro 1971*, la Estraro pritraktis la demandon de interkonsento inter TEJO kaj UEA, konforme al la proponoj de TEJO. Mi atentigis, ke tia interkonsento estas superflua, se fakte TEJO estas sekcio de UEA. En tia kazo ne temas pri du sendependaj organizaĵoj, kiuj faras

kontrakton inter si; do sufiĉas konciza regularo por difini la formojn de agado de TEJO. Mi insistis, kiel ofte pli frue en tiu periodo de malobservoj de neŭtraleco fare de TEJO, ke aŭ TEJO fariĝu sendependa organizaĵo ekster la kadro de UEA, kun kiu UEA povus subskribi kontrakton pri kunlaboro, aŭ ĝi restu sekcio, en kiu okazo nenia kontrakto estas necesa, sed ja estas necesa nur regularo, »en kiu UEA lasus al la sekcio kiel eble plej grandan sendependecon en la agado« en la limoj de la politika neŭtraleco de UEA. Estis decidite, ke la ĝenerala sekretario de UEA plu traktos la aferon kun la funkciuloj de TEJO.

Dum la kunsido de la 9-a de januaro 1972 mi konstatis, ke neniu konkreta rezulto estas atingita post la septembra kunsido. Kaj mi denove levis la demandon »ĉu TEJO ne devus esti aŭ komplete sendependa aŭ vera sekcio de UEA, pri kiu UEA respondecas«. Mi ankaŭ konstatis, ke »neniu estrarano de UEA ricevis raporton pri la kongreso de Edinburgo, nek pri la kontrakto de TEJO kun MFDJ«, kaj mi informis, ke mi mem eksciis pri ĝi nur el *Kontakto*. Post tio mi klarigis la karakteron de MFDJ (v. 4.3) kaj, laŭ mia propono, la *Estraro malaprobis tiun kontrakton*. Apenaŭ necesas diri, ke la Estraro de TEJO komplete malatentis la malaprobajn kaj plu konservis la rilatojn kun MFDJ kaj aliaj parakomunistaj organizaĵoj, tute laŭ sia bontrovo. La tiama Estraro, elektita en Londono, tre malforta kaj malunueca (tri estraranoj estis altruditaj al mi kiel prezidanto) ne estis kapabla devigi la Estraron de TEJO observi la malaprobajn de la kontrakto, aŭ fariĝi memstara organizaĵo, pri kies agadoj UEA ne plu respondecus. Mi denove insistis, ke estu elaborita regularo, kiu klare fiksus la bazajn principojn pri respondecoj kaj rajtoj de la sekcio de UEA, sed d-ro Bormann opiniis, »ke estus maloportune alpaŝi tion en la nuna periodo de iom streĉitaj rilatoj inter UEA kaj TEJO« (p. 2). Post longa diskuto, la Estraro de UEA decidis informi la Estraron de TEJO, »ke ĉiuj gravaj elpaŝoj de TEJO en la ekstera mondo, kiuj havas gravajn financajn aŭ politikajn aŭ jurajn sekvojn, devus esti faritaj en interkonsento kaj kun la aprobo de la kompetentaj organoj de UEA. Tio validas ankaŭ por UEA mem« (p. 2).

La 6-an de aprilo 1972 okazis en la Centra Oficejo kunsido inter mi mem, s-ro Becker kaj la direktoro de la CO, unuflanke, kaj s-ro Liouville-Cash kaj s-ro Bakker filo, aliflanke, kiuj lastaj havis instrukciojn de la prezidanto de TEJO s-ro Corsetti. La celo de la kunveno estis trovi ian solvon en la rilatoj inter UEA kaj TEJO. Pri la kunveno mi raportis al la Estraro dum la kunsido de la 8-a de aprilo. Jen kelkaj eltirajoj el la protokolo:

»La prezidanto unue memorigas pri la starpunkto de la antaŭa kunsido, laŭ kiu necesus aŭ ke TEJO estu jure sendependa, aŭ ke ĝi observu la Statuton de UEA, inkluzive la koncepton de neŭtraleco... Montriĝis el tiuj diskutoj [de la 6-a de aprilo], ke TEJO opinias, ke ĝi ne plu povas vivi en la mallarĝaj limoj de la neŭtraleco, kiel konceptas ĝin UEA... La prezidanto atentigas la reprezentantojn de TEJO, ke la nuna

politikigado de TEJO estas tre danĝera vojo, kaj ke la artikoloj aperontaj ekzemple en la venonta numero de *Kontakto* certe kaŭzos gravajn protestojn... Samtempe la prezidanto informas, ke li petis la ĉefredaktoron [de *Esperanto*, en tiu tempo d-ro Sadler] ellasi en la TEJO-paĝo de la revuo *Esperanto* kelkajn liniojn pri TEJO-arango en GDR sub la titolo «*La junularo akuzas imperiismon*». Tion la ĉefredaktoro prizorgis interkonsente kun la redaktoro de la TEJO-paĝo. La dir. aldonas, ke poste la Estraro de TEJO postulis reenmeton de tiuj frazoj, sed ke li kiel ĉefredaktoro rifuzis tion. La Estraro aprobas unuanime tiun starpunkton».

Ĉi tie ni faru malgrandan paŭzon. En la senprecedenca kampanjo de mensogoj kaj kalumnioj kontraŭ min persone, daŭrigata ankaŭ post Hamburgo, oni vaste disfamigis, ke mi kvazaŭe »cenzuris kontraŭajn opiniojn« k.s. La fakto estas, ke mi neniam en mia tuta vivo »cenzuris« ian ajn »kontraŭan opinion« (vere mi sentus min intelektu tre malforta, se mi ne povus defendi miajn proprajn opiniojn alimaniere ol per »cenzurado«), sed mi ja rigardis kiel mian devon de prezidanto de UEA malebligi, ke tiaj kontraŭneŭtralecaj tekstoj pri kontraŭneŭtralecaj aranĝoj, kiel la TEJO-arango »La junularo akuzas imperiismon«, aperu en la centra organo de nia neŭtrala UEA.

Poste, dum la sama kunsido, la direktoro petis, ke la Estraro komisiu iun el siaj membroj tralegi la presprovaĵojn de ĉiu numero de *Kontakto* por vidi, »ĉu en ili troviĝas materialoj, kiuj povus esti rigardataj kiel neneŭtralaj«. La Estraro »decidas komisi tiun taskon al s-ro Wensing«. En la protokolo estas plu dirite:

»La prezidanto atentigas, ke tiuj decidoj estas faritaj unuanime kaj estu rigardataj kiel kolektiva respondeco de la Estraro. Li do atendas, ke, se hazarde leviĝos misprezentoj en la gazetaro aŭ aliloke, la tuta Estraro unuanime kaj energie defendos tiun starpunkton«.

Kompreneble, ne »hazarde«, sed tute sisteme kaj malice ja aperis misprezentoj en Heroldo kaj aliloke (interalie eĉ en »privataj« leteroj de tiu sama s-ro Wensing, kiu akceptis la taskon kontroli la manuskriptojn aŭ presprovaĵojn de artikoloj por *Kontakto*), kaj la tiama Estraro ne nur ne »defendis energie« la kolektivan decidon, sed kelkaj el ĝiaj membroj kontribuis al disfamigo de tiu mia kvazaŭa »cenzurado«, »diktatoreco«, ktp. En tiaj kondiĉoj la maldekstrula gvidantaro de TEJO, monolita pro la ideologia fono, sentis sin sufiĉe forta fronte al la malforta Estraro de UEA por plu agi laŭ sia bontrovo.

La gvidantaro de TEJO sentis sin des pli forta, ĉar kelkaj Esperanto-periodaĵoj, unuavice *Heroldo*, sisteme laŭdegadis ĉion en TEJO, eĉ la plej evidentajn blufojn aŭ fuŝaĵojn, prezentante ĝin kiel »la plej efikan« Esperanto-organizaĵon aŭ per similaj superlativoj, paralele atakante per misprezentoj kaj prisilentoj preskaŭ ĉion pozitivan en UEA, precipe se ĝi estis ligita al mia nomo. Tiel kreiĝis falsa aŭreolo ĉirkaŭ la kapo de TEJO.

En la realo la gvidantaro de TEJO ja abunde politikumis, sed post Tyresö preskaŭ komplete neglektis siajn verajn taskojn laŭ la Statuto (v. 4.1). Pri disvastigo de Esperanto inter la junularo,

helpo al geinstruistoj de Esperanto en la lernejoj, kursoj por studentoj, kreado de studentaj Esperanto-klubo kaj lernejaj rondoj... oni nenion aŭdis. La politika linio de TEJO kaŭzis, ke multaj junaj esperantistoj, ellerninte la lingvon en diversaj cirkonstancoj, sed certe ne pro la laboro de TEJO, volis havi nenion komunan kun tia politike orientita TEJO, kaj restis ekster ĝiaj vicoj. Tion la gvidantaro de TEJO »kompensis« per absurdaj blufoj pri membronombro en siaj oficialaj raportoj. Ekzemple, en la raporto por 1973-74 ĝi donis fantazie blufajn ciferojn pri la membronombro por 1973 kaj, parenteze, por 1972. Jen kelkaj el ili: Bulgario 1.200 (2.600), FR Germanio 1.320 (300), Hungario 1.100 (1.300), Madagaskaro 400 (40), Pollando 1500 (3.500) ktp. (Jarlibro, 1974, II, p-oj 56-57). Se oni konsideras, ke tiuj »landaj sekcioj« de TEJO formas parton de la koncernaj landaj asocioj, la absurdeco de la blufoj fariĝas pli ol evidenta: en Madagaskaro, kie UEA havis 31 membrojn, TEJO havis 400 (!); en FR Germanio TEJO 1.320 (kresko de pli ol 1.000 en unu jaro!) kaj la landa asocio 1.664, se tiu cifero entute estas ĝusta, ĉar dum la jarkunveno de GEA en Luksemburgo, nek la prezidanto, nek la vicprezidanto (d-ro Bormann kaj s-ro U. Moritz) povis doni al la membroj kian ajn informon pri la nombro de membroj de GEA, nombro de abonantoj, financa situacio ktp.*), en Pollando en 1972 TEJO 3.500 kaj la Pola Asocio same, ktp. Feliĉaj tiuj landaj asocioj kun tiom da junaj esperantistoj sub la aĝo de 25 jaroj! La Estraro de TEJO neniam prizorgis precizan statistikon surbaze de fakta membreco, sed tute laŭplaĉe deklaris pure arbitrajn ciferojn, montrantajn milojn da membroj en la »socialisma bloko« nun plus FRG kaj Madagaskaro, kaj iom pli realecajn taksojn por la cetera mondo. La solaj ĝustaj ciferoj estis 372 junaj individuaj membroj de UEA, el kiuj nur 148 MA kun *Kontakto!* *Surbaze de tia blufe falsita realaĵo estis »elektita« la Komitato de TEJO, kiu siavice elektis la Estraron.* Pro tiu kaj aliaj falsajoj mi sentis min devigita distancigi min, tre milde, de pluraj partoj en la raporto de TEJO (Jarlibro, 1974, II, p. 66).

Aldone al la politika aspekto, ankaŭ la foresto de poresperantaj agadoj inter la junularo ege maltrankviligis ne nur min kaj aliajn funkciulojn de UEA, sed ankaŭ plurajn estintajn aktivulojn de TEJO. Laŭ la komisiono de la Estraro mi, do, verkis projekton de nova regularo de TEJO, laŭ kiu ĝi estus vere junulara sekcio de UEA, bone organizita surbaze de fakta membraro, ricevus financon de UEA, ĝuus grandan liberecon de agado por Esperanto inter la junularo, sed *devus respekti la neŭtralecon de UEA kaj rajtus subskribi kontraktojn kun aliaj organizaĵoj aŭ devontigi sin*

*) *Rimarko de Sarlanda Esperanto-Ligo:* Laŭ informo de H. Nischwitz, estrarano de GEA, donita en la jarĉefkunveno de GEA dum la Germana Esperanto-Kongreso, 1975, en Oberkirch, GEA kaj GEJ kune havas malpli ol 1 000 membrojn.

finance nur kun la aprobo de la Estraro aŭ Komitato de UEA konforme al la Statuto de la Asocio. La projekton mi sendis, interalie, al la prezidantino de TEJO antaŭ la junulara kongreso de Sarajevo (1973), por ke la Komitato de TEJO pridiskutu kaj eventuale amendu ĝin. Fakte, la gvidantaro de TEJO tute ne pritraktis la projekton, verŝajne eĉ ne tralegis ĝin, sed utiligis ankaŭ tiun okazon por mensoge disfamigi en la kongreso, ke mi »diktatorece« volas altrudi novan regularon, »sklavigi« TEJO-n, k.s., eĉ ne menciante, ke temis pri diskutota *projekto*. Post kelkaj tagoj la Komitato de UEA, kunveninta dum la UK en Beograd *sen mia ĉeesto*, akceptis ĉiujn postulojn de TEJO en »interkonsento«, *jure malebla* en tia formo kaj, krome, kelkrilate *rekte kontraŭa al la Statuto de UEA*. Sed tiu Komitato jam ekde Londono (1971) estis sub forta influo de la komitatanoj el »socialisma bloko« kaj iliaj aliancanoj, kaj ne hezitis malrespekti la Statuton de la Asocio.

Post la malsukceso de tiu lasta provo konduki la junularan sektion al ĝiaj laŭstatutaj devoj, fariĝis eĉ pli evidente, ke TEJO volis nek sendependiĝi ankaŭ formale, nek esti *vera* sekcio de UEA konforme al ĝia Statuto, sed nepre volis resti *fakte sendependa organizaĵo en UEA* por povi agi politike malneŭtrale kiel formala sekcio de respektata neŭtrala internacia organizaĵo, ĉar nur tiamaniere ĝi povas kontribui al la celoj de la partipolitikaj faktoroj, de kiuj ĝi dependas. Por ĉiuj, kiuj lernis nur la abocon de politikaj sciencoj, estas tute klare ke ia TEJO *ekster la kadro* de respektata neŭtrala internacia asocio tuj perdus sian ekzistorajton kiel partipolitika organizaĵo sur la vosto de la grandaj parakomunistaj organismoj, kaj sekve fariĝus komplete senvalora el vidpunkto de la menciitaj faktoroj.

Sed fariĝis same klare, ke UEA ankaŭ tiurilate staras antaŭ *ne plu evitebla alternativo: aŭ* konservi tian politikigintan »sektion«, fakte absolute memstaran politikan organizaĵon en sia sino, kaj, rezulte mem definitive perdi sian neŭtralecon kaj neripareble kompromiti sin politike, *aŭ* rompi ĉian rilaton kun la nuna t.n. TEJO, kaj formi sian propran junularan sektion, politike neŭtralan, por povi efike rekomenci la agadojn en junularaj medioj. Se la politika konspiro en UEA ne estus sukcesinta en Hamburgo, la dua alternativo certe estus realiĝinta. Kaj tion perfekte sciis la konspirintoj, ĉar, kiel montrite, mi neniam kaŝis mian »aŭ...aŭ« starpunkton. Plia kaŭzo por formovi la ĉefan defendanton de neŭtraleco!

La ĉefan, sed ne la solan, ĉar la saman opinion havis ne nur granda nombro da aktivuloj tra la mondo, inkluzive la landojn de la »socialisma bloko« (inter komunistoj ĉiam troviĝis multaj sinceraj esperantistoj), sed ankaŭ pluraj iamaj eminentaj funkciuloj de TEJO. En konversacio kun unu el ili, parolante pri la politikigo de TEJO kaj politikaj konspiroj en UEA, mi diris, ke fine la

aŭtoritatoj en la okcidentaj landoj ekscios tion kaj komencos rigardi la tutan Movadon kiel komuniste orientitan; je tio li respondis: »Ĉe ni en ... tio jam okazis«. Dum alia estinta komitatano de TEJO skribis, ke »tri jaroj ne sufiĉis por plena ruinigo de nia junulara sekcio«, tiu unua esprimis la opinion, ke TEJO kiel originale imagita kaj funkcia ĝis Tyresö »fakte ne plu ekzistas«, kaj aldonis, ke »la nuna sekretario eĉ ne scias Esperanton«. Tria estinta funkciulo de TEJO skribis al mi longe antaŭ Hamburgo: »La venko de viaj oponentoj en Hamburgo povas nur aŭguri la baldaŭan pereon de UEA«. Post Hamburgo la sama skribis: »Viaj kontraŭuloj, obseditaj de la celo faligi vin, puninde ignoris la konsekvencojn de sia senkompromisa strategio«. Plia, same elstara aktivulo de TEJO, skribis al mi en marto 1975:

»Sed ĉefa motivo por tiu ĉi letero estas tio, ke mi petas vian pardonon pri mia ekscitiĝo kaj kvereleco en Londono [dum la UK en 1971, mia rim.], *surbaze de argumentoj, kies dubindan validon mi nur poste konstatis...* Pro mia ĉiam plia distanciĝo de TEJO, komenciĝinta dum mia estraraneco en 1971-72, kiam mi ektravidis certajn laŭmode maldekstrajn tendencojn (kiuj jam kondukis al danĝeraj eksceso, por ne paroli pri la intelekta malserioziĝo de TEJO), mi... praktike perdis ĉian kontakton kun la organizita junularo... [Tio] ĉiam pli forpuŝis min de ĝi kaj eĉ kondukis al ĵusa rompo kun la *Kontakto*-redakcio kaj eksigo el la Komitato de TEJO... Necesis plenaj tri jaroj de Londono al Hamburgo, por ke mi povu klare vidi«.

Pli bone post tri jaroj ol neniam. Espereble troviĝas ankaŭ aliaj junaj homoj inter la iamaj gvidantoj de TEJO, kiuj jam klare vidas aŭ baldaŭ malfermos la okulojn, rekonos siajn erarojn pro misinformiteco kaj agos konforme.

5. DE KONSPIRO AL LA PUĈO

5.1 Akriĝo de la »ideologia klasbatalo«

Aldone al la faktoj prezentitaj en la antaŭaj sekcioj pri la politika situacio de la Esperanto-instancoj en la »socialisma bloko«, en MEM kaj en TEJO, necesas ĉi tie diri kelkajn vortojn pri la akriĝo de la »batalo sur ideologia kampo« por pli bone kompreni la politikan fonon de la konspiro, kiu kondukis al la hamburga puĉo.

La soveta politiko de »paca kunekzistado«, revivigita de Ĥruŝĉov dum la 20-a Kongreso de la Komunista Partio de USSR (1956), estas bazita sur la malnova tezo de la »du diametre kontraŭaj tendaroj« (kapitalismo kaj socialismo), kaj entenas la politike ruzan formulon de A.J. Viŝinski de 1938 pri samtempaj »lukto kaj kunlaborado« sur la »internacia areno«: tamen, »lukto« ĉefe por interna uzo kaj praktikaj agoj, kaj »kunlaborado« ĉefe kiel slogano por eksteraj rilatoj kaj propagando. Kiel klare vidiĝas el la tuta politika kaj internaciura literaturo en Soveta Unio kaj en la »socialisma bloko«, »paca kunekzistado« ne nur ne rilatas al »kunekzistado de ideoj, sed, male, postulas senkompatan »ideologian lukton«, ĉar la »venko de socialismo super kapitalismon estas malebla... sen la venko de la revolucia Marksista-Leninista ideologio« (ekz., *Kommunist*, 1962, n-ro 8).

Laŭ tiu koncepto de »paca kunekzistado«, en kondiĉoj de parta interna liberaliĝo kaj de kreskantaj kontaktoj de Soveta Unio kaj de la landoj de la bloko kun la okcidentaj ŝtatoj, en la menciitaj orienteŭropaj landoj estis formitaj diversaj Esperanto-instancoj, sed plene sub la partia kontrolo, kiel montrite supre.

Necesas, tamen, diri, ke la speco kaj grado de tiu kontrolo super la Esperanto-instancoj fare de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj ne estis identaj en ĉiuj. Unue tial, ĉar ne ĉiuj el tiuj landoj estas en la sama pozicio rilate al Moskvo: iuj estas pli dependaj, ol la aliaj. Due tial, ĉar la severeco de la reĝimo varias de unu lando al alia kaj, en la sama lando, de unu periodo al alia. Trie ankaŭ tial, ĉar multo dependas de la demando kiu instanco kaj kiuj konkretaj personoj (la pli »molaj« aŭ la pli »malmolaj«) estas fakte ŝarĝitaj pri la kontrolo. Fine, sed certe ne plej malgrave, ankaŭ la karakteroj, sociaj-partiaj pozicioj kaj esperantisteco de la personoj nomitaj

La nova linio de »ideologia ofensivo«, deviga por ĉiuj kun eblaj nuancoj, eksplicite esprimiĝis, ekzemple, en la Programo de Bulgara Esperantista Asocio (v. 3 supre). Ĝi signifas grandan retropason al situacio, kiun trafe karakterizas la konfidencaj raportoj de 1957-58 pri Ĉeĥoslovakio; eble ĝi eĉ kondukos al la »granda silento« de 1950-55 (v. 2.2). Oni ne forgesu, ke el vidpunkto de ambaŭ ekstremoj Esperanto ja estas »danĝera lingvo« (v. 1.3), ĉar humaneca internaciismo ne povas esti arestita kaj la internaciaj kontaktoj pere de Esperanto inter ordinaraĵoj homoj, *sen oficiala aprobo*, neniam povos esti plene kontrolataj malgraŭ la persekutoj, cenzuro, traserĉoj kaj similaj metodoj, kiel tion atestas, interalie, vere kuraĝaj korespondaĵoj kaj informoj kontrabanditaj diversmaniere en la okcidenton lige kun la nuna puĉo. Nenio malhelpas la aŭtoritatojn en la »socialisma bloko«, aŭ en iuj el la landoj apartenantaj al ĝi, tuj ĉesigi la pluan ekzistotaĵon de Esperanto en kia ajn organiza formo, eĉ la plej strikte kontrolata, se ili tion opinias pli utila ol estas la atendataj rezultoj de la puĉo, aŭ eĉ tute senkonsidere al tiu maldekstrula »sukceso« en Hamburgo. Tio estas nur konjekto, tamen ne tute senbaza, por la estonteco. Intertempe la konspirintoj en ĉiu okazo sukcesis ekregi en UEA por povi senĝene agi interne de ĝi kaj pere de ĝi por siaj politikaj celoj, aŭ, kiel aperte skribis *Starto* (n-ro 6/1974) en sia komento post la puĉo:

»*Erariga estus supozo, ke ĝi [mia foriro rezulte de la puĉo, mia rim.] estas rezulto de ajnaj personaj plaĉo aŭ malplaĉo kontraŭ Prof. I. Lapenna. UEA, same kiel ĉiuj aliaj organizadoj, celantaj la internacian steron, estas devigata respeguli objektivajn ŝanĝojn en la internacia vivo. Ĝi ne povas neglekti ilin, se ĝi mem ne volas esti neglektata kaj se ĝi volas labori por la internacia kompreniĝo [en la stilo de la Programo, de MEM kaj de TEJO, kompreneble, mia rim.]. Interne de UEA oni ne povas malatenti la kvantan fortiĝon de la asocioj el la socialismaj landoj... kaj sekve ankaŭ enradikiĝon de la novaj tendencoj en la aplikado de la Internacia Lingvo [laŭ la modelo de la Programo, MEM, TEJO, kompreneble, mia rim.]. La esperantistaro [legu: la konspirintoj, mia rim.] atendas de la nova Estraro, ke ĝi respektos ilin kaj kontinuigos la pozitivajn atingojn de la antaŭa« [interspacigo de »pozitivajn« en la originalo, do certe ne mian reziston al la kontraŭneŭtralecaj atakoj, nome la »negativajn atingojn«, pro kiuj mi fariĝis »faligenda bastiono de neŭtraleco«; substrektoj miaj, mia rim.].*

Tiu komento de la ĉeĥa *Starto* estas tiel klara, ke eĉ la plej grandaj naŭvuloj kaj intelektaj blinduloj verŝajne fine komprenas la veran politikan sencon de la puĉo, kiu perdigis al UEA la neŭtralecon. Kaj per tio ni povus fini. Tamen, ni daŭrigu per prezento de pliaj dokumentoj kaj materialoj.

5.2 Kernaj aspektoj de la komploto

En decembro 1973 kaj komence de 1974 mi eksciis el pluraj absolute fidindaj fontoj, ke la gvidantoj de la Esperanto-instancoj en la landoj de la »socialisma bloko«, kun la helpo de pluraj estraranoj kaj estintaj funkciuloj de TEJO (jam plene en iliaj

La nova linio de »ideologia ofensivo«, deviga por ĉiuj kun eblaj nuancoj, eksplicite esprimiĝis, ekzemple, en la Programo de Bulgara Esperantista Asocio (v. 3 supre). Ĝi signifas grandan retropason al situacio, kiun trafe karakterizas la konfidencaj raportoj de 1957-58 pri Ĉeĥoslovakio; eble ĝi eĉ kondukos al la »granda silento« de 1950-55 (v. 2.2). Oni ne forgesu, ke el vidpunkto de ambaŭ ekstremoj Esperanto ja estas »danĝera lingvo« (v. 1.3), ĉar humaneca internaciismo ne povas esti arestita kaj la internaciaj kontaktoj pere de Esperanto inter ordinaraĵoj homoj, *sen oficiala aprobo*, neniam povos esti plene kontrolataj malgraŭ la persekutoj, cenzuro, traserĉoj kaj similaj metodoj, kiel tion atestas, interalie, vere kuraĝaj korespondaĵoj kaj informoj kontrabanditaj diversmaniere en la okcidenton lige kun la nuna puĉo. Nenio malhelpas la aŭtoritatojn en la »socialisma bloko«, aŭ en iuj el la landoj apartenantaj al ĝi, tuj ĉesigi la pluan ekzistotaĵon de Esperanto en kia ajn organiza formo, eĉ la plej strikte kontrolata, se ili tion opinias pli utila ol estas la atendataj rezultoj de la puĉo, aŭ eĉ tute senkonsidere al tiu maldekstrula »sukceso« en Hamburgo. Tio estas nur konjekto, tamen ne tute senbaza, por la estonteco. Intertempe la konspirintoj en ĉiu okazo sukcesis ekregi en UEA por povi senĝene agi interne de ĝi kaj pere de ĝi por siaj politikaj celoj, aŭ, kiel aperte skribis *Starto* (n-ro 6/1974) en sia komento post la puĉo:

»*Erariga estus supozo, ke ĝi [mia foriro rezulte de la puĉo, mia rim.] estas rezulto de ajnaj personaj plaĉo aŭ malplaĉo kontraŭ Prof. I. Lapenna. UEA, same kiel ĉiuj aliaj organizadoj, celantaj la internacian steron, estas devigata respeguli objektivajn ŝanĝojn en la internacia vivo. Ĝi ne povas neglekti ilin, se ĝi mem ne volas esti neglektata kaj se ĝi volas labori por la internacia kompreniĝo [en la stilo de la Programo, de MEM kaj de TEJO, kompreneble, mia rim.]. Interne de UEA oni ne povas malatenti la kvantan fortiĝon de la asocioj el la socialismaj landoj... kaj sekve ankaŭ enradikiĝon de la novaj tendencoj en la aplikado de la Internacia Lingvo [laŭ la modelo de la Programo, MEM, TEJO, kompreneble, mia rim.]. La esperantistaro [legu: la konspirintoj, mia rim.] atendas de la nova Estraro, ke ĝi respektos ilin kaj kontinuigos la pozitivajn atingojn de la antaŭa« [interspacigo de »pozitivajn« en la originalo, do certe ne mian reziston al la kontraŭneŭtralecaj atakoj, nome la »negativajn atingojn«, pro kiuj mi fariĝis »faligenda bastiono de neŭtraleco«; substrektoj miaj, mia rim.].*

Tiu komento de la ĉeĥa *Starto* estas tiel klara, ke eĉ la plej grandaj naŭvuloj kaj intelektaj blinduloj verŝajne fine komprenas la veran politikan sencon de la puĉo, kiu perdigis al UEA la neŭtralecon. Kaj per tio ni povus fini. Tamen, ni daŭrigu per prezento de pliaj dokumentoj kaj materialoj.

5.2 Kernaj aspektoj de la komploto

En decembro 1973 kaj komence de 1974 mi eksciis el pluraj absolute fidindaj fontoj, ke la gvidantoj de la Esperanto-instancoj en la landoj de la »socialisma bloko«, kun la helpo de pluraj estraranoj kaj estintaj funkciuloj de TEJO (jam plene en iliaj

manoj), sekrete planas plian atencon kontraŭ la neŭtralecon de UEA, ĉi-foje per ekregado de la Asocio mem.

Tiucele okazis pluraj t.n. »konsultiĝoj de reprezentantoj de Esperanto-asocioj kaj movadoj en socialismaj landoj« nome *Bulgario, Ĉeĥio, Slovakio, GDR, Hungario, Pollando* kaj Soveta Unio, el kiuj nur la 4 substrekitaj estas aliĝintaj asocioj de UEA. Senpere antaŭ la hamburga puĉo okazis plia tiaspeca »konsultiĝo« en Orienta Berlino, sed pri ĝi, laŭ mia scio, aperis eĉ ne la stereotipa komunikado, ke la »konsultiĝo« pritraktis »formojn kaj metodojn de plua kunlaborado« interne de la bloko kaj »en la internacia Esperanto-Movado«, sed estas pli ol klare, ke ĝi donis la »lastan tuŝon« al la taktiko por definitive sukcesigi la konspiron. Similan aldonan celon havis la diversaj kunvenoj de la gvidantoj de MEM en Orienta Eŭropo, fakte la samaj personoj kiel la gvidantoj de la koncernaj »reprezentantoj de Esperanto-movadoj en socialismaj landoj« (v. 3.3). Tion konfirmas ankaŭ fidindaj komunikoj, ricevitaj el unu el tiuj landoj:

»Jam kelkajn monatojn antaŭe [antaŭ la elektoj de komitatanoj B en 1974, *mia rim.*] reprezentantoj de Esperanto-Asocioj el t.n. socialistaj landoj devis veturi al Bulgara ĉefurbo Sofio, kompreneble por viziti ian 'pacan kunvenon'. Tie ili ricevis instrukciojn kiel agi, kiel voĉdoni, precipe kontraŭ tiuj, kiuj ne estas komunistoj, aŭ estas ĉefuloj de iaj religiaj aŭ idealismaj grupoj ktp.«

Ĉu ili fakte veturis tien propravole, aŭ faris tion laŭ la ordono de siaj partiaj instancoj, ne estas esenca. En ĉiu okazo la ŝtataj-partiaj instancoj, de kiuj ili dependas, pagas ĉiujn elspezojn de la partoprenantoj en tiuj »konsultiĝoj«, diversaj kunvenoj kaj ankaŭ en la komitataj kunsidoj de UEA kaj TEJO. La financa helpo – donata sendube unuavice, se ne eĉ ekskluzive, por politikaj propagandaj celoj – multe helpis la konspiradon, ĉar ĝi ankaŭ ebligis personajn kontaktojn de la konspirintoj.

Pri la sekretaj »pritraktoj« de tiuj »konsultiĝoj« la Estraro kaj Komitato de UEA neniam ricevis ian ajn oficialan raporton, kvankam estus tute normale, ke la organoj de UEA estu regule informataj, se temus pri iaj utilaj agadoj en la intereso de Esperanto, sekve neniel postulantaj ian ajn »sekretecon«. La *sola escepto* estas la *Protesto* de la 19-a de marto 1973, adresita al la CO de UEA kaj al mi kiel tiama honorofica direktoro de CED. Tiu unika oficiala dokumento – subskribita de N. Aleksiev, prezidanto de la bulgara BEA, prezidanto de MEM, membro de la Monda Packonsilantaro, komitatano de UEA kaj ĉefo de la politika intrigo en la bloko (espereble mi menciis ĉiujn titolojn) – estas tiel karakteriza por la »formoj kaj metodoj« de la »konsultiĝoj«, ke pluraj ĝiaj partoj meritas esti cititaj ĉi tie iom pli amplekse. Jen ili [kun miaj koncizaj komentoj en krampoj]:

»Reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj, kiuj kunvenis en Budapeŝto la 19-an de marto 1973, informiĝis, ke UEA planas eldoni novan

version de la tre utila, vere necesa libro 'Faktoj pri Esperanto'. Laŭinforme ĝi enhavos ampleksan novan parton 'Persekutoj kontraŭ Esperanto', verkita de Ulrich Lins».

[*Komento:* Temas pri ĉap. 21.4 de *Esperanto en Perspektivo*, publikigita fine de 1974; oni notos kun intereso, ke la »representantoj« eksciis pri tiu parto jam antaŭ la 19-a de marto 1973. Ulrich Lins aŭ mi mem certe ne informis ilin pri tio. Do, iu alia ĉu en la Estraro de UEA, ĉu en la CO, ĉu aliloke].

«Laŭ nia profunda konvinko kaj ĝisnuna sperto la enŝovo de tiu parto havas malbonan influon sur la normala evoluo de la Esperanto-Movado en niaj landoj, sekve – ankaŭ sur la stato de la Internacia Esperanto-Movado... Ni ne vidas socian bezonon de nova aktualigo de tiu temo [persekutoj kontraŭ Esperanto en Soveta Unio kaj »socialismaj landoj« en la tempo de stalinismo]; ja plej aŭtoritataj gvidorganoj en la koncernaj landoj delonge likvidis tiun praktikon kaj agas tute male... Prave tiuj rondoj kaj la esperantistaro en niaj landoj [ĉu fakte la esperantistaro?] pritaksos ĉion ĉi kiel *antisocialisman manovron*. Tio povas nur malutili al nia estonta agado».

[*Plia komento:* Se fakte la »gvidorganoj« jam likvidis tiun praktikon kaj agas male, do la prezento de persekutoj sub stalinismo devus kontribui al »likvidado de tiu praktiko« kaj fortikigi la »malan agadon«. Kaj se la prezento de la persekutoj estas »pritaksata« kiel »antisocialisma manovro«, ĉu, do, la persekutoj estis »socialisma manovro«?]

«Refoje ni atentigas, ke la eldono de similaj tute neaktualaj verkoj, povas nur endanĝerigi la normalan kunlaboradon inter landaj asocioj kaj UEA, alporti al UEA neantaŭvideblajn gravajn damaĝojn. Ĉiuokaze ni *postulas* [substrekitaj en la originalo], ke en la eldono de UEA aperu nur informoj, kiuj estas aprobitaj de la esperantistoj [legu: altruditaj de la partiofunkciuloj] el la koncerna lando. *Ni protestas* [substrekitaj en la originalo] kontraŭ la memcela aperigo de la ĉapitro 'Persekutoj kontraŭ Esperanto', ĉar ĝi povas alporti nur damaĝon por la afero de la Internacia Lingvo».

Do, tiel: rekta minaco al UEA, se ĝi aŭdacos publikigi kion ajn pri la persekutoj en Soveta Unio kaj en la »socialismaj landoj«. La proteston mi metis en la tagordon de la Estrara kunsido, okazinta fine de aprilo 1973. La Estraro, laŭ mia propono, unuanime malakceptis la proteston, pri kio mi informis la protestintojn pere de N. Aleksiev. Estus interese vidi kiel reagas la nuna Estraro, plene dependa de la bloko kaj ĝiaj okcidentaj aliancanoj, je tiaspeca protesto. Estus ankaŭ interese scii, ĉu *Esperanto en Perspektivo* estas libere importebla por ĉiuj esperantistoj en la 7 socialismaj landoj de la bloko.

En ligo kun la protesto pro ĉap. 21.4 pri persekutoj sub stalinismo, estas utile mencii, ke, laŭ informo ricevita el Bulgario en decembro 1973, unu el la riproĉoj en la antaŭhamburga kampanjo kontraŭ mi estis la siatempa publika *Letero al Stalin*, menciita supre en 1.3. Laŭ alia informo, ricevita el Hungario, »ni ĉiuj estis feliĉegaj kiam vi tiel lerte respondis al orientgermana

parolisto en la kongreso, sed mi aŭdis, ke la ĉefuloj en Berlino ne pardonas al vi, ke vi ofendis la ambasadoron de GDR« [temas pri la incidento dum la budapeŝta kongreso en 1966, v. 2.3]. La sama informis, ke li aŭdis »atakojn« kontraŭ mi pro tio, ĉar »vi metis en la programon de la kongreso la sovetaj[n] verkiston Soljenicin...«.

Praktike identa informo venis el Ĉeĥoslovakio en letero al eksterlanda amiko, kiu sendis al mi fotokopion: »Pri prof. Lapenna mi eksciis, ke li permesis al fame konata rusa poeto [aktoro] Rytjkov deklami en Vieno kontraŭ Sovetunio, tial li devas esti forigota«. Sincere parolante, mi ne memoras, ĉu N. Rytjkov fakte deklamis Soljenicin en Vieno (1970), nek mi trovis pri tio informon en la kongresa numero de *Esperanto*, sed ke li deklamis erojn el la verkoj de la rusa Nobelpremiito dum unu el la lastaj kongresoj antaŭ sia forpaso (kaj antaŭ la publikigo de *Gulag*), tio estas ĝusta. En ĉiu okazo, mi povis nek permesi, nek malpermesiti, ĉar pri la artaj aranĝoj de la kongresoj decidis la LKK kun la aprobo de la Estraro. Tamen, mi diru tute klare, ke mi neniam estis kontraŭ deklamado en niaj kongresoj de *nepolitikaj* literaturaj verkoj de kiu ajn aŭtoro. Sed por Soveta Unio kaj por ĝiaj aliancanoj la literatura verkaro de Soljenicin estas nenio alia ol »fia perfidaĵo«. Jen kelkaj citaĵoj – veraj literaturaj juveloj – el *Deklaracio de la Literatura Sekcio de BEA*, publikigita en *Bulgara Esperantisto*, n-ro 3-4/1974:

»La sekcio de Literaturistoj de BEA en la nomo de siaj membroj – poetoj, verkistoj kaj tradukistoj – esprimas sian indignon kontraŭ la perfida agado de Soljenicin. Tiu fihomo vivis en sia patrujo, manĝis la panon de sia popolo kaj ĝuis ĝiajn bonaĵojn [la literaturistoj forgesis aldoni: en malliberejoj kaj koncentrejoj, *mia rim.*], sed samtempe en sia verko '*Arkipelago Gulag*' [kiun aliloke ili nomis »malpura paskvilo«, *mia rim.*] li bedaŭras, ke la atoma bombo, posedata nur de Usono en 1945, ne estis jetita por definitiva frakaso de USSR [ĉu? kiu informis pri tio la literaturistojn de BEA, se la verko de Soljenicin estas absolute malpermesita en la tuta bloko?]. Por ni, bulgaroj, Sovetunio estas lumturo de libereco, demokratio, sociala justo kaj paco...«

Do, mi »estis forigota« ankaŭ pro – Soljenicin! Estus vere interese vidi ĉu post tiu »forigo« kaj post la senapelacia verdikto de la »poetoj, verkistoj kaj tradukistoj« en la Literatura Sekcio de BEA la nomo de Soljenicin iam ajn plu aperos en kiu ajn ligo kun UEA sub la nuna gvidantaro.

Unu el la plej gravaj kaj kompletaj informoj venis sur magnetofona bendo, farita en unu el la ŝtatoj de la »socialisma bloko«, sed enpoŝtigita en okcidenta lando. La sendinto estas konata aktivulo por Esperanto en sia lando. La mesaĝo komenciĝas per la vortoj: »Mi petas, atentu, aŭskultu kion mi diros, [por]ke vi helpu, ke UEA ne pereu«. Laŭ liaj diroj, li havis la okazon mem ĉeesti kunsidojn, dum kiuj oni priparolis la manieron ekregi en UEA. Oni »malkaŝe diradis, ke vi estas neŭtralistoj kaj per via neŭtralisma politiko vi ĉiam malhelpas

agadon de esperantaj asocioj en socialistaj landoj«. Sekvas longa listo de tiuj miaj »neŭtralistaj agoj« [fakte, firma defendo de la neŭtraleco de UEA, *mia rim.*], kiujn ne necesas ripeti, ĉar la ĉefaj jam estas menciitaj en tiu ĉi dokumento. La sendinto informas: »Ne kredu, ke ili ne admiras viajn talentojn kaj sciojn, eĉ vorto 'genia' uziĝis...« Tute kontraŭe, la koncernaj »gvidantoj« estas »konsciaj pri grandega laboro de vi farita por Esperanto, pri viaj sukcesoj por Esperanto, klereco kaj reputacio inter juristoj, oratora kapablo, populareco inter esperantistoj, ankaŭ en socialistaj landoj...«, kaj tial estos malfacile »forigi vin *sen kuna taktiko kun TEJO kaj helpo de malfortaj, sed ambiciaj kaj enviaj esperantaj gvidantoj en kapitalistaj landoj...*« [estas menciitaj kelkaj nomoj, el kiuj, laŭ mi, du malprave, *mia rim.*]. Vidiĝas el sonbendo, ke la »gvidantoj el socialistaj landoj« estus verŝajne tute feliĉaj pro miaj diversaj »talentoj kaj scioj«, se nur ne ekzistus unu, certe la plej decida, nome ke »vi estas [la] *sola en Komitato [de UEA] okcidenta specialisto pri socialistaj landoj kaj sola [kiu] povas tuj senmaskigi iliajn agojn...*« [tiurilate, escepte, tute konsentite]. La mesaĝo plu diras: »Tial kaj tial ili faras manovrojn por havi plej multon en [la] Komitato kaj elĵeti vin... *Ili serĉas kun TEJO novan prezidanton kaj novan estraron.* Ili diras ke ĉiu prezidanto estas pli bona ke [ol] Lapenna kaj liaj estraranoj.« Fakte, ne »miaj estraranoj«, sed multjaraj sinceraj aktivuloj ĉu en la Estraro ĉu ekster ĝi, kun propraj personecoj, kiuj kunhelpis la konstruadon de UEA ĝis Hamburgo. Tamen, mi konsentas plian fojon, ke el la vidpunkto de ilia vera celo ili ja absolute pravis. La mesaĝo finiĝas per plia admono pri la danĝero por la neŭtraleco de UEA kaj per la vortoj: »Batalu por savi UEA. *La ordinariaj esperantistoj en socialistaj landoj estas senpovaj, sed ili staras post vi.*«

Alia, tute certe membro de la komunista partio (inter kompartianoj, kiel dirite, ja ekzistas multaj sinceraj esperantistoj), prezentis koncize en sia letero esence la samajn trajtojn de la konspiro kaj daŭrigis:

»Do evidentas, ke oni, planas (kaj aktive preparas) vian forigon. Antaŭ vasta esperantujo ili ne aperados multe, pli multe ili agos inter komitatanoj, kiujn ili povas aĉeti per promesoj por [pri] postenoj kaj inter tiuj eniuloj, kiuj povas influi la komitatanojn. Ili serioze ellaboris sian strategion kaj taktikon, lasante ilin [sin] nevideblaj por aliaj...«

Jen plia eltiraĵo el unu el la leteroj:

»Vere la neŭtraleco de UEA estas en danĝero. En la tuta oriento [Orienta Eŭropo] oni diras, ke ĝi devas esti 'progresema' organizaĵo. Alloga ideo!... Bedaŭrinde la delegitoj el viaj landoj ne scias la sendon (signifon) de la vorto 'progresema' kaj tre facile oni erarigos ilin [en la komunista lingvo 'progresema' signifas aŭ komunista aŭ parakomunista, *mia rim.*]... Vi kaj ĉiuj veraj esperantistoj devas organizi la defendon de neŭtraleco tiel bone, ke politikistaj spekulantoj rezignu de sia intenco. Mi esperas, ke en tiu ĉi *fatala momento* vi trovos sufiĉan energion, ke [por] sukcese solvi la problemon. Por vi tio ne estas unua okazo«.

La tutan agordon de intrigoj bone karakterizas kvarpaĝa letero de plia aktivulo en unu el la »socialismaj landoj«. En ĝi li diras: »Internacia Lingvo fariĝis por mi ne nur fundamenta ideo por krei en min internaciismon, sed ankaŭ restis mia ĉefedukanto formiĝanta mian karakteron«. Jen karakterizaj partetoj:

»Dum mia laborado en E.movado konstante mi devis luktadi kontraŭ ekstremaj grupoj kaj apartaj fuŝuloj serĉantaj propran profiton kaj eluzadon de niaj [siaj?] pozicioj por kontentigi siajn malsanajn ambiciojn. Mi devis konstante malkaŝadi fian misagadon de la friponoj kaj *hipokrituloj semantaj malkonkordan malveron en la vicoj de la movado...* Mi bone komprenas, ke *nur pura neŭtraleco de nia movado povas reziste kontraŭstari ĝian likvidon*. Oni devas esti naivaj kaj tiom stultaj por akcepti kontraŭon... Ni devas sentime malkaŝadi fuŝulojn spitante ĉiujn obstaklojn: ŝovinismon, ekstremismon, malveron, misprezentadon, mallaŭdon kaj friponecon en plej fia senco de la vorto...« [La koncerna letero estis siatempe sendita ankaŭ al tiama kaj nuna funkciulo de UEA; mi nur esperas, ke la koncerna funkciulo neniam malkaŝos la nomon de la sendinto].

Aliflanke, mi eksciis jam en decembro 1973 de du flankoj, ke fine de decembro aŭ komence de januaro okazos en Kassel »strikte konfidenca« kunveno kun la ĉefa punkto de la tagordo »Kiel faligi Lapenna?« Tiu kunveno estis aranĝita okaze de la seminario de GEJ kun samtempa kunsido de la Estraro de TEJO. Poste mi eksciis, ke tiun sekretan kunvenon kun la menciita sola punkto de la tagordo tutcerte ĉeestis la prezidantino de TEJO d-rino Szabó-Felső, la vicprezidanto T. Jansson, U. J. Moritz, Ulla kaj F. Luin. La prezidantino Szabó-Felső (nun estraranino de UEA) venis al la kunveno kun freŝaj »informoj« [legu: instrukcioj] el Orienta Eŭropo [informo ricevita de absolute fidinda persono]. Interesa detaletio: je mia insistado ricevi la protokolon de la kunsidoj de TEJO en Kassel, ĝia prezidantino fine sendis la protokolon – kune kun sia letero de la 7-a de junio 1974! Ŝi sendis la protokolon de la kunsido de la Estraro, sed, kompreneble, ne tiun de la sekreta kunveno. Eĉ pli, en la akompana letero ŝi skribis: »Mi asertas, ke Uwe Joachim Moritz ne partoprenis la estrarkunsidojn«. Kompreneble, tre verŝajne li ne partoprenis la »estrarkunsidojn«, pri kio en tiu ĉi kunteksto tute ne temis, sed li ja partoprenis la sekretan kunvenon kaj ludis tie unu el la ĉefaj roloj, kion, cetere, li neniam neis post kiam la »strikta sekreteco« ne plu estis sekreto. Kiel mi diris en la *Aprila Artikolo*, mi havis la okazon ankaŭ paroli kun du personoj aktive partoprenintaj en tiu subfosa agado, sed ĝustatempe malfermintaj siajn okulojn. Kvankam mi jam sciis pri kio temis, tamen mi demandis unu el ili, kion fakte oni kritikas rilate mian gvidadon en UEA. Li respondis proksimume: »Fakte nenion, sed oni rigardas vin bastiono de *neŭtraleco*; tial detruu vian *popularecon per nigrigoj faligos vin kaj la neŭtralecon*«. Do, esence identa »ekspliko«, kiel la eksplikoj entenataj en la informoj ricevitaj el Orienta Eŭropo, aŭ la eksplicita rekono de *Starto*, menciita supre, ke mia »foriro« ne

estis en kiu ajn senco »rezulto de ajnaj personaj plaĉo aŭ malplaĉo kontraŭ Prof. I. Lapenna«. Absolute ĝuste!

Evidente, la ĉefaj trajtoj de la konspira taktiko, konsentita inter la bazaj centroj de la komploto – tiu de la orienteŭropa bloko, gvidata de N. Aleksiev, kaj tiu de Kassel – helpataj de aliancanoj en okcidentaj landoj, estis jam bone ellaborita komence de 1974: akiri absolutan plimulton en la Komitato kaj *samtempe intensigi la kampanjon de plej monstraj kalumnioj kontraŭ min persone* kun la celo detrui mian »popularecon«, nome tiun grandan apogon, kiun mia laboro por Esperanto kaj ĝenerale la ĝishamburga linio ĝuis, kaj espereble plu ĝuos, inter la vastaj tavoloj de la esperantistaro. Laŭ tiu taktiko, jam bone elprova en ĉiuj totalecaj sistemoj, por detrui ian »danĝeran«. idearon – en la kazo de UEA la idearon ligitan al principoj de neŭtraleco, universaleco, demokrateco kaj humaneca internaciismo kontraste al proleta internaciismo – ne sufiĉas nur rekte kaj sisteme atakadi la idearon mem kaj senguste primokadi ĝin (v. la koncernajn partojn de ĉiuj supraj sekcioj), sed necesas ankaŭ senskrupule kaj maksimume nigrigadi ĝiajn ĉefajn protagonistojn, en nia kazo unuavice min mem. Aldone, la taktiko postulas misuzon de ĉiuj homaj malfortoj (ekzemple tro blovitaj ambicioj kaj envioj), de personaj aŭ eĉ de familiaj ligoj en medioj gajnotaj por atingi la celon.

Kompreneble, por povi sekvi la evoluon de la plano kaj fari en ĝi eventualajn ŝanĝojn, la taktiko postulas daŭran kontakton inter la personoj, kies tasko estas realigi ĝin. La ligoj inter la konspirintoj estis simplaj: Sofio-Budapeŝto-Prago-Varsovio (plus Bratislavo, Orienta Berlino kaj Moskvo) kunvenis ofte je la kostoj de la ŝtataj-partiaj instancoj, kiel montrite supre; aliflanke, pere de la prezidantino kaj viceprezidanto de TEJO, ili estis en daŭra kontakto kun la konspirintoj de Kassel; siavice, estas konataj la intimaj ligoj inter la redakcio de *Heroldo* kaj Varsovio, la Estraro de TEJO, U.J. Moritz (li eĉ fieris pri sia telefona »varma linio« kun Bruselo), redakcio de *La Brita Esperantisto* (kiu publikigis serion da plej insultaj atakartikoloj de D. Quirke), *Pilo-Press*, s-ro Wensing kaj d-ro W. Bormann (la filo de d-ro A. Bormann, eldonisto de *Interlingvistika Servo*, en kiu aperis kaj plu aperas tekstoj kaj »kritikoj« plenaj de misprezentoj pri mia laboro kun samtempaj laŭdoj de d-ro W. Bormann), kaj de ĉiuj ili kaj pluraj aliaj inter si. Jen eta, preskaŭ amuza, spicaĵo. L. Pickel publikigis en sia *Pilo-Press* n-ro 10/1974 de la 8-a de marto, do unu monaton antaŭ la apero de mia *Aprila Artikolo*, jenan informon: »Stanisław Świsłak, prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, kaj Andrzej Pettyn, ĝenerala sekretario de PEA, telefone interparolis kun Ludwig Pickel, eldonanto de *Pilo-Press*, pri kelkaj aktualaj Esperanto-problemoj. La telefona komunikado inter Varsovio kaj Nürnberg bonege funkciis«. Imagu: la prezidanto kaj sekretario de la Pola

Esperanto-Asocio telefonas ne al iu funkciulo de UEA por paroli pri »kelkaj aktualaj Esperanto-problemoj [ĉu eble gramatikaj?], sed precize al L. Pickel, proprietulo de *Pilo-Press* kaj de la iama Germana Esperanto-Revuo [ĉar GEA, sub la prezidanteco de d-ro W. Bormann, estrarano pri landaj asocioj, perdis eĉ sian propran organon]. Aŭ, eble, la alvoko okazis nur por konstati, ĉu la telefona komunikado inter Varsovio kaj Nürnberg bone funkcias?!

Pliaj 50-60 paĝoj ne sufiĉus por prezenti nur la ligojn inter la komplotintoj, el kiuj verŝajne *ne ĉiuj* konsciis, ke ili partoprenas en *politika* konspiro, sed objekte ili ja partoprenis kaj ilia malamo kaŭzita de tro blovitaj ambicioj ja estis abunde utiligita por la celoj de la konspiro.

5.3 Realigoj de la interkonsentita taktiko

Nun ni venu, koncizege, al la realigo de la interkonsentita taktiko.

Tuj post la sekreta kunveno en Kassel, jam la 24-an de januaro, 1974, la prezidantino de TEJO skribis al mi, ke laŭ la interkonsento, kiun aprobis la Komitato de UEA en Beograd (1973), TEJO devus esti »laŭproporcie reprezentita en la Komitato kaj Estraro de UEA«. Ŝi asertis, ke »laŭ la statistikoj TEJO havas pli ol 13.000 membrojn«, sed ŝi tamen rekonis, ke »ni ne sukcesis pruvi, ke efektive ni havas tiom da membroj«. Tial ŝi kontentiĝus per *nur 8 lokoj en la Komitato de UEA, kiujn nomu TEJO, t.e. la Estraro de TEJO, sen kiaj ajn elektoj!* Ŝi postulis, ke mi voĉdonigu la Komitaton, se mi ne konsentas kun ŝia interpreto de tiu klaŭzo de la »interkonsento«. Pri la kontraŭstatuta decido de la Komitato de UEA en Beograd kaj la blufaj arbitraj ciferoj de TEJO pri la nombro de ĝiaj membroj oni bv. relegi la sektion 4.4. En mia respondo de 07.02.1974 mi atentigis la prezidantinon de TEJO pri la koncernaj reguloj de la Statuto de UEA, emfazis ke eĉ la Komitato ne rajtas ilin ŝanĝi, ĉar tiu rajto estas rezervita al ĝenerala voĉdonado, kaj nete rifuzis ŝiajn postulojn kaj pri la 8 komitatanoj kaj pri la voĉdonigo de la Komitato kiel evidente kontraŭstatutajn. En ŝia letero de 23.03.1974. ŝi skribis: »Via argumentado kun [pri] la menciitaj artikoloj de la Statuto konvinkis min, ke ni devas retiri nian peton. *La menciitajn punktojn de la Statuto mi vere preteratentis*« [mia substreko].

Tiu taktika movo, do, malsukcesis, sed estas interese, ke la prezidantino de TEJO, krome doktorino pri juro, tute »preteratentis« la Statuton farante la proponon. Psikologie, se ne jure, tute kompreneble. Kiu en tiu tuta kontraŭneŭtraleca konspiro pensis pri la observado de la Statuto de UEA?

Ankaŭ s-ro Tomas Jansson, vicprezidanto de TEJO, tuj plenumis sian taktikan taskon. Reveninte hejmen, li rapidis sendi

cirkuleron kun rekomendo al delegitoj voĉdoni en la elekto de 6 komitatanoj B por jenaj 6 kandidatoj el inter 14 entute:

S. Ĉoliĉ, Pál Felső (la edzo de la prezidantino de TEJO), F. Luin (la edzo de Ulla Luin, komitatano A de UEA, siavice filino de J. Strönné, komitatano A de UEA – «familiaj ligoj»), U.J. Moritz, A. Pettyn, Renée Triolle, el kiuj 3 estas kompartianoj kaj la ceteraj 3 minimume «simpatiantoj».

Por fari la kandidatojn pli akcepteblaj, en la cirkulero estis dirite, ke ili «estas aktivaj en TEJO», kio estis malvera, ĉar, pro sia aĝo, ili ĉesis, kelkaj jam delonge, esti eĉ membroj de TEJO, kvankam sendube U. Moritz, R. Triolle kaj eble aliaj ja «aktivis» en difinita senco.

Preskaŭ samtempe mi ricevis plian konfidencan informon el Ĉeĥoslovakio, ke ankaŭ tie oni preparas ian kampanjon por elektigi siajn homojn kiel komitatanojn B. Ke la informo estis ĝusta, montris la «strikte konfidenca» cirkulero de aprilo 1974, pri kiu mi diros sube kelkajn vortojn.

En tiaj kondiĉoj – konante bone amason da faktoj pri la kontraŭneŭtralecaj starpunktoj kaj agoj de la gvidantoj de Esperanto-organizaĵoj en «socialismaj landoj», de MEM kaj TEJO, kaj konstatinte ankoraŭfoje la ĝustecon de la alarmaj informoj prezentitaj en 5.2 – mi decidigis informi la membraron pri la danĝero de malintegriĝo de UEA. La artikolo aperis en la aprila numero de *Esperanto*, 1974 (*Aprila Artikolo*). Estus vere utile, ke ĉiu leganto de tiu ĉi dokumento, atente relegu la menciitan artikolon. Unu el ĝiaj celoj, kiun mi ne povas ne ripeti ĉi tie, estis sciigi, ĉu la individua membraro de UEA pere de la delegitoj plu apogas la tiaman linion de UEA, aŭ ne. Tial mi skribis:

«En la prezentita nuna situacio de UEA, ne ia simpla plimulto, sed nur *amasa apogo* povos konvinki min – kaj verŝajne la aliajn multjarajn kunlaborantojn laŭ la sama linio – ke penvaloras daŭrigi laŭ tiu vasta vojo de progreso... kaj energie plu konstruadi surbaze de la ĝisnunaj atingoj. Se mi estos elektita per tia *amasa apogo*, mi rigardos tion ankaŭ kiel *klaran mandaton* liberigi la Asocion de tiuj evidentaj negativajoj, kiuj haltigis ĝian progreson kaj minacas ĝian ekziston». (La *Aprila Artikolo* estas publikigita en tiu ĉi libro kiel Aldono 7.1.).

Estu menciite, ke en *ĉiuj antaŭaj elektoj* de komitatanoj B mi ĉiam ricevis plej multe da voĉoj el inter la kandidatoj, kaj ne povas esti dubo, ke ankaŭ en la lastaj elektoj estus okazinta la samo. Tamen, la dissemantoj de kalumnioj kaj malicaĵoj, abunde misprezentis kaj plu prezentas tiun artikolon kvazaŭ ian «reklamon» por mi mem. Fakte, en la prezentitaj kondiĉoj, estis absolute necese atentigi la membraron-delegitaron *pri kio* ĝi voĉdonos en la elektoj de komitatanoj B, ĉar mi ankaŭ diris, ke, se mi ne ricevos tian amasan apogon, «mi rigardos tion kiel *malvenkon* de tiu tuta idearo, kiu markas la modernan UEA».

Preskaŭ samtempe kun la publikigo de la *Aprila Artikolo* venis en miajn manojn la menciita «strikte konfidenca» cirkulero de aprilo 1974

en la ĉeĥa lingvo kaj en Esperanta traduko. Ĝi estis adrestita al la delegitoj de UEA en Ĉeĥoslovakio kaj rilatis al la elekto de komitatanoj B. La cirkulero estis sendita en la nomo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de Esperantistoj en Slovaka SR. Ĝin subskribis F. Sviták, ĉefelegito de UEA, P. Rosa, prezidanto de Asocio de Esperantistoj en SSR, kaj J. Vítek, prezidanto de ĈES. La subskribintoj rekte postulas de la delegitoj, ke ili voĉdonu por la *absolute samaj kandidatoj*, kiel tiuj de la vicprezidanto de TEJO Tomas Jansson: *Čolić, Felsö, Luin, Moritz, Pettyn, Triolle*. La cirkulero donas detalajn instrukciojn kiel voĉdoni kaj akcentas, ke oni voĉdonu nur por 6 »de ni menciitaj kandidatoj«, sed en sia entuziasma hasto ili forgesis iom atente nombri, ĉar ili aldonis plian, nome G. Genčev. Plia instrukcio: »Se vi hazarde jam aliel voĉdonis, sed la voĉdonilon ankoraŭ ne forsendis, ne ŝanĝu ĝin per korektoj, sed petu je la sama adreso novan voĉdonilon kun klarigo, ke la ekzistanta [la jam ricevita] fuŝiĝis senintence«. La subskribintoj de la cirkulero esprimis la deziron, »ke la elektitaj komitatanoj de UEA kontribuu *kaj al niaj interesoj kaj al interesoj de ĉiuj Esperanto-movadoj en socialismaj ŝtatoj* kaj certe ankaŭ al interesoj de UEA« [kompreneble, »al interesoj de UEA« laste kaj en la lumo de la interesoj de la »socialismaj ŝtatoj«; *miaj rimarko kaj substreko*]. La cirkulero finiĝas per jenaj vortoj:

»Ni denove atentigas, ke *ne temas pri via privata opinio* dum voĉdonado, kiel tion prezentas foje organoj de UEA [legu: la prezidanto de UEA, kiu, cetere, tute ne uzis la vorton 'privata'], sed pri neceso voĉdoni tiel, *kiel tion bezonas organizaĵo, kiu vian delegitecon aprobis. Ni atendas vian disciplinitan obeemon*«.

Ke la cirkuleron iniciatis F. Sviták, ne povas esti kia ajn dubo. Ĉu Vítek kaj Rosa subskribis ĝin propravole, aŭ ili sentis sin devigitaj meti sur ĝin sian nomon, ne estas konate. Mi konis ambaŭ dum multaj jaroj kaj ĉiam rigardis ilin tre sindonaj kaj sinceraj esperantistoj, kiuj eĉ en malfacilaj kondiĉoj ĉiam klopodis labori pozitive por Esperanto. Estu kiel ajn, ilia subskribo troviĝas sur cirkulero, kiu estas *evidenta* plia rezulto de la interkonsentita taktiko. Kaj same evidente, konsiderante la cirkonstancojn en Ĉeĥoslovakio, plene aprobita de la partiaj instancoj, al kiuj la »*Esperanto-movadoj*« en tiuj landoj estas subigitaj.

Reage je tiuj cirkuleroj, en okcidentaj landoj troviĝis kelkaj, kiuj sendis siajn cirkulerojn por aliaj kandidatoj. Mi mem, en mia funkcio de prezidanto, aldonis cirkuleron por ĉiuj voĉdonontoj, en kiu mi tre eksplicite skribis: »... bonvolu taksu la kandidatojn ne laŭ iuj 'instrukcioj' aŭ similaj 'konsiloj', sed *plene libere* prenante en konsideron nur la *faktajn meritojn de ĉiu kandidato por nia neŭtrala UEA*...« Ankaŭ tiun cirkuleron la komplotintoj hontinde misprezentis kiel »ŝokan«, kiel »eksterordinaran misuzon de la rimedoj de UEA«, kiel »propagandon de unu el la kandidatoj, kiu rekomendis sin mem«, ktp., ktp. en inundo de cirkuleroj de U.

Moritz, E.J. Woessink, T. Boersma, G. Leon-Smith k.a., nun ankaŭ en »privataj leteroj«, ekzemple tiu de la nuna ĝenerala sekretario de UEA, s-ro E.L.M. Wensing, de la 10-a de aprilo 1975 al s-ro H. V. Rasmussen (v. Aldonojn 7.4).

Nu, se vere tiu lojala peto al la membroj-delegitoj voĉdoni laŭ sia konscienco estus tiel »ŝoka«, do ĝi devus ŝoki unuavice ilin kaj doni al mi eĉ ne unu voĉon. Efektive, la ĉefdelegitoj kaj delegitoj, kies opinioj estas sendube reprezentaj por la starpunkto de la individua membraro, ankaŭ ĉi-foje montris sian maturecon kaj esperantistecon. Malgraŭ la politikaj instrukcioj de la orienteŭropaj gvidantoj kaj la intrigoj de iliaj aliancanoj en la okcidenta grupo, *en la liberaj elektoj* de komitatojn B estis elektitaj la plej valoraj kandidatoj, dum la kandidatoj de la konspirintoj, kun la escepto de A. Pettyn (fakte la sola, kiu havas meritojn ankaŭ por Esperanto) komplete fiaskis: Genčev ricevis 80 voĉojn, Ćolić 217, Felsö 177, Luin 195, Moritz 295, Triolle 219. Estis elektitaj: Régulo-Pérez per 539, M. Vermaas 511, J. Thierry 430, K. Söderberg 348, A. Pettyn 312 kaj mi mem 622 voĉoj. *La fakton, ke mi ricevis rekordan apogon de preskaŭ 84 %, mi rigardis kiel plebiscitan aprobon de la tiama linio de UEA.* Kun la helpo de multaj aliaj sinceraj kunlaborantoj kaj tia amasa apogo de la individua membraro pere de la delegitoj, mi certe estus dediĉinta ĉiujn miajn fortojn por liberigi la Asocion de la negativajoj, kiel promesite en la *Aprila Artikolo*, se la konspirintoj ne estus sukcesintaj per la hamburga puĉo ekregi en UEA.

La malvenko de la konspirintoj en la elektoj de komitatojn B lasis al ili nur unu eblecon: ekregi la Komitaton en Hamburgo mem per elektigo de siaj homoj kiel komitatanoj C. Tiucele necesis eĉ pli intensigi la kampanjon de kalumnioj per ĉiuj eblaj rimedoj: artikoloj, cirkuleroj, »privataj leteroj«, pliaj sekretaj kunvenoj kaj similaj metodoj, ne dignaj de kultura, demokrata, politike neŭtrala organizaĵo. Interalie, en ligo kun la *Aprila Artikolo*, oni vaste disfamis, ke mi kvazaŭe malpermesis la publikigon de »negativaj reagoj«, »kontraŭaj opinioj«, ktp. kun aldonoj pri miaj kvazaŭaj »cenzuradoj«, k.s. La vero estas, ke s-ro S. Milojević, la redaktoro de *Esperanto*, sendis la 10-an de majo 1974, *sen mia scio*, cirkuleran leteron al 15 personoj, kiuj reagis je la *Aprila Artikolo* per leteroj skribitaj al la CO, kaj informis ilin, ke li ne publikigos tiujn leterojn. La 18-an de majo mi skribis al d-ro Sadler kaj al s-ro Milojević: »... Entute, mi havas nenion kontraŭ tio, ke vi publikigu *ĉiujn negativajn reagojn* kondiĉe, ke en la sama numero vi publikigu nur dekonon de la pozitivaj laŭ mia elekto [en tiu momento mi estis ricevinta ĉ. 200 subtenajn reagojn, sed poste venis ĉ. 200 pliaj, *mia nuna rimarko*]. Sincere parolante, mi eĉ tre ŝatus, ke vi agu tiel, ĉar alie *certe disfamiĝos, ke mi 'sufokis' kontraŭajn opiniojn*. Krome, estus vere utile, ke la esperantistaro,

almenaŭ la saĝa esperantistaro, *klare vidu la intelektan nivelon – kaj aliajn nivelojn – de tiuj t.n. kontraŭuloj*» [mia nuna substreko]. Cetere, kiel oni povis atendi, preskaŭ ĉiuj »negativaj reagoj« aperis en *Heroldo* (tuta paĝo en la n-ro de la 1-a de julio 1974), dum nur 1-2 el la vere amasaj pozitivaj apogoj estis publikigitaj. *Tio estas la vero pri mia kvazaŭa »sufokado de kontraŭaj opinioj«.*

Jen nun ankaŭ kelkaj el la multaj reagoj el Orienta Eŭropo en ligo kun la Aprila Artikolo kaj la elektoj:

»... mi deziras informi vin, ke ankaŭ inter polaj delegitoj oni provis *instrukcie influ* la *elekton*. Via letero estis do necesa por tion konsciigi al *aliaj* delegitoj, kiuj boneŝance *ne estas simile minacataj en siaj rajtoj*...«

Alia skribis:

»... Kompreneble, mi voĉdonis *tute laŭ propra elekto*. Konvinkita, ke vi plu gvidos nian Movadon same prudente kaj sukcese kiel ĝis nun, mi kunsendas la vortojn de sincera agnosko kaj estimo...«

Plia skribis:

»Kvankam neniu cirkulero estis sendita, ne estas dubo, ke en nuna Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio ekestis danĝera tendenco maksimume centriĝi decidojn ... La elekton de delegitoj oni traktas kiel *politikan aferon* [substrekita en originalo]... Pri la delegitoj A oni decidis kelkpersone, samtempe sugestante, ke pri iu ajn reprezentado de pola E-Movado eksterlande povas decidi nur la prezidiumo *post bazaj konsultoj kun la ministerio ktp.*«

El letero de delegito:

»Mi deziras informi, ke mi ne obeis la instrukciojn, sed voĉdonis por kandidatoj 5, 9, 10, 11, 12, 14...« [por ne mencii la nomojn, la skribinto indikis tiamaniere la kandidatojn, por kiuj li voĉdonis; estis deko da tiaj informoj, unu el Rumanio].

Simpla individua membro:

»Tiuj homoj revas pri ia *orienta UEA por tute aliaj celoj ol la nia!* Oni nur devas flari, de kie blovetas tiu malodora venteto, kaj per kiaj truetoj ĝi intencas penetri nian organismon. Vere ili estas ege rafinitaj«.

Specimeno de kalumnioj:

»Post tiu kunveno... komenciĝis tiu granda kampanjo, kiu finiĝis per jam fame konata 'strikte sekreta' cirkulero, en kiu ili devigas UEA delegitojn trastreki certajn nomojn [meti kruceton apud certaj nomoj] kaj minacas al ili... Ankaŭ komencis [komenciĝis] *diversaj kalumnioj, malpurigoj, akuzoj*; oni multe parolis ekz. ke prof. Lapenna kaj aliaj estas homoj, *kiuj ŝtelis monon de UEA, uzas drogojn* ktp., ktp.«

Nova admono:

»Ne plu atendu... Mi ja diris al vi antaŭe pri kio temas, ke oni tion preparis jam de antaŭ kelkaj jaroj... Mi ne povas skribi ĉion«.

Sendube, oni ja preparis la konspiron longe antaŭ la puĉo. La intrigoj dum la londona kongreso (1971) sufiĉe klare montras, ke jam dum tiu kongreso politikaj faktoroj ludis gravan rolon. Interalie, la komunista taggazeto *Morning Star* de la 2-a de aŭgusto 1971, do la lundon de la kongresa semajno, publikigis longan kvarkolumnan raporton pri la UK, verkita de »speciala

korespondanto«. Preskaŭ duono de tiu artikolo estas plena de atakoj kontraŭ mi kiel prezidanto de UEA kaj eĉ kontraŭ mi kiel verkinto de faka libro en la angla. Troviĝas tie esprimoj pri mia »prestiga politiko«, kiu, laŭ la »speciala korespondanto«, estas la kaŭzo de la »financaj malfacilaĵoj« de UEA. Estas uzita ankaŭ la esprimo »kulto de personeco«, mia kvazaŭe erara interpretado de la »lingva imperialismo« kaj »kultura genocido«, ktp., kio, denove laŭ la »speciala korespondanto«, kaŭzis, ke mi estas »forte atakata« de *influaĵoj okcidentaj esperantistoj*. Kvazaŭ oni legus la multjarajn misprezentadojn de *Heroldo* pri iaj kvazaŭaj »financaj malfacilaĵoj« de UEA, dum la vero estas, ke ĝuste pro la multflankaj kaj ampleksaj agadoj de UEA en la postmilita periodo, la asocia kapitalo kreskis de 50.000 gld. en 1948 al ĉ. dekoble pli granda sumo, se oni prenas en konsideron la valoron de la domo de UEA en Rotterdam (v. ĉap. 18.6 de *EeP*). Ankaŭ la esprimoj »kulto de personeco« k.s. estas jam bone konataj pro la skribado de *Heroldo*, dum la demandoj ligitaj al »imperialismo« ja havas alian signifon en mia »interpretado«, ol estas la signifo donata al tiu koncepto en la Esperanto-instancoj de la »socialisma bloko« kaj de ĝia nuna filio, TEJO.

Jam antaŭ la londona kongreso komenciĝis ankaŭ la kampanjo de fitelegramoj, kiujn ĝis antaŭ Hamburgo sendadis al mi kaj al aliaj personoj iu individuo (aŭ individuoj) el Parizo, ĉiam kun la subskribo »Pariza Esperantista Tribunalo« aŭ, poste, »Pariza Tribunalo«. Entute estis senditaj ĉ. 40 tiaj longaj telegramoj kun profunde insulta enhavo. Esploro ĉe la francaj aŭtoritatoj montris, ke la koncerna individuo aŭ grupeto indikas kiel sendinton aŭ min mem, aŭ iun el miaj bonaj amikoj, ekzemple Harry Holmes, Jean Thierry, k.a. Tio, kompreneble, jam estas ekster la sfero de ordinaraĵoj kaj troviĝas *profunde en tiuj de krimo ne nur pro la enhavo, sed ankaŭ pro la kontraŭleĝa misuzo de nomoj*. La evidenta celo estis maltrankviligi min, malfortigi mian rezistopovon kaj naŭzigi min eĉ pri la vorto »Esperanto«. La krima individuo, kompreneble, atingis neniun el tiuj celoj, sed liaj agoj, eĉ se ne estus kio ajn alia, pravigus la esprimon »abscesoj sur la organismo de UEA«.

Mi havas nenian pruvon, ke ankaŭ la sendado de tiuj telegramoj, el kiuj la unua estis ricevita en julio antaŭ la londona kongreso, estis planita de la konspirintoj, *sed estas tute certe, ke la koncerna sendinto troviĝis tre proksime al ili, kaj per sia agado celis helpi la konspiron*. La enhavo de la telegramoj kutime baziĝis sur io mensoga aŭ deformita, pri kio li sciigis, tute evidente, de iu proksime iel al la fonto. En sia granda hasto foje li faris eraron. Anstataŭ rerakonti la aferon, mi citas laŭvorte parton de mia letero de 15.6.1974 al s-ro D.J.F. Quirke kun kopio al s-roj G. Leon-Smith (prezidanto de BEA kaj ĉefdelegito de UEA), A. Diaz

(komitatano de UEA), d-ro J. Wells (en tiu tempo estrarano de UEA), H. Holmes, W. Auld (redaktoro de *La Brita Esperantisto*), d-ro V. Sadler, S. Milojević, F-ino A. Solar (por la Konsilantaro de la Londona Klubo):

»Temis pri tio, ke la 3-an de julio [1973] mi ricevis unu el la fitelegramoj el Parizo en kiu, interalie, estis dirite: 'Ne eksigu el BEA sed faru al ĝi proceson kiel vi minacis'. Ĉar mi neniam minacis procesi kontraŭ BEA en tiu tuta afero ĉirkaŭ »Aliflanke«, nek mi iam uzis tiun vorton, sed, male, vi uzis ĝin en via cirkulera letero de 28.05.1973 (»eĉ minaci eventualan procezon«), mi invitis vin al la kolegio [en la universitato] por diskuti la aferon. Vi venis kaj mi prezentis al vi la faktojn. Vi ne kontestis la ĝustecon de la identeco de tiu mensoga aserto, kio metis vin en tre embarasa situacion. Vi ruĝiĝis kaj ŝvitis. En tiu via cirkulero vi eksplicite diris, ke vi sendis ĝin al estraranoj de BEA [brita] kaj UEA, al la personoj ricevintaj mian antaŭan leteron kaj 'plus unu-du amikoj miaj'. Mi demandis vin kiuj do estas tiuj 'unu-du amikoj viaj' kaj vi menciis iun el norda Anglio, iun en la CO de UEA (vi ne povis rememori kiu precize) kaj iun en Belgio. Tiun lastan vi suspektigis. Vi mem, proprainciate, verŝajne pro la embarasa situacio, promesis esplori la aferon, kaj informi min pri la rezulto. Vi neniam informis min. La 9-an de februaro [1974] mi telefonis al vi... Dum tiu telefona konversacio mi diris, ke la francaj aŭtoritatoj interesiĝis pri tiu krima sendado de telegramoj kun misuzo de nomoj; ke mi nun posedas preslitere skribitajn originalajn tekstojn de tiuj telegramoj; kaj ke, por fine senmaskigi la aŭtoron aŭ aŭtorojn de tiu krima ago, estus necese havi tekston manskribitan de la individuo. Mi eksplicite demandis vin, ĉu vi havas tian tekston. Vi respondis, ke vi havas, ke vi serĉos en la vespero kaj sendos al mi, sed forigos ĉiujn partojn, kiuj estas plej ofendaj por mi. Vi ankaŭ diris, ke pere de viaj ligoj en Belgio vi faris esplorojn ĉu la suspektito estis en Parizo kaj kiam. Vi promesis informi ankaŭ pri tio... Pasis kelkaj tagoj kaj denove vi ne plenumis vian promeson. Sekve, la 16-an de februaro 1974 mi skribis al vi leteron, en kiu mi memorigis vin pri la menciita konversacio de la pasinta sabato kaj plian fojon petis vin doni la promesitajn informojn senprokraste. Kopion de tiu letero ricevis d-ro Wells. Al tiu letero vi neniam respondis. Sekve, vi neniam plenumis viajn promesojn, kiujn vi mem, proprainciate, faris al mi en julio de la pasinta jaro... Plia fakto estas: dum la konversacio en julio de la pasinta jaro mi diris, interalie, proksimume jenajn vortojn: 'se almenaŭ tiu krimulo, kiu sendas el Parizo insultajn kaj fiajn telegramojn, evitus la vorton *esperantista* en la indiko *Pariza esperantista tribunalo*, ĉar estas terurajo ne nur, ke tiaj aferoj entute povas okazi en la Esperanto-Movado, sed ke eĉ neesperantistaj oficistoj de la oficejoj manipulantaj la telegramojn, povas vidi la fiaĵojn en la Esperanto-Movado'. Nu, post tiu mia rimarko, en ĉiuj postaj telegramoj, nome en la telegramoj ricevitaj post julio 1973, la vorto *esperantista*, ne plu troviĝas, sed ili estas sendataj en la nomo de nur *Pariza Tribunalo*«.

La eraro de la individuo estis, ke en tiu okazo li prenis frazon el cirkulero, kiun s-ro Quirke sendis al la supre menciitaj personoj, tiel ke la cirklo de la eblaj sendintoj de la telegramoj estas limigita nur al »unu-du amikoj« de s-ro Quirke, ne menciitaj laŭnome.

Temas pri la sama s-ro D. Quirke, kiu en la rubriko »Aliflanke« de *La Brita Esperantisto*, redaktata de s-ro W. Auld, lanĉis sisteman kampanjon de atakoj kun amaso da misprezentoj, mensogoj kaj duonveroj, eĉ pli danĝeraj ol la mensogoj, kontraŭ min persone kaj kontraŭ la Asocion sub mia prezidanteco. Tiu kampanjo komenciĝis per la aprila numero (1973) de *La Brita Esperantisto* (BE). Ĉio en tiu rubriko estis akompanata de grave insultaj aŭ vulgaraj esprimoj. Jen kelkaj el tiuj atakaj esprimoj publikigitaj

sole en du numeroj de BE: »tinteto de elingata ponardo, personaj antipatioj, absurda ŝakalado, stultaj infanaĵoj, infaneca kvereleto, idiotaĵoj, balota baleto, sange sub ponardo, unueco estas morto, inko kaj vitriolo, malpura tolaĵo, jetado de koto, papismo, ktp., ktp.« Kaj tiel, preskaŭ seninterrompe, de unu numero al alia de BE kun kulmino en la julia-aŭgusta numero, 1974, do *senpere antaŭ la UK* en Hamburgo. Jen kelkaj el la »perloj«, kiuj aperis en tiu numero de BE, ĉiuj rilatantaj al mi persone:

»Necesas tamen registri, ke liaj lastatempaj misagoj estas ŝoke hontindaj. Konstatinte, ke li tre probable perdos sian prezidan oficon en la ĉi-jaraj elektoj, li montris sin preta uzi ĉian malnoblan rimedon por eviti tion. Estas jam konate, ke li senskrupule akaparis al si la kolumnojn de la revuo *Esperanto*, samtempe rifuzante al siaj rivaloj la rajton prezenti sian kazon en la asocia gazeto, kaj eĉ nepermesante al la homoj persone atakataj en liaj artikoloj spaceton por sin defendi: tio estas en si mem aroganta aŭtokrataĵo [netaj mensogoj rilate la reagojn je la Aprila Artikolo, v. supre en tiu ĉi subsekcio]. Sed li transiris ĉiajn limojn de deco kaj tolereblo kiam li, estante kandidato por la Komitato de UEA, dissendis kun la balotilo mem leteron, en kiu li kiel prezidanto rekomendis sin mem kiel kandidaton [plia neta mensogo, v. supre]...«

Tiu tuta atako troviĝas sub la titolo »Troas la penado«, do identa al la samtitola mizera pamfleto en versoj de la iama aŭtoro de *Infana Raso*. Kaj la unua frazo de tiu hontinda fiaĵo komenciĝas per jenaj vortoj: »Hodiaŭan paralelon al la trista karieraborto de la kompatinda markizo [Louis de Beaufront] prezentas nun la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio...« Tiu hontinda komparo de mi mem kun De Beaufront estas por mi eĉ pli granda insulto ol ĉiuj aliaj mensogoj kaj insultoj en tiu sistema kampanjo de BE.

Post la londona kongreso, al la multjara kampanjo de *Heroldo* aliĝis ankaŭ *Germana Esperanto-Revuo kaj Pilo-Press*, ambaŭ privata proprieto de s-ro L. Pickel. Ĝi estis harmoniigita kun la kampanjo en la »socialisma bloko«, sed pri tio jam estas sufiĉe dirite.

Necesas aldoni, ke ĉiuj provoj haltigi la disvastigadon de mensogoj aŭ atingi publikigon de korektoj pri faktoj, restis sensukcesaj. Ekzemple la redaktoro de *BE* ne nur rifuzis publikigi mian plej ĝentilan leteron de la 30-a de septembro 1973, sed li ankaŭ rifuzis publikigi protestojn de membroj kaj aliaj legantoj de *BE*, inter kiuj ankaŭ la malaprobajn leterojn de la antaŭa redaktoro de *BE*, s-ro Ockey, de s-ro Holmes, de la Londona Esperanto-Klubo, de s-ro Sonnabend, ktp. Do, la samaj personoj, kiuj ĉiel disfamigadis, ke mi kvazaŭe »malpermesas esprimiĝon de kontraŭaj opinioj«, kion mi absolute neniam faris, fakte mem sufokis ĉian ajn ne nur »esprimiĝon de kontraŭaj opinioj«, sed eĉ publikigon de korektoj pri faktoj. Precize laŭ tiu primitiva artifiko de vilaĝa ŝtelisto, kiu mem ŝtelis kaj poste kuras kriante 'kaptu la ŝteliston'.

La ruza artifiko 'kaptu la ŝteliston' – parte konscie ellaborita kaj

harmoniigita por misgvidi kaj trompi la nesufiĉe informitan publikon, parte kiel rezulto de subkonscia projekciado de la propra karaktero en aliajn (alivorte: atribuado al aliaj de siaj propraj karakteraj trajtoj) – manifestiĝis kaj plu manifestiĝas en ĉiuj aliaj aspektoj de la kampanjo de nigrigoj. Por ne longigi, mi menciuj nur unu plian ekzemplon, nome la kalumnion, ke mi kvazaŭe »algluiĝis al la prezidanta seĝo« kaj, por konservi ĝin, mi eĉ montris min preta »uzi ĉian malnoblan rimedon«, kaj simile en aliaj artikoloj, cirkuleroj, pamfletoj kaj »privataj« leteroj. Mi vere ne scias kiom da esperantistoj povis entute kredi tian absurdan stultajon rilate min aŭ kiun ajn alian personon, kiu *ekster la Esperanto-Movado* per siaj laboro, scioj, kvalifikoj kaj pozicio en la scienca mondo aŭ ĝenerale en la socio pli ol abunde kontentigis siajn »ambiciojn« (se li havis iajn) por serĉi ian aldonan »gloron« en UEA, eĉ en UEA fine rekonita antaŭ Hamburgo kiel respektata kaj prestiĝa monda organizaĵo. Per siaj nomoj tiaj personoj povis nur kontribui, kaj fakte kontribuis, al prestiĝo de UEA kaj de Esperanto, certe ne aldoni ion al sia establita reputacio per kia ajn funkcio en la Asocio. En ĉiu okazo mi memorigas tiujn, kiuj emas »forgesi« faktojn, ke en 1956, post la retiriĝo de E. Malmgren, kaj denove en 1962, post la forpaso de Prof. Canuto, la komitato preskaŭ unuanime deziris, ke mi akceptu la prezidantecon, sed en ambaŭ kazoj mi firme rifuzis. En 1956 mi insistis, ke Prof. Canuto fariĝu prezidanto kaj ke mi prefere restu ĝenerala sekretario, ĉar tiun kombinaĵon mi rigardis pli bona el vidpunkto de la intereso de UEA; en 1962, pro la samaj kaŭzoj, mi insistis, ke Prof. Yagi fariĝu prezidanto. Nur en 1964, *post fidela servado al UEA kiel ĝenerala sekretario ekde 1955 kaj post seninterrompa estraraneco ekde 1938*, mi akceptis la kandidatigon kaj fariĝis prezidanto de la Asocio. En 1968, okaze de la 30-jara datreveno de mia estraranigo, mi firme deklaris, ke mi deziras eksiĝi, sed fine restis pro la insista petego de la tuta Komitato kaj de la tuta kongreso. Ĉiu partopreninto de la madrida kongreso verŝajne ankoraŭ memoras tion. Ĉu, do, tiel agas persono, kiu »algluiĝis al la prezidanta seĝo« kaj kiu deziras konservi ĝin »uzante ĉian malnoblan rimedon«? La periodo 1971-1974 estas tute alia afero. La prezentita situacio en UEA morale-intelekte devigis min ne nur resti surpostene, sed ankaŭ prezenti la aferon al la membraro: certe ne por ne perdi mian »prezidantan oficon«, sed por kontraŭbatali la politikan atencon, por laŭeble preventi la malintegriĝon de la Asocio kaj la detruon de ĝiaj pene akiritaj pozicioj. La membraro donis al mi kaj al aliaj sinceraj esperantistoj la mandaton. La puĉistoj elmanovris la mandaton, malatentis la opinion de la grandega plimulto de la membraro, krude malobservis la Statuton kaj – atingis sian celon.

5.4 La puĉo kaj ĝiaj sekvoj

Post trijaraj antaŭprearoj de la komplotintoj – periodo, dum kiu, aldone al ĉiuj aliaj laboroj en UEA kaj CED, mi donadis centojn da laborhoroj por verkado de *Esperanto en Perspektivo* kaj por redaktado de la tuto – la puĉo mem estis simpla afero. Ĉio dependis de tio, ĉu la komitatanoj A kaj B, agante konforme al art. 25/c de la Statuto kaj 29 de la Ĝenerala Regularo, elektos kiel komitatanojn C personojn »el inter la elstaraj membroj de la Asocio, kiuj pro siaj scioj, spertoj kaj laboro povas efektive kaj aktive helpi al la agado de la Asocio«, aŭ la statutaj preskriboj estos plian fojon piedpremitaj. Tial, malfermante la kunsidojn de la Komitato sabaton, la 27-an de julio, en la salono Hodler, kaj direktante miajn vortojn ĉefe al nekomunistaj komitatanoj (ĉar la instrukcioj, kiujn la komunistoj ricevis, estis neniel ŝanĝeblaj), mi esprimis la espereton, ke la spirito de la fondinto de UEA animos la kunsidojn. Vane. Ĝi forestis.

Tio klare vidiĝis nur kelkajn minutojn post la komenciĝo, kiam la Komitato malakceptis per 24 voĉoj kontraŭ 19 kaj 2 sindetenoj (voĉdonis nur komitatanoj A kaj B) la Principaron pri Elektado de Komitatanoj C, kiun mi estis ellaborinta laŭ la decido de la Komitato en Londono (1971). Post la malakcepto de la Principaro, oni ankaŭ malakceptis la proponon formi la kutiman elektokomisionon, por ke ĝi atente konsideru la meritojn de la kandidatoj el vidpunkto de la statutaj preskriboj. Komitatano Aleksiev proponis, ke eĉ en la pleno oni ne diskutu pri la meritoj de la kandidatoj kaj ke oni »tuj voĉdonu pri la kandidatoj«, ĉar »jam sufiĉas, laŭ li, la rekomendoj« (p-oj 5 kaj 9 de la protokolo, kiu, fakte, devus estis *komplete publikigita* almenaŭ en la Jarlibro, por ke la membraro fine eksciuj la veron kaj ne plu estu trompata pri la eventoj de Hamburgo). Kompreneble, kiel diskuti, se ĉio jam estis antaŭdecidita, eĉ la persono de la estonta prezidanto, senkonsidere al kiaj ajn »meritoj«!! En tia atmosfero apenaŭ estis eble diri kelkajn vortojn por prezenti ĉiun el la 29 kandidatoj. Estas pli ol interese menci, ke neniu alia ol N. Aleksiev mem, la ĉefo de la komunista bloko, proponis kiel unu el la kandidatoj ĝuste s-ron E.L.M. Wensing, konatan pro sia kontraŭkomunista sinteno, kion li neniam kaŝis. Se la afero ne estus tragika, ĝi vere estus amuza. Tamen, kia lerta plia truko por »pruvi« al la ŝanceliĝantoj en la Komitato kaj al naivuloj ekster ĝi, ke ne ekzistas kontraŭneŭtraleca konspiro. Kvazaŭ politika manovrado por atingi la celon ne implicus eĉ tiajn interkonsentojn, kia estis la Pakto Stalin-Hitler pere de iliaj ministroj Molotov-Ribbentrop. Tiom nur por ilustri la eblecojn de politika manovrado.

La decida kunsido okazis la saman tagon posttagmeze. Laŭ la protokolo entute ĉeestis 49 komitatanoj A kaj B, sed laŭ mia memoro ĉeestis ankaŭ Sviták, ne menciita inter la ĉeestan-

taj komitatanoj, kaj, cetere, estas apenaŭ imageble, ke li ne ĉeestus ĝuste tiun kunsidon, dum li ĉeestis kaj la matenan kaj la postajn. La konspirintoj havis 18 (sen Sviták 17) komunistojn el la kvar »socialismaj landoj«, ĵus alvenintaj de la lasta sekreta kunveno en Orienta Berlino (v. supre en 5.2), kiuj bloke voĉdonis laŭ la partiaj instrukcioj. Al tiuj 18 (aŭ 17), inkluzive du, kiuj ĉeestis kontraŭstatute (pri kio poste), necesas aldoni la »representantojn de la grupo de Kassel« (minimуме 4 sen Szabó-Felső, jam enkalkulita en la 18), konspire ligita al la »socialismaj landoj«. Do, la tuta bloko, aganta laŭ instrukcioj kaj ne ŝanceliĝebla per kiaj ajn argumentoj, havis tuj 22 (aŭ 21) voĉojn. Sufiĉis nur 3-4 pliaj »aliancanoj« el inter la komitatanoj de la okcidentaj landaj asocioj por havi la absolutan plimulton de 25 aŭ 26. La katastrofon de Hamburgo ne kaŭzis *nur* la bloko de komunistoj kaj de la »kunvojaĝantoj« de Kassel (t.n. TEJO-grupo), sed ankaŭ la fakto, ke pluraj komitatanoj A de la okcidentaj landoj asocioj ne nur ne observis la alarman admonon de la Aprila Artikolo, sed, male, aktive helpis la konspirintojn preskaŭ en ĉiuj voĉdonoj, tute certe en la elektoj de komitatanoj C. La motivoj estis diversaj, ĉefe iaspeca miksado de tro blovitaj ambicioj (almenaŭ 5), persona malamo (almenaŭ 3), politika simpatio (almenaŭ 1), familia solidareco (almenaŭ 1), eĉ »atismo« (almenaŭ 1), entute ĉ. 11 pliaj »aliancanoj«, kio donis al la »bloko de komunistoj kaj nepartianoj« (por uzi la esprimon aplikatan en la elektoj en la soveta tipo de demokratio) entute 32-33 komitatanojn A kaj B. Inter ili certe troviĝis la du britaj komitatanoj (v. la kampanjon de D. Quirke en BE), la du germanaj (D-ro Bormann evidente aspiris la prezidantecon, sed kontentiĝis pri vicprezidanteco; notu ankaŭ la ligan kun GER kaj *Pilo-press* de L. Pickel kaj la familian ligan kun *Interlingvistika Servo* de A. Bormann), T. Boersma (komplete sub la influo de la kampanjo kaj de sia informanto E.J. Woessink), Ib Schleicher (verŝajne pro mia kritiko de lia t.n. Tria Laborplano, tiu fuŝaĵo, kiun neniu, eĉ ne li mem, klopodas realigi), K. Greutert kaj O. Lehtivaara (kiuj pro absolute nekompreneblaj psikologiaj motivoj preskaŭ senescepte voĉdonis kun la bloko). Tio reduktis al 16-17 la nombron de la komitatanoj A kaj B, firme reprezentantaj la principojn de neŭtraleco, demokrateco kaj laboro por la Internacia Lingvo konforme al la Statuto, kaj ne por atingi politikajn celojn aŭ elvivigi siajn ambiciojn. Apenaŭ necesas diri, ke en la grupo de »aliancanoj« okazis ankaŭ signifaj kaj nedecidaj diverĝoj en voĉdono por tiu aŭ alia kandidato (ekzemple pro persona amikeco aŭ malamikeco al difinita kandidato, aŭ por »havi unu plian« el la propra lando, k.s.), kaj ke la »eksterblokaj« 16-17 komitatanoj, kompreneble, *tute ne havis ian »interkonsenton« por kiu voĉdoni, sed agis laŭ sia konscienco juĝante la*

meritojn konforme al la postuloj de la statutaj preskriboj. Ekzemple mi mem ne nur voĉdonis por Carlo Minnaja, semtempe kandidato de la bloko, sed ankaŭ estis unu el tiuj, kiuj kandidatigis lin.

La rezultoj de la elektoj – kaj ankaŭ kelkaj postaj voĉdonoj – montras la ĝustecon de la supra ĝenerala analizo.

Jenaj 13 estis elektitaj (parenteze la nombro de ricevitaj voĉoj): D-ro C. Støp-Bowitz kaj E.L.M. Wensing (ĉiu 33), U.J. Moritz kaj E.J.M. Woessink (ĉiu 32), U. Grattapaglia (31), F. Luin kaj R. Triolle (ĉiu 30), C. Nourmont kaj P. Peeraerts (ĉiu 28), S. Kawamura, D-ro C. Minnaja kaj J. Pool (ĉiu 27), G. Kühlmann (25). Kvar el ili (Moritz, Luin, Triolle kaj Peeraerts) estis klare forĵetitaj en la elektoj de komitatanoj B (ili ricevis nur inter 39.5 % kaj 21.4 % de ĉiuj voĉoj), sed nun eniris en la Komitaton tra la obskura malantaŭa pordo de la konspiro; almenaŭ tri devus esti eksigitaj el kiu ajn kultura organizaĵo, dum la aliaj, kun 2-3 esceptoj (certe C. Minnaja) apenaŭ havas kian ajn meriton por la Asocio, kelkaj eĉ ne scias la lingvon kontentige.

Aliflanke, *ne estis elektitaj* valoregaj kandidatoj, bone konataj pro siaj laboro kaj atingoj en la Esperanto-Movado, pluraj el ili ankaŭ ekster ĝi en siaj respektivaj fakoj, el inter la jenaj 16 (parenteze la nombro de ricevitaj voĉoj): H. Holmes (15), D-ro P. Neergaard (19), Prof. Fuĵio Egami (18), D-ro J.C. Wells (15), D-ro M. Dazzini (16), H. Behrmann (18), U. Lins kaj I. Gastón (ĉiu 16), G. Becker kaj G. Maertens (ĉiu 15), J. Haazen (14), G. Svensson (17), J. Calado (13), E. Lapenna (12), A. Zapeda (9), E. Carlén (7), inter kiuj almenaŭ 13, kies »scioj, spertoj kaj laboro« ja estus ne nur utilaj, sed vere necesegaj por plu progresigi la lingvon en la nunaj, escepte favoraj eksteraj kondiĉoj.

Sufiĉas kompari la du vicojn por tuj konstati, ke la bloko malobservis ne nur la spiriton kaj la tutan sencon de la statutaj reguloj pri komitatanoj C, sed ankaŭ la *eksplicite preskribitan kriterion*. Certe, oni restus plene en la kadro de la kriterio, se oni elektus C. Minnaja anstataŭ U. Lins, aŭ P. Neergaard anstataŭ F. Egami, aŭ inverse; sed se oni metas sur la pesilon de valoroj *laŭ la deviga statuta kriterio*, unuflanke, ekzemple, la nomojn de Wensing (kiu dek jarojn misgvidis la estraron kaj la tutan asocion pri Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio; v. la absolute ĝustajn faktojn en ĉap. 20.6.4 de EeP), Woessink (kiu komplete neglektis la financojn de la Asocio en 1973 kaj tial mi distancis min de la financa administrado; Jarlibro, 1974/11, p. 66 kaj protokolo p-oj 11-13), U. Grattapaglia (kiu dum trijara komitaneco faris absolute nenion, se oni esceptas unu poŝtkarton laŭ la linio de la bloko), U. Moritz (sen komento), F. Luin (sen plia komento, krom ke li estas la tria membro de la familio Strönne-Luin en la Komitato, dum samtempe Gulli Svensson estis malakceptita!), G. Kühlmann, R. Triolle kaj C. Nourmont, kaj,

aliflanke, la nomojn de H. Holmes, P. Neergaard, J.C. Wells, M. Dazzini, U. Lins. H. Behrmann, I. Gastón, E. Lapenna, k.a.; kaj se, post la malpermeso de diskuto pri la meritoj aŭ malmeritoj de la kandidatoj, oni elektas la unuan grupon, tiam ne povas esti ereto da dubo, ke *temas pri kruda malobservo de la Statuto kaj Ĝenerala Regularo* pro politikaj kaj aliaj eksterstatutaj motivoj.

Ĝi ne estas la sola malobservo. Aldone al la jam menciitaj, jen kelkaj pliaj:

(i) Jam antaŭ la UK en Beograd (1973) la Pola Esperanto-Asocio (PEA) forigis 3 siajn komitatanojn A, inter kiuj la malnovan fidelan pioniron J. Toczyski (espereble tiu ĉi laŭdeto ne kaŭzos al li malagrablaĵojn), kvankam ne estis elektojaro. Tio kontraŭas al art. 25/A de la Statuto, kiu preskribas, ke nur »eksigintaj kaj mortintaj komitatoj povas esti anstataŭataj«. Neniu el la tri estis eksiginta aŭ mortinta. Post kiam la dir. de la CO atentigis PEA pri tiu *kontraŭstatuta decido*, ĝi, kompreneble en la tieaj kondiĉoj, havigis la eksigojn.

(ii) Inter la tri novaj polaj komitatancj (»duraj«) troviĝis ankaŭ S. Świstak. Art. 30 de la Ĝenerala Regularo, konforme al art. 25/C de la Statuto, preskribas, ke »povas esti elektita kiel komitatano A, B aŭ C nur persono, kiu estis Membro-Abonanto de UEA almenaŭ dum tri jaroj antaŭ la jaro de la elektoj«. Świstak tute ne plenumis tiun kondiĉon, ĉar li ne estis MA dum la antaŭaj tri jaroj. Tamen la Komitato en Beograd, laŭ la propono de N. Aleksiev, allasis lin kiel komitatano (protokolo, p. 2). La senco de tiu regulo estas klara: malhelpi, ke pri la sorto de UEA decidadu homoj aŭ tute novaj aŭ neinteresitaj, kaj en ĉiu okazo komplete neinformitaj pri la agadoj kaj problemoj de UEA. Tia homo nun estas eĉ estrarano!

(iii) Laŭ art. 26 de la Statuto, komitatano A, »kiu ne povas partopreni komitatkunsidon, devas nomi anstataŭanton skribe aprobotan de la koncerna landa asocio«. Kiel kutime, ankaŭ en la invito al la hamburgaj kunsidoj tio denove estis eksplicite dirita kaj la koncerna rajtigilo aldonita. La ĉeĥa komitatano Kočvara ne nomis F. Sviták, sed tamen la Komitato per plimulto de voĉoj akceptis lin kiel anstataŭanton sen kia ajn rajtigilo. Kontraŭe al la eksplicita regulo, ĵus prezentita, Sviták kaj Świstak diris, ke »la landaj asocioj havas la rajton nomi la anstataŭantojn« (protokolo, p. 3). Tiel, do, kaj Świstak kaj Sviták (kia simileco de nomoj!) *kontraŭstatute partoprenis kaj voĉdonis*.

(iv) En 1973 la pola asocio havis 3.100 asociajn membrojn, por kiuj ĝi pagis la kotizon kaj 244 individuajn, entute 3.344 (*Esperanto*, julio/aŭgusto, 1974, p. 138). Sekve, laŭ art. 25/A de la Statuto ĝi rajtis havi 4 komitatanojn A. Fakte ĝi nomis 5, kaj iliaj nomoj aperis en la *Jarlibro*, 1974/I. Ĉiuj 5 ĉeestis kaj voĉdonis. Tiun *gravan malobservon de la Statuto* mi rimarkis nur post

Hamburgo kaj demandis la dir. de la CO kiel ĝi povis okazi. Li respondis, ke li »pretervidis tion«. Post tio li verŝajne skribis al PEA kaj, rezulte, laŭ la *Jarlibro*, 1974/II, Ŝwistak ne plu troviĝas en la listo de komitatanoj, sed li plu restas estrarano *duoble kontraŭstatute*.

Tamen, la plej grava kaj la plej ŝoka, vere mortiga por UEA kaj por la tuta neŭtrala Esperanto-Movado, estas la ĉiufanka malobservado de la neŭtraleco kaj per eksplikitaj deklaroj kaj per agoj, kaj antaŭ Hamburgo kaj post ĝi, kaj fare de la gvidantoj en la »socialismaj landoj« kaj fare de la »kunvojaĝantoj« de la kliko nomanta sin TEJO, kiel abunde pruvite en la antaŭaj sekcioj. Nu, el vidpunkto de la »socialisma bloko«, en atmosfero de »proleta internaciismo« kaj »akriĝinta ideologia lukto«, tio estas tute normala. Ĉu ne estis Lenin, kiu skribis en sia *La Proleta Revolucio kaj Kautsky la Renegato*: »Diktaturo estas povo bazanta sin rekte sur perforto kaj ne ligita per kiaj ajn leĝoj«, kaj ripetis la saman penson en multaj aliaj okazoj? Kial, do, la fidelaj disĉiploj de leninismo ne agus same en UEA, se ili ne nur ne renkontas firman unuecan reziston, sed eĉ trovas miopajn aliancinojn, kies personajn malfortojn ili povas bonege ekspluati por siaj celoj?

Tuj montriĝis la unuaj rezultoj de la puĉo. Post la »elekto« de komitatanoj C, el kiuj 7 ĉeestis kaj prenis siajn lokojn en la Komitato, okazis la elektoj de la dumkongresaj komisionoj de la Komitato. La nombra rilato inter la reprezentantoj de la tri grupoj – komunistoj kaj »kunvojaĝantoj«; nekomunistoj-aliancinoj de la bloko; eksterblokaj – estis: elektokomisiono por la estraro: 2:2:1; financoj-administrado: 5:0:0; programoj: 4:0:1. La saman bildon montras la t.n. konstantaj komisionoj de la komitato, elektitaj en Hamburgo: Statuto 1:3:0; kongresoj: 4:0:0; landaj asocioj: 2:1:1; eksteraj rilatoj: 3:2:0; informado: 3:1:0. Do, *kompleta ekregado de la politika bloko*. Ĉu tiuj komisionoj (kaj diversaj aliaj »grupoj«, formitaj post Hamburgo) havos kian ajn kapablon *labori por Esperanto*, estas alia afero, kiun ni eĉ ne tuŝu ĉi tie. Nur principa rimarketo, *tute ekster la kadro de la politika puĉo*: se oni kredas, ke ofico per si mem donas kompetentecon, anstataŭ ke kompetenteco donu oficon; aŭ se por riparigi ŝuojn oni formas komisionon de neŝuistoj, anstataŭ simple iri al ŝuisto – tiam la rezultoj *necese* estas katastrofaj. Tion, interalie, pravas la multnombraj siatempaj komisionoj de TEJO kun sonoraj nomoj kaj senonaj vakuo, kiujn ili postlasis post kelktempa surpapera ekzistado. Tion ankaŭ montras la Komisiono de UEA por la Tria Laborplano, kies membroj eĉ ne kapablis establi skriban kontakton dum plenaj du jaroj, kaj kies »produkto«, akceptita de la Komitato en 1973 »malgraŭ la kontraŭstaro de la Estraro«, alivorte por infanece spiti la Estraron, *fakte senigis la Asocion, por la unua fojo post tuta historia epoko, de kia ajn agadprogramo*.

La rolo de politikaj fortoj en UEA manifestiĝis same klare okaze de la voĉdono pri la Rezolucio proponita de Komitatanoj J. Thierry, A. Bourdeaux, R. Bernard, H. Sonabend, J. Gonzáles Aboín, Prof. J. Régulo-Pérez kaj f-ino M. Vermaas. La Rezolucipropono esprimis la »supozon« [tre mildel], ke »la elektoj de komitatanoj A en kelkaj LA estis faritaj sub premo de politikaj faktoroj kontraŭe al la principo de neŭtraleco de UEA«; ke »la elektoj de komitatanoj C estis evidente manipolitaj«; ke la »senprecedencaj intrigoj, manipuladoj, sekretaj kaj konspiraj agadoj kaŭzis la nunan bedaŭrindan komenciĝon de malintegriĝado de UEA, precize kiel antaŭvidite en la Aprila Artikolo de la prezidanto«. Krome, la Rezolucipropono:

»Kun profunda indigno plej forte kondamnas la kampanjon de mensogoj, kalumnioj kaj insultoj (eĉ dum ĉi tiu kongreso en la Oratora Konkurso kaj aliloke) fare de organizita grupo, inkl. la redakcion de *Heroldo* kaj *The British Esperantist*, – kaj esprimas al Prof. d-ro Ivo Lapenna sian sinceran bedaŭron kaj ŝokiĝon, ke tiaj aferoj povis okazi en Universala Esperanto-Asocio, kaj entute en la neŭtrala Esperanto-Movado«.

La Rezolucipropono estis malakceptita per 37 voĉoj kontraŭ 17 kaj 5 sindetenoj (prot. p-oj 27 kaj 39; v. supre pri la ĝusteco de la analizo rilate la nombron de eksterblokaj komitatanoj). Kia diferenco inter la nuna Komitato, regata de la ekstrema maldekstro, kaj la firme neŭtrala Komitato de 1956, kiu senkompromise kondamnis la atakojn de la ekstrema dekstro kun similaj »mensogoj, kalumnioj kaj insultoj«, kaj eksigis G. A. Connor el UEA (v. supre en 1.3). Kaj la samaj personoj, kiuj per sia voĉdono malakceptis la Rezoluciproponon ne hontis sendi al mi siajn reprezentantojn (N. Aleksiev en la nomo de la bloko kaj T. Boersma en la nomo de la »aliancanoj«) por humile, vere pli ol humile, petegi min, ke mi akceptu la honoran prezidantecon de UEA (kalkulante verŝajne je mia »ambiciemo«!) kun la evidenta celo atingi, ke per mia nomo mi donu benon kaj al la kontraŭneŭtraleca puĉo kaj al ĉiuj kunligitaj malnoblaĵoj. Kompreneble, en *tiaj* kondiĉoj kaj el *tiaj* manoj mi nete rifuzis (detaloj pri la diskuto en la komitato troviĝas en la protokolo, p. 27, kaj en la korekto, sendita de la prezidanto al la Komitato per cirk. let. de 13.10.74). Cetere, ili verŝajne eĉ ne rimarkis, ke per sia propono pri honora prezidanteco ili mem implicite rekonis la ĝustecon de la Aprila Artikolo kaj la kalumnian karakteron de la nigriĝoj: se nura ereto en la Aprila Artikolo estus malĝusta (kaj nenio en ĝi estis malĝusta) kaj se sole milono de la nigriĝoj ĉirkaŭ mia nomo estus vera (kaj absolute nenio estis vera), ili ne rajtus veni eĉ al la ideo proponi al mi tiun honorigon, ĉar mi ne meritis ĝin.

Okazis, do, ke landaj asocioj kaj unuopuloj, kiuj fakte devus esti eksigitaj el UEA pro konsciaj malobservoj de la principo de neŭtraleco kaj pro aliaj kontraŭstatutaj agoj (kion, en kazo de

proceso, rekonus kiu ajn kortumo en kiu ajn demokrata lando kaj juĝus konforme), efektive ekregis la Komitaton kaj la Asocion. En la Komitato kreĝis artefarita plimulto, inspirita de politikaj motivoj en alianco kun miopaj ambicioj, kiu ne nur ne spegulas, sed rekte kontraŭas la starpunkton de la grandega plimulto de la membraro, inkluzive tiun en Orienta Eŭropo, kiel tion evidente montras la rezultoj de la elektoj de komitatanoj B, la kortuŝaj manifestacioj okaze de la adiaŭa parolado kaj amaso da aliaj signoj de apogo kaj por mi kiel defendanto de neŭtraleco kaj persone, ricevitaĵ post Hamburgo. La fakto, ke la supera organo de UEA ne kondamnis – kaj kun tia plimulto evidente ne povis kondamni sen kondamni sin mem – la naŭzajn nigrigojn de mia nomo, estas la *persona kaŭzo* de la ekŝigo. La laŭdoj dum la ferma kunsido kaj, parte, en la septembra *Esperanto* (kun la tujposta daŭrigo de la kalumnia kampanjo, al kiu nun aliĝis ankaŭ *Esperanto*); la hipokritaj rezolucioj pri neŭtraleco fare de tiuj, kiuj konscie malobservis la neŭtralecon kaj plu malobservas ĝin, povis, eble, plu blindigadi politikajn naŭvulojn dum kelka tempo, espereble ne plu post la legado de tiu ĉi dokumenta materialo, sed ne povis kaj ne povas ŝanĝi la bedaŭrindan realaĵon. Dum en ĉiuj antaŭaj kazoj la politike malneŭtralaj elementoj formis siajn proprajn politikajn organizaĵojn *ekster UEA* (v. 2.1 kaj 2.2), ĉi-foje ili agis *interne de UEA* kaj ekkaperis ĝin per la puĉo de la 27-a de julio 1974. *Por la unua fojo en la historio de la neŭtrala Esperanto-Movado tiun tagon UEA perdis sian neŭtralecon, per tio samtempe malebligis la pluan agadon por la celoj laŭ sia propra Statuto, ĉesis esti si mem.*

Post tiu fatala kunsido, orienteŭropa kongresano, ekstreme ekscitita, pala kaj tremanta, diris al mi antaŭ atestantoj: *«Ĉi tie ne plu estas UEA; ĉi tie regas la sekreta polico de...»*. Je mia reago, ke li diru la samon publike, li respondis, ke li ne povas, ĉar, post la reveno, *«oni tuj enkarcerigus min»*. R. Llech-Walter, konata franca pioniro kaj estinta estrarano de UEA dum pluraj jaroj, ripete diradis: *«Tio ĉi estas frenezulejo kaj ne Komitato de UEA»*. Jam dum la kongreso, aldone al la funkciuloj menciitaj en la enkonduka sekcio, la ĝeinstruista asocio (ILEI) kaj la jurista (IEAJ) ekŝiĝis el UEA. La samon faris aŭ anoncis pluraj individuaj membroj. Post la kongreso, Sarlanda Esperanto-Societo ekŝiĝis el GEA kaj sekve ankaŭ el UEA. Urugvaja Esperanto-Societo agis same. En la franca ekstis tia krizo, ke la plej valoraj gvidantoj (D-ro Albault, J. Thierry, A. Bourdeaux, k.a.) ekŝiĝis el UFE. En Nederlando la Rotterdama societo forte kondamnis la sintenon de T. Boersma en la Komitato, dum lia misprezenta raporto en tri daŭrigoj en *Komuna Esperanto-Gazeto* elvokis indignon kaj protestojn; li rifuzis publikigi ankaŭ mian korekton, tute konforme al la nuna linio de absoluta cenzurado kun la celo plu sufokadi la veron kaj trompadi la esperantistaron. Dum la

kunveno de la Londona Klubo de 18.10.74, eĉ D. Quirke (kies rubrikon »Aliflanke« en *La Brita Esperantisto* oni fine »fortondis« post kiam li »faris sian laboron«; v. BE, vintro, 1974, p. 296) publike deklaris sin trockisto, konsentis pri la »stalinisma danĝero en UEA« kaj tial »ni devas atente sekvi la evoluon« (vidu paralelon kun la »maŭistoj« en 4.1). Cetere, BE aperis kun plurmonata malfruigo kaj BEA mem frontas malkontenton de la membraro. Simile en preskaŭ ĉiuj aliaj okcidentaj LA. En letero de 04.12.74 al H. Tonkin, J. Pool kaj U. Lins kun kopio al mi, konata estinta estrarano de TEJO skribis pri »la naŭzaj eventoj en Hamburgo«, pri la »du aĉaj artikoloj en novembra *Esperanto*«; li opiniis »duonon de la nuna estraro komplete katastrofa« kaj esprimis la esperon, »ke jam venontjare oni malkonfirmos iu(j)n. Konsiderante la konsiston de la nuna Estraro, ne estas klare kiun kombinon de 4 el 8 estraranoj li rigardas »katastrofa«. Mi mem ricevis post Hamburgo novan ondegon da leteroj, multaj kolektivaj kun dekoj da subskriboj (ĝis cent), en kiuj oni kondamnas la hamburgajn eventojn kaj esprimas al mi solidarecon. Kelkaj organizaĵoj eĉ elektis min honora membro. Verŝajne plej trafe karakterizis la animstaton de la sinceraj esperantistoj d-ro M. Dazzini (sekretario de ILEI kaj eksiginta ĉefdelegito por Italio), kiu diris al mi, ke li ja plu klopodos labori por ILEI kaj en sia loko Massa, sed, egale kiel finiĝos tiu tuta afero, »*neniam plu kun la sama entuziasmo kiel antaŭ Hamburgo*«. Jen kion atingis la puĉistoj el psikologia vidpunkto, eĉ se komplete forestus ĉio cetera!

Tiel en la okcidenta mondo. Sed kio pri la »socialisma bloko«, kies partiaj aŭtoritatoj ja decidis se ne precize kiu estos en la estraro de UEA, do certe *kiu devas ne esti prezidanto* aŭ estrarano de la Asocio, sed por kiuj Esperanto plu restas »danĝera lingvo«, kaj la esperantistoj plu estas nefidindaj elementoj, kiujn oni devas strikte kontroli. Do, ankaŭ el la blokaj landoj – *ĉiuj, eĉ el Soveta Unio* – mi ricevis similajn esprimojn de solidareco, en pluraj kazoj pere de mesaĝoj buŝe transdonitaj al personoj, kiuj turisme vizitis tiujn landojn, en aliaj per korespondadoj enpoŝtigitaj eksterlande, kaj en kelkaj kazoj eĉ poŝtkartoj skribitaj en fremda nacia lingvo, kun la adreso de CED, sed sen mia nomo. Nombro da korespondadoj estis adresitaj al aliaj personoj kaj fotokopie plusenditaj al mi. Jen kelkaj el la plej gravaj citaĵoj el tiuj leteroj [miaj ev. komentoj en krampoj]:

»Antaŭ forveturo [al Hamburgo], ekz., nia prezidanto Aleksiev estis vokita al oficejo [verŝajne partia], kie oni minacis al li, se li ne agos laŭ iliaj ordonoj» [ĉu necesis minaci al li, estas dubinde].

»Prezidanto de Slovaka E-asocio s-ano Rosa devis viziti ministerion, kie ili rekte malpermesis paroli en Hamburgo en nomo de E-asocio« [fakte, en la Komitato li ja silentis].

»S-ro Sviták estas ĉefa ĉefdelegito de UEA, sed... li havis ankoraŭ alian taskon

en Hamburgo. Li servas al sekreta polico kaj spionis nin ĉiujn, kiuj ĉeetis la kongreson. Li estas ankaŭ skribinto de tiu 'strikte sekreta' ĉirkulero».

»Antaŭ kelkaj semajnoj forkondukis min el laborejo sekreta polico kaj mi estis demandesplorita 6 horoj[n] ĝis vespero sen manĝo, trinko kaj sen ebleco viziti necesojn. Ili demandis plejparte pri Hamburgo, kun kiu ni parolis, kion mi parolis. Alia grupo de sekretaj policanoj en mia neĉeesto kontrolis kvin horoj[n] mian domon. Ili serĉis literaturon el okcidento, sed ili trovis nenion... Nun mi atendas kio okazos kun mi...«

»Nuntempe oni parolas pri likvido de ĉiuj sekcioj en Ĉeĥoslovakio... kaj ekzistos nur MEM-asocio».

»Antaŭ miaj okuloj ankoraŭ staras prof. Lapenna en Hamburgo. Kiel saĝe li parolis kaj malkaŝe montris la kaŭzojn de [la] tuta agado. Mi jam neniam aŭdos paroli tiun saĝan homon. Bedaŭrinde».

»Ni esploris [la] nove elektitajn homojn [kom. C] kaj kun surprizo ni konstatis, ke tio estas preskaŭ nur komunistemaj... Unue kun la helpo de siaj homoj ili misuzos UEA por sia propagando kaj poste verŝajne oni likvidos la Asocion, aŭ UEA fariĝos filialo [filio] de MEM».

»Al mi perdiĝis unu letero, kiun mi sendis al mia samlandanino en Brazilo. Mi menciis du amikojn en la letero. Post nelonge la nomitaj amikoj estis surprizitaj, kiam alvenis en iliajn laborejojn sekreta polico, forkondukis ilin kaj demandesploris du horojn pri mi, kion mi parolas post mia reveno, ĉu mi alportis ian literaturon ktp. Tia terura tempo ankoraŭ ne estis en nia lando».

»Mia pola amiko skribas al mi, ke li forlasis Polan Esperanto-Asocion, ĉar tie jam ne regas esperantistoj, nur mono de ministerio, kiu estas uzata de nigraj fortoj. E-movado en Pollando estas jam malforta kaj la samo okazas en aliaj orientaj landoj...« [letero ricevita de okcidenteŭropa esperantisto].

»En la nomo de multaj x-aj [turbo en Pollando] esperantistoj ni certigas vin, ke ni estas kun vi».

»Ni bedaŭras pro via rezigno. Ĝuste tion deziris la malamikoj de neŭtrala UEA.»

»Mia amiko el... sendis al mi kopion de via letero pri la kaŭzoj de via eksigo, kiun mi tajpis en multaj ekzempleroj kaj donis al s-ano... [lege elstara esperantisto en sia lando, mondkonata] laŭ lia peto, por ke li povu ĉirkuligi ĝin« [do, oni devas apliki la sistemon de la soveta *samizdat* por diskonigi la veron].

»Mi prelegis jam en kelkaj kluboj pri Hamburgo..., sed ĉiam ĉeestis ia [iul] partiano, kiu klarigis, ke oni devis purigi UEA, ĉar estis diversaj ebriuloj kaj diktatoroj, kiuj bremsis la tutan agadon».

»Ni ĉiuj, kiuj vizitis U.K. en Hamburgo estis jam ekzamenitaj de [la] sekreta polico. Oni demandis kun kiu ni renkontiĝis, kiu pagis al ni la vojaĝkostojn...«

»Mi kuraĝas esprimi miajn ideojn nur en privataj leteroj kaj eĉ pro tio mi estas persekutata».

»Mi konas sufiĉe vian agadon por Esperanto... Forlasinte propravole la Esp.movadon vi fariĝis al mi pli konata de kiam mi eksciis pri viaj motivoj de tiu paŝo... Mi admiras ĉiujn, kiuj luktas kun kontraŭuloj, kiuj estas senraciaj en antaŭvidado de okulfrapantaj eventoj».

»[Oni diris al ni, ke] nun Esperanto sub gvidado de [la] partio bone progresos. Sed kiel ĝi progresas ni vidas jam. En Slovakio oni malpermesis televidan kurson en lasta momento. En prokisima urbo Paskov, kie volis Esperanta Klubo soleni sian 10-jaran jubileon kaj aranĝi ekspozicion kaj koncerton, alvenis polico kaj fermis la gastejon 'Sokolejo', en kiu oni volis aranĝi ĉion. Vespere, kiam la homoj foriris, denove la gastejon [oni] malfermis...«

»Mi plene konsentas vin, escepte de unu: kial turni la dorson al la tuta afero [la skribinto evidente ne konis la kaŭzojn, kiuj devigis min ekŝigi el miaj funkcioj], por kiu ĝis nun neniu laboris pli efike en nia historio... Neniu el ili havas klaran koncepton, ili nur vipas, senskrupule kritikaĉas: detruas. Ĉu ili havas [havos] la kapablon ankaŭ konstrui? Jen kion mi ne kredas. Mi senhezite staras apud vi».

»Mi neniam aŭdis vin paroli. Mi nur legis multajn fojojn viajn paroladojn.

librojn, artikolojn kaj memoras [laŭ]vorte la plej belajn partojn. Ili estas por mi fonto de scio, vero kaj kondukilo tra [la, mia] vivo... En Hamburgo [la] komunistoj el socialistaj landoj voĉdonis laŭ ordono kaj ni estas senpovaj, sed okcidentanoj perfidis [nur la »gvidantoj« en kelkaj landoj, tamen] Zamenhof, vin kaj nin simplajn esperantistojn en socialistaj landoj...» [similaj ideoj pri la »perfido de la okcidentanoj« estis esperimita ankaŭ en aliaj korespondaĵoj].

»Fine de aprilo amiko informis min, ke li ĉeestis kongreson de slovakaj esperantistoj en Altaj Tatroj. Li skribis: 'Kiam mi parolis kun konatuloj, mi eksciis kiom de homoj en [la] pasintaj monatoj estis priesploritaj [de la polico]. Inter ili estis ankaŭ prezidanto de slovaka E-asocio s-ano Rosa kaj... s-ano Vaňa [do, eĉ la subskribo de la misfama »strikte konfidenca cirkulero« kaj la silentado en Hamburgo ne multe helpis al Rosa.]. Tiu lasta [Vaňa] estas invalido. Alvenis ia homo al li kaj anoncis [informis], ke antaŭ [la] domo estas ia difekta aŭtomobilo. S-ano Vaňa iris rigardi tien. Kiam li alvenis al aŭtomobilo, du viroj kaptis lin, entiris en aŭtomobilon kaj forportis lin al priesplorado'. ... Multaj plendis, ke ili ricevadas difekitajn kaj malfermitajn leterojn, ankaŭ mi. Estas videble, ke ni estas observataj kaj kontrolataj«.

Eble tio pli ol sufiĉas por montri la eĥojn inter ordinaraĵaj esperantistoj, t.e. eĉ tre elstaraj kiel esperantistoj, sed sen funkcioj en la partie kontrolataj Esperanto-instancoj de la bloko. Tamen, nur unu plia korespondaĵo meritas mencion kaj komenton. Ĝin sendis Esperanto-Rondo ĉe Kultura Domo de la Sindikatoj, Suceava, Rumanio. En ĝi estas, interalie, dirite tute aperte: »*Nia freŝoficialigita grupo kun pli ol 400 anoj deziras esprimi al vi nian simpatian kaj nian solidarecon kun vi*«. Por plene kompreni tian liberecon kaj firmecon de *oficialigita* rondo necesas scii, ke Rumanio, same kiel Jugoslavio, sed iom malpli eksplicite, *malakceptas* la sovetan koncepton de »proleta internaciismo« kaj la oficialan sovetan doktrinion pri »socialisma internacia juro«, bazita »sur la pli alta principo de proleta internaciismo«, alivorte la t.n. Breĵnev-doktrinion pri la rajto interveni en la internajn aferojn de »socialismaj landoj«, kiel en la kazo de Ĉeĥoslovakio (interesigantoj pri tiu demando kun scio de la angla trovos iom detalan analizon en mia artikolo »*The Soviet Concept of Socialist International Law*« en *The Year Book of World Affairs*, 1975, p-oj 242-265). Tio eksplikas kial nek Jugoslavia Esperanto-Ligo, nek la rumaniaj esperantistoj estis invitataj partopreni en la konspiro; eĉ se oni estus invitintaj ilin, la gvidantoj de JEL tutcerte estus rifuzintaj kaj la rumaniaj esperantistoj tre verŝajne estus havintaj la forton rezisti.

Por kompletigi la bildon pri la negativa starpunkto de la vastaj tavoloj de la esperantistaro ankaŭ en la landoj de la bloko rilate la partipolitikan linion de la altruditaj gvidantoj, estas menciinda la situacio en GDR. Kvankam – skribis *der esperantist* – la Kulturligo fincas la tutan profesian kaj honorofican aparaton de la Centra Laborrondo de Esperanto, eldonas *der esperantist*, organizas diversajn Esperanto-aranĝojn kaj pagas la kostojn de la delegitoj (ekzemple de 200 partoprenintoj en la kunveno en Karl-Marx-Stadt), tamen la esperantistaro »*babiladas pri*

demokrateco» kaj – ne aliĝas al la Laborrondo. Kaj der esperantist minacas: »Inter la kapitalisma kaj socialisma mondoj staras barikado. Eblas nur troviĝi sur tiu ĉi aŭ sur alia flanko... *Kiuj nun restas ekster niaj vicoj pro malsimpatio al Kulturligo* [legu: pro subiĝo al la partia Kulturligo], *do simple perfidas...*« (n-roj 61-62 kaj 63-64/1974).

Aliflanke, por esti tute objektiva, mi ne povas ne diri, ke tuj post Hamburgo venis ankaŭ 2-3 aprobaĵ reagoj, inter kiuj plia cirkuleraco de s-ro Felix Epstein, unu el la multaj skribitaj de tiu jam kaduka maljunulo, sed ankoraŭ sufiĉe juna por trovi energion kaj tempon por elvivigadi sian vere patologian malamon al mi dum pli ol du jardekoj per tiaj moralaj-intelektaj produktoj. La fakto, ke siatempe li simile atakadis min por defendi G.A. Connor montras, ke lia sinteno havas nenion komunan kun la politika konspiro, kiun, cetere, li estas malkapabla kompreni. En tiu lasta (ĉu vere lasta?) cirkulero li uzis pri mi multajn tre »afablaĵn« epitetojn, el kiuj eble la plej afabla estis la jubila, ke en Hamburgo » la verda diablo abdikis«! Eta frandaĵo: H. Müller, elstara kaj tre respektata germana esperantisto, konstatis laŭ la posta stampo, ke la cirkulero estis enpoŝtigita en la distrikto de Hamburgo, en kiu loĝas d-ro W. Bormann, sufiĉe malproksima de tiu, en kiu loĝas s-ro F. Epstein, kio, tamen, povas esti nur pura hazardo.

Tiom, tre ĝenerale, pri la unuaj reagoj en la monda Esperanto-Movado. Sed kio pri la nova Estraro?

Unu el la unuaj paŝoj de la nova prezidanto estis viziti la redakcion de *Heroldo* de Bruselo, tre kredeble por danki pro la multjara kampanjo de mensogoj, ku sendube faciligis la sukceson de la puĉo. Pri la vizito aperis informo kun foto de la prezidanto en amika konversacio kun s-ro G.C. Fighiera en *Heroldo* n-ro 11-12/1974. La prezidanton akompanis la estrarano pri financoj, s-ro E. J. Woessink, verŝajne por danki al *Heroldo* pro ĝiaj siamtempaj hontindaj misprezentoj en la t.n. afero Jakob kaj pri *La Praktiko*, en kiuj E.J. Woessink ludis sian rolon, tiutempe absolute prave. Kia nova amikeco! D-ro W. Bormann, kiel pli ol abunde informis *Pilo-Press* en kelkaj sinsekvaj n-roj (31, 32, 33/74), veturis al Pollando, kie li havis »gravajn konversaciojn«, interalie kun la direktoro de la Eksterlanda Servo de la Pola Radio, dum kiu »evoluis interesoplena diskuto tuŝanta ankaŭ politikajn temojn« (n-ro 33/74). Plia eta frandaĵo: *Pilo-Press* publikigis leteron de iu Bruno Gahler, laŭ kiu »ja ne longe daŭros kaj vi [L. Pickel-czinski] fariĝos honora civitano de Polujo laŭ la oftaj mencioj en Radio Varsovio kaj laŭ viaj meritoj por la simpatia patrio de Zamenhof«! (v. ankaŭ en 5.2 pri la konversacio de L. Pickel kun Varsovio antaŭ la puĉo).

Nu, ni lasu tion. Kaj kio pri la laboro por Esperanto?

En la kampanjo de nigrigoj la konspirintoj kaj iliaj aliancanoj sisteme, ripete, endoktrinige disfamigadis (kaj plu disfamigas), ke mi »sufokadis kontraŭajn opiniojn«, k.s. (v. supre en 4.4); responde al mia artikolo »UEA en danĝero de malintegriĝo«, la »verama« *Heroldo* publikigis ankaŭ parton de letero de R. Corsetti sub la titolo »UEA en danĝero de modernigo« (n-ro 10/1974). Se vere estus tiel, do nun de ĉiuj flankoj devus fontane ŝpruci novaj ideoj, dum jaroj tiel terure »sufokataj«, kaj ĉiuj direktitaj al »modernigo« de la »malmoderna« ĝishamburga UEA!! Kio, do, estas tiuj ideoj? Kaj kie la modernigo?

Jen bilanceto post nuraj kelkaj monatoj:

(i) Laborplano praktike ne ekzistas. Neniu, eĉ ne la verkinto(j) okupiĝas pri la realigo de kiu ajn ero. La nuna UEA laboras sen baza laboraprogramo, por la unua fojo ekde 1955.

(ii) En la julia/aŭgusta n-ro de *Esperanto* aperis miaj Sugestoj pri Agadprogramo de UEA por la Periodo 1974-1977. Kvankam la Komitato decidis, ke estu konsiderataj la sugestoj (protokolo, p. 25), tamen nenio estas farita tiurilate.

(iii) En la maja n-ro de *Esperanto* (1974) aperis Projekto de Laborplano por la Kontraŭrasisma Jardeko, ellaborita de mi kaj aprobita de la antaŭa Estraro. Kiel en la antaŭaj kazoj de tiaj okazaj planoj (v. 18.3.3.4 de *EeP*), ĝi kombinas kontribuon al Unesko por kontraŭbatali rasismojn kaj aron da agadoj por progresigi Esperanton. Kvankam la Komitato akceptis ĝin (protokolo, p. 25), tamen absolute nenio estas farita por realigi kion ajn en tiu plano. Anstataŭe oni multe skribas pri la Internacia Jaro de la Virino, kiu, kvankam apoginda, apenaŭ donas kian ajn eblecon agadi por Esperanto. Estas eĉ formita ia komitato aŭ komisiono (kiom da ili ĝis nun?), kiu devus kunveni dum la UK en Kopenhago por plani siajn agadojn por – la fino de la jaro, kvazaŭ tiajn internaciajn agadojn oni povus serioze organizi sen antaŭa projekto kaj fine de tia »jaro«! Kaj, cetere, tio okazas tuj post kiam la artefarita plimulto en la Komitato senigis la Asocion de 5 (kvin) valoregaj virinoj: M. Vermaas, E. Lapenna, I. Gastón, G. Svensson kaj A. Zapeda (v. supre pri la elekto de komitatanoj C).

(iv) Malgraŭ impertinenta aserto – unu el la multaj post Hamburgo – en la maja *Esperanto* (1975), ke »la Asocio dum la lasta duonjaro flegas pli intensajn eksterajn rilatojn, ol ĝi faris iam ajn antaŭe en sia lastatempa historio« (mi vere demandas min, ĉu povos troviĝi unusola naŭvulo, kiu kapablos engluti tion), la eksteraj rilatoj kolapsis. Por la unua fojo ekde 1952, UEA ne estis reprezentita en la Generala Konferenco de Unesko fine de 1974, nek ĝia starpunkto pri la programo de Unesko estis esprimita en alia maniero. La ligoj kun multaj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko, flegataj dum jaroj de J. Thierry en Parizo kaj de mi mem en Londono, estas komplete neglektataj. Eĉ

la 20-jara datreveno de la fama Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 kaj la establo de konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko, ne estis menciitaj per unusola linio en la decembra *Esperanto*. Kiel vidiĝas el letero de d-ro Tonkin al s-ro J.L. Saudian-Rousseau de 25.10.1974, la nuna estrarano pri eksteraj aferoj eĉ ne sciis, ke J. Thierry dum jaroj estis reprezentanto de UEA ĉe la Sekretariato de Unesko en Parizo (v. la lastjarajn Raportojn de la Estraro, Eksteraj Rilatoj). Mi aldonu, ke per mia letero de 08.09.74, do tuj post mia reveno hejmen – ankoraŭ laca kaj pro la longa vojaĝo kaj pro la novaj insultoj ricevitaj en Hamburgo – mi skribis 5-paĝan leteron al la CO por la Estraro *pri la plej urgaj taskoj, interalie pri tiuj en la sfero de eksteraj rilatoj*.

(v) La bulteno »Unesko-Novaĵoj«, kiu kostis al UEA praktike neniom, ĉar la tuta redakta laboro estis farata ekster la CO, estas ĉesigita. Ĉ. 1.000 artikoloj kaj novaĵoj, ĉerpitaj el tiu bulteno, aperis en la Esperanto-gazetaro en la antaŭaj jaroj. Ŝajnas, ke ankaŭ *Kontakto* ne plu aperados, kvankam ĝi estus povinta ludi pozitivan rolon, se ĝi mem kaj TEJO estus revenintaj al la linio de la periodo antaŭ Tyresö.

(vi) CED ĉesis funkcii. La nunaj babiladoj pri reorganizo eksplicite insultas min kaj la aliajn estintajn kunlaborantojn kaj, krome, estas ĉefe direktitaj al detruo de CED kiel *scienca institucio* de la neŭtrala Esperanto-Movado, *pledanta aperte*, surbaze de faktoj kaj sciencaj argumentoj ne por Ido, aŭ Interlingua, aŭ kiu ajn mortnaskita projekto, *sed por nia vivanta Internacia Lingvo Esperanto*. En letero sendita al *Esperanto*, Mag. I. Dratwer, unu el la plej sindonaj kunlaborintoj de CED, skribis interalie:

»Kun miksitaj sentoj mi legis eĉ relegis la planon de estonteco de CED, prezentitan de ĝia nuna aganta direktoro d-ro J. Pool en *Esperanto* n-ro 832 (4)-1975 kaj pli amplekse en *Heroldo de Esperanto* n-ro 9-1975, ne sciante, ĉu ĝi estis ŝerco, mistifikajo aŭ serioza propono... Tiu nova CED fakte eĉ ne estos Esperanta, ĉar 'atendeble, triono de la konsilantaro kaj kelkdeko da korespondantoj estos neesperantistoj' (!! – I.D.) kaj UEA devos pagi al tiu nova CED 10% de ĉiuj enspezoj!... La plano, prezentita de la nuna aganta direktoro de CED estas malutila por la Movado kaj danĝera himero«. [Ĉu almenaŭ tiu ĉi letero estos publikigita en *Esperanto*?!]

La legantoj de tiu ĉi dokumento bv. noti, ke la buĝeto de CED, *ĉiam rigore observata*, restis praktike senŝanĝa ekde ĝia fondiĝo en 1952 malgraŭ la altiĝo de ĉiuj prezoj kaj inflacio. En 1973 la *tuta sumo* de la elspezoj de CED estis *malpli ol duono* de la plej malalta salajro en la CO, dum la subvencio de UEA al CED estis 623 britaj pundoj, do ĉ. unu triono de la plej malalta salajro en la CO. Rezulto de sindona libervola laboro, distinge de la burokratiĝo de la CO.

(vii) La oratoraj konkursoj estas ĉesigitaj.

(viii) Ŝajnas, ke ankaŭ ISU estontece okupiĝos pri »interlingvistikaj demandoj« anstataŭ esti kadro por prezento de sciencaj akiraĵoj en diversaj branĉoj.

(ix) La informado komplete kolapsis.

(x) La *Jarlibro* ne plu aperados en du partoj, sed nur en unu.

(xi) La Raporto de la Estraro ne plu estos publikigata por la membraro, sed nur komunikata al la Komitato. Fakte, post la nuligo de ĉiuj agadoj apenaŭ estos io por raportoj, se oni esceptas blufajn laŭ la modelo de TEJO (v. supre en 4.4).

Restas, praktike, nur la gazeto (publikigata kun grandaj malfruigoj), la *Jarlibro* en unu parto kaj la organizado de la kongresoj. Kaj por tio oni bezonas Komitaton de sepdeko da personoj, Estraron de 8, tutan aron de komisionoj, oficistaron de 7-8 personoj! Krome, ĉiuj kotizoj estas konsiderinde altigitaj, kio, pro la inflacio, ja estus *plene pravigebla, se samtempe la agadoj ne estus ĉesigitaj*.

Tio, do, estas la »novaj ideoj« kaj la »modernigo«, kaj tio okazas ĝuste en la tempo, kiam, pro la unike favoraj eksteraj kondiĉoj ĉiam pli impete postulantaj solvon de la lingva problemoj, necesis ekspluati maksimume la prestiĝan pozicion de UEA (pensu nur al la nombro de registaraj reprezentantoj en la universalaj kongresoj de la lastaj jaroj, al la kreskantaj simpatioj de la publiko, al serioza raportado en la gazetaro) kaj *intensiĝi ĉiujn agadojn* strikte observante la neŭtralecon. Eĉ se ne estus okazinta la perdo de neŭtraleco kaj demokrateco, *la nuligo de la ĝishamburgaj agadoj sufiĉus por montri, ke UEA galopas en abismon*. Ne povas esti alimaniere, se oni konsideras la konsiston de la nuna Estraro, kies membroj ne nur ne sukcesis evoluigi la organizaĵojn, pri kiuj ili mem ĉefe respondecis aŭ ankoraŭ respondecas, sed permesis, milde dirite, ke ili regresu. Aldone al TEJO (Tonkin-Corsetti-Szabó) kaj la kazoj de Świstak (eĉ ne estis MA), Woessink (respondeca pri la deficito en 1973), Wensing (EKI tute ne plenumis sian originalan programon), sufiĉas mencii GEA, kiu sub sia brila prezidanto d-ro Ziegler (kiun F. Epstein siatempe sukcesis elpeli) havis plurajn milojn da membroj, propran oficejon, profesion oficiston, propran organon, dum hodiaŭ GEA havas, dubinde, 1.000 membrojn kaj estas sen oficejo, eĉ sen propra organo. Surbaze de kio oni povas atendi, eĉ se forestus ĉio cetera, *ke tiaj homoj subite estos kapablaj sukcese gvidi mondan organizaĵon?* Kaj kiel la puĉistoj povis formi alian Estraron, se ili mem malakceptis valorajn kandidatojn kaj per siaj agoj devigis aliajn ekzigi el siaj funkcioj?

Ĉu ankoraŭ iu »nova ideo«. Jes: ne nur absolute totaleca cenzuro (neniu el la multnombraj protestoj, ekzigitaj leteroj de membroj, kritikoj, k.s. estis publikigita en *Esperanto*), sed eĉ polemikoj kun *mensogaj* asertoj pri tekstoj, kiujn la redakcio rifuzis publikigi (ekz. »Por ke estu tute klare« en la novembro n-ro 1974), misprezentoj, prisilentoj, unuvorte totaleca sufokado de la vero

laŭ konata modelo. Jen nur unu el multaj eretoj. *Esperanto* skribis, plian fojon impertinente, ke la »hamburgaj eventoj rezultigis apenaŭ 5 ekzigojn«, sed ke »la samaj eventoj rezultigis ankaŭ almenaŭ 5 realigojn. Kaj kio!? Kion oni volas?« (novembra n-ro, 1974, 183). Tia starigo de la afero – eĉ se la aserto estus vera, kaj senkonsidere al primitiva egaligo de kvantoj senigitaj de kvalitoj – preskaŭ invitas al ekzigoj, ĉar ĝi implicas, ke la membroj dezirantaj »pruvi« sian malaprobbon devas tiucele ekzigi, dum fakte tre multaj membroj restis pro diversaj kaŭzoj (principa »fideleco al UEA«, la koncepto »por ne krei skismon« (fakte jam kreitan de la puĉistoj), »ĉar ne ekzistas alternativo«, ktp.), kvankam ili forte malaprobis la eventojn de Hamburgo, kaj la konduton de la puĉistoj al mi persone. Plue, pluraj dumvivaj membroj, kvankam ŝokitaj pro la eventoj (ekz. H. kaj N. Holmes, M. Vermaas, B. Trærup, k.a.) daŭrigas sian membrecon. Unu el la nemenciitaj skribis: »Mi restas dumviva membro, sed verŝajne ĝis morto de UEA, kiun mi verŝajne travivos. Mia koro sangadas, kiam mi vidas, ke idealoj, por kiuj mi 25 jarojn batalis, pereadas.«

En ĉiu okazo la bedaŭrinda vero estas, ke dum la unua jaro sub la reĝo de politikaj intrigoj kaj mensogo la Asocio perdis precize 759 individuajn membrojn. Ĉiu povas mem konstati tion komparante la statistikon por 1974 (6.543) en la marta *Esperanto* (1975), p. 59, ne kun la malĝustaĵo pri 1973 sur la sama paĝo (7.231), sed kun la ĝusta nombro en la julia/aŭgusta *Esperanto*, 1974, p. 138 (7.302).

Ĉu, eble, ankoraŭ iu »nova ideo«? Fakte ne, ĉar la kampanjo de kalumniadoj kaj nigrigadoj fare de la sama grupo, daŭrigata ankaŭ post Hamburgo, estas jam »malnova ideo«, kiel montrite en la antaŭaj sekcioj. Nova estas la aldono, insiste ripetata en artikoloj (ekz. de d-ro Sadler en la januara *Esperanto*, 1975), cirkuleroj (ekz. de la prezidanto de 15.05.75 al la komitatanoj), eĉ en personaj klaĉadoj kaj »privataj« leteroj (tute speciale de s-ro E.L.M. Wensing), ke la politika konspiro kaj perdo de neŭtraleco estas mia »fantaziaĵo« aŭ »inventiaĵo« aŭ simile! Nova estas ankaŭ la aliĝo de *Esperanto* (kompreneble) al tiu plia skandalo en UEA. La verŝajne bonkora d-ro Denoël, »estrarano pri pacigo«, ne nur faris nenion por haltigi tiun tutan hontindaĵon, sed, male, per siaj »pacigaj movoj« objekte helpas ĝin, kvankam eble li mem ne konscias pri tio. Nova estas ankaŭ la vere maldigna klopodo, ĝis nun ne tre sukcesa, izoli min for de miaj multjaraj kunlaborantoj kaj geamikoj per kalumnioj pri mi, unuflanke, kaj per ĉiaspecaj flatadoj al la »kaptotoj«, aliflanke. Ŝajnas, ke eĉ la »faligita bastiono de neŭtraleco« tre ĝenas la konspirintojn kaj iliajn aliancinojn! Ĉe la pinto, kiel kutime, troviĝas *Heroldo*, superinta sin mem – ĝi estu ankoraŭfoje dirita – per sia provo de morala-intelekta murdo sub preteksto de recenzo pri *ErP* (n-ro de la 16-a de aprilo 1975), kion ĉiu honesta homo povas rigardi nur

kiel moralan-intelektan suicidon de tiu gazeto. Cetere, UEA jam vendis 600 ekzemplerojn de *EeP* en nuraj kvin monatoj, kio jam kovris pli ol la duonon de la produktokostoj. La atako de *Heroldo* kredeble kaŭzos eĉ pli grandan interesigon. Post la disvendo de proksimume 600 pliaj ekzempleroj, prenante abunde en konsideron ankaŭ la rabaton al revendistoj kaj la modestan tantiemon al la du kunaŭtoroj (mi mem rezignis pri mia parto favore al la *ĝishamburga* CED), la resto de minimume 1.600-1.700 ekzempleroj (pro la recenzaj kaj kelkaj aŭtoraj mi prenas abunde sub 1.800) estos *pura profito* por UEA: mia plia financa kontribuo aldone al la enhava valoro kaj la intelektaj streĉoj de mi mem kaj de la kunaŭtoroj, entenataj en la verko. Necesis tion diri, ĉar kaj *Heroldo* kaj *Interlingvistika Servo* malice misprezentis eĉ tiun *financan aspekton*.

Por ankoraŭfoje – kaj lastfoje en tiu ĉi dokumentaro – paraleligi, valoras mencii, ke en la tempo de la ekstreme dekstra atako, similan murdatencon faris la grupo Connor en *Amerika Esperantisto* rilate la unuan eldonon de *Retoriko*, kio, efektive, multe helpis la publikigon de la dua eldono kaj, post ne tre longe, ankaŭ de la tria... *Retoriko* restas; *Amerika Esperantisto* jam delonge mortis.

Sufiĉas. Ĉiu serioze pripensu la prezentitajn faktojn kaj faru siajn konkludojn. La danĝero de malintegriĝo de UEA transiras jam en danĝeron por la plua disvastiĝado de Esperanto kaj eĉ por la ekzisto de la lingvo mem.

En la *Aprila Artikolo* mi atentigis tute klare kaj tre eksplicite, ke por konstrui solidan domon necesas multe da scio kaj laboro; por detrui ĝin per modernaj eksplodigiloj sufiĉas nur sekundoj. Ankaŭ tio nun efektiviĝas, pli ol bedaŭrinde, antaŭ la okuloj de ĉiuj, kiuj ne enŝovas siajn kapojn en la sablon.

6. RESUMA KONKLUDO

El la prezentitaj dokumentoj, materialoj kaj analizoj sekvas jenaj konkludoj:

(i) Esperanto ĉiam estis kaj plu estas atakata de diversaj naciismaj politikaj fortoj, sed precipe de la ekstremaj dekstro kaj maldekstro. Tiu sinteno atingis kulminon en la persekutoj sub la hitlerismo kaj, eĉ pli, sub stalinismo (ĉ. 30.000 esperantistoj en koncentrejoj, pluraj dekoj ekzekutitaj). Por ambaŭ ĝi estis »danĝera lingvo«: por la nazioj kiel »lingvo de cionistoj kaj kosmopolitoj«. La »danĝera« karaktero de la Internacia Lingvo (ne de kiu ajn alia) ŝuldiĝas ne nur al la fakto, ke pro sia facileco ĝi ebligas monde internaciajn senperajn kontaktojn, kiuj glitas el sub la kontrolo de la diktatorecaj politikaj policoj, sed ankaŭ pro la interkompreniga kaj solidara riga efiko, kiun spontane kaŭzas la uzado de Esperanto en internacia rilatado (humaneca internaciismo). La ĝustecon de tiu analizo (kiu, kompreneble, ne ekskludas la utiligon de Esperanto, adekvate al la naciaj lingvoj, por kiu ajn celo, ankaŭ malhonesta) pravas, interalie, ne nur la persekutoj, sed, eĉ pli, la kuraĝa rezisto de la esperantistaro ĝenerale, inkluzive ĝian nunan sintenon en la blokaj landoj, spite al la persekutoj. La humaneca internaciismo, organike ligita al la Internacia Lingvo, estas unu el la plej esencaj kaŭzoj de ĝia unika sukceso en la kultura historio. Tial: konscie pluflegi ĝin kiel faradis UEA ĝis Hamburgo (1974) konforme al sia Statuto (art. 4), signifas samtempe progresigi la lingvon; sufoki aŭ detrui ĝin, signifas senigi la lingvon de ĝia tuta senco *kiel neŭtrale homa komuniko*, haltigi ĝian pluan progresadon kaj, fine, mortigi ĝin.

(ii) Ekde sia formiĝo en 1908, UEA sukcesis konservi sian *politikan neŭtralecon* dum ĉiuj politikaj uraganoj, inkluzive la du grandajn mondmilitojn. Pro sia politika neŭtraleco UEA suferis atakojn ankaŭ interne de la Esperanto-Movado. Tamen, la sole gravaj politikaj krizoj solviĝis tiel, ke la kontraŭneŭtraluloj *apartiĝis disde UEA* kaj formis aŭ provis formi siajn organizaĵojn *ekster ĝia kadro*: SAT en 1921, IPE (Internacio de Proletaj Esperantistoj) en 1932, kelkaj mallongdaŭraj naziaj grupetoj sub Hitler, Malik en Ĉeĥoslovakio en 1950.

(iii) Distinge de la pasiva antaŭmilita neŭtraleco de UEA, mi mem formulis kaj evoluigis jam longe antaŭ la Dua Mondmilito la koncepton de *aktiva neŭtraleco*, kiu, esence, postulas energian reagon je la politike motivitaj eksteraj atakoj kontraŭ Esperanton, tute egale de kiu ekstremo ili venas, kaj firman defendon de la neŭtraleco kontraŭ la atencojn interne de UEA. Sub mia influo, la koncepto de aktiva neŭtraleco, fortikigita per la aldonado en la Statuto de la alineo pri la respekto de la homaj rajtoj kiel esenca kondiĉo por la laboro de UEA (art. 4/II), fariĝis gvidprincipo de la Asocio en la postmilita periodo. Mi mem konsekvence praktikis ĝin dum mia tuta plurjardeka agado por Esperanto. Tion necesis diri ne pro ia »memglorigo« aŭ pro »fiero«, kvankam mi ne malprave povus sufiĉe fieri pro tiu mia senkompromisa sinteno, sed tial, ĉar *ĉiuj atakoj kontraŭ la neŭtralecon*, precipe en la postmilita periodo, inkluzive la nunan konspiron, *estis nedisigeble ligitaj kun hontindaj atakoj kontraŭ min persone*, pro kio mi devis multe suferi.

(iv) La vivo de la Esperanto-organizaĵoj en Orienta Eŭropo, renaskiĝintaj post la milito kiel relative memstaraj organizaĵoj, estis tre mallonga: kun la escepto de la jugoslavia kaj pola, ili ĉiuj estis likviditaj en 1949-50. Nur en 1954-55 ili reaperis, sed nun aŭ en la kadro de aliaj t.n. »amasaj organizaĵoj«, aŭ alimaniere sub la firma kontrolo de la partio. La pola, bulgara, hungara kaj, fine, la ĉeĥa (en 1970) aliĝis al UEA, dum la Esperanto-instancoj en GDR, Slovakio kaj USSR plu restis ekster ĝi. Jugoslavio, aliĝinta jam longe antaŭ la milito, neniam apartenis al tiu »socialisma bloko«. La aliĝo de la kvar blokaj landoj nombre fortikigis la Asocion, sed samtempe kaŭzis problemojn rilate la neŭtralecon, kiun necesis iom elaste interpreti, se temis nur pri malobservoj *interne* de la menciitaj organizaĵoj, tamen rigore atentante, ke ne okazu gravaj atencoj kontraŭ la neŭtralecon de UEA mem. Tiucele oni devis ne nur klarigadi kaj interkonsentadi, sed ankaŭ energie interveni en pluraj kazoj de agoj kontraŭaj al la neŭtraleco de UEA. La aranĝo sufiĉe kontentige funkciis ĝis proksimume 1971 en rilato al la koncernaj landaj organizaĵoj kiel tiaj. Oni ne povas diri la samon pri la Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kiu per siaj partipolitikaj propagando kaj rezolucioj *laŭ la soveta koncepto de paco* kaŭzis ĝenojn kaj malagrablojn, tiel ke necesis interveni, eĉ draste (konfisko de flago kun partipolitikaj sloganoj en Tokio en 1965, aŭ konfisko de propagando kontraŭneŭtraleca literaturo kaj flugfolioj en Helsinko en 1969), por protekti la neŭtralecon. MEM nun troviĝas plene sub la kontrolo de la gvidantoj de la orienteŭropaj Esperanto-organizaĵoj, siavice sub la kontrolo de la komunistaj partioj de tiuj landoj. Pere de sia prezidanto, N. Aleksiev, samtempe prezidanto de la Bulgara Esperantista Asocio kaj membro de la Monda Packonsilantaro, MEM kaj ĝiaj aktivuloj (samtempe funkciuloj de la koncernaj Esperanto-instancoj, tiel ke malaperas la

distingo inter la du) ricevas instrukciojn rekte el Moskvo, kiel aperte rekonite en la ĉeĥa *Starto* n-ro 6/74.

(v) Ekspluatante la t.n. »junularan ribelon«, la maldekstrulaj elementoj en TEJO komencis jam en 1969 politikigadi la junularan sektion de UEA kaj per eksplicitaj kontraŭtralecaj deklaroj kaj per siaj agadoj: partoprenado en evidente politikaj »kontraŭimperialismaj« kunvenoj, junularaj pacfestivaloj, k.s. en orienteŭropaj landoj, kontrakto pri kunlaboro kun la Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ) kaj intimaj ligoj ankaŭ kun aliaj konataj parakomunistaj organizaĵoj. En la periodo de la politika konspiro en UEA (1971–1974) la Estraro de TEJO, »elektiita« surbaze de blufoj kaj arbitraj membronombroj en la blokaj landoj, konsistis el nuraj maldekstruloj: komunistoj kaj »kunvojaĝantoj«. *La politikaj agadoj de TEJO grave kompromitis la neŭtralecon de UEA*, ĉar TEJO estas parto de UEA. Kompreneble, mi forte reagis. Interalie, laŭ mia propono la Estraro de UEA nuligis la kontrakton de TEJO kun MFDJ (sed TEJO tion komplete malatentis) kaj instrukciis la direktoron de la CO malebligi, ke kontraŭneŭtralecaj tekstoj de TEJO aperu en kiu ajn periodaĵo de UEA aŭ TEJO. Fine, kiam nenio plu helpis, mi senkompromise starigis la alternativon: *aŭ TEJO regore observu la neŭtralecon de UEA*, aŭ ĝi estu ĉesigita kiel sekcio de UEA. Se la kontraŭneŭtraleca puĉo ne estus sukcesinta en Hamburgo, tio certe estus okazinta. Kaj tion bonege sciis kaj la gvidantaro de TEJO kaj la gvidantoj de la Esperanto-Instancoj en la blokaj landoj. Des pli la kontraŭneŭtralecaj elementoj unuecigis siajn fortojn por forigi la ĉefan defendanton de la neŭtraleco kaj tial la ĉefan obstaklon al ekrego en la Asocio mem.

(vi) En ligo kun la t.n. pacofensivo de Soveta Unio en Eŭropo antaŭ la Konferenco de Helsinki kaj post ĝi, la »ideologia lukto« inter la »du diametre kontraŭstrantaj tendaroj« konsiderinde akriĝis. La Esperanto-instancoj en la blokaj landoj tuj obeeme konformiĝis. Kiel vidiĝas el publikaĵoj sub ilia plena kontrolo, ili ne nur eksplicite forĵetis la principon de neŭtraleco de UEA kiel »kontraŭsocialisman devojiĝon«, sed ankaŭ aperte anstataŭigis ĝin kaj la humanecan internaciismon de la Asocio per »proleta internaciismo« en la interpreto de Stalin (senkompromisa apogo al USSR), konfirmita de la Breĵnev-doktrino. Ili ankaŭ konsilis al ĉiuj »progresemaĵ« esperantistoj en okcidentaj demokratioj *ne* formi »en la nunaj historiaj kondiĉoj« siajn apartajn organizaĵojn surbaze de »proleta internaciismo« laŭ la modelo de IPE en 1932, *sed agi interne de la neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj*. La nova linio estas plej komplete ellaborita en formo de tuta politika doktrino en la 40-paĝa Programo de Bulgara Esperantista Asocio. Kaj tio ne plu estis la relative negravaj kaj limigitaj malobservoj de neŭtraleco el la periodo de antaŭ 1971, nek ĝi estis komparebla kun la

partipolitikaj agadoj de MEM, organize ne ligita al UEA, sed *tio estas reapiro de la doktrino de »proleta internaciismo« kun ĉiuj ĝiaj partipolitikaj sekvoj, ĉi-foje ne ekster UEA, sed kiel agadprogramo de 4 aliĝintaj landaj organizaĵoj, do en la sino de UEA mem, kio evidente kontraŭas la regulon de art. 13 de la Statuto, eksplicite preskribanta, ke nur neŭtralaj landaj asocioj povas aliĝi al UEA.*

(vii) Samtempe komenciĝis la konspiro ekregi la Komitation kaj pere de ĝi la Asocion en la elektoj de 1974 kunlabore kun la jam politikiginta Estraro de TEJO. Tiucele okazis nombro da konfidencaj kunvenoj de la gvidantoj en la blokaj Esperanto-organizaĵoj, la lasta el ili en Orienta Berlino senpere antaŭ la UK en Hamburgo fine de julio kaj komence de aŭgusto 1974. Siavice, kelkaj maldestrulaj funkciuloj kaj estintaj funkciuloj de TEJO havis fine de decembro 1973 »strikte konfidencan« kunvenon en Kassel por kunordigi la taktikon. Pri la tuta konspiro mi sciigis el fidindaj fontoj en decembro 1973 kaj komence de 1974. En tiaj kondiĉoj mi opiniis kiel mian devon informi la membraron pri la afero, kaj mi faris tion en artikolo publikigita en la aprila n-ro de *Esperanto*. Ĉio antaŭvidita en la artikolo realiĝis konforme al interkonsentita taktiko, jam bone elprovita en tiu tipo de politikaj sistemoj: por detrui ian »danĝeran« idearon – en la kazo de UEA la idearon ligitan al principoj de neŭtraleco, demokrateco kaj humaneca internaciismo – ne sufiĉas nur rekte, sisteme atakadi kaj primokadi la idearon mem (»mucida neŭtraleco«, »kadavro«, »sanganta vundo de la Esperanto-Movado: neŭtraleco«, kaj multaj samspecaj esprimoj), sed necesas ankaŭ senskrupule kaj maksimume nigrigadi ĝiajn ĉefajn protagonistojn, en nia kazo unuavice min mem. Tial la kampanjo kontraŭ neŭtralecon estis kaj plu estas ligita al hontindaj atakoj kontraŭ min persone. Krome estis abunde ekspluatataj ĉiuj homaj malfortoj (ekzemple tro blovitaj ambicioj kaj envioj), personaj amikecoj, eĉ familiaj ligoj en medioj gajnotaj por atingi la celon. Efektive, kiel klare evidentiĝis en Hamburgo, la konspirintoj trovis plurajn aliancantojn inter funkciuloj de kelkaj okcidentaj LA – unuavice de la brita, germana kaj nederlanda – kiuj aliĝis ne pro la politikaj celoj de la konspiro (verŝajne ili ĝis nun eĉ ne sukcesis kompreni tiujn celojn), sed pro aliaj motivoj, ĵus menciitaj.

La du interligitaj centroj de la konspiro – tiu de la blokaj landoj gvidata de komitatano N. Aleksiev, kaj tiu de Kassel – apogitaj de kelkaj nekomunistaj aliancantoj, intensigis sian kampanjon de ĉi-aspecaj, plej fantaziaj nigrigoj kaj en Orienta Eŭropo kaj en la Okcidento per pliaj artikoloj en *Heroldo*, *The British Esperantist* kaj 1-2 malpli gravaj periodaĵoj, per pliaj amasaj cirkuleroj kaj per aliaj metodoj. La partopreno de la privata *Heroldo*, bone konata pro siaj ligoj kun Varsovio kaj misfama pro sia sistema misprezenta klaĉado, ne estis surpriza. Sed ja estis surpriza kaj pli ol bedaŭrinda la aliĝo de *The British Esperantist*, oficiala organo de la brita asocio, kies

senprecedence insulta skribado, eĉ se ĝi ne estis formale interkonsentita kun la konspirintoj, tamen objekte helpis iliajn celojn.

(viii) La unua konkreta manifestiĝo de la interkonsentita taktika plano estis la postulo de la prezidantino de TEJO, F. Szabó-Felső, ke TEJO nomu ok membrojn de la Komitato de UEA. Tion mi firme rifuzis kiel absolute kontraŭstatutan. La dua ŝanco estis la elekto de komitatanoj B fare de la ĉefdelegitoj kaj delegitoj, reprezentantaj la individuajn membrarojn de UEA, kies altaj kotizoj formas la ĉefan enspezon de la Asocio. Estis proponitaj 14 kandidatoj, inter kiuj mi mem kaj pluraj aliaj konataj aktivuloj, por 6 elekteblaj komitatanoj B. La konspirintoj interkonsente proponis precize 6 kandidatojn, el kiuj 3 kompartianoj kaj 3 minimume »kunvojaĝantoj«. Kontraŭe al la antaŭa praktiko, T. Jansson, vicprezidanto de TEJO kaj partopreninto en la sekreta kunveno de Kassel kune kun la prezidantino kaj aliaj, sendis cirkuleron kun alvoko al la delegitoj voĉdoni por la 6 kandidatoj kvazaŭe »ĉar ili estas aktivaj en TEJO«; samtempe en Ĉeĥoslovakio la tieaj gvidantoj sendis »strikte konfidencan« cirkuleron (kiu tamen venis en miajn manojn) kun postulo voĉdoni, sub premo de apertaj politikaj minacoj, por la samaj 6 kandidatoj. Ankaŭ tiu provo malsukcesis. Malgraŭ la senprecedenca kampanjo, celanta damaĝi mian reputacion kaj popularecon inter la membraro, mi mem ricevis amasan apogon de preskaŭ 84 % de ĉiuj voĉoj kaj aliaj valoraj kandidatoj iom malpli. Konsiderante la enhavon de la Aprila Artikolo, tiu voĉdono signifis ne nur rekonon de mia laboro, *sed ankaŭ plebiscitan aprobon de la ĝishamburga linio de aktiva neŭtraleco* kaj de mia eksplicita promeso liberigi la Asocion de ĉiuj negativajoj.

Fariĝis, do, tute klare, ke la plua sorto de UEA estos decidita dum la UK en Hamburgo kaj dependos de tio, ĉu la 13 komitatanoj C estos elektitaj konforme al la statute difinita kriterio »*el inter elstaraj membroj, kiuj pro siaj scioj, spertoj kaj laboro povas efektive kaj aktive helpi al la agadoj de la Asocio*«, aŭ kontraŭ tiu kriterio pro politikaj motivoj. La 27-an de julio, en la momento de la elektoj ĉeestis 49 komitatanoj A kaj B (laŭ la protokolo, sed verŝajne 50, ĉar unu komitatano A de la bloko ne estas menciita) el 52 entute. La bloko havis 18 komitatanojn (du ĉeestis kontraŭstatute), el kiuj 17 estis A, nomitaj de la partiaj instancoj kaj ne elektitaj de la membraro, kaj 1 B, ĉiuj komunistoj kaj agantaj laŭ la ricevitaj partiaj instrukcioj. Al la bloko apartenis almenaŭ 4 »kunvojaĝantoj« de la grupo Kassel, do entute 21 aŭ 22. Sufiĉis nur 3-4 pliaj aliancanoj por havi la absolutan plimulton kaj, pro kaŭzoj jam menciitaj, troviĝis pli da ili. Entute estis 26 kandidatoj. Kvankam la voĉdono estis sekreta, la rezulto montris, ke la bloko de komunistoj-kunvojaĝantoj kaj de la ĉefaj nekomunistaj aliancanoj voĉdonis bloke laŭ antaŭa interkonsento kaj sukcesis elektigi ĉiujn siajn 13 kandidatojn, kiuj, kun 2-3 esceptoj, apenaŭ havas kiajn ajn meritojn en la senco de la statuta

kriterio. Aliflanke, ne estis elektitaj valoregaj kandidatoj, pluraj ankaŭ mondkonataj en siaj respektivaj fakoj ekster la Esperanto-Movado. La batalo por la neŭtraleco de UEA estis perdita. Mi kaj aliaj elstaraj aktivuloj dum la kongreso mem eksigis el niaj funkcioj; aliaj eksigoj, generala malkontento kaj streĉitecoj sekvis la hamburgajn eventojn en la tuta neŭtrala Esperanto-Movado. Tio estas tute komprenebla, se oni prenas en konsideron la fakton, ke en la Komitato kreiĝis artefarita plimulto, politike inspirita, kiu neniel respondas al la starpunkto de la vastaj tavoloj de la membraro, kiel tion pravas la rezultoj de la elektoj por komitatanoj B, la kortuŝaj manifestacioj okaze de mia adiaŭa parolado kaj multnombraj aliaj esprimoj de solidareco.

La unuaj rezultoj de la puĉo vidiĝis jam en Hamburgo. Kvankam en la nova Estraro estas nur du komunistoj, tamen, evidente, ĝi troviĝas plene en la manoj de la komunista bloko inkluzive la »kunvojaĝantojn« en la Komitato. Krome, en ĉiuj kongresaj komisionoj de la Komitato la bloko havis, kaj en la t.n. konstantaj komisionoj plu havas, absolutan plimulton. La nova gvidantaro nuligis aŭ haltigis preskaŭ ĉiujn antaŭhamburgajn multflankajn agadojn de la Asocio kaj enkondukis totalecan cenzuron: ĝi rifuzis publikigi la tekston pri la kaŭzoj de miaj eksigoj, la eksigajn leterojn de aliaj funkciuloj, la multnombrajn protestojn, kritikojn kaj eksigajn leterojn de membroj. Kompleta, totaleca prisilento de la vero kun la celo kredigi al la membraro, ke la Asocio plu estas la antaŭhamburga neŭtrala UEA. Sed ĝi ne plu estas, ĉar:

1. *Ĝia junulara sekcio*, do konsista parto de UEA, forĵetis la principon de neŭtraleco kaj per eksplicitaj deklaroj kaj, eĉ pli grave, per siaj multnombraj partipolitikaj agadoj. Mi publike demandas la novan gvidantaron, ĉu ĝi intencas tuj ĉesigi la ekziston de la politike neneŭtrala TEJO kiel sekcio de UEA por klare distancigi sin de ĝia evidente politika karaktero.

2. La gvidantoj de *kvar aliĝintaj landaj organizaĵoj*, nun absolute subigitaj al siaj respektivaj komunistaj partioj kaj agantaj laŭ iliaj instrukcioj, ne nur krude forĵetis la principon de neŭtraleco, sed ankaŭ eksplicite anstataŭigis ĝin per tiu de »proleta internaciismo«, kaj agas konforme al tiu principo pere de siaj organizaĵoj kaj pere de MEM, kio, pro la identeco de ideologiaj celoj kaj funkciuloj, fariĝis la sama afero. Sekve ili ĉesis esti neŭtralaj en la senco de art. 4 kaj 13 de la Statuto, sed akiris decidan povon en la Komitato de UEA. Mi publike demandas la nunan gvidantaron, ĉu ĝi intencas iniciati proceduron por eksigi tiujn organizaĵojn el UEA konforme al art. 20 de la Statuto; aŭ, se ĝi ne kapablas tion atingi pro la nuna artefarita plimulto en la Komitato, ĉu ĝi intencas establi en kompetenta kortumo, ke la membreco de la kvar landaj organizaĵoj estas ĉesigita pro ilia malneŭtrala karaktero laŭ la Statuto de UEA.

3. Krome, mi publike demandas la nunan gvidantaron, ĉu ĝi

intencas, konforme al la principo de aktiva neŭtraleco, energie protesti pro la policaj persekutoj kontraŭ esperantistoj en Ĉeĥoslovakio post la hamburgaj eventoj, aŭ ĝi preferos silenti por ne provoki la blokon en la Komitato, de kiu ĝi dependas.

Nur pozitiva respondo al la tri demandoj pravigus la aserton, de UEA restas neŭtrala. Alie la aserto estas trompa malvero.

Cetere, la samajn demandojn mi faras ankaŭ al la neŭtralaj organizaĵoj en la kadro de UEA kaj al iliaj elektitaj estraranoj, ankaŭ al tiuj, kiuj pro diversaj personaj motivoj aŭ misgviditaj de la kampanjo, aktive kontribuis al la sukceso de la politika puĉo. Se antaŭ la publikigo de tiu ĉi dokumenta materialo oni povis preteksti, ke la faktoj ne estis sufiĉe konataj aŭ kontentige pruvitaj, nun tio ne plu eblas. Ĉia plua pasiva silentado signifas kunrespondecon aŭ eĉ komplicecon. Erari oni povas. Tio estas homa kaj pardonebla. Persisti en la eraro estas nepardoneble.

Fine, mi povus starigi la lastan demandon: kion la nuna gvidantaro, precipe la estrarano »pri pacigo«, kaj la respondecaj instancoj de tiuj organizaĵoj, kiuj restas neŭtralaj, intencas fari por iel ripari la senprecedencajn maljustaĵojn faritajn al homo, kiu dum preskaŭ kvin jardekoj, dediĉis ĉiujn siajn intelektajn kaj fizikajn fortojn al la progresigo de Esperanto kaj de la Zamenhofa humaneca internaciismo, kaj kiu fariĝis viktimo ĉefe pro sia firma defendo de la aktiva neŭtraleco, sen kiu UEA ĉesas esti si mem, kaj aliparte tial, ĉar difinita tipo de individuoj, pro siaj misproportiaj aspiroj, kapablas elvivigi siajn ambiciojn famiĝi sole per senskrupule mensogaj ni-grigoj de tiuj, kiuj pro siaj objektivaj atingoj ja fariĝis iom konataj: kion oni intencas fari por fine haltigi tiun malnoblan kampanjon? Sed mi rezignas pri la demando, kaj sekve, ankaŭ pri la respondo.

7. ALDONOJ

7.1 APRILA ARTIKOLO

(*Noto:* Tiu ĉi admona artikolo aperis en n-ro 4/1974 de la revuo *Esperanto*. Ĝi fariĝis konata en la Esperanto-Movado kiel la »Aprila Artikolo« kaj laŭ tiu titolo ĝi estas plurloke menciita ankaŭ en *Hamburgo en Retrospektivo*. Sube aperas la kompleta, korektita teksto. Ĉiu leganto povos facile konstati, ke la analizo de la situacio kaj la prognozo bazita sur tiu analizo montrigis ĝustaj).

Admono al la membraro

U.E.A. EN DANĜERO DE MALINTEGRIGO

La formala unuiĝo de la neŭtrala Esperanto-Movado, esprimita en la aktoj de 1947-48, kvankam sendube pozitiva fakto, neniel per si mem signifis aŭtomatan solvon de multnombraj problemoj, kiujn kaŭzis la postmilitaj kondiĉoj ĝenerale, kaj la tiama tre malforta interna situacio de UEA speciale. Dum ĉiuj kontentis kaj multaj jubilis pro la ĉesigo de la dueco, klarvidaj personoj bone komprenis jam tiam, ke necesos multflankaj sciencaj studoj, abundaj spertoj akireblaj nur per intensa praktika laboro, kaj grade vastiĝantaj diversdirektaj agadoj – ĉio ĉi kombinita en unu granda tuto – por fortikigi la Asocion interne surbaze de unueca platformo; por transformi iom post iom la Esperanto-Movadon en atentindan kulturan kaj socian faktoron de la nuntempo; por doni al la Internacia Lingvo la merititan prestiĝon kaj tiel faciligi ĝian pluan disvastiĝon.

7.1.1 Bazaj konceptoj

Konkrete, sukcesa laboro postulis, unuavice, teorian pritrakton kaj praktikan aplikon de kelkaj esence gravaj bazaj konceptoj: universaleco kaj neŭtraleco, unueco en diverseco, kunligiteco kaj interdependeco, celoj kaj rimedoj. Ĉiu el la menciitaj principoj, detale pritraktitaj en la baldaŭ aperonta monumenta verko *Esperanto en Perspektivo**, estas per si mem sintezo de kontrastoj, kontraŭaĵoj, aŭ eĉ de antagonismaj tendencoj: humanisma internaciismo kiel idea fono, nedisigeble ligita al la Internacia Lingvo, troviĝas meze inter fermita naciismo kaj la unueca mondo de la estonteco; aktiva neŭtraleco, konforma al universaleco de la lingvo kaj respondanta al humanisma internaciismo, solvas la

*) La verko fakte aperis fine de 1974.

antagonisman konflikton inter pasiva, indiferenta neŭtralismo kaj ekstrema partipolitikismo; unuecon limigas diverseco ekzistanta en la realo, kaj diversecon mildigas la postulato de unueco (v. ankaŭ la artikolon pri unueco en la januara *Esperanto*, 1974; kunligiteco de ĉiuj agadoj – unuavice en la tri ĉefaj branĉoj: informado, instruado kaj praktikaj aplikoj – estas kondiĉita de ilia interdependeco; demokrateco kun memdisciplino okupas centran pozicion de pozitivo kontraŭ ambaŭ inter si konfliktantaj ekstremaĵoj de diktaturo kaj anarkio (v. ankaŭ la koncernan artikolon en decembra *Esperanto*, 1973); fine, celo sen rimedoj estas absurdaĵo, kaj neutiligo de rimedoj por atingi la celon estas stultajo.

Prenitaj pare, ĉiu el la duopoj prezentigas kiel tuto, en kiu la kontraŭstarantaj flankoj kompletigas kaj samtempe limigas unu la alian, kaj per sia kontrasta kunekzisto formas unuecan bazan koncepton. Ĉiuj bazaj konceptoj kune, en ekvilibra sintezo de kompleksaj interagoj, fariĝis la firma fundamento, sur kiu estis eble solvadi organizajn demandojn konforme al la bezonoj de unuopaj evoluperiodoj; realigi paralelajn agadojn en la sferoj de informado, instruado kaj praktikaj aplikoj, post *realecaj* taksoj de faktaj eblecoj; samtempe klopodi finance fortikigi la Asocion.

Grandiozaj estis la taskoj, kiujn en 1948 kaj poste frontis UEA kaj ĝiaj organoj aŭ unuopaj funkciuloj, al kiuj la membraro konfidis la gvidadon de la Asocio.

Ĉu ili estas plenumitaj?

7.1.2 Nekontesteblaj atingoj

Post la supraj iom abstraktaj tezoj – kvintesenco, tamen, de multjaraj observoj, studoj kaj spertoj – ni transiru al konkretaj faktoj en malpli abstrakta lingvaĵo.

Venkante multajn malfacilaĵojn – de eksteraj persekutoj ĝis internaj miopecoj – la neŭtrala Esperanto-Movado, konscie kaj celtrafe gvidata de UEA laŭ du bazaj perspektivaj programoj kaj pluraj okazaj laborplanoj, faris rimarkindajn progresojn en ĉiuj direktoj. Tio ne falis el la nuboj. Ĉiu el la multaj grandaj eksteraj kampanjoj, ĉiu interna fortikiga agado, ĉiu reorganizo por adapti la strukturon al la aktualaj bezonoj, ĉiu el la klopodoj havigi la minimume necesajn financajn rimedojn postulis amason da tempo kaj scioj por antaŭpreparoj, planado, kunordigado kaj realigado. Sole la subskribinto oferis milojn da efektivaj laborhoroj ekde 1948 tiucele, ne kalkulante la antaŭan laboron en Jugoslavio. Aliajn centmilojn da laborhoroj, same senkompanse, donis centoj, en iuj sferoj eĉ miloj da talentaj kaj sindonaj, pozitivaj fortoj laborante sur internacia, landa, loka aŭ faka niveloj. La motivo certe estis nek materia gajno (neimagebla, cetere), nek kontentigo de iuj personaj ambicioj, sed sole la

konvinko pri la praveco de nia starpunkto kaj la ĝusteco de la principoj, laŭ kiuj ni ekagis por venkigi ĝin. Unu sukceso post la alia efikis inspire kaj mobilize, kio siavice kuraĝigis vastigon kaj profundigon de la agadoj.

Se oni eĉ nur suprajne trafolumas la Estrarajn Raportojn ekde 1948, oni facile konstatas la daŭran progresadon en ĉiuj direktoj, reciproke kunligitaj: interna fortikigo, kvalita plibonigo kaj kvanta kreskigo de nia informado, sciencaj esploroj kaj dokumentado, novaj elstaraj periodaĵoj, instruado en diversaj formoj, evoluigo de niaj kongresoj ekde iaspecaj provincaj foiroj al monde respektataj kulturaj-laboraj aranĝoj, multflankaj kontribuoj al kultura riĉigo de la lingvo (ISU, Oriento-Okcidento, belartaj kaj oratoraj konkursoj, teatraj prezentadoj, artaj festivaloj) ktp., ĝis la prestiĝaj eksteraj rilatoj kun Unesko, UN kaj amaso da aliaj organizaĵoj. Tuta numero de *Esperanto* necesus nur por listigi sen komentoj ĉiujn atingojn. Sufiĉas, eble, memori, ke en 1948 UEA konsistis el 26 aliĝintaj kaj kunlaborantaj asocioj, havis 17 007 membrojn en 70 landoj kaj 2 224 delegitojn en 58 landoj; en 1972 ĝi konsistis el 54 aliĝintaj kaj kunlaborantaj asocioj, havis 32 459 membrojn en 88 landoj kaj 3 556 delegitojn en 65 landoj. La kapitalo, kiu en 1948 estis ronde ĉ. 50 000 gld., konstante kreskis kaj estis preskaŭ dekoble pli granda en 1972, se oni prenas en konsideron la faktan valoron de la domo en Rotterdam. Aldone, dank' al iniciato kaj laboro de Marianne Vermaas, la Institucio Hodler 68 kolektis en formo de donacoj kaj pruntoj pliajn 150 000 guldenojn, taŭge investitajn. Ankaŭ la domo de UEA en Rotterdam, la bone ekipita CO kaj la fortiĝinta financa bazo, kredis al mi, ne falis el la nuboj!

Mallonge, ni sukcesis konduki la Asocion kaj sekve la tutan neŭtralan Esperanto-Movadon el senperspektiva rutino, kelkrilate sur la rando de abismo, al dinamisma, forta organizaĵo kun alte respektata reputacio en la ekstera mondo.

7.1.3 »Kiel faligi Lapenna?«

Jam antaŭ pluraj jaroj mi atentigis pri la subfosa agado de grupeto da personoj, kiuj pro diversaj obskuraj motivoj klopodas detrui la atingojn kaj grave kompromiti ĉiujn objektivajn valorojn en la Esperanto-Movado. Post la UK en Londono (1971) tiu maldigna kampanjo intensiĝis kaj oni povas atendi kun grandega verŝajno, ke ĝi atingos eĉ pli vastajn dimensiojn en la sekvaj semajnoj, antaŭ la UK en Hamburgo. La metodo estis kaj restas: artikoloj kun insultaj atakoj, malveroj kaj duonveroj (eĉ pli danĝeraj ol la malveroj) en 2-3 gazetoj; rifuzo de la ĉiopovaj redaktoroj publikigi korektojn kaj kontraŭajn opiniojn kun la celo teni la legantaron plene sub sia influo (interalie: pro la rifuzo de la redaktoro de *The British Esperantist* publikigi mian korekton, mi eksiĝis el Honora Membreco de BEA, sed la kaŭzojn oni ĝis nun

prisilentis al la brita esperantistaro); intenca prisilentado de ĉiuj novaj atingoj, precipe se ligitaj al mia nomo; sekretaj kalumniaj cirkuleroj; sekretaj korespondadoj de la koncernaj personoj direktitaj eĉ al unuopaj membroj de la Estraro de UEA; sekretaj kunvenoj, ekzemple unu fine de decembro en Germanujo kun la ĉefa punkto de la tagordo »Kiel faligi Lapenna?«.

Fine, evidente kun la celo naŭzigi min komplete eĉ pri la vorto »Esperanto«, grupeto aŭ individuo sendadas ne nur al mi, sed ankaŭ al aliaj personoj insultajn anonimajn telegramojn el Parizo ĉiam kun la subskribo »Pariza Esperantista Tribunalo« aŭ »Pariza Tribunalo«. Ekde julio 1971 entute estis senditaj ĉ. 40 tiaj longaj telegramoj. Esploroj ĉe la francaj aŭtoritatoj montris, ke la koncerna individuo aŭ grupeto indikas kiel sendinton aŭ min mem, aŭ iun el miaj bonaj amikoj, ekzemple Harry Holmes, Jean Thierry k.a. Tio, kompreneble, jam estas ekster la sfero de ordinaraĵoj, kaj troviĝas profunde en tiu de krimo ne nur pro la insulta kaj kalumnia enhavo, sed ankaŭ pro la kontraŭleĝa misuzo de nomoj.

Mi ne eniros en kiun ajn detalon, ĉar mi timas, ke eĉ la nura tuŝo necese malpurigus miajn manojn. Krome, tio povus nur kaŭzi plian malbonon al afero, je kies grandeco mi plu fidas, ĉar certe ne kulpas Esperanto, ke ĝin ellernis eĉ tiaspecaj individuoj. Sufiĉas diri, ke elstara membro de la Asocio, bonega konanto de la historio de Esperanto, diris al mi: »Estis multaj fiaĵoj en la historio de la Esperanto-Movado, sed la nunaj superas ĉiujn kune«.

Tia, do, estas la respondo al la demando »kiel faligi Lapenna«: ne per sincera kaj honesta diskuto aŭ konstrua kritiko, kiu evidentigus miajn eventualajn erarojn en gvidado de UEA kaj ĝenerale en la laboro por la Internacia Lingvo, sed per obskuraj komplotoj, unuflanke, kaj per krimaj agoj kun la celo kalumnii kaj nigrigi, aliflanke.

7.1.4 Atenco kontraŭ neŭtralecon: »kadavro«

Laŭ pluraj fidindaj informoj – eĉ de du personoj aktive partoprenintaj en tiu subfosa agado, sed ĝustatempe malfermintaj siajn okulojn – estas klare, ke la celo de la tuta kampanjo estas plene ekregi la Asocion kaj utiligi ĝin por siaj politikaj celoj (en la kazo de unu grupeto) aŭ por kontentigi siajn personajn tro blovitajn ambiciojn (alia grupeto). Kiam mi demandis unu el ili, kion fakte oni kritikas rilate mian gvidadon de UEA, li respondis proksimume: »Fakte nenion, sed oni rigardas vin bastiono de neŭtraleco; tial detruui vian popularecon per nigrigoj faligos vin kaj la neŭtralecon«. Eble en ligo kun tiu celo, aŭ ekster kia ajn ligo, R. Cash, estinta oficisto en la CO de UEA, skribis en artikolo publikigita en *Kontakto* n-ro 3/73, ke en TEJO oni ne plu malŝparas sian tempon diskutante pri »mucida neŭtraleco«, kiu temo estas »morta mefito« kaj »forgesita miozoto«, kaj ke nur en

kelkaj »maturaĝaj« rondoj »oni ankoraŭ priflaras kaj palpetas la kadavron« (p. 18). Mi ne donos ekzemplojn de kruda malobservado de neŭtraleco en la lastaj 2-3 jaroj, kiu jam sufiĉe kompromitis la Asocion kaj perdigis al ĝi valorajn membrojn. Ĉiam la samaj personoj misuzis la prestiĝan pozicion de UEA ekspluatante ĝian neŭtralecon.

Kial ekspluatante? Ĉar, se UEA havus difinitan politikan koloron, tiam ĝia apogo estus praktike senvalora; sed se ĝi havas reputacion de serioza politike neŭtrala monda organizaĵo, tiam la apogo de tiuj, kiuj arogas al si la rajton paroli en ĝia nomo aŭ en tiu de ĝia junulara sekcio, ja havas pezon! Kaj precize tio eksplikas la nunan klopodon plene ekregi en UEA kaj misuzi ĝian internacian reputacion, eble eĉ ĝian kapitalan rezervon, por nete politikaj celoj.

La kalkuloj de la atencantoj, tamen, ne estas tute ĝustaj. Se ili sukcesos – kaj ili ja povas sukcesi, se la tuta membraro ne konsciiĝos en tiu ĉi lasta momento – tre baldaŭ UEA eniros en la liston de politikaj organizaĵoj de difinita tipo, kaj sekve perdos la valoron eĉ por tiuj, en kies servon oni intencas ĝin meti. Krome, tute certe multaj landaj asocioj eksigĝos, la individua membraro abunde forlasos la Asocion, okazos plena malintegriĝo kaj kolapso. La pene konstruita moderna, forta kaj prestiĝa UEA ĉesos ekzisti. Estinta membro de TEJO, ege progresema el ĉiuj vidpunktoj, skribis al mi antaŭ nelonge: »La venko de viaj oponantoj en Hamburgo povas nur aŭguri la baldaŭan pereon de UEA«. Oni ne forgesu, ke por konstrui solidan domon necesas multe da scio kaj laboro; por detrui ĝin per modernaj eksplodigiloj sufiĉas nur sekundoj!

7.1.5 Detruado de aliaj valoroj

La slogano »estu paco«, tiel ŝatata en la Esperanto-Movado ekde ĝiaj komenciĝoj, estas principe bona, salutinda kaj observenda. Tamen, se oni interpretas ĝin kiel ian »devon« ne reagi kontraŭ plej seriozan minacon, ĝi fakte helpas la minacon. Ne povas esti »paco« inter vero kaj mensogo, inter agreso kaj defendo, inter bono kaj malbono. Eĉ Kristo, kiun verŝajne neniu, senkonsidere al sia religia aparteno, povus kalumnii pro »instigado al malpaco«, elvippis la komercistojn el la templo. En la aktuala kazo la pasiveco, eĉ timiga pasiveco, kuraĝigis aliajn atakojn el ĉiuj objektivaj valoroj en la nuntempa Esperanto-Movado. Eĉ la Akademio de Esperanto, kiu neniam laboris tiel science kaj efike, kiel nun sub la prezidanteco de Prof. Waringhien kaj liaj kolegoj en la Estraro, suferis plurajn atakojn, el kiuj elstaras tiuj en la rubriko »Aliflanke« de *The British Esperantist* de novembro-decembro 1973 kaj januaro-februaro 1974. En la artikolo de s-ro E.L.M. Wensing, publikigita en la sama januara-februara *BE*, troviĝas ne

plu nur atakoj kontraŭ tuta aro da objektivaj valoroj, sed ankaŭ nekredeble senbaza kaj muljusta juĝo pri Esperanto mem kun samtempa tute nescienca laŭdegado de la angla. Esperanto por la aŭtoro ne estas vivanta lingvo, sed nur »projekto«, eĉ »projekto« posedanta sole »pli riĉan literaturon ol iu ajn antaŭa projekto« (!), kaj ne multoble pli grandan ol ĉiuj ĉ. 800 projektoj kune. Ne distingante inter science bazita pritrakto kaj amatoreco, li riproĉas ian kvazaŭan ĝeneralan »amatorecon« kaj »diletantecon« de ĉio en la Esperanto-movado, sed ne vidas, ke EKI, kies prezidanto kaj verŝajne sola estrarano li nun estas, ekde la fondiĝo de EKI en 1963 atingis fakte nenion en medioj de komerco kaj industrio: nek amatore, nek fake, se oni esceptas la nunan publikigon de la *Internacia komerca-ekonomika vortaro*, elstara verko de s-ro F. Munniksma. Verŝajne nek li, nek la redaktoro rimarkis, ke pli grandan esprimiĝon de amatoreco kaj diletantismo ol estas la koncerna numero de *BE* oni apenaŭ povas imagi: kun la escepto de la indiko »Eŭropa Eldono« kaj la mapo de okcidenta Eŭropo, ĝi havas absolute nenion eŭropan. Fine, por kompletigi la bildon, la aŭtoro de »Aliflanke« en *BE* anoncis tute klare per sia bondezira novjara karto: »Jen 1974 – Ni tuŝu la Fundamenton!«. Do, la sekva viktimo estos la Fundamento mem, tiu sendiskute baza lingva kerno, al kiu ŝuldiĝas la nuna vivanteco kaj uneco de la lingvo.

Se oni legus tiajn absurdajn atakojn en iu nete malamika nacilingva periodaĵo, oni tion povus kompreni kaj tutcerte ankaŭ sukcese rebati. Publikigi tiaĵojn en oficiala organo de landa asocio signifas nekredeble malprudentan segadon de la branĉo, sur kiu ni sidas. H.A. de Hoog skribis en *Dia Regno* de februaro 1974 rilate alian negativan fenomenon, ke tio »montras la mizeran konsiston etikan kaj gramatikan de tiu fronto, kiu, eĉ sen prestiĝo kaj validaj argumentoj, povas tamen plu krei konfuzon inter la nove bakitaj esperantistoj kaj skeptikecon inter la ĝenerala publiko kaj ĉe la respondecaj instancoj oficialaj de la diversaj landoj«. Tiuj vortoj aplikiĝas al ĉiuj nuntempaj defetismaj negativajoj. Kaj ĝuste tio estas unu el la ĉefaj obstakloj al plua progresado. Se oni ne haltigas plej energie tiun subfosan agadon, ne nur la plua progresado, sed eĉ la ekzisto de Esperanto mem kiel lingvo estos en danĝero.

7.1.6 Aktiva neŭtraleco

Ĉar, kontraŭ mia volo, mi fariĝis »faligota bastiono de neŭtraleco«, eĉ iusence simbolo de la konceptaro pri la senco mem de nia lingvo en la nuntempa socio kaj pri la moderna UEA, mi ankoraŭfoje precizigu mian firman starpunkton:

Senkompromise mi defendas la principon de pozitiva aŭ aktiva neŭtraleco ne tial, ĉar mi persone estus neŭtrala rilate sociajn kaj politikajn problemojn (neniu estas neŭtrala tiurilate), sed tial, ĉar

la neŭtraleco de UEA estas absoluta kondiĉo de ĝia universaleco, kiu, siavice, respondas al la universaleco de la lingvo. Diference de la senvertebra neŭtralismo, tiel ofte praktikata antaŭ 1947, la aktiva neŭtraleco signifas, ke (i) UEA ja estas kaj devas esti neŭtrala rilate partipolitikon, sed ĝi ne estas neŭtrala koncerne kiun ajn aspekton, inkluzive la politikan, de la lingva problemoj; (ii) ĝian neŭtralecon nun difinas la respekto de la homaj rajtoj laŭ Art. 4 de la Statuto; (iii) la neŭtraleco finiĝas tie, kie komenciĝas la rektaj atakoj kontraŭ la lingvon; la persekutoj de la personoj, kiuj ĝin scias; la oficiala malebligo de kia ajn organizita laboro por Esperanto. Tiam koncepton mi formulis jam en Jugoslavio, longe antaŭ la milito, kaj laŭ ĝi mi konsekvence agis dum mia tuta laboro por Esperanto.

Anticipe mi pardonpetas pro la uzota »mi« en la sekvaj linioj, sed en tiu ĉi kunteksto ĝi estas neevitebla. Estis mi kaj miaj tiamaj junaj geamikoj, kiuj energie aŭdigis nian voĉon kontraŭ hitlerismon, dum preskaŭ la tuta cetera neŭtralisma Esperanto-Movado tombe silentis, aŭ eĉ provis »flati« al la nazioj – interalie per la hontinda elpelo de judaj esperantistoj el niaj societoj en Germanio kaj per kreo de naziaj Esperanto-organizadoj – por »savi la aferon«, kiun, kompreneble, ili ne »savis«, sed humilige kompromitis ĝin. Estis mi la sola, kiu dum la UK en Londono (1938) plej forte protestis en la sama senco. Estis mi denove, kiu dum la UK en Bern (1947), apogita de deko da landaj asocioj, proponis Rezolucion kondamnantan la krimojn de la nazioj, kies viktimoj estis ankaŭ tre multaj esperantistoj, inkluzive la familion Zamenhof. Post la malkuraĝa malakcepto de la Rezolucio per ĉ. 2/3 de la Berna Kongreso, ankoraŭfoje dank' al mia insistado la parto pri la homaj rajtoj eniris en la Statuton de UEA kaj fekundigis la neŭtralecon per humaneca enhavo, ktp. Pro tiu principa starpunkto mi devis suferi multajn personajn ĝenojn kaj persekutojn, unue en la duonfaŝisma antaŭmilita Jugoslavio; poste, ekde 1947, fare de ekstreme dekstraj elementoj en Usono (helpataj de similaj individuoj en kelkaj aliaj landoj), kiuj lanĉis mondskalan kampanjon de kalumnioj ĉefe pro la Berna Rezolucio, kaj ne hezitis eĉ denunci min al aŭtoritatoj de multaj ŝtatoj. Tiu ekstreme dekstra atako kontraŭ la neŭtralecon de UEA kaj min persone kiel ĝian »bastionon« ĉesis nur en 1956, kiam UEA fine eksigis el siaj vicaj s-ron G.A. Connor, la ĉefon de la tiama intrigo.

Aliflanke, necesis plurfoje interveni kaj interne de la Movado kaj ekstere pro malobservoj de neŭtraleco fare de la alia ekstremo. Tial la atakoj kontraŭ la principon de neŭtraleco nun venas de tiu alia flanko. Ĝin formas kelkaj plene konsciaj pri sia celo, sed ankaŭ kelkaj, kiuj en sia politika nematureco fakte eĉ ne scias al kiu »maldekstra« fluo aŭ nuanco ili apartenas, sed por kiuj ĉefas detruo por elviviĝi en detruado kaj por »fariĝi gravaj« per

detruado. Kaj plian fojon mi mem – pli precize: mia dorso – fariĝis la ĉefa paŝcelo.

Espereble, la situacio rilate neŭtralecon estas nun tute klara. Espereble, eĉ la membroj de UEA apartenantaj al diversaj politikaj partioj aŭ kun fortaj partipolitikaj ligoj komprenas, ke *detruo de la neŭtraleco de UEA signifas la finon de UEA mem kiel monda internacia organizaĵo*. Se ni ĉiuj povis dum multaj jaroj, eĉ en la periodo de la t.n. »malvarma milito«, amike kunsidadi ĉirkaŭ la sama tablo, kaj trovadi taŭgajn solvojn por progresigi Esperanton, kial ni ne povus fari la samon nun, kiam la eksteraj kondiĉoj estas pli favoraj kaj nia UEA multe pli forta? Se tamen iuj nepre volas politikumi per Esperanto aŭ uzi la lingvon por politikaj celoj, kial ne krei apartajn politikajn Esperanto-organizaĵojn, kun kiuj UEA povus eĉ eniri en kontraktajn rilatojn? Neniu povas havi ion ajn kontraŭ tio. Male, ĝi eĉ estus utila. *Sed oni ne tuŝu la politikan neŭtralecon de UEA, ĉar progresigi Esperanton ĉie en la mondo kaj en ĉiuj sociaj tavoloj povas nur monda organizaĵo politike neŭtrala en la supre difinita senco.*

7.1.7 Senkompromisa persona deklaro

Sufiĉas. Por ĉiu racie pensanta homo estas klare, ke plua sukcesa laboro por Esperanto fariĝas absolute malebla en tiaj kondiĉoj de senrespondecaj atencoj kontraŭ ĉiujn premisojn de agado kaj ĉiujn objektivajn atingojn: estas komplete sence konstruadi ion tage, kion aliaj malkonstruas nokte. La dilemo estis: ĉu, do, silenti pri la danĝero – unu el la plej seriozaj, kiuj iam minacis ne nur la neŭtralan Esperanto-Movadon, sed eĉ la estontecon de la lingvo mem – kaj retiriĝi de *kia ajn* plua laboro por Esperanto, rezignacie lasante, ke la afero ruliĝu direkte al abismo; aŭ prezenti la gravecon de la situacio al la tuta membraro, por ke ĝi, ekkoninte almenaŭ la plej esencajn faktojn, povu diri sian decidan vorton? Tiu ĉi artikolo montras, ke ankoraŭfoje la intereso de Esperanto venkis miajn personajn inklinojn en la aktualaj cirkonstancoj.

Nun okazas la elektoj por la nova Komitato, kiu difinas la politikon de UEA kaj de kiu grandparte dependas la estonteco de la Asocio. La aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj elektas kvindek da Komitatanoj A. Espereble oni elektos la plej kompetentajn, meritplenajn personojn, kun bonaj konoj pri la eblecoj en siaj landoj kaj, samtempe, kun la necesaj mondaj perspektivoj. La ĉefdelegitoj kaj delegitoj, reprezentantaj pli ol 7 000 individuajn membrojn, elektos nur 6 komitatanojn B (okaze de la sekva revizio de la Statuto necesos doni al la individuaj membroj pli adekvatan reprezentigon). La komitatanoj A kaj B elektos en Hamburgo la komitatanojn C ĝis kvarono de sia propra nombro »por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj«.

Dum jaroj, ekde kiam mi ĉesis esti Kom. A de la Jugoslavia Asocio, mi estus povinta komforte akcepti kandidatigon kiel Kom. C, sed mi ĉiam preferis kandidatigi kiel Kom. B, ĉar mi deziris scii la starpunkton de la individuaj membroj pri mia laboro. En ĉiuj antaŭaj elektoj mi ĉiam ricevis pli multe da voĉoj ol kiu ajn alia kandidato, kio multe kuraĝigis min plu dediĉi miajn fortojn al la bono de nia afero. Ankaŭ nun mi povus glate esti elektita Kom. A de la aliginta jurista faka asocio, kies prezidanto mi estas, sed pli ol iam antaŭe mi ne nur deziras, sed fakte bezonas scii la starpunkton de la ĉefdelegitoj kaj delegitoj por mia persona orientiĝo. Tial, laŭ la peto de multnombraj kunlaborantoj, el kiuj trideko da ĉefdelegitoj kaj delegitoj kandidatigis min al komitataneco B, mi akceptis plian fojon la kandidatigon. Do, mi estas unu el la 14 kandidatoj, inter kiuj feliĉe troviĝas kelkaj mondkonate meritplenaj por nia afero.

Nun, ne estu kia ajn miskompreno: persone mi neniam havis, nek povas havi kian ajn »ambicion« plenumi en la Asocio kiun ajn funkcion. Mia sola »ambicio« estis kaj restas dediĉi *fruktodone* – ne sterile – miajn fortojn al afero, kiun mi rigardas unu el la plej gravaj en la historio de la homaro kaj unu el la decidaj por ĝia estonteco. En la prezentita nuna situacio de UEA, ne ia simpla plimulto, sed nur amasa apogo povos konvinki min – kaj verŝajne la aliajn multjarajn kunlaborantojn laŭ la sama linio – ke penvaloras daŭrigi laŭ tiu vasta vojo de progreso konforme al la principoj skizitaj enkonduke, kaj energie plukonstruadi surbaze de la ĝisnunaj atingoj. Se mi estos elektita per tia amasa apogo, mi rigardos tion ankaŭ kiel klaran mandaton liberigi la Asocion de tiuj evidentaj negativajoj, kiuj haltigis ĝian progreson kaj minacas ĝian ekziston, kaj kiuj havas nenion komunan kun sincera diskutado de problemoj kaj demokrata decidado. Se, male, mi ne ricevos tian plimulton, mi rigardos tion kiel malvenkon de tiu tuta idearo, kiu markas la modernan UEA kaj al kies formiĝo egale kontribuis centoj da kunlaborantoj kaj miloj da subtenantoj. Kaj mi foriros de ĉio sen amaro, liberigante tiel plene mian tempon kaj energiojn por mia faka, scienca laboro.

Estu absolute klare: aŭ oni plu deziras »havi Lapenna« sen abscesoj sur la organismo de UEA, aŭ oni havos la abscesojn sen mi.

Tio estas mia lasta, senkompromisa vorto.

Ivo Lapenna

7.2 KONGRESA PAROLADO KAJ REZOLUCIPROPONO

(*Nota:* En tiu ĉi aldono estas publikigitaj la kongresa parolado kiel 7.2.1 kaj la Rezolucipropono de sep komitatanoj kiel 7.2.2.

La parolado estis eldirita dimanĉon, la 28-an de julio 1974, do la tagon post la sukcesinta puĉo, en la fino de la inaŭgura kunsido. Pro la sabataj eventoj en la Komitato apenaŭ estis eble utili la antaŭpreparitajn pensojn. Kun la escepto de la enkonduko, ĉio cetera estis preskaŭ komplete improvizita. Tio precipe rilatas al la fina parto. La parolado aperas ĉi tie pro du kaŭzoj: unue tial, ĉar ĝi estas la lasta en la longa vico de inaŭguraj paroladoj ekde la Pariza Kongreso en 1950 kaj kompletigas la libron *Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj*; due tial, ĉar iuj, ekzemple la ĉeĥa *Starto*, kalumnie disfamiĝadis, ke mi »misuzis« la inaŭguran podion »por ataki la kontraŭulojn« kaj similajn stultajojn, kiujn nur la »blinda ŝafaro« (Zamenhof) povas kredi. Atenta leganto certe rimarkos, ke en tiu tempo mi tute ne intencis eksigi el membreco mem de UEA. Tiun decidon mi devis fari nur fine de 1975 pro kaŭzoj prezentitaj en Aldono 7.5. La nuna teksto estas redaktita laŭ magnetofona bendo, donacita de amiko. La lasta parto estas laŭvorte transskribita de la teksto publikigita en *Esperanto*, septembro 1974, p. 146.

La Rezolucipropono estas menciita en 5.4. Ĉi tie aperas la kompleta teksto. La tutan situacion perfekte ilustras la fakto, ke la Komitato malakceptis ĝin per 37 voĉoj kontraŭ 17 kaj 5 sindetenoj.

7.2.1 Naciismo, rasismo kaj la internacia lingvo

Estimataj Sinjorinoj kaj Sinjoroj!

Altestimataj reprezentantoj de la federaciaj kaj urbaj aŭtoritatoj!
Karaj geamikoj!

Du aferoj ŝajnas al mi akcentindaj en ligo kun niaj kongresoj. La unua rilatas al ilia karaktero; la dua al ilia eduka valoro.

I

Ekde la jaro 1905, kiam por la unua fojo en la historio de la homaro homoj de diversaj nacioj, parolantaj malsamajn lingvojn, kuniĝis en Bulonjo sur Maro kaj povis komunikadi unu kun la alia, pruvante tiel al si mem kaj al la ekstera mondo, ke la novnaskita infano ja estas vivkapabla, ĝis la nuntempo la universalaj kongresoj de Esperanto konsiderinde evoluis kaj ŝanĝis sian fizionomion. Se en la komenco la ĉefa atento estis dediĉita al la lingvo mem, al ĝia unueco – ĉar la lingvo estis ankoraŭ tre fragila – kaj al kelkaj organizaj demandoj, kun la tempo, paralele kun la evoluo de la lingvo kaj paralele kun ĝia disvastiĝo ĉie tra la mondo, la atento de la kongresoj centriĝis al aliaj demandoj. Precipe granda progreso estas farita post la Dua Mondmilito, kiam, pro la daŭra akriĝado de la lingva problemo en la mondo, Universala Esperanto-Asocio firme elpaŝis en la kompleksajn internaciajn rilatojn por prezenti la problemon kaj por pledi por tiu solvo, kiun la Esperanto-Movado opinias la plej racia kaj la sole radikala, nome la solvo pere de la Internacia Lingvo. Tio siavice reflektiĝis ankaŭ en la programoj de la Universalaj Kongresoj. La gamo de la ĉeftemoj, spegulantaj la aktualecon de difinitaj demandoj, kiujn frontas la nuntempa mondo, etendiĝas vaste ekde la ĝenerala problemo de lingva komuni-

kado en la mondo, tra diversaj aliaj demandoj, ekzemple la lingvaj obstakloj barantaj la vojon al realigo de la celoj de kultura turismo, ĝis la esperoj ligitaj al la Konferenco de Helsinki, esperoj pri amika kunlaborado inter la nacioj ne nur sur ekonomia kaj politika kampoj, sed ankaŭ sur la kampo de kulturaj interŝanĝoj, kaj ĝis la ĉeftemo de tiu ĉi kongreso, nome naciismo kaj internacia kunlaborado.

La dua karakterizo de niaj kongresoj estas, ke ili – por tiel diri – vojaĝas de lando al lando. La celo de tiu »vojaĝado« ne estas nur porti la torĉon de la esperantismo de unu lando al alia kaj kuraĝigi, instigi, doni impulsojn al la Esperanto-Movado de la koncerna lando, sed ankaŭ ebligi al multnacia kongresanaro konatiĝi kun ĝiaj vivmaniero, kulturo kaj aliaj valoroj.

En la Federacia Respubliko Germanio – la lando, kiu gastigas nian 59-an Universalan Kongreson de Esperanto – multo estas lernebla kaj lerninda el kultura, historia, scienca, etnologia kaj aliaj vidpunktoj. Tamen, ŝajnas al mi, ke por ni ĉiuj – por mi mem tute certe – unu el la plej grandaj instruoj, kiujn oni povas lerni, estas, ke reĝimo de rasisma teroro, sub kiu vivis tiu ĉi lando, reĝimo kiu minacis la liberecon de la mondo kaj kiu sklavigis sian propran popolon, estas transformebla en la daŭro de unu generacio en sistemon de demokratiaj institucioj, en sistemon de ekonomia prospero, en sistemon, kiu fariĝis faktoro de paco. Ankaŭ la Esperanto-Movado, kiu, kune kun multaj aliaj kulturaj valoroj, estis viktimo de tiu hitlera naciismo, nun havas liberan vojon por progresi kaj por evolui. Kaj ni ĉiuj povas nur ĝoji, ke tiel estas. Estis necese, geamikoj, ke tiu rasisma reĝimo malvenku en la milito, por ke la germana popolo povu venki en paco. Ni povas konsoli nin, kun fiero konsoli nin, ke unu el la grandaj filoj de tiu ĉi popolo, Willy Brandt, ĝis antaŭ nelonge federacia kanceliero, ricevis la Nobel Pacpremion en tiu sama jaro, en kiu Universala Esperanto-Asocio estis kandidato por la sama premio.

Alia instruo, kiu – ŝajnas al mi – interesas nin ĉiujn kiel adeptojn de la Internacia Lingvo, estas la formiĝo de la komuna germana lingvo. Kvankam certe ne ekzistas identeco inter la formiĝo de la komuna germana, aŭ la formiĝo de kiu ajn nacia literatura lingvo, kaj la formiĝo de la Internacia Lingvo Esperanto, tamen ekzistas konsiderinda paraleleco. Ankaŭ la germana literatura lingvo formiĝis en historiaj kondiĉoj, kiuj postulis kreon de tia lingvo. Longe daŭris tiu procezo. Ne okazis tio de unu tago al la alia, sed dum multaj jarcentoj. Ekde la unua, tiel nomanta poezia aŭ poeta lingvo de la 12-a jarcento, tra la kancelaria lingvo de la 14-a kaj 15-a jarcentoj, ĝis Martin Luther, kiu donis la bazojn de la germana komuna lingvo, kaj ĝis la klasikuloj – precipe la klasikuloj Schiller kaj Goethe – kiuj firmigis ĝin per siaj geniaj verkoj kaj donis al ĝi la necesan elastecon, tre longa estis la vojo. Tamen, tiu germana

Al la ĉeftemo de nia kongreso – naciismo kaj internacia kunlaborado – estas ligita alia grava demando, aktuala en la hodiaŭa mondo, nome rasismo kaj rasa diskriminacio. Verŝajne vi scias – ĉar en la revuo *Esperanto* aperis projekto de laborprogramo por la Kontraŭrasisma Jardeko – ke Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko lanĉis jardekon de precipe intensa kunlaboro favore al forigo de rasismo kaj de kiu ajn formo de rasa diskriminacio en la mondo. La projekto de la laborplano, kiel mi diris, estas farita kaj publikigita. La komitato de UEA dum tiu ĉi kongreso akceptos ĝin, verŝajne, post eventualaj amendoj. Laŭ mia opinio, la neŭtrala Esperanto-Movado, ne rezignante pri sia parti-politika neŭtraleco, devas partopreni en tiu grava agado de Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj. Estas tuta jardeko da laboro por kontraŭbatali rasismojn kaj ĉiujn formojn de rasa diskriminacio.

Kial ni devas partopreni?

Ni devas partopreni unue pro principaj kaŭzoj, ĉar mi fidas, ke inter la parolantoj de la Internacia Lingvo ne ekzistas unusola persono, kiu estas adepto de rasismo aŭ de kiu ajn formo de rasa diskriminacio. Mi fidas, ke nia devo kiel homoj estas partopreni en agadoj por kontraŭbatali rasismojn kaj rasan diskriminacion.*

Sed tute aparte, kiel organizitaj esperantistoj, kiel membroj de Universala Esperanto-Asocio, kaj entute kiel parolantoj de la Internacia Lingvo ni devas partopreni, ĉar dum tiu jardeko ni havos la okazon atentigi pri plej diversaj formoj de kultura kaj lingva diskriminacio en la nuntempa mondo. Ni havos la eblecon pledi por la Internacia Lingvo, prezentante ĝiajn atingojn sur diversaj kampoj, kiel kultura lingvo, kiel lingvo de internacia komunikado por praktikaj servoj, kiel lingvo de persona komunikado, eĉ kiel lingvo de familia rilatado en tiuj aŭdacaj kaj kuraĝaj familioj, kiuj ne hezitis uzi ĝin por paroli kun siaj infanoj kaj tiamaniere transformi ĝin eĉ en familian lingvon. Ĉiuj-ĉi eblecoj prezentiĝos por la organizita Esperanto-Movado en la sekvanta jardeko. Kaj mi tre esperas, ke Universala Esperanto-Asocio scios bonege utiligi ilin same tiel, kiel ĝi utiligis similajn eblecojn en la pasinteco.



* En la Oratora Konkurso unu el la konkursantoj ofende atakis precipe tiun ĉi penson. La komisiono sub la prezido de d-ro Tonkin nek forprenis de li la parolon, nek admonis lin pro la misuzo de la konkurso. Male, la koncerna persono ricevis unu el la premioj. Tio estas nur unu el la aspektoj de la malsana atmosfero, en kiu okazis la puĉo. Cetero ankaŭ la Oratoraj Konkursoj por la junularo estas ĉesigitaj.

grava, de internacia kunlaborado – ni havos la okazon paroli multe dum unu el la ĝeneralaj kunvenoj, ĉar tio ĉi estas ĝia ĉefa temo. Ĉi tie eble necesas diri, ke distinge de raso kun difinitaj biologiaj eksteraj signoj, kaj distinge de gento, kiu estas etnografia kategorio bazita sur sangaj ligoj, nacio estas socia-politika kategorio. Ne ekzistas sangaj ligoj – nur en la epoko de romantikismo oni parolis pri »komuna deveno« – en la vera senco de la vorto, kiuj kreus la nacion. Ĝi estas socia fenomeno, ĝi estas politika fenomeno: ĝi formiĝis en la tempo, kiam la feŭdaj ligoj ne plu taŭgis por la ŝvelintaj ekonomiaj fortoj kaj tial necesis krei pli grandajn sociajn unuojn, sur pli vastaj teritorioj, por havigi al tiuj ŝvelintaj ekonomiaj fortoj merkatojn adekvatajn. En ligo kun tio kreiĝis la koncepto de nacio kaj ĝia ideologia esprimo: naciismo. Mi ne eniros ĉi tie en detalojn, ĉar la tempo mankas kaj ankaŭ tial, ĉar ni havos la okazon priparoli la detalojn dum la kongreso mem. Sed mi ne povas ne diri, ke naciismo kiel tia estas nek pozitiva, nek negativa. Ĉio dependas de la grado ĝis kiu naciismo estas pravigebla. Sendube, naciismo, kiu kreiĝis en la epoko de la formiĝo de la nacioj; naciismo, kiu leviĝis kontraŭ la feŭdan disrompitecon kaj postulis unuecan ŝtaton sur vasta teritorio kun komuna merkato en la kadro de tiu ŝtato – tia naciismo estis progresema paŝo antaŭen kompare kun la feŭdismo. Sendube, ankaŭ en la hodiaŭa mondo, naciismo, kiu postulas liberigon de sia nacio el sub la jugo de alia nacio kaj kreon de sendependa ŝtato, estas pozitiva. Sed naciismo tendencas transformiĝi en imperialismon. Tio okazis en la pasinteco, kaj tio okazas ankaŭ en la nuntempo. Naciismo transformiĝinta en imperialismon signifas altrudadon de sia propra kulturo, de sia propra lingvo, de siaj propraj ekonomiaj interesoj, mallonge de sia propra privilegia pozicio malavantaĝe por ĉiuj aliaj nacioj. Sur kultura kampo, tute speciale sur lingva kampo, t. e. la kampo, kiu aparte interesas nin – kio ne signifas, ke ni povos analizi la fenomenon sur kultura kaj lingva kampo, komplete izoligante ĝin de ĉiuj ceteraj; kio ne signifas, ke ni ne devas studi ĉiujn aspektojn de naciismo (ekonomian, politikan kaj aliajn aspektojn) por kompreni la kultural-lingvan aspekton – do, tiu naciismo sur kultura-lingva kampo esprimiĝas certe en la deziro de la grandaj nacioj kaj de iliaj intelektaj satelitoj altrudi siajn kulturojn, siajn naciajn lingvojn al la tuta cetera mondo en la intereso de si mem kaj malavantaĝe de ĉiuj aliaj nacioj: grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj. Ni fidus, ke, kvankam principe eble ekzistas pluraj solvoj, la solvo kiun ni proponas por tiu antagonismo inter ekstrema naciismo altrudanta siajn lingvojn al aliaj kaj la defendorajtoj de la mezgrandaj, malgrandaj nacioj kaj etnaj grupoj por konservi sian nacian aŭ etnan identecon, por defendi sin de kultura genocido, troviĝas sole en la ĝeneraligo de la Internacia Lingvo Esperanto kiel ĝusta solvo por tiu tuta afero.

III

Al la ĉeftemo de nia kongreso – naciismo kaj internacia kunlaborado – estas ligita alia grava demando, aktuala en la hodiaŭa mondo, nome rasismo kaj rasa diskriminacio. Verŝajne vi scias – ĉar en la revuo *Esperanto* aperis projekto de laborprogramo por la Kontraŭrasisma Jardeko – ke Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko lanĉis jardekon de precipe intensa kunlaboro favore al forigo de rasismo kaj de kiu ajn formo de rasa diskriminacio en la mondo. La projekto de la laborplano, kiel mi diris, estas farita kaj publikigita. La komitato de UEA dum tiu ĉi kongreso akceptos ĝin, verŝajne, post eventualaj amendoj. Laŭ mia opinio, la neŭtrala Esperanto-Movado, ne rezignante pri sia parti-politika neŭtraleco, devas partopreni en tiu grava agado de Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj. Estas tuta jardeko da laboro por kontraŭbatali rasismojn kaj ĉiujn formojn de rasa diskriminacio.

Kial ni devas partopreni?

Ni devas partopreni unue pro principaj kaŭzoj, ĉar mi fidas, ke inter la parolantoj de la Internacia Lingvo ne ekzistas unusola persono, kiu estas adepto de rasismo aŭ de kiu ajn formo de rasa diskriminacio. Mi fidas, ke nia devo kiel homoj estas partopreni en agadoj por kontraŭbatali rasismojn kaj rasan diskriminacion.*

Sed tute aparte, kiel organizitaj esperantistoj, kiel membroj de Universala Esperanto-Asocio, kaj entute kiel parolantoj de la Internacia Lingvo ni devas partopreni, ĉar dum tiu jardeko ni havos la okazon atentigi pri plej diversaj formoj de kultura kaj lingva diskriminacio en la nuntempa mondo. Ni havos la eblecon pledi por la Internacia Lingvo, prezentante ĝiajn atingojn sur diversaj kampoj, kiel kultura lingvo, kiel lingvo de internacia komunikado por praktikaj servoj, kiel lingvo de persona komunikado, eĉ kiel lingvo de familia rilatado en tiuj aŭdacaj kaj kuraĝaj familioj, kiuj ne hezitis uzi ĝin por paroli kun siaj infanoj kaj tiamaniere transformi ĝin eĉ en familian lingvon. Ĉiuj-ĉi eblecoj prezentigos por la organizita Esperanto-Movado en la sekvanta jardeko. Kaj mi tre esperas, ke Universala Esperanto-Asocio scios bonege utiligi ilin same tiel, kiel ĝi utiligis similajn eblecojn en la pasinteco.



* En la Oratora Konkurso unu el la konkursantoj ofende atakis precipe tiun ĉi penson. La komisiono sub la prezido de d-ro Tonkin nek forprenis de li la parolon, nek admonis lin pro la misuzo de la konkurso. Male, la koncerna persono ricevis unu el la premioj. Tio estas nur unu el la aspektoj de la malsana atmosfero, en kiu okazis la puĉo. Cetero ankaŭ la Oratoraj Konkursoj por la junularo estas ĉesigitaj.

Nun, estimata prezidantaro kaj estimataj geamikoj, mi deziras anonci al vi, ke mi decidis ekŝiĝi el ĉiuj funkcioj en Universala Esperanto-Asocio. Farinte tiun decidon, mi prenas la kuraĝon diri al vi kelkajn adiaŭajn vortojn.

Dum dudek kvin jaroj ni konstruadis – ni, nome tiuj, kiuj efektive kunlaboris, kiuj fidis je la neŭtraleco de UEA, kiuj komprenis, ke la neŭtraleco de UEA estas bazo de ĝia universaleco – ni konstruadis la modernan, fortikan kaj prestiĝan UEA, surbaze de principoj, prilaboritaj jam en la jaroj 1948, 1949 kaj 1950. Agante laŭ tiuj principoj, ni malfermis multajn pordojn, ni traboris multajn murojn kaj vastigis la eblecojn por la uzado de la Internacia Lingvo. Universala Esperanto-Asocio duobligis sian membraron: ĝi kreis la gravan Centron de Esploro kaj Dokumentado (1952), kaj dank'al tiu Centro, kiu povis nutri la neŭtralan Esperanto-movadon kaj la ĝeneralan Esperanto-movadon per gravaj dokumentoj kaj bonaj argumentoj, ni sukcesis progresigi Esperanton konsiderinde en la lastaj dudek jaroj. Multaj pordoj malfermiĝis precipe rezulte de la grava Rezolucio de Unesko de la 10a de decembro 1954, kiam la plej grava interŝtata organizaĵo por la edukado, scienco kaj kulturo, rekonis la edukan, kulturan kaj scienca valoron de la Internacia Lingvo. Multaj aliaj eblecoj ekzistis por ni, kaj ni vaste utiligis ilin, pro la konsultaj rilatoj kun Unesko kaj alispecaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj, kiujn havas UEA. Tio ebligis al ni aŭdigi nian voĉon kaj tre ofte havigi pozitivajn rezultojn por nia afero. Unu el la pozitivaj rezultoj atingitaj en la lasta tempo estas, ke nun en la sistemo de neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko ĉiu nia reprezentanto povas paroli en la Internacia Lingvo, se li tion deziras kaj se li prizorgas la tradukadon en unu el la laboraj lingvoj. En pluraj landoj – en dudeko da ili – ekzistas juraj eblecoj por la instruado de la Internacia Lingvo en la elementaj lernejoj. Ankaŭ tiu pordo, geamikoj, estas malfermita. Tute laste, dank'al la premo de Universala Esperanto-Asocio kaj al la premo de kelkaj aliaj amikaj internaciaj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko, ni povas nun havi rilatojn sur landa nivelo inter niaj landaj asocioj kaj la respektivaj landaj Unesko-komisionoj. Pri tio ĉiuj asocioj estas informitaj. Nia ILEI, la organizaĵo de Esperanto-instruistoj, nia skolta organizaĵo, nia scienca organizaĵo kaj multaj aliaj fakorganizaĵoj, kiuj ankaŭ partoprenas tiun ĉi kongreson, kaj faras ĝin si-aspeca unika kongreso – kongreso de kongresoj – de la hodiaŭa mondo, fortiĝis kaj sukcese agas en siaj respektivaj medioj.

En tia situacio, ni rigardu momenton al la ekstera mondo. Kiel ĉiuj observantoj povis antaŭvidi antaŭ multaj jaroj, la lingva problemo komplikiĝis kaj ĉiam pli komplikiĝas. Memoru, ke, kiam fondiĝis Unuiĝintaj Nacioj, estis kvin oficialaj kaj du laboraj lingvoj. Nun en la daŭro de unu jaro, ekde nia lasta kongreso en Beograd, aldoniĝis du pliaj laboraj kaj oficialaj lingvoj en pluraj

3. konstatas, ke la elektoj por Komitatoj C estis evidente manipultaj, kontraŭe al la eksplicita principo de la artikolo 25 de la Statuto, kaj opinias, ke tia plia malobservo de la spirito de la Statuto estas grava atenco kontraŭ la neŭtraleco, kaj krome senigas la Asocion de aparte valoraj membroj en la Komitato;

4. deklaras, ke senprecedencaj intrigoj, manipuladoj, sekretaj kaj konspiraj agadoj kaŭzis la nunan bedaŭrindan komenciĝon de malintegriĝado de UEA, precize kiel antaŭvidite en la aprila artikolo de la prezidanto.

Subskribintoj: S-roj Jean Thierry, André Bourdeaux, Roger Bernard (en la nomo de D-ro Albault), Sonnabend, José González Aboín, Prof. J. Régulo Pérez kaj F-ino M. H. Vermaas.

7.3 PLIAJ KONTRAŬNEŬTRALECAJ DOKUMENTOJ

(Noto: La suba teksto aperis en la konstanta rubriko »Esploro kaj Dokumentado« de *Horizonto*, kultura kaj informa revuo de la Neŭtrala Esperanto-Movado, n-ro 3/1976. La rubrikon redaktas la aŭtoro de tiu ĉi verko).

7.3.1 Enkonduka rimarko. – En la verko *Hamburgo en Retrospektivo (HeR)* estas prezentitaj multnombraj dokumentoj pri la kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA. Ĉap. 3 de la verko enhavas detalan analizon de la Programo de Bulgara Esperantista Asocio (BEA), plu aliĝinta asocio de UEA. Por bone kompreni la politikan kaj kontraŭneŭtralecan materialon, kiu estos prezentita kaj analizita sube, estas necese atente tralegi *HeR*. Utilas enkonduke rimarkigi, ke la Statuto de Bulgara Esperantista Asocio, kiel laste reviziita en 1972 dum la kongreso en Smoljan, la sama kiu akceptis la nunan programon de BEA, eksplicite mencias kiel unu el la celoj de tiu organizaĵo »eduki siajn membrojn en la spirito de patriotismo kaj *proleta internaciismo*, de alligiteco al tendaro de l' socialismo ...«

7.3.2 Programo de Centra Laborrondo Esperanto de GDR. – Per sia letero de 01.07.1975, adresita al la Estraro kaj Komitato de UEA, kaj atinginta la aŭtoron de *HeR* post la publikigo de tiu verko, Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko (CLEK) proponis, ke la Komitato de UEA decidu dum siaj kunsidoj en Kopenhago (1975) pri ĝia aliĝpeto »kiel kolektiva membro de UEA« ekde 01.01.1976. Al la propono estis aldonitaj diversaj dokumentoj, el kiuj la plej grava estas la »Gvidprincipoj por la laboro de la esperantistoj en Kulturligo de GDR«. Sur la unua paĝo troviĝas jena baza principo:

»La esperantistoj de GDR utiligas la Internacian Lingvon por la ideologia batalo kontraŭ imperiismo [de la okcidenta mondo, kompreneble – rim. de la red.] Ili decide kontraŭas ĉiujn variantojn de antikomunismo, reviziismo, konverĝa teorio kaj

3. konstatas, ke la elektoj por Komitatanoj C estis evidente manipulitaj, kontraŭe al la eksplicita principo de la artikolo 25 de la Statuto, kaj opinias, ke tia plia malobservo de la spirito de la Statuto estas grava atenco kontraŭ la neŭtraleco, kaj krome senigas la Asocion de aparte valoraj membroj en la Komitato;

4. deklaras, ke senprecedencaj intrigoj, manipuladoj, sekretaj kaj konspiraj agadoj kaŭzis la nunan bedaŭrindan komenciĝon de malintegrigado de UEA, precize kiel antaŭvidite en la aprila artikolo de la prezidanto.

Subskribintoj: S-roj Jean Thierry, André Bourdeaux, Roger Bernard (en la nomo de D-ro Albault), Sonnabend, José González Aboín, Prof. J. Régulo Pérez kaj F-ino M. H. Vermaas.

7.3 PLIAJ KONTRAŬNEŬTRALECAJ DOKUMENTOJ

(Noto: La suba teksto aperis en la konstanta rubriko »Esploro kaj Dokumentado« de *Horizonto*, kultura kaj informa revuo de la Neŭtrala Esperanto-Movado, n-ro 3/1976. La rubrikon redaktas la aŭtoro de tiu ĉi verko).

7.3.1 Enkonduka rimarko. – En la verko *Hamburgo en Retrospektivo (HeR)* estas prezentitaj multnombraj dokumentoj pri la kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA. Ĉap. 3 de la verko enhavas detalan analizon de la Programo de Bulgara Esperantista Asocio (BEA), plu aliĝinta asocio de UEA. Por bone kompreni la politikan kaj kontraŭneŭtralecan materialon, kiu estos prezentita kaj analizita sube, estas necese atente tralegi *HeR*. Utilas enkonduke rimarkigi, ke la Statuto de Bulgara Esperantista Asocio, kiel laste reviziita en 1972 dum la kongreso en Smoljan, la sama kiu akceptis la nunan programon de BEA, eksplicite mencias kiel unu el la celoj de tiu organizaĵo »eduki siajn membrojn en la spirito de patriotismo kaj *proleta internaciismo*, de alligiteco al tendaro de l' socialismo ...«

7.3.2 Programo de Centra Laborrondo Esperanto de GDR. – Per sia letero de 01.07.1975, adresita al la Estraro kaj Komitato de UEA, kaj atinginta la aŭtoron de *HeR* post la publikigo de tiu verko, Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko (CLEK) proponis, ke la Komitato de UEA decidu dum siaj kunsidoj en Kopenhago (1975) pri ĝia aliĝpeto »kiel kolektiva membro de UEA« ekde 01.01.1976. Al la propono estis aldonitaj diversaj dokumentoj, el kiuj la plej grava estas la »Gvidprincipoj por la laboro de la esperantistoj en Kulturligo de GDR«. Sur la unua paĝo troviĝas jena baza principo:

»La esperantistoj de GDR utiligas la Internacian Lingvon por la ideologia batalo kontraŭ imperiismo [de la okcidenta mondo, kompreneble – rim. de la red.] Ili decide kontraŭas ĉiujn variantojn de antikomunismo, reviziismo, konverĝa teorio kaj

neŭtralismo. Ili aktivas por akceptigo de *paca kunekzistado inter diverssociaj ŝtatoj* [v. p. 50 de *HeR*], subtenas la *antiimperiisman liberigan batalon* kaj pledas por pli larĝa uzo de Esperanto serve al la paco kaj progreso. Ili kunlaboras kun ĉiuj *progresivaj* lingvoamikoj kaj organizaĵoj, kiuj sekvas la samajn aŭ similajn celojn». (Substrekitaj de la red.)

Temas pri tiu sama CLEK, en kies ŝtato la importado de la revuo *Esperanto* kaj de aliaj publikaĵoj de la neŭtrala ĝishamburga UEA estis malpermesita kaj la publikaĵoj mem estis konfiskataj.

Laŭ la Protokolo de la kunsidoj de la Komitato de UEA en Kopenhago, la aliĝpeto de CLEK eniris en la tagordon kiel p-to 31c. Pri tiu aliĝpeto la Komitato diskutis sabaton, jaŭdon kaj denove sabaton de la kongresa semajno, *sed vane oni serĉas en la Protokolo iun ajn informon pri tiuj diskutoj*. Partopreninto informis, ke fine oni prokrastis la decidon pri tiu aliĝpeto, sed en la Protokolo troviĝas absolute nenio pri la decido prokrasti la decidon. Fakte, *tio estas plia falsado de la okazintaĵoj en la Komitato*, ĉar gravaj faktoj estas prisilentitaj. Ankaŭ la septembra *Esperanto* raportis, ke »pliaj landaj asocioj petis aliĝon al UEA«, sed diris nenion pri la sorto de tiuj aliĝpetoj. Plia prisilentado de gravaj faktoj.

Evidente, la Komitato de UEA, en sia nuna konsisto, ne povis rifuzi la aliĝpeton de CLEK, kies programo estas klare politika kaj tial evidente kontraŭa al art. 13 kaj 4 de la Statuto de UEA, sed ĝi ankaŭ ne kuraĝis akcepti tiun politikan organizaĵon kiel aliĝintan asocion, verŝajne pro la ekzisto de *HeR*. Tial la decido estis prokrastita. Fakte, la aliĝpeto devis esti tuj rifuzita konforme al la Statuto.

7.3.3 Programo de ĈEA por la jaroj 1976-1980. – Dum la Dua Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, okazinta komence de februaro 1976 en Prago, estis akceptita la Programo de ĈEA por la jaroj 1976-1980. *Starto*, organo de ĈEA, publikigis en n-ro 1/1976 sur p. 4 koncizan resumon de la Programo. La publikigita resumo estas fakte falsaĵo, ĉar ĝi komplete kaŝas la politikan karakteron de la Programo. Anonima amiko de la neŭtrala Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio sendis al la redaktoro de tiu ĉi rubriko la kompletan tekston. Jen resumo de la ĉefaj punktoj kun originalaj citaĵoj el la Programo mem. (Substrekitaj de la red.)

Jam sur la unua paĝo estas formulita la baza principo de agado:

»Kiel anoj de ŝtato, kiu konstruas modernan socialisman socion, bazitan sur la principoj de socialisma proprieto kaj *proletara internaciismo* sub la gvido de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, ni klopodos per *idee-politika* kaj organiza agado pri edukado de niaj anoj al konscia kaj aktiva ŝtataneco, al respektado de la principoj de demokratia centrismo kaj internacia solidareco en la spirito de la rezolucioj de la 15-a Kongresa de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio.«

Sur la sama unua paĝo troviĝas direktivoj por »efika kunlaboro kun esperantistaj organizaĵoj eksterlande, unuavice kun

Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj precipe en la landoj de socialisma socio«¹. La celo estas ne daŭrigi la brilajn tradiciojn de la neŭtrala Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio, sed la »progresemaĵojn de la laborista Esperanto-Movado«. Pri la vera senco de la vortoj »progresemaĵoj de la laborista Esperanto-Movado« v. 2.1 de *HeR*. La fina celo de tiu tuta agado estas »*plifortigi la aŭtoritaton de la socialismaj landoj en la tutmonda Esperanto-Movado*«, alivorte eĉ pli firme ekregi en UEA.

En la p-to 3 la Programo instrukas pri la rolo de la *Bulteno de ĈEA* »kiel organiza kaj informa ligilo kaj samtempe kiel *idee-politika helpanto* de la Asocio al *sistema edukado* de lokaj grupoj kaj ĉiuj anoj en la spirito de principoj de socialisma patrioteco kaj *proletara internaciismo*«.

La p-to 5 de la Programo rilatas la UEA kaj MEM, kiuj estas metitaj sur la saman nivelon kun la sama rango:

»En kunlaboro kun la kulminaj [superaj, *rim.* de la red.] internaciaj Esperanto-Organizaĵoj (UEA kaj MEM) atente sekvi laŭ la ebloj la disvastigon de nia anaro kaj la *representiĝo en la gvidaj organoj de la menciitaj organizaĵoj*. Samtempe en la kadro de MEM kaj ankaŭ en duflankaj rilatoj kun la Esperantaj asocioj de socialismaj landoj, *kaj ankaŭ en la organoj de UEA*, atribui al la komuna batalo por la paco kaj por plialtigo de la prestiĝo de UEA en internacia skalo«.

Kompreneble, ĉiuj prudentaj homoj en la mondo deziras pacon, sed en la Programo de ĈEA – same kiel en la programoj kaj praktikaj agadoj de la aliaj Esperanto-organizaĵoj en la blokaj landoj – ne temas pri tiu paco, sed pri paco laŭ la koncepto de MEM, siavice subigita al la Monda Packonsilio, siavice instrumento de la nuntempa soveta politiko. Tion aperte difinas la p-to 6 de la Programo:

»Kiel centron de la tuta agado de ĈEA kaj de ĉiuj niaj esperantistoj estas necese rigardi la aktivan laboron en la sfero de la paca movado. Ĝia iniciatanto plue fariĝos [plu estos, *rim.* de la red.] la porpaca sekcio de ĈEA, *kiu okupas gravan pozicion kiel ĉenero de MEM, pere de kiu ĝi kunlaboras kun Monda Packonsilio...* La sekcio atingas rimarkindajn rezultojn ankaŭ en konkreta kunlaboro kun Ĉeĥoslovaka Porpaca Movado en la batalo kontraŭ *faŝismo en Ĉilio kaj kontraŭ imperiismo de Israelio [Israelo] en arabaj landoj...*«

Kiel oni vidas la »israela imperiismo« troviĝas ankaŭ en tiu ĉi Programo de landa asocio aliĝinta al UEA, al kiu apartenas ankaŭ Esperanto-Ligo en Israelo. Kiom longe ĝi ankoraŭ toleros tian politikan programon kontraŭ sia propra lando en la sino de UEA?

En la p-to 7 de la Programo estas pritraktitaj la kontaktoj inter la Junulara Komisiono de ĈEA kaj la Centra Komitato de la Asocio de Socialista Junularo en Ĉeĥoslovakio. La tasko estas – asertas la Programo – eduki la junularon al »praktika esprimado kaj validigo de la ideoj de socialisma patrioteco, *proletara internaciismo kaj klasa koncepto de la mondo kaj ties problemoj*«.

Sajnas, ke eĉ dum amuziĝoj la esperantista junularo devas esti prilaborata en la senco de »proleta internaciismo« kaj »klasa koncepto de la mondo«, ĉar la Programo eksplicite instrukas, ke

dum la »amuziĝo de la junularo« necesas samtempe »edukadi el ties vicoj novajn adeptojn por sinsekva transprenado de pli superaj respondecaj taskoj kaj funkcioj en la *tuta Esperanto-Movado*«. La p-toj 8-10 de la Programo rilatas precipe al la laboroj de la »metode-propaganda« kaj »politike eduka« komisionoj de ĈEA kun la celo »daŭre plialtigadi la *politike* idean nivelon de la Movado kaj ties celtrafaj metodoj kaj formoj de la gvidado kaj propagando«. Subvenciojn de la ŝtato »oni devus en la estonteco uzi por celtrafa financado de la gazeto *Paco*, propagandaj eldonaĵoj pri ĈSSR, *politike-eduka agado* kaj klerigado de ĈEA funkciuloj«.

En la fina parto la Programo atakas la »esperantisman sektismon«, kio en la lingvaĵo de la Programo evidente egalas al »*abstrakta internaciismo, neŭtralismo, pacifismo, kosmopolitismo kaj aliaj malutilaj devojiĝoj*« en la Programo de la Bulgara Esperantista Asocio (v. 3.2 de *HeR*, precipe p. 27). Ĝi aperte instrukas:

»La ideoj, *politikaj* kaj porlaboraj principoj de la agado, kiuj estas entenataj en ĉi tiu Programdeklaro, formas la fundamentan *direktivon kaj gvidilon*, kiun ni en la proksima periodo sekvos...«

7.3.4 Konciza komento. – Ne necesas esti politika sciencisto por kompreni, ke la supraj dokumentoj, same kiel la materialoj prezentitaj en *HeR*, estas nete politikaj kaj evidente kontraŭaj al la principo de politika neŭtraleco en la senco difinita en la Statuto de UEA. Tamen, por plene kompreni la tutan sencon de tiu politika agado necesas scii iom pli pri la politika signifo de la konceptoj de »paca kunekzistado«, »proleta internaciismo«, »konverĝa teorio«, »klasa koncepto de la mondo« k.a., abunde utiligataj ankaŭ ekster la analizitaj dokumentoj. Ĉi tie utilas nur mencii, ke la koncepto de »proleta internaciismo«, kiel formulita en la nuntempaj politika kaj internacijura doktrinoj de Soveta Unio, estas malakceptitaj eĉ de pluraj komunistaj partioj (ekzemple la ĉina, jugoslavia, franca, itala k.a.) por ne paroli pri partioj kun aliaj politikaj programoj. La principo de »proleta internaciismo« kaj la kunligitaj principoj de »kunekzistado« kaj »klasabatalo« estas ekskluzivaj. Ili kontraŭas ne nur al la principo de neŭtraleco de UEA, sed ankaŭ al ĝia fundamenta celo: »plifaciligi la ĉiuspecajn spiritalajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj, *sen diferenco* pri nacieco, raso, religio, *politiko* aŭ lingvo« (art. 3.b de la Statuto). En 3.2 de *HeR* estas donitaj kelkaj difinoj pri la menciitaj konceptoj. Interesiĝantoj kun scio de la angla trovos pliajn informojn pri faktoj kaj analizojn en du artikoloj de la redaktoro de tiu ĉi rubriko: (i) *The Legal Aspects and Political Significance of the Soviet Concept of Co-existence*, publikigita en *International and Comparative Law Quarterly*, julio, 1963, p-oj 737-777; (ii) *The Soviet Concept of 'Socialist' International Law*, publikigita en *The Year Book of World*

Affairs, 1975, p-oj 242-264. Ambaŭ publikaĵoj estas certe troveblaj en universitataj bibliotekoj.

7.4 INTENSIGO DE LA NIGRIGA KAMPANJO

(*Noto:* En la kampanjo de kalumnioj kaj nigrigoj, celanta komplete deformi mian karakteron kaj misprezenti mian multjaran laboron, gravan rolon ludis kaj plu ludas diversaj »sekretaj cirkuleroj« kaj »privataj« leteroj. Tipa ekzemplo – unu el la multaj – estas la letero de s-ro E. L. M. Wensing, la nuna ĝenerala sekretario de UEA, de 10.04.75 al s-ro H.V. Rasmussen, unu el la plej elstaraj kaj respektataj aktivuloj en la dana Esperanto-Movado, helpredaktoro de *Esperanto* komence de la periodo, kiam s-ino Kirsten Zacho, unu el la plej klarvidaj kaj noblaj aktivuloj, estis redaktoro de la oficiala organo de UEA. Membroj de la Dana Agadgrupo de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ĉefe anoj de Kleriga Konversacia Klubo (Studenta Esperanto-Klubo), kies prezidantino, s-ino Kirsten Zacho, kaj aliaj tuj firme distancigis sin de la hamburgaj okazaĵoj) multobligis tiun »privatan« leteron de s-ro Wensing, la respondo de s-ro H.V. Rasmussen de 16.05.75 kaj miajn komentojn de 22.06.75, kaj dissendis tiun tutan materialon, kune kun kelkaj el la reagoj, al pluraj ĉefdelegitoj, delegitoj kaj individuaj membroj de UEA. Longe mi hezitis ĉu entute tuŝi tiun aferon en la nuna eldono: unuflanke troviĝas la konscio, ke kia ajn publika reago je tiaj basaj atakoj estas per si mem humiliga por mi; aliflanke troviĝas la same forta konscio, ke en la nuna marĉo de ĉiaspekaj intrigoj necesas diri la veron ankaŭ pri tiuj miaj kvazaŭaj »subpremadoj de kontraŭaj opinioj«, por ke silento ne estu komprenata kiel konsento. Ĉar s-ro Wensing certe deziras konservi la aŭtorajn rajtojn pri tiu sia intelekta produkto, kiel ankaŭ por ne malŝpari spacon kaj monon, sube estas reproduktita nur la leterkapo de lia skribaĵo. El ĝi vidiĝas, ke tiu »privata« letero, kies enhavo neniel rilatas al privataj aferoj, estis skribita sur la oficiala papero de UEA. Kun la permeso de s-ro H. V. Rasmussen, sube estas publikigita la kompleta teksto de lia letero de 16.05.75. En miaj komentoj de 22.06.75 estas ellasitaj nur kelkaj partetoj, kiuj ne rilatas al la temo (ekz. salutoj) aŭ koncernas demandojn pli detale dokumentitajn en *HeR*. En la komentoj troviĝas abundaj laŭvortaj citaĵoj el la letero de s-ro Wensing, tiel ke la legantoj povos facile vidi pri kiaspekaj fantaziaj akuzoj temas. Personoj, kiuj deziras legi la tutan longan leteron de s-ro Wensing, verŝajne povos havigi ĝin de la skribinto mem. Cetere ankoraŭ io: se estus ereto da vero en tiu kalumnia aserto pri mia kvazaŭa »sufokado de kontraŭaj opinioj«, kial, do, la kompatindaj »sufokitoj« ne esprimas nun tiujn siajn »subpremitajn ideojn«? En tri plenajaroj, ekde la hamburga puĉo ĝis nun, s-ro E. L. M. Wensing, la ĝenerala sekretario de UEA, ne publikigis en la organo de la Asocio unusolan programan artikolon, en kiu li prezentus siajn ideojn por progresigi la lingvon kaj la Asocion).

7.4.1 Leterkapo de la skribajo de s-ro E.L.M. Wensing

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(En Konsultoj Rilate kun UNESCO)

TIU CI ESTAS PRIVATA LETERO

kiu esprimas tute personan opinion.

Achel, la 10-a de aprilo 1975

E.L.M. Wensing,

Dennenstraat 9,

B-3581 ACHEL (Belgio)

Sinjoro H.V. Rasmussen,

Bygtoften 8,

DK-2800 LYNGBY, Danlando

Estimata sinjoro Rasmussen,

7.4.2 Letero de s-ro H.V. Rasmussen

DK-2800 Lyngby, la 16-an de majo 1975

S-ro E.L.M. Wensing,

Dennenstraat 9,

B-3581 Achel,

Belgio.

Sinjoro,

Nekompreneble estas al mi, ke vian leteron de la 10-a antaŭamonata al mi vi komencis per la vorto »estimata«. Efektive mi devas dubi pri via sincereco.

Kiel vi povas estimi personon havantan la impreson, kiu laŭ via konkludo regas ĉe mi, kaj kiu laŭ via opinio estas tiel erara?

Kiel vi povas estimi personon, kiu – laŭ via esprimmaniero – »blinde kredis la »avertojn« de la antaŭa prezidanto«?

Nekompreneblaj al mi estas ankaŭ viaj motivoj por sendi al mi la leteron. Vi ja legis miajn artikolojn en »Eŝo« kaj do scias, ke ĉe mi regas seniluziigo pri Esperanto-organizaĵoj – efektive amariga seniluziigo – kaj vi devus kompreni, ke tio signifas profundan pesimismon.

Ĉu vi klopodis forigi tiun mian pesimismon, veki en mi la esperon, ke Esperanto tamen venkos malgraŭ la esperantistoj? Se jes, vi elektis la plej maltaŭgajn rimedojn.

Aŭ ĉu vi trovis miajn eldirojn tro danĝeraj al la nuna UEA kaj tial deziris plifirmigi mian volon ne esti ĝia membro? Se tio estas la klarigo, mi devas diri, ke tion mi akceptas kiel komplimenton, kaj ke vi plene sukcesis.

Ĉu vi ne povas kompreni, ke mi trovas la enhavon de via letero ofenda al mi kaj al la antaŭa UEA-prezidanto, kun kiu mi ekde la tempo, kiam mi estis helpredaktoro de »Esperanto« havas amikajn rilatojn, kaj kies laboron por Esperanto kaj UEA mi tre alte respektas kaj estimas?

La leterojn k.c., kiujn vi menciis, mi ne legis krom la leteron de s-ro Moritz, sed mi ne havas kopion de ĝi. Tial mi ne povas prijuĝi ilin escepte de tio, ke la aserton de s-ro Moritz, ke prof. Lapenna nomis certajn personojn »abscesoj«, mi opinias oportuna intenca miskompreno. Kiam siatempe mi legis la artikolon de prof. Lapenna, mi havis la klaran komprenon, ke li celis per tiu vorto ne personojn, sed la kritikindaĵojn en UEA.

»La estraro nepre deziras eviti ĉion, kio povus daŭrigi la konflikthan situacion en niaj vicoj«, vi skribis. Ĉu la estraro vere opinias, ke per tia »strutpolitiko« oni povas ĉesigi konflikton? Ĉu la estraro vere esperas, ke ĝi tiel povos akiri fidon malpermesante al la membroj esprimi en »Esperanto« opiniojn, kiuj ne plaĉas al ĝi?

Por mencii unu ekzemplon: En la marta numero de »Esperanto« estas sur p. 39 la informo, ke s-ro Peter Zacho ne plu prizorgas la kolektadon de poŝtmarkoj por UEA, sed sen sciigo pri la motivo de lia ekŝigo. Mi scias, kial li retiris sin, kaj ke li petis la revuon publikigi lian leteron kun la informo pri lia motivo, sed do la estraro – aŭ ĉu ni diru »junto«? – nepre deziris eviti tion!

Vi asertas, ke prof. Lapenna estis diktatoro, kiu agis sammaniere. Mi devas al tio diri, ke eĉ se mi kredus ĉiujn viajn vortojn tiurilate, tio ne povus forigi mian pesimismon.

Tre karakteriza estas al mi ja la fakto, ke vi eĉ ne povas montri, ke UEA sub la nuna gvidantaro estas demokratia organizaĵo, en kiu ĉiuj opinioj rajtas esprimiĝi.

Okaze de viaj eldiroj pri la defcito de UEA mi por via informiĝo citas jenajn liniojn, kiujn »Eĥo« ne represis:

»Por la sekura gvidado de entrepreno aŭ organizaĵo estas ĉiam necese per adekvata kontado kaj regula studado de ties ciferoj havigi al si instrumenton, per kiu oni povas doni ĝisdatigitan bildon de la aktualaj ekonomiaj situacio kaj evoluo, tiel ke oni i.a. povas kontraŭagi malbonan evoluon tuj, kiam ĝi komenciĝas. Tion oni devas ne forgesi en ekonomie malforta organizaĵo kiel UEA kaj precipe ne en inflacia tempo kiel la nuna.

Sed la direktoro de UEA, kiu ricevas sian salajron i.a. por gvidi la ekonomian administradon de la asocio, estis tute indiferenta tiurilate. Dum la komitataj kunsidoj en Hamburgo estis diskuto pri la demando, kial oni ne sufiĉe frue eksciis, ke la evoluo kondukos al tiel granda defcito.

Laŭ la protokolo de la kunsidoj, p. 13, la direktoro respondis, 'ke li efektive ne konsciis aŭ ne sciis, ke estos tia defcito, kvankam li intencis fari dum la jaro duonjaran bilancon, sed pro tempomanko ne sukcesis tion fari'.

Ne temas pri malgranda loka grupo, sed pri tutmonda organizaĵo. Estas ridinde kaj samtempe tragedie, ke la direktoro devis diri tiujn vortojn, kaj strangege, ke li ankoraŭ havas la

postenon, por kiu li evidente ne estas kvalifikita. Mi aldonu, ke ĉi tie mi esprimas min laŭ mia profesia kompetenteco.

La pesimismo, kiun via letero povis nur plifortigi, estas la kaŭzo de mia malfrua respondo, kiun mi per kopioj sciigas al d-ro Tonkin, s-ro Ib Schleicher kaj al prof. d-ro Ivo Lapenna. Al la lastnomita mi sendas ankaŭ kopion de via letero petante lin komenti viajn akuzojn.

H. V. Rasmussen

7.4.3 Komentoj de I.L.

22. 06. 1975.

S-ro H.V. Rasmussen,
Cand. Oecon.
Bygtoften 7,
Lyngby, Danlando.

Estimata kaj kara Sinjoro Rasmussen,

(---)

Certe vi rimarkis, ke s-ro Wensing (en la plua teksto W.) nomas sian leteron »privata«, kvankam ĝi estas skribita sur la oficiala papero de UEA kaj sendita kopie al d-ro H. Tonkin kaj s-ro Ib Schleicher. Do, ĝi tute ne estas »privata«. Tamen, eĉ se ĝi fakte estus skribita sur la persona papero de W. kaj sendita nur al vi, tio neniel liberigus W. de morala kaj jura respondecoj. Ŝajnas, ke W. kredas, ke li povas libere kalumnii sub la ŝirmo de indiko »privata«. Li ne agis tiel nur rilate al mi, sed ankaŭ rilate al s-ro F. Munniksma, – la projektinto, kompilinto kaj redaktinto de la monumenta *Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro* – kiun li tiel profunde ofendis, ke s-ro Munniksma interrompis kian ajn rilaton kun W., kaj ne nur eksigis el UEA, sed eĉ komplete forlasis la Esperanto-Movadon. Tial vi prave malatentis la indikon »privata« kaj komunikis al mi tiun tekston.

(---)

Nun mi pritraktu la unuopajn asertojn de W.:

1. W. asertas, ke mia aprila artikolo en *Esperanto*(*) »elvokis de multegaj flankoj komentojn, kritikojn, refutojn kaj ĝustigojn, sed li *formale malpermesis* al la redaktoro de la revuo publikigi ion ajn, kio povus malfavore influi liajn tezojn«.

La vero estas, ke la redaktoro de *Esperanto* sendis la 10-an de majo 1974, *sen mia scio*, cirkuleran leteron al 15 personoj, kiuj reagis je la aprila artikolo per leteroj skribitaj al la CO. En ĝi li informis la skribintojn, ke *li* ne intencas publikigi iliajn reagojn ĉu pozitivajn ĉu negativajn. La 18-an de majo 1974 mi skribis al la direktoro de la CO kaj al la redaktoro: »... entute mi havas nenion kontraŭ tio, ke vi publikigu ĉiujn negativajn reagojn kondiĉe, ke en la sama numero

(*) Temas pri la *Aprila Artikolo*, publikigita nun kiel Aldono 7.1.

vi publikigu nur dekonon de la pozitivaj laŭ mia elekto [en tiu momento mi jam estis ricevinta ĉ. 200 subtenajn reagojn, sed poste venis multaj aliaj, mia nuna rimarko]. Sincere parolante, *mi eĉ tre ŝatus, ke vi agu tiel, ĉar alie certe disfamiĝos, ke mi 'sufokis' kontraŭajn opiniojn* [kiel vi vidas, tio nun abunde okazas, ankaŭ en la »privata« letero de W]. Krome, estus vere utile, ke la esperantistaro, almenaŭ la saĝa esperantistaro, klare vidu la intelektan nivelon – kaj aliajn nivelojn – de tiuj t.n. 'kontraŭuloj'. «

Tio estas la vero pri mia kvazaŭa »malpermeso al la redaktoro« kaj mia kvazaŭa »sufokado de kontraŭaj opinioj«. Cetere, tiuj »opinioj«, nome preskaŭ ĉiuj »negativaj reagoj«, abunde aperis sur tuta paĝo de *Heroldo* de la 1-a de julio(*), dum nur 1-2 el la amaso da pozitivaj apogoj estis publikigitaj en unu-du periodaĵoj.

2. W. asertas, ke »bedaŭrindaj okazaĵoj«, kiujn li poste listigas sub a-ĝ, kaŭzis »la ne-reelektiĝon de Lapenna«.

Plia mensogo. *La vero estas*, ke en la elektoj por komitatanoj B mi ricevis *plebiscitan apogon* de preskaŭ 84 % kaj por la ĝishamburga linio de UEA kaj por mia laboro. En Hamburgo mi ne povis esti »reelektita«, ĉar mi mem eksigis el ĉiuj funkcioj pro la politika kontraŭneŭtraleca konspiro kaj hamburga puĉo, evidente kontraŭa al la menciita plebiscita apogo.

3. En siaj p-toj a-ĝ W. citas la nomojn de sinjoroj Moritz, Woessing, Fighiera, Auld, Quirke, Corsetti, *do de personoj, kiuj aŭ aktive partoprenis en la komplotado, aŭ objekte helpis ĝin*, kiel pruvite en la dokumentaro »Hamburgo en Retrospektivo«. Tiel do: por »pruvi« unu mensogon aŭ kalumnion, oni citas alian mensogon aŭ kalumnion, kiu siavice estas »pruvita« per la unua mensogo aŭ kalumnio! Tamen, mi komentu la unuopajn punktojn:

(a) W. citas el la letero de s-ro Moritz de 29.04.1974, en kiu tiu sinjoro (unu el la partoprenintoj de la »strikte konfidenca« kunveno en Kassel kun la sola punkto de la tagordo »Kiel faligi Lapenna?«) kulpigis min »pri eksterordinara misuzo de la rimedoj de UEA«, ĉar mi »elverŝas en la publika organo de la Asocio siajn [miajn] personajn juĝojn, insultojn, tordaĵojn kaj minacojn«.

Temas pri la *Aprila Arkitikolo*. *La vero estas*, ke en ĝi mi plej trankvile kaj objekte prezentis la situacion, kion mi rigardis kiel mian elementan devon. Sufiĉas relegi tiun artikolon – eĉ senkonsidere al la nun publikigota dokumentaro – por konstati la objektecon. Kaj tion sinjoro Moritz nomis »eksterordinara misuzo de la rimedoj de UEA«!

W. citas sinjoron Moritz ankaŭ rilate mian cirkuleron al la voĉdonontoj en la elektoj por komitatanoj B kaj mensoge asertas, ke en tiu cirkulero mi »rekte kaj plurfoje« admonis la balotontojn agi »laŭ tiuj klaraj postuloj de li mem donitaj en la citita cirkulero«. *La vero estas*, ke ankaŭ tiun cirkuleron la komplotintoj

hontinde misprezentis. Tiun cirkuleron mi sendis, ĉar s-ro T. Jansson, plenumante la taskon ricevitan de la »strikte konfidenca« kunveno de Kassel, dissendis cirkuleron pledante por 6 difinitaj kandidatoj (el kiuj 3 komunistoj kaj 3 »kunvojaĝantoj«), dum la gvidantoj en Ĉeĥoslovakio sendis same tiel »strikte konfidencan« cirkuleron en la ĉeĥa lingvo, postulante sub rektaj minacoj de politikaj sekvoj, ke la balotontoj voĉdonu por la samaj 6 kandidatoj. Reage je tiuj cirkuleroj, troviĝis kelkaj en okcidentaj landoj, kiuj sendis siajn cirkulerojn por aliaj kandidatoj. *En tiaj kondiĉoj* mi opiniis, ke estas mia devo kiel prezidanto de la Asocio peti la voĉdonontojn, ke ili »... bonvolu taksu la kandidatojn ne laŭ iuj 'instrukcioj' aŭ similaj 'konsiloj', sed plene libere prenante en konsideron nur la faktajn meritojn de ĉiu kandidato por nia neŭtrala UEA...« Tio estas la vero. Aldone: mi neniam »praktikis« kiajn ajn »sekretajn kunvenojn«, sed ĉion faradis aperte kaj publike. Dank' al miaj proponoj la kunsidoj de la Komitato fariĝis publikaj, dum la protokoloj de la Estraro ĉesis esti konfidencaj, kun la escepto de demandoj tuŝantaj privatajn aferojn aŭ povantaj ĝeni la funkciadon de la Asocio, sed en tiu okazo ĉiam nur provizore (ekzemple la ekziĝo de la direktoro) kaj ĉiam laŭ la decido de la Estraro.

W. plu citas s-ron Moritz, kiu »konkludas«, ke »estas ŝoke nomi siajn kontraŭulojn 'abscesoj'«.

La vero estas, ke prezentinte la ĉefajn trajtojn de la konspiro en la *Aprila Artikolo* kaj la tutan moralan-intelektan marĉon, mi skribis en la fino: »Aŭ oni plu deziras 'havi Lapenna' sen abscesoj sur la organismo de UEA, aŭ oni havos la abscesojn sen mi«. La senco estas pli ol klara: la vorto »abscesoj« – treege milda por speguli la realaĵon – rilatis kaj plu rilatas al ĉiuj aspektoj de tiu fenomeno, certe ne al personoj, sed s-ro Moritz kaj liaj amikoj insiste aplikas la esprimon al si mem. *Tio estas ilia aserto, ne mia.*

En la sama punkto *W. asertas*, ke mi »kraĉis al ne tute senmeritaj E-istoj« mian »juĝon, ke ili povus forlasi la E-o movadon sen endanĝerigi ĝian plu-ekzistadon, sed ke sen li ĝi kolapsus«. Laŭ *W.*, tion mi diris »al ge-sroj Grattapaglia dum la Luksemburga Kongreso, 1974«.

La vero estas, ke dum multaj jaroj mi estis en amikaj rilatoj kun gesinjoroj Grattapaglia, sed ilia sinteno subite kaj radikale ŝanĝiĝis post la nepublika kunsido de la Komitato (Londono, 1971), kiu pritraktis tre malagrablan aferon en la CO. Tiun aferon mi ne deziras tuŝi, sed mi devas diri, ke post profunda tuttaga ekzamenado, *kiun partoprenis ankaŭ s-roj Wensing, Woessink kaj U. Moritz* (tiamaj estraranoj) montriĝis tute klare, ke gravegaj akuzoj kontraŭ d-ro Sadler estis malpravaj kaj temis pri ja malagrabla, sed privata afero. Sekve, la Estraro, dum la kunsido de vendredo antaŭ la komenciĝo de la Londona Kongreso, *unuanime*

malakceptis la proponon de d-ro Sadler ekŝigi el sia ofico pro tiu malagrabla afero. Post la elekto de la nova Estraro en la sama kongreso, mi denove voĉdonigis la novan Estraron pri la sama propono (por ke la nova Estraro ne estu ligita en tiel grava afero per la decido de la antaŭa), kaj ankaŭ la nova Estraro unuanime malakceptis la proponon de d-ro Sadler pro la samaj kaŭzoj. Dum unusola semajno s-ro Wensing, tiama vicprezidanto, voĉdonis por la *malakcepto de la ekŝigpropono*, sed en la mezo de la semajno, dum la menciita nepublika kunsido de la Komitato, forte kritikis min, kvazaŭ mi estus aginta sen la konsento de la tuta Estraro, *inkluzive s-ron Wensing. Pli da hipokriteco apenaŭ estas imagebla*. En la konfidenca kunsido de la Komitato gesinjoroj Grattapaglia, ambaŭ komitatanoj, *pro siaj moralaj konceptoj* forte kritikis, eĉ kun tre levitaj voĉoj, la starpunkton de la Estraro, sed, *pro la menciita sinteno de W.* en la Komitato, la pinto de la atako estis direktita kontraŭ min. Tion ili faris ankaŭ ekster la kunsido de la Komitato en konversacioj kun diversaj kongresanoj, *laŭte postulante elĵeton de d-ro Sadler el la CO. Ekde tiu momento ili vere malamike rilatis al mi*. Mi mem sincere bedaŭris tion kaj tial dum la Luksemburga Kongreso mi afable petis ilin priparoli kun mi la aferon por klarigi tiun miskomprenon. Mi trankvile eksplikis al ili, pli precize provis ekspliki la karakteron de la afero, sed neniel sukcesis, ĉar ili ambaŭ, precipe s-ro Grattapaglia, volis aŭdi nenian eksplikon, nenian argumenton. S-ro Grattapaglia ĉiam pli kaj pli ekscitiĝis kaj 2-3 fojojn laŭte, preskaŭ kriante diris kaj ripetis, ke ĉio estas tiel »ŝoka«, ke li volas forlasi UEA kaj la tutan Movadon. *Reage je tio* mi fakte diris proksimume: »Do forlasu, se vi volas: UEA vivis sen vi, kaj ĝi povos vivi denove sen vi«. Je tio li reagis dirante proksimume: »Ankaŭ sen vi ĝi povas vivi«, kaj mia respondo estis: »Eble tamen ne tiel bone, kiel kun mi«. *Tio estas la vero*, kaj tiu vero plian fojon montras, ke s-ro W. mensogas aŭ fidas je mensogoj. La vero pri la voĉdono en la menciitaj du kunsidoj de la Estraro troviĝas en la koncernaj protokoloj; la vero pri la sinteno de W. en la Komitato troviĝas sur bendo, mia propra, kiun mi ankoraŭ konservas.

(b) En tiu ĉi punkto W. *citas* sian amikon kaj adoranton s-ron Woessink pri la sama cirkulero (do, dua akuzo pri la sama afero), kiun mi aldonis al la informoj de la CO rilate la voĉdonon pri komitatanoj B. *La veron* mi jam prezentis supre en 3 (a).

(---)

(c) W. *asertas*, ke mi »rifuzis« publikigon de lia repliko al mia *Aprila Artikolo*, ĉar »kontraŭdirojn li simple ne toleras, neniam toleris, kiel mi povis mem konstati dum mia pli ol 10-jara vicprezidenteco (1962-1972)«.

La vero estas, ke mi ne nur ne rifuzis (nek povis rifuzi) lian »replikon«, sed, kiel montrite supre en punkto 1, *eksplicite petis la*

redaktoron publikigi ĉiujn negativajn reagojn, inkluzive tiun de s-ro W. Cetere, resumo de lia repliko, plena de misprezentoj, aperis en *Heroldo* de la 1-a de julio 1974, p. 3.

Mi aldonu ĉi tie, ke s-ro W. siatempe fariĝis komitatano C kaj tuj vicprezidanto de UEA laŭ mia propra propono, ĉar f-ino Vermaas kaj s-ino Isbrucker varme rekomendis lin kiel personon, kiu pro sia pozicio en Philips, povus sukcese agadi en la medioj de komerco kaj industrio. Kvankam – mi volonte konfesas tion – mi neniam estis aŭdinta pli frue eĉ pri la nomo de W. (li komplete forestis el la Esperanto-Movado dum tre multaj jaroj), mi fakte apogis lin precipe pro la rekomendo de la tiama direktorino f-ino Vermaas, kiun W. poste per siaj ĉikanoj kaj suspektigoj sukcesis elpeli el la direktoreco de la CO. Mi donis al W. grandegan helpon en la komenco, ĉar, kiel dirite, pro sia foresto el la Esperanto-Movado, li havis nenian ideon pri la aktuala situacio de Esperanto en la mondo, tute speciale pri UEA. Pri la t.n. Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI) vidu ĉap. 20.6, precipe 20.6.4, de *Esperanto en Perspektivo*, kie ĉiuj faktoj rilate al EKI estas absolute objektivaj kaj ĝuste prezentitaj. Mi aldonas ankaŭ la leteron de s-ro F. Munniksma »Misgvidado« de junio 1974, kiu finiĝas per la vortoj: »... tiel ke s-ro Wensing grave misgvidis la UEA-Estraron, la Komitaton kaj la tutan membraron«.

Fine, por iom pli ilustrati la karakteron de s-ro W., mi memorigu tiujn, kiuj ĉeestis la UK en Vieno (1970), ke s-ro W. en la ferma kunsido per preskaŭ bombastaj vortoj, al mi sufiĉe malagrablaj, laŭdegis mian demokratecon, talentojn, sindonon ktp., kion d-ro Sadler, la tiama ĉefredaktoro, resumis per jenaj vortoj: »*Singarde pesante la argumentojn, pacience aŭskultante ĉies opinion, nia prezidanto firmanime gvidas la debatojn laŭ ordigita maniero. Profesoro Lapenna, mi dankas al vi pro via senlima oferemo, pro via neimitebla gvidado, pro viaj elstaraj meritoj por nia Movado, sed ankaŭ pro la eraroj, kiujn vi – kiel ĉiu homa kreaĵo – kelkfoje faras. Koregan dankon kaj fartu bone!*« (*Esperanto*, septembro 1970, p. 138).

Komparu la ĵus citatajn vortojn kun tiuj en lia letero al vi, kaj faru mem vian konkludon.

(ĉ) W. asertas, ke artikolo de s-ro Fighiera »Senutilaj polemikoj« »kompreneble ... estis rifuzita«.

La vero estas, ke ankaŭ tiu plia akuzo estas neta monsogo. La koncerna artikolo apartenas al tiuj kelkaj »negativaj reagoj« je mia *Aprila Artikolo*, al kiuj rilatas mia letero de la 18-a de majo 1974 citita en p-to I, supre. Cetere, ankaŭ tiu artikolo de Fighiera komplete aperis, *fakte* kompreneble, en *Heroldo* de la 1-a de julio 1974.

(d) W. asertas, ke C.R. Power riproĉis al mi »maldemokratiajn principojn de voĉdonado« [la vero estas entenata en la p-to 3 (a)

supre], kaj ke »Prof. L. obstine rifuzis doni al li precizigojn pri la supozataj subfosaj agadoj de difinitaj grupoj, sed kontraŭe, en 4-paĝa artikolo, kaŝas sin en nebulaj, neniel bazitaj, neniel pruvitaj kulpigoj«.

La vero estas, ke en la supra citaĵo de s-ro W. ĉiuj vortoj post la vorto »rifuzis« estas *pura inventaĵo de W.* Estas vero, ke s-ro Power en sia letero de 26.04.1974 skribis al mi, ke mia artikolo de aprilo »multon diras, sed ĝi ankaŭ multon ne diraŝ«, kaj li petis de mi precizigon pri la »evidentaj negativajoj«, je kiuj mi celis en tiu artikolo. En mia letero de 04.05.1974 mi donis al li kelkajn informojn, sed li ne estis kontenta, ĉar laŭ li, mi rifuzis »respondi la kernajn demandojn« de lia letero. En mia letero de 21.05.1974 mi skribis, interalie: »Se mi volus doni konkretajn ekzemplojn pri diversaj fiaĵoj, malobservoj de la Statuto kaj regularoj, ĉiaspecaj intrigoj, sekretaj kunsidoj kaj sekretaj cirkuleroj, ne sufiĉus jarkolekto de *Esperanto*. Tio tute ne estas troigita«. Efektive, la manuskripto de *Hamburgo en Retrospektivo* ampleksas 90 tajpitajn paĝojn, havas ĉ. 55.000 vortojn, kaj tamen ĝi tuŝas nur parton de la tuta konspiro.

Ĉar W. grave misprezentis ankaŭ la leterojn de s-ro Power, mi citu el la letero de C.R.L. Power al mi jenajn vortojn: »Nur la plej senscia aŭ detruema esperantisto povus ne altege estimi vin pro viaj netakseblaj, senlacaj laboroj por la lingvo kaj la Movado. Eĉ inter viaj plej akraj kritikantoj troviĝas tiuj, kiuj timas, *ke via malvenko signifus tre danĝeran eblecon de stalinismiĝo de UEA*. Sed viaj lastatempaj elpaŝoj ŝajnas al mi almenaŭ neprudentaj«. Espereble s-ro Power baldaŭ legos la dokumentan materialon en »*Hamburgo en Retrospektivo*« kaj tiam li mem konstatos, ke mia aprila artikolo estis ne nur prudenta, sed necesega admono. En ĉiu okazo s-ro W. konscie falsis la enhavon de la leteroj de s-ro Power, ĉar la kulpigoj, kiujn li metas en la buŝon de Power, ne estas eldiritaj de Power, sed de W. mem.

(e) *W. mencias* plurajn leterojn de s-ro W. Auld, laŭ kiuj, se W. entute citas korekte, mi mem »tranĉis la gorgon« al mi mem. Kia delikata esprimmaniero por la iama aŭtoro de *Infana Raso*, se tio estas liaj vortoj kaj ne la vortoj de W. kiel en la kazo de C.R. Power.

(f) *W. citas* parton de la letero de s-ro Dermond Quirke de la 28-a de majo. Temas pri la sama D.J.F. Quirke, kiu per serio da artikoloj, publikigitaj en *The British Esperantist* sub la redaktado de W. Auld, objekte kontribuis al la kampanjo de kalumnioj kaj mensogoj helpinta la politikan konspiron kaj la katastrofon de Hamburgo. Laŭ tiu letero de la 28-a de majo 1973 mi kvazaŭe minacis »eventualan procezon pri kalumnio«.

La vero estas, ke mi neniam minacis iniciati kian ajn proceson pro kalumnioj, kvankam sendube mi estus povinta tion fari kun absoluta certeco pri sukceso. *La vero plu estas*, ke la 3-an de julio

1973 mi ricevis unu el la konataj fitelegramoj el Parizo, en kiu, interalie, estis dirite: *»Ne eksigu el BEA, sed faru al ĝi proceson kiel vi minacis«*. Ĉar, kiel ĵus dirite, mi neniam minacis procesi kontraŭ BEA, nek mi iam uzis tiun vorton, sed, male, D.J.F. Quirke uzis ĝin en la sama senco en sia cirkulera letero de 28.05.1973, mi havis konversacion kun s-ro Quirke en mia kolegio, prezentis al li la identecon de la du asertoj, ambaŭ mensogaj, kio metis lin en grandan embarason. Li rekonis, ke mi neniam »minacis per proceso«, ke sekve lia aserto estis mensoga, kaj ke la sendanto de tiuj fitelegramoj utiligis la mensogan aserton en la cirkulero de Quirke en preskaŭ identa formo. Tiun sian cirkuleron s-ro Quirke estis sendinta al estraranoj de BEA kaj UEA »plus unu-du amikoj miaj«. Mi demandis lin, kiuj do estas tiuj 1-2 amikoj liaj, ĉar evidente la cirklo de la eblaj sendantoj de tiuj telegramoj estis limigita ĝuste al tiuj. S-ro Quirke menciis iun en norda Anglio, alian en la CO de UEA (sed li ne povis rememori pri la nomo) kaj la trian en Belgio. Tiun lastan li suspektigis kaj promesis al mi esplori la aferon kaj komuniki la nomon. Tion li neniam faris, kvankam plurfoje mi memorigis lin pri lia eksplicita promeso. Pliaj detaloj pri tiu tuta afero ĉirkaŭ la fitelegramoj el Parizo troviĝas en la sekcio 5.3 de *Hamburgo en Retrospektivo*. En ĉiu okazo estas mensoga la aserto de s-ro Quirke, reproduktita laŭvorte en la letero de s-ro W., ke mi iam ajn minacis per »eventuala procezo pri kalumnio«.

(g) En tiu ĉi punkto W. amasigis tiom da mensogoj, kiom da asertoj. Mi neniam montris kian ajn malobjektivecon rilate la financojn de la Beograda Kongreso, kiel asertas W., sed, male, firme malaprobis la pli ol senbazajn suspektigojn de Prof. Popović kaj Prof. Šaponjić pri iaj kvazaŭaj »ŝteloj, trompoj, fiaĵoj« kaj similaj esprimoj uzitaj de s-ro Woessink en liaj cirkuleroj kontraŭ la du profesoroj. Mian starpunkton aprobis la Estraro per plimulto de voĉoj dum la printempa kunsido de 1974, poste ankaŭ la Komitato en la kunsidoj de Hamburgo. Pri la aserto de W. pri mia kvazaŭa »subpremo de opiniesprimoj de aliaj estraranoj«, »rigida cenzuro«, »sufokado de kontraŭaj voĉoj« ktp., vidu supre en punkto I. Krome, mi eksplicite deklaras je mia akademia vorto, ke mi neniam en mia tuta vivo »cenzuris« kian ajn »kontraŭan opinion«. Vere, mi sentus min intelektu tre malforta, se mi ne povus defendi miajn proprajn opiniojn alimaniere ol per »cenzurado«, *eĉ se mi havus tian povon, kiun mi nek havis, nek iam dezirus havi*. Sed mi ja rigardis kiel mian devon de prezidanto de UEA malebligi, ke kontraŭneŭtralecaj tekstoj pri kontraŭneŭtralecaj aranĝoj, ekzemple la aranĝo de TEJO »La junularo akuzas imperiismon«, aperu en la publikajoj de mia neŭtrala UEA. Ankoraŭfoje cetere: dum la kunsido de la Estraro de la 8-a de aprilo 1972, laŭ la peto de la direktoro, la Estraro decidis komisi al s-ro Wensing la taskon tralegi la presprovaĵojn de ĉiu numero de

Kontakto por vidi »ĉu en ili troviĝas materialoj, kiuj povus esti rigardataj kiel neneŭtralaj« (pliaj detaloj en sekcio 4.4 de *Hamburgo en Retrospektivo*). Mia artikoleto »Respondeca komuna tasko« (marta numero de *Esperanto*, 1974, p. 47) ne estis skribita tial, ĉar »doktoro Bormann havis la neimageblan (!) kuraĝon aperigi sian artikolon pri la hamburga kongreso en la revuo 'Heroldo'« (d-ro Bormann ja publikigis multajn kontribuojn, sen kia ajn »kuraĝo«, en *Heroldo* jam longe antaŭ la menciita artikolo pri la Hamburga Kongreso), sed tial, ĉar en tiu sia artikolo d-ro Bormann komplete ignoris la fakton, ke la organizo de la universalaj kongresoj ja estas respondeca komuna tasko kaj de la Estraro, kaj de la LKK, kaj de la CO. En ĝi estis menciita nek la Estraro, nek la estrarano pri kongresoj, nek la CO, tiel ke oni ricevis la impreson kvazaŭ nur la LKK estus la organizanto. Bv. relegi tiun artikolon kaj vi mem konstatos, ke ankoraŭfoje W. konscie diras malveron.

(ĝ) W. asertas, ke la artikolon de komitatano Renato Corsetti, reage je mia *Aprila Artikolo*, »la redakcio de la revuo ne rajtis aperigi laŭ ordono de L.«

La vero estas, ke ankaŭ tiu plia akuzo (kiom da ili jam) estas neta mensogo. Ankaŭ tiu artikolo apartenas al la grupeto de »negativaj reagoj« al kiuj rilatas mia letero de 18.05.1974, citita en la punkto 1 supre. Kaj plian fojon cetere: resumo de tiu letero aperis en la jam fama numero de *Heroldo* de la 1-a de julio 1974.

Per tio mi finas la pritrakton de la mensogaj asertoj entenataj en la punktoj a-ĝ. Feliĉe ke W. ne daŭrigis la liston de »malpermesitaj publikajoj«. Kiel noble! Kiel vi vidas el lia letero, li kredas, ke per sia listo »vi jam estas sufiĉe informita pri la maniero, laŭ kiu, en la antaŭa UEA, la voĉoj de oponentoj estis silentigataj«. Aliflanke, mi opinias, ke tiu lia listo de mensogoj donas al vi sufiĉe klaran bildon pri la karaktero de tiu sinjoro.

4. W. asertas en sia plua teksto, ke mia »Esencaj kaŭzoj de mia ekziĝo« ne estis publikigita tial, ĉar »la Estraro nepre deziras eviti ĉion, kio povas daŭrigi la konflikthan situacion« (kiel nobla penso; tamen: nepre daŭrigi la kampanjon de kalumnioj), kaj due ankaŭ tial, ĉar »en tiu artikolo estas absolute nenio nova por ĉiuj, kiuj aŭskultis la duhoran eksplikadon de Prof. L. en Hamburgo«. Kompreneble, ke estas nenio nova. Estas eĉ multege malpli ol en mia adiaŭa parolado en Hamburgo. Sed ĉu la tuta membraro – kaj ne nur la ĉeestintoj de tiu parolado – ne rajtas sciigi pri la kaŭzoj de miaj ekziĝoj el diversaj funkcioj en UEA? Ĉu ne estas elementa rajto de persono, kiu 46 jarojn de sia vivo dediĉis al laboro por Esperanto kaj ekde 1938 seninterrompe en la Estraro, ekspliki al la membraro kial li sentis sin devigita ekziĝi? Kaj kio pri la multnombraj ekziĝaj leteroj de aliaj funkciuloj kaj membroj? Kio pri la kompleta, totaleca ne nur prisilentado de la vero, sed ankaŭ

plua deformado de faktoj, misprezentoj kaj rektaj mensogoj, kiel en la nun pritraktata letero de W?

5. W. asertas, ke en mia adiaŭa parolado, kiun li nomas »memlaŭdega epilogo«, mi ridindigis »niajn britajn kaj usonajn membrojn pro ilia – kelkfoje iom brita – Esperanto-akcento«. *La vero estas*, ke dum tiu parolado mi imitis tiujn, kiuj riproĉis al mi mian kvazaŭan »diktatorecon«, ĉar mi »scias oratori« kaj per miaj »argumentoj sukcesas konvinki la aliajn«. Je tiaj »riproĉoj« mi reagis per ilia propra lingvaĵo. Tion ĉiu povas konstati, kiu havigas la kompletan surbendigitan paroladon de la Magnetofona Servo. Same tiel kiu ajn povas konstati, ke mi neniel »insultis« s-ron Kühlmann, sed nur komparis la elektitajn komitatanojn C kun la neelektitaj sole el vidpunkto de la statute difinita kriterio por elekto de komitatanoj C. Kaj tion mi faris por montri, ke ankaŭ tiu statuta regulo estis komplete malatentata pro politikaj motivoj. Plue, W. asertas, ke s-ro Kühlmann »iam savis L. kiam li troviĝis en pli ol mizera stato«. Mi vere ne scias kian fantazion havas W. por inventi eĉ tian mensogon: Kvankam mi kelkfoje en mia vivo troviĝis en malfacilaj situacioj – ekzemple dum la partizana milito en Jugoslavio, kiun nek Kühlmann, nek W. partoprenis – tamen mi neniam estis en ia »pli ol mizera stato« kaj ankoraŭ malpli s-ro Kühlmann »savis« min.

6. W. asertas, ke la antaŭa Estraro, sub mia prezidanteco, »postlasis UEA'n en pli ol mizera financa stato«.

La vero estas, ke la asocia kapitalo kreskis de 50.000 gld. en 1948 al ĉ. dekoble pli granda sumo, se oni prenas en konsideron la valoron de la domo en UEA en Rotterdam. Kaj s-ro W., pro sia antaŭa pozicio en grava industria entrepreno, devus kompreni, ke la kapitala rezervo estas esenca por taksii la financon situacion, certe ne la deficito de unu jaro, kiu, malgraŭ la alteco neniel pravigebla, tamen malaltiĝis nur je 10.000 gld. Pri la financa fortikiĝo de UEA vidu ĉap. 18.6 kaj 18.7 de *Esperanto en Perspektivo*. Pro la neniel pravigebla deficito de 1973, kiel vi scias, mi eksplicite distancigis min en la fina rimarko al la Estrara Raporto por 1973-74.

7. W. asertas, ke CED kaj LMLP kostis al UEA ĉiujare pli ol 20.000 gld.

La vero estas, ke la buĝeto de CED, ĉiam rigore observata, restis praktike senŝanĝa ekde la fondiĝo de CED en 1952 malgraŭ la altiĝo de ĉiuj prezoj kaj inflacio. En la lastaj jaroj la tuta sumo de la elspezoj de CED estis malpli ol duono de la plej malalta salajro en la CO, dum la subvencio de UEA al CED estis 500-600 britaj pundoj jare, do ĉ. 1/3 de la plej malalta salajro en la CO. CED ja aŭspiciis LMLP, sed la kontoj de LMLP ĉiam troviĝis ekster la buĝeto de CED, tute aparte. Tiu konto estis komplete administrata en la CO, kaj havas nenion komunan kun la konto de CED.

Por fini, mi citas el unu el la korespondaĵoj de s-ro F. Munniksmā, rilatantaj ne al mi, sed al »kunlaborado« inter W. kaj s-ro Munniksmā:

»La blufο kiu sendube ĉirkaŭas la neveraĵojn de s-ro Wensing povus fari impreson ĉe neinformitaj aŭ facilkredaj homoj ... La korespondado kun W. formas apartan ĉapitron, eĉ senrigarde al la punktoj kiuj jam ĉisupre preparoligis. Li tiagrade serpentis kaj misprezentis aferojn, ke mi ripete devis korekti ilin, citante liajn proprajn vortojn. La energio uzita por tia korespondado indus pli bonan aferon«.

Jen, kara Sinjoro Rasmussen, mi prezentis al vi la veron, kiu samtempe dementas, tre milde dirite, ĉiujn asertojn de s-ro Wensing de la komenco ĝis la fino. Per sia letero li ne »sukcesis iomete prilumi kelkajn aliajn flankojn de la antaŭa prezidanto«, sed plene prilumis sin mem. Mia letero, kvankam adresita al vi, ne estas »privata« en la senco uzita de s-ro Wensing. Vi povas ĝin utiligi tute laŭ via bontrovo kaj mi mem prenas plenan moralan-intelektan kaj juran respondecon pri absolute ĉio, kion mi diris supre. Mi mem ne plu deziras reveni al tiu ĉi temo, ĉar la kazo de s-ro Wensing forrabis al mi jam tro multe da vere valora tempo.

*Kun estimo kaj tre koraj salutoj,
sincere via
Ivo Lapenna.*

7.5 EKSIGŬ EL UEA POST 45-JARA MEMBRECO

(*Noto: La suba eksiĝa letero estis adresita al la direktoro de la CO kun kopio al la prezidanto de la Asocio. Apenaŭ necesas diri, ke la nuna gvidantaro de UEA ne publikigis ĝin kaj tiel prisilentis ankaŭ tiun fakton. La letero aperis en n-ro 2/76 de *Horizonto*.*)

24.12.1975.
kopie al d-ro H. Tonkin
kaj al pluraj geamikoj

D-ro V. Sadler,
Direktoro de la CO de UEA,
Rotterdam.

Estimata Direktoro,

Kiel vi scias, dum la UK en Hamburgo mi eksiĝis el ĉiuj funkcioj en UEA, inkluzive la honoran membrecon, pro kaŭzoj prezentitaj en la adiaŭa parolado, koncizigitaj en »Esencaj Kaŭzoj de mia Eksiĝo«, kaj abunde dokumentitaj en *Hamburgo en Retrospektivo: Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Konspiro en UEA*. Mi decidiĝis ne eksiĝi tuj el la membreco mem de UEA, sed atendi ĝis la fino de 1975 por vidi kio okazos kaj, sekve, por konstati ĉu la

cirkonstancoj en UEA permesos al mi ĝustatempe pagi la MA kotizon por la kuranta jaro kaj tiel daŭrigi la membrecon, aŭ ili devigos min ekŝigi el la Asocio. Malgraŭ la politika konspiro, kiu kondukis al la hamburga kontraŭstatuta puĉo, kaj malgraŭ la senprecedenca kampanjo de kalumnioj kaj ofendoj kontraŭ mi persone en ligo kun la konspiro, mi tamen deziris doni ŝancon al la nuna gvidantaro ripari la malbonon, fine evidentigi la vaste reklamitajn »novajn ideojn«, kaj montri ne per senbazaj frazoj kaj neplenumataj promesoj, sed per agoj kaj konkretaj rezultoj almenaŭ ian laborkapablon.

Ekzameninte la tutan evoluon ekde Hamburgo, mi konstatis, ke la *principo de neŭtraleco*, kiel oni povis atendi, estis kaj plu estas krude malobservata. Sufiĉas nur mencii la malkapablon de la Komitato tuj malakcepti la aliĝpeton de la Centra Laborrondo Esperanto el GDR, kiu aperte deklaris sin kontraŭneŭtrala; aŭ la fakton ke la Komitato eĉ ne venis al ideo iniciati la proceduron por eksigo de Bulgara Esperanto-Asocio, kies Programo kaj Statuto (laste reviziita en 1972) estas nete partipolitikaj, kiel montrite en *Hamburgo en Retrospektivo* kaj en posta dokumento, ambaŭ – Programo kaj Statuto – malkovritaj post Hamburgo; aŭ la politikan seminarion de TEJO en Coimbra (Portugalia) komence de la pasinta oktobro (v. *Boletín* de novembro-decembro 1975, p. 23). Neniaj »deklaracioj pri neŭtraleco« povas kaŝi aŭ forviŝi la realaĵon. Neŭtralecon oni malobservas ne nur per eksplicitaj kontraŭneŭtralecaj deklaroj aŭ agoj, sed ankaŭ per nereagoj en kazoj, kiuj postulas reagojn. En tiaj kazoj silenti signifas konsenti.

Post Hamburgo aperis tuta aro da *misprezentadoj kaj/aŭ profunde ofendaj artikoloj* en *Esperanto* (ekz. en numeroj 11/74, p. 182-83; 1/1975, p. 1-2; 4/1975, p. 62; 5/1975, p. 81-83; 7-8/1975, p. 123-124, verŝajne la kulmino de tiu provoka impertinenteco) kaj en kelkaj satelitaj organoj (ekz. *La Brita Esperantisto* aŭ la *Interlingvistika Informa Servo* de d-ro A. Bormann), eĉ por ne paroli pri la konate »verama« *Heroldo*, kun kiu la nuna gvidantaro de UEA havas plej intimajn rilatojn (interalie v. en *Esperanto* 9/1975, p. 48). Samtempe estas enkondukita *tolaleca cenzuro*. La nuna gvidantaro rifuzis publikigi ne nur mian ekŝigan tekston kaj miajn artikolojn *reage* je nete misprezentaj asertoj publikigitaj en la organo de la Asocio, sed ankaŭ nombron da leteroj kaj protestoj, senditaj de aliaj membroj. Eĉ pli ŝoke: la redakcioj de *Esperanto* kaj de 2-3 satelitaj organoj ne nur rifuzis publikigi miajn *reagojn* tekstojn kun korektoj pri faktoj, sed eĉ polemikis kun tiuj nepublikigitaj tekstoj kaj malice deformis ilian sencon. Tia skandala konduto estas nekutima eĉ en totalecaj reĝimoj. La »Konkludoj« en la Estrara Raporto por 1974-75, tute egale ĉu oni nomas tiun parton tiel aŭ »rimarkoj« aŭ alimaniere, estas plia skandala misprezentado de faktoj kaj insultado de organizaĵoj aŭ

unuopuloj fidelaj al la politike neŭtrala ĝishamburga UEA. La saman kalumnian karakteron havas la letero de la ĝenerala sekretario de 10.04.1975, skribita »private« sur la oficiala papero de UEA, al s-ro H.V. Rasmussen, kiel ankaŭ tuta aro da similaj »privataj« kaj neprivataj misprezentoj rilate la financon de UEA, membrecon, ktp. Aldoniĝas la fakto, ke, laŭ fidindaj informoj ricevita de persono vizitinta la Centran Oficejon, la vicedirektoro uzas tie ege insultajn esprimojn pri mi.

Tiu tuta hontinda kampanjo kontraŭ min persone havis kaj plu havas la evidentan celon komplete deformi mian tutan personecon kaj mian tutan laboron por Esperanto ĝenerale kaj por UEA speciale antaŭ neinformitaj aŭ nesufiĉe informitaj membroj kaj nemembroj de la Asocio.

Rilate la laboron: sufiĉas legi la Estraran Raporton por konstati, ke en ĝi abundas blufoj, malĝustaj kaj amaso da vortoj, sed forestas faktoj pri laboro kaj pri konkretaj rezultoj. La kulmino tiurilate troviĝas en ĉap. VIII Informado, kiu tekstas: »Raporto de la kompetenta estrarano ne atingis nin«. Sed, laŭ eksplicita preskribo de art. 30 de la Statuto, la kompetenta kaj respondeca estrarano pri informado estas precize la verkinto de la Raporto, nome la ĝenerala sekretario de la Asocio. Efektive, el la Raporto kaj el la Protokolo de la lastaj komitataj kunsidoj klare vidiĝas, ke preskaŭ ĉiuj antaŭhamburgaj agadoj, kiuj kondukis la Asocion al prestiĝa pozicio en la ekstera mondo kaj kiuj interne fortigadis ĝin ĝis Hamburgo, estas ĉesigitaj. Esence, restas nur la rutina administrado de la membroj, la publikigado de la Jarlibro (nun nur en unu parto), la organizado de la universalaj kongresoj kaj la eldonado de la revuo *Esperanto*, tiu lasta kun grandegaj malfruiĝoj de 5-6 semajnoj, laŭ mia scio absolute senprecedence en la tuta historio de UEA.

Pro ĉiuj supraj kaŭzoj mi ne plu povas esti membro de UEA sen serioze kompromiti mian koncepton pri Esperanto kiel neŭtrale homa lingvo kaj miajn personajn dignon kaj honoron. Tial mi nun – post seninterrompa membreco ekde 1930, do post plenaj 45 jaroj – bedaŭrinde sentas min devigita ekŝiĝi el UEA. Mi revenos al la Asocio, se iam UEA revenos al la ĝishamburga linio de politika neŭtraleco, interna demokrateco kaj elementa dececo, do se ĝi retrovos sin mem.

*Kun salutoj,
D-ro Ivo Lapenna*

7.6 DEKLARO DE LA PREZIDANTO DE LA AKADEMIO

(*Noto:* La Prezidanto de la Akademio de Esperanto komunikis sian Deklaron de 17.05.76 al la periodaĵoj *Esperanto*, *Heroldo*, *Horizonto* kaj *Sennaciulo*. Ĝis la finredakto de tiu ĉi verko la Deklaro aperis nur en *Horizonto*, n-ro 3/76. kaj *Sennaciulo*).

Akademio
De Esperanto

La Prezidanto
Prof. G. Waringhien

De kelkaj lokoj oni demandis min pri la sinteno de la Akademio antaŭ la nuntempaj malakordiĝoj. Ĉar mi jam antaŭe ricevis de unu akademiano similan demandon, mi opinias eble utila diskonigi la respondon, kiu mi persone faris al tiu kolego:

»1^o Mian personan opinion pri nia kolego Lapenna mi neniam kaŝis: mi rigardas lin kiel la indan postvenanton de tiuj grandaj esperantistoj, kiuj plej progresigis la movadon, Bourlet, Hodler kaj Privat; kaj, pli sukcese ol ili, li, dank' al siaj esceptaj kvalitoj de diplomato, organizanto kaj oratoro, altigis UEA ĝis la rango de la rekonataj organizoj internaciaj. Tial mi profunde indignis kontraŭ la hontinda kampanjo de kaŝumioj, per kiu kelkaj oponentoj provis, sed vane, makuli lian honoron kaj subfosi lian prestiĝon.

2^o Sed kiel Prezidanto de la Akademio mi povas havi nur unu solan gvidlinion: konservi al ĝi la karakteron de »sendependa lingva institucio«, kiu difinas la artikolo 1-a de la Statuto. Tial mi ĉiam tenis la Akademion ekster la politikaj aŭ organizaciaj polemikoj, kaj penadis rilati senpartie kaj al UEA kaj al SAT. Kaj same kiel mi – kun aliaj eminentaj kolegoj – partoprenis egale en la SAT-kongreso en Augsburg kaj en la UEA-kongreso de Vieno, mi intencis ĉi-jare viziti kaj la Universalan Kongreson en Ateno kaj la Internacian Konferencon de la Neŭtrala Esperantista Movado en Parizo – kion nebligas la fakto, ke la dua okazos samtempe kiel la unua.

3^o La akademianoj ĉeestantaj Universalan Kongreson ordinare profitas la okazon, por kunveni neformale kaj diskuti pri demandoj rilataj al la funkciado de la Akademio kaj al la lingvo mem; konciza protokolo kutime aperas pri tio en la sekvanta Ĉirkulero Akademia. Se pluraj aliaj akademianoj kunvenis en alia loko kaj diskutis pri tiuj du specoj de demandoj, mi volonte diskonigus al iliaj kolegoj la rezulton de iliaj diskutoj.«

G. Waringhien.

7.7. LA MALESPERO

(*Noto:* La suba poemo estis unue publikigita en la hispana *Boletín*, septembra-oktobra n-ro, 1974, p. 18. Kun la permeso de la aŭtoro, kiu ŝanĝis du vortojn de la originalo, ĝi nun reaperas en tiu ĉi libro. La poemo reflektas plej koncize kaj plej

trafe la pensojn kaj sentojn esprimatajn en amaso da leteroj de sinceraj esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo. Multaj el ili – tute egale ĉu en UEA aŭ ekster ĝi – perdis la fidon kaj fariĝis apatiaj. Aliaj, ŝokitaj pro la tuta bedaŭrinda realaĵo, eĉ forlasis ĉion. Kaj tio verŝajne estas la plej malbona el la malbonegaj sekvoj de Hamburgo. Perdo de fido, apatio kaj malespero estas la plej grandaj malamikoj de kiu ajn batalanta movado. Evidente, ankaŭ pri tiu aspekto ne pensis, nek nun pensas, la ĉefroluloj respondecaj pri la aktuala profunda krizo).

LA MALESPERO

En la mondon venis malkonsento,
tra la mondo iras honta moko,
pro intrigoj de malica gento
Estroj falas de sur sia loko.
Ne al paco amon ĝuiganta
iras nun la homa familio;
en la rond' eterne disputanta
plu certigas la malharmonio.

Sub la ŝajna signo de l'espero
kolektiĝis gravaj intrigantoj,
kaj subite stagnas la afero
pro la ruzo de la subfosantoj.
Forte staras la miljaraj muroj
inter la popoloj konfuzitaj;
kaj plu staros la babelaj turoj
de la klana vol' fortikigitaj.

Sur ŝanĝata lingva fundamento
korprenante unu la alian,
la adeptoj faros sen konsento
unu lupan rondon milpartian.
Niaj plej kuraĝaj laborantoj
en klopodoj vanaj ja laciĝos,
kaj la revo de la esperantoj
por eterne ne efektiviĝos!

Salvador Gumá

7.8 DEKLARO DE PRINCIPOJ

La Unua Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kunveninta en Saarbrücken de la 10a ĝis la 16a de Aŭgusto 1975,

REEKZAMENINTE en prelegoj kaj diskutoj la lingvan

problemon en la nuna mondo kaj la pozicion de la lingvo Esperanto,

kaj konstatinte, ke la nuna gvidantaro de UEA ne plu agas laŭ la konceptaro, kiu ĝis la Hamburga politika puĉo ebligis disvastigi la lingvon,

DECIDAS memori al la esperantistaro jenajn principojn:

1) El ĉiuj projektoj de komuna lingvo nur Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta komunajo. Tiu komunajo havas la moralan devon konservi ekster ĉiu ajn alia ideologio la neŭtrale homan kulturan karakteron de la Zamenhofa Esperanto kaj de la humaneca internaciismo esence ligita al ĝi.

2) Tiucele fariĝis nepre necesa la estiĝo de internacia agad-grupo politike neŭtrala por plu disvastigi la lingvon kaj progresigi la movadon:

a) per aktivado surbaze de lokaj agad-grupoj, en kiuj la scipovo de Esperanto estas la fundamento de ĉiu ajn progreso;

b) per instruado de Esperanto en formo de kursoj parolaj, lernejoj kaj grupaj, perradiaj kaj perkorespondaj, kaj ankaŭ per plivastigo de memlernaj metodoj;

c) per ekstera aktivado por prezenti kaj defendi la lingvon, apogante sin sur la Principaro de Frostavallen kaj sur la dokumenta materialo de la ĝishamburga CED, enkondukante ankaŭ la noción de »publikaj rilatoj« por konstante flegi la prestiĝan bildon de la Lingvo Internacia, de ĝiaj kulturo kaj komunajo, kaj instigi al lernado.

3) La internacia agad-grupo utiligos la rimedojn de komunikado interne de la Esperanto-Movado, interalie kaj precipe la novan periodaĵon *Horizonto*, por diskonigi ĉi deklaron de principoj kaj instigi al formiĝo de agadgrupoj kaj al aktivado laŭ tiuj ĉi principoj sur landa, regiona kaj loka niveloj.

ALVOKAS la esperantistaron – pro la nuna totaleca cenzurado de la vero en la organoj de UEA kaj en pluraj aliaj satelitaj periodaĵoj – profunde orientiĝi pri la veraj kaŭzoj de la nuna politikigo de la Asocio.

Tiu politikigo ja klare pruviĝas el la kontroleblaj faktoj prezentitaj en la dokumento *Hamburgo en Retrospektivo*.

ALVOKAS plie – pro la nuna malkonstruado en UEA – aktivi kaj en novaj agad-grupoj kaj en la ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj konforme al tiuj principoj.

PROTESTAS kontraŭ la malveraj asertoj esprimitaj en la artikolo »Danĝera ludo en Sarlando« (*Esperanto*, 7-8/1975) pri la celoj kaj karaktero de la Unua Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. La neceson de tiu ĉi Konferenco kaŭzis la kontraŭstatutaj manovroj, kiuj kulminis en Hamburgo.

KOMISIAS la francan agad-grupon organizi en 1976 la Duan Internacian Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

En la nomo de la partoprenantoj de la Konferenco:

Jean Thierry, prezidanto; Isaj Dratwer, vicprezidanto; Heinz Dieter Maas, vicprezidanto; Peter Zacho, vicprezidanto; Reinhard Hauptenthal, sekretario.

7.9 KONDIĈOJ DE UNUECO

(*Noto: La suba teksto estas kompletigita kaj ĝisdatigita versio de artikolo publikigita en *Horizonto* n-ro 3/1976).*

En tiu ĉi artikolo mi klopodos respondi al multnombraj leteroj turniĝantaj ĉirkaŭ la prema demando, ĉu la neŭtrala Esperanto-Movado, ideo plu unueca, havas ian ŝancon retrovi ankaŭ unuecan organizan formon. La solvo de tiu problemo estas urĝa, ĉar la nuna krizo estas multe pli profunda kaj pli vasta ol oni povus unuavide supozi. Ne plu temas nur pri UEA, kiu, eĉ pli rapide ol antaŭvidite en la *Aprila Artikolo*, ruliĝas en abismon, sed ankaŭ, multe pli grave, pri la estonteco de la Internacia Lingvo mem. Nepardoneble, nepre nepardoneble, tio okazas ĝuste en la periodo, kiam la situacio sur la lingva kampo komplikiĝas de monato al monato, kaj kiam politike senmakula, aktive neŭtrala, forta, digna kaj prestiĝa monda Esperanto-Organizaĵo, kia estis UEA ĝis Hamburgo (1974), devus kaj povus ludi decidan rolon en la traktado de la lingva problemo firme pledante por Esperanto.

7.9.1 Kaŭzoj de la krizo

Tri grupoj de faktoroj, reciproke kunligitaj, kaŭzis la nunan krizon: (i) kruda malobservado de la politika neŭtraleco; (ii) sistemaj nigrigadoj de mia nomo, absolute senprecedencaj en kiu ajn kultura movado, sed tre kutimaj en difinitaj tipoj de politikaj sistemoj; (iii) malkapablo de la nunaj respondeculoj en UEA gvidi la Asocion kaj utiligi ĝin por progresigi la lingvon surbaze de la ĝishamburgaj atingoj.

(i) *La neŭtraleco* kiel esenca kondiĉo de universaleco estas detale analizita en Ĉap. 18.2.1 de *Esperanto de Perspektivo* (p-oj 553–561). Ĉiuj sinceraj kaj seriozaj esperantistoj devus atente legi kaj relegi almenaŭ tiun parton de la verko por plene kompreni kial la politikiĝo de UEA ne povis ne disrompi la unuecon. Tiu aspekto, do, estas abunde dokumentita kaj neniam hipokritaj »deklaroj pri neŭtraleco« povas kaŝi la bedaŭrindan relacon. Nek interne de la Esperanto-Movado, nek, ankoraŭ malpli, ekster ĝi. Nur politikaj analfabetoj aŭ personoj, kiuj intence blindigas kaj surdigas sin, povas plu dormi trankvile. Cetere, ankaŭ malgrandaj infanoj

kovras siajn kapetojn per litotukoj kaj kusenoj kiam fulmotondras ...

La klare unudirekta politikiĝo de UEA necese malproksimigis de la Asocio ne nur tre multajn membrojn kun aliaj politikaj konceptoj, sed ankaŭ tiujn personojn, inkluzive min mem, kiuj reagus absolute idente ankaŭ en kazo de politikiĝo en kiu ajn alia direkto, eĉ en tiu de la propraj politikaj konvinkoj, kontraŭe al la Statuto.

Tio kondukas al la jura kaj eĉ intelekta-morala signifo de la Statuto de UEA, pri kio necesas diri kelkajn vortojn. Statuto de kia ajn organizaĵo ne estas paperĉifono: ĝi estas baza jura dokumento kun karaktero de siaspeca kontrakto. *Malobservo de la Statuto estas, do, rompo de kontrakto*. Nenia plimulto, eĉ ne unuanimeco, en kiu ajn gvida instanco povas ŝanĝi tion. Ĉiu ajn membro povus plendi al kompetenta kortumo por observigi la Statuton, kaj la kortumo, konstatinte la malobservon, tutcerte nuligus kontraŭstatutan decidon aŭ alimaniere devigus konformiĝi al la Statuto. Tio ne malofte okazas en landoj kun sendependaj kortumoj.

La verkintoj de la nun valida Statuto de UEA perfekte komprenis, ke la Asocio ne povas esti neŭtrala, se la aliĝintaj asocioj estas politike malneŭtralaj. Tial art. 13 de la Statuto preskribas, ke *nur politike neŭtralaj* landaj organizaĵoj povas aliĝi al UEA kaj, kompreneble, resti en ĝi, se ili estas neŭtralaj. Ĝis la hamburga politika puĉo tiu grava regulo *ja estis strikte observata* dank' al la firma sinteno de la tiamaj gvidaj instancoj de UEA kiuj energie kontraŭstaris ĉian ajn provon atenci la politikan neŭtralecon de la Asocio (v. 4.4 de *HeR*). Nur post Hamburgo, kiam la konspirintoj kaj iliaj aliancanoj sukcesis ekregi la Asocion per kontraŭstatutaj manovradoj, enkondukis totalecan cenzuron kaj forigis la ĉefajn protagonistojn de la laŭstatuta neŭtraleco, la pordo estis malfermita por senbrida politika agado de nombro da landaj asocioj en *la sino de UEA mem laŭ la instrukcioj de ekstermovadaj politikaj faktoroj kaj eĉ konforme al aperte deklaritaj politikaj programoj*. Pli evidenta malobservo de art. 13 de la Statuto ne estas imagebla.

(ii) *La atakoj kontraŭ mi* kun la celo complete deformi mian tutan personecon kaj bagateliĝi mian ampleksan laboron por Esperanto estis kaj plu estas grandparte ligitaj al la demando de neŭtraleco. Eĉ se ne estus tiel, la nigrigoj de mia nomo per si mem ŝokis multajn kaj malproksimigis ilin de la nuna UEA. La afero ankoraŭ ne finiĝis: nun la Estraro de UEA obstine klopodas senigi min de miaj aŭtoraj rajtoj pri *Esperanto en Perspektivo* (ĝi donas al UEA konsiderindan profiton) kaj de mia modestega tantiemo, kiun, post la fakta malapero de CED, mi volis uzi por aliaj utilaj celoj en la neŭtrala Esperanto-Movado. Pri tiu vere senprecedenca kampanjo mi ne volas diri ĉi tie unusolan plian vorton.

(iii) La malkapablo gvidi la Asocion estis antaŭvidebla jaĉn en Hamburgo, sed ĝi povis plene manifestiĝi sole post la 2-jara regado

ekde julio 1974. Nur personoj, kiuj komplete ignoras la multflankajn ĝishamburgajn agadojn aŭ kiuj tro rapide forgesis la penan konstruadon de la moderna UEA en la postmilita periodo, povas kredi al la posthamburgaj promesoj, neniam realigataj, al tordadoj de faktoj kaj bluoj inkluzive la rolon de multnombraj »komisionoj«, aŭ la signifon de la »libervolula servo«, aŭ la »sanigon de financoj« (kiuj estis pli ol sanaj kaj tute ne bezonis sanigon) kaj similajn sloganojn por neinformitaj naivuloj. La realaĵo, tuŝebla nur parte kaj supraĵe, indikas precize la malon. Jen kelkaj nekontesteblaj faktoj aldone al bilanceto en 5.4:

La Tria Baza Laborprogramo, *kiun mi mem kaj ĉiu serioza esperantisto* rigardis ekde la komenco kiel grandan fuŝaĵon, sed kiun la Komitato spite akceptis dum la UK en Beograd (1973) sen mia ĉeesto, estas tute neglektita. Neniu, eĉ ne tiuj membroj de la Komisiono, kiuj ellaboris ĝin, pensas pri ĝia realigo. En la Komitato, tute konforme al la »harmonia kunlaboro«, neniu venis eĉ al la ideo demandi kial la Estraro faris nenion *por realigi almenaŭ* tiujn kelkajn taskojn, kiuj povis esti plenumitaj. Neniu proponis kiajn ajn plibonigojn aŭ ellaboron de nova, realeca programo. Regis kaj plu regas tomba silento. La saman sorton havas la Laborplano por la Kontraŭrasisma Jardeko, akceptita de la Komitato en Hamburgo. La realigado de tiu okaza Laborplano dum la restanta periodo de la Jardeko estus efike kontribuinta al batalo kontraŭ rasismojn kaj samtempe doninta grandajn pliajn avantaĝojn kaj al Esperanto kaj al UEA. *Por la unua fojo ekde 1951, rilate bazan programon ekde 1955, UEA havas nek bazan programon, nek okazan planon de laboro. Alivorte, ĝi turniĝas surloke, sen kia ajn perspektivo kaj tial ankaŭ sen ebleco mobilizi la fortojn por plenumado de konkretaj taskoj kaj por atingo de difinitaj celoj.*

La Statuto certe bezonis kelkajn plibonigojn. Mi mem atentigis jam antaŭ Hamburgo, ke taŭga okazo por fari la necesajn ŝanĝojn prezentiĝos antaŭ la 27-a de aprilo 1976, kiam, laŭ la nederlanda leĝo, necesos fari novan petskribon por renovigi la juran personecon. Efektive, post Hamburgo estis formita aparta 5-membra komisiono – kiom da ili jam! – por revizii la Statuton. En pompa artikolo de nejuristo, komitatano U.J. Moritz, publikigita en *Esperanto* n-ro 3/75, estis prezentita la »antaŭprojekto« kun invito al la membraro fari komentojn. Post tio okazis nenio ĝis la julia-aŭgusta numero de *Esperanto*, kiu informis, ke dum la UK en Kopenhago oni diskutos pri la afero. Tamen, tie denove okazis nenio. Fine, oni povis legi en *Esperanto* n-ro 1/1976, ke finiĝis la ĝenerala voĉdonado kaj ke la membraro aprobis la pluvalidigon de la Statuto por plia periodo de 29 jaroj. *Tio signifas, ke la malnova Statuto, sen kiaj ajn ŝanĝoj, estis submetita al voĉdono kaj ke nun UEA petskribos por daŭrigo de la jura personeco laŭ la neŝanĝita Statuto.* Denove, do, granda bruo por nenio. Valoraj tempo kaj mono superflue perditaj.

tiuj politikaj celoj. Tio kontribuas al endoktrinigado de politike nematuraj aŭ ne sufiĉe orientitaj personoj en la okcidenta Esperanto-Movado, kaj donas, bedaŭrinde, al la tuta Esperanto-Movado plian stampon de politika malneŭtraleco.

Fine – kaj eble plej grave – ankoraŭ io. En la *Aprila Artikolo* mi atentigis ankaŭ pri la atakoj kontraŭ ĉiujn objektivajn valorojn en la Esperanto-Movado, pri la bagatelizado de la Akademio de Esperanto kaj pri la detruado de la bazoj mem de la Internacia Lingvo.

En tiu artikolo estis eksplicite dirite, ke la sekvanta viktimo estos la Fundamento (v. 7.1.5), do tiu unike solida garantio de la lingva unueco, kiu ebligis la transformiĝon de la lingvoprojekto de Zamenhof en riĉan, plensukan, nuancitan lingvon. Tio nun fakte okazas ne plu en *La Brita Esperantisto* aŭ simila gazeto, sed sur la plej alta nivelo: en la organo de UEA mem.

En *Esperanto* n-ro 4/1976, do precize du jarojn post la *Aprila Artikolo*, aperis teksto »Strategion, ne nur Taktikon« de d-ro I. Szerdahelyi (Universitato de Budapeŝto), en kiu li pseŭdosciencie atakas absolute ĉion ekde la pureco (unueco) de la lingvo ĝis la nocio »esperantisto« laŭ la difino de la Bulonja Deklaracio. Laŭ d-ro Szerdahelyi, la plej granda peko de la organizita Esperanto-Movado (ĝis Hamburgo, kompreneble) estis »*la tradicia kontinuo, principe la izoliteca politiko!*«

La »tradicia kontinuo« estas – fakte nekredeble, sed legu mem, se vi ne kredas – »*la sukcesigo de la afero!*« Kaj eĉ pli terure laŭ la aŭtoro, la rimedoj por atingi tiun »kondamnindan« celon estas, interalie, »*certigo de internaciaj kontaktoj (literaturo, gazetaro, korespondado, renkontiĝoj, kluboj, kongresoj, ktp.)*« kaj »*flegi la purecon de la lingvouzo, k.s.*« En tiu kunteksto li komplete forgesis la rilatojn kun Unesko, UN kaj centoj de interŝataj kaj internaciaj organizaĵoj; la siatempajn amasajn kampanjojn de UEA, pro kiuj milionoj interesiĝis pri Esperanto; la same siatempajn dokumentojn kaj aliajn publikaĵojn de CED, ktp.; sed li ne forgesis mencii kun malrespekto la esperantajn flagon kaj himnon (ne la hungarajn, kompreneble) kaj la »kulton de personeco« (ne la eŭfemisme uzatan esprimon por la stalinisma teroro, sed la vulgare insultan, inventitan de la »verama« *Heroldo*). Nu ni lasu tiun aspekton, relative negravan, kaj substreku la esencon: en la artikolo estas atakitaj ĝuste tiuj valoroj – literaturo, gazetaro, internaciaj kongresoj, internacia korespondado kaj aliaj internaciaj kontaktoj – kiuj decide kontribuis al socia enradikiĝo de Esperanto kaj, krome, donis al ĝi karakteron de plenvolara kultura lingvo.

Sed kio pri la »izoliteca politiko«? Evidente, ĝi ekzistas nur en la menso de d-ro Szerdahelyi, laŭ kies logiko »certigo de internaciaj kontaktoj, literaturo, gazetaro, korespondado, kongresoj ktp.« (kaj amaso de aliaj aspektoj nemenciitaj, sed eble inkluzivitaj en la »kotopo«) estas »politiko de izoliteco«! Ĉu, do, ankaŭ la multjaraj

nado de la Jarlibro (nun en unu parto) kaj la publikigado de la revuo *Esperanto* kun grandegaj malfruigoj de pluraj semajnoj, eĉ de du monatoj, ankaŭ tio, kiel multo alia, senprecedenca en la historio de UEA. (Lastmomente: pri la revuo *Esperanto* v. en p-kto (4) de la Antaŭparolo al la Dua Eldono).

7.9.2 Kelkaj el la sekvoj

Ne estas surprize, ke, pro la koncize prezentitaj tri grupoj de faktoroj, UEA perdis en 1974 precize 759 individuajn membrojn (IM) kaj en 1975 pliajn 418, tiel ke fine de 1975 ĝi havis entute nur 6.025 IM (*Esperanto*, n-ro 4/1976, p. 78) kompare kun 7.302 en 1973, la lasta jaro antaŭ Hamburgo. Tio signifas, ke en nuraj du jaroj la »neta« perdo estis 1.177 IM, aŭ preskaŭ unu kvinono de la tuta individua membraro, eĉ senkonsidere al la fakto, ke el la 991 dumvivaj membroj multaj ne forlasis la Asocion ĝuste tial, ĉar ili anticipe pagis dumvivan kotizon (v. la finajn alineojn de 5.4). Tiurilate UEA retroiris je »nuraj« 21 (dudek unu) jaroj: ĝi estas la plej malalta nombro de IM ekde 1954, kiam, *dum sia suprenirado*, UEA estis atinginta 6.103 membrojn (do 78 IM pli ol en 1975), siavice ĝis tiu jaro la plej granda nombro ekde la kunfandiĝo en 1948 kaj eĉ ekde la fruaj tridekaj jaroj.

La membroperdo, klare antaŭvidita en la *Aprila Artikolo*, estas nur unu el la eksteraj signoj de la nuna realaĵo, kiu entute retrojetas la Asocion al la fruaj kvindekaj jaroj (kiam komenciĝis la konstruado de la moderna UEA; v. Ĉap.18 de *Esperanto en Perspektivo*), multrilate al la antaŭmilita periodo, dum la perdo de neŭtraleco ne havas paralelon en la tuta historio de la Esperanto-Movado. La grandega diferenco estas, ke en la fruaj kvindekaj jaroj komenciĝis la ascenda linio de konstruado, dum en la nuna kazo temas pri la ĝis nun atingita grado de malkonstruado sur la abrupta descenda linio.

La situacio en multaj okcidentaj landaj asocioj ne estas pli bona. La membronombro de la brita asocio, iam unu el la plej solidaj, terure malaltiĝis al nuraj 869 (*Esperanto*, n-ro 4/1976, p. 78), dum ĝia organo, *La Brita Esperantisto*, iam regule publikigata ĉiumonate, nun dum longa tempo tute ne aperas; la francan asocion forlasis pli ol 200 membroj kaj ĝia eta organo aperadas sporade; la germana asocio jam delonge perdis sian organon GER, kaj la statistiko pri ĝia membraro estas evidenta blufio; el Usono ne venas vivosigno; *Sonorilo*, pli frue *Belga Esperantisto*, fondita en 1902 kiel *Belga Sonorilo*, ĉesis aperadi; la aliaj landaj organoj (kun kelkaj esceptoj) fariĝas ĉiam pli malgrandaj, neregulaj, enhave palaj kaj neinteresaj; ktp. Aliflanke, tute kompreneble, kreskas kaj prosperas la politike malneŭtralaj, luksaj periodaĵoj eldonataj de la blokaj landaj asocioj en UEA, abunde subvenciataj de la ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj ĝuste por

En la *Jarlibro* de UEA por 1975 oni povas legi, ke ekzistas 5-membra *Komisiono pri Informado* kaj ke la respondeca estrarano kaj gvidanto estas la sama S. Świstak (Pollando), kiu en Beograd estis allasita kiel komitatano A de la pola asocio tute kontraŭe al art. 30 de la Ĝenerala Regularo de UEA. Plia komisiono funkciis dum la UK. Kaj la rezulto? Plian fojon: gravediĝis montoj, naskiĝis eĉ ne muso. La tuta ĉapitro pri informado en la Estrara Raporto konsistas el unusola frazo: »Raporto de la kompetenta estrarano ne atingis nin«. Oni ne forgesu, ke la statute respondeca estrarano estas la ĝenerala sekretario, do la sama kiu kunmetis la Estraran Raporton. Kaj plian fojon, denove konforme al la »harmonia kunlaboro«, neniu protestis pro tiu senrespondeca neglektado de la informado, unu el la ĉefaj agadbranĉoj, pro kiuj UEA ekzistas. Fakte, nenio estis por raporti, ĉar ĉiuj antaŭaj agadoj sur la kampo de informado, kiuj rezultigis milojn da artikoloj en la monda gazetaro, prelegojn, informojn, radio-elsendojn, ekspoziciojn, flugfoliojn, broŝurojn kaj tiel plu, estas ĉesigitaj. Krome, diversaj bultenoj kaj cirkuleroj, artikola servo, Unesko-Novajoj, statistikoj kaj analizoj sur la kampo de informado ne plu funkcias. Ankaŭ CED kiel scienca-esplora institucio de UEA fakte malaperis.

En la sfero de *eksteraj rilatoj* praktike ĉio stagnas. Ĉi tie oni formis plian komisionon de 6 membroj, dum alia komisiono ekzistas en Parizo. Ŝajnas, ke la plej epokfara atingo de tiuj komisionoj estas la letero-mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko al la UK en Kopenhago. *Esperanto* akompanis tiun »eventon« per bombastaj vortoj, kvazaŭ tio estus ia eksterordinara sukceso, neniam antaŭe spertita en la kadro de la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko. Fakte, jam en 1953 la Ĝenerala Direktoro de Unesko sendis sian reprezentanton al la UK en Zagreb. Post la establiĝo de la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko en 1954, la Ĝenerala Direktoro de Unesko ĉiujare sendis mesaĝojn al la UK. Kelkfoje ili estis subskribitaj de la Ĝenerala Direktoro, kelkfoje de lia ĉefo de kabineto, kelkfoje de alia funkciulo de la Sekretariato. La mesaĝoj ĉiam estis aŭ legitaj aŭ menciitaj dum la inaŭguro. Doni al tia mesaĝo preskaŭ sensacian valoron signifas humiligi la dignon de la Asocio.

Aparte bedaŭrinda estas la *situacio en TEJO*. Ekde kiam ĝi komencis politikumadi aperte malobservante sian Statuton kaj neglektante siajn verajn taskojn. TEJO ĉiam pli malintegriĝadis kaj nun ekzistas ĉefe surpapere. Verŝajne ne troviĝas unusola serioza esperantisto, iom familiara kun la situacio en TEJO, kiu provus kredi al la blufoj pri la nombro de membroj kaj agadoj. Sufiĉas ĉi tie mencii, ke *Kontakto* n-ro 4/1974, kiu devis aperi fine de 1974, estis publikigita en januaro 1976.

Efektive, preskaŭ ĉiuj agadoj aŭ estas konscie ĉesigitaj aŭ tutsimple iel elvaporiĝis. Restas, esence, nur la organizado de la universalaj kongresoj, la rutina administrado de la membraro, la eldo-

konsultaj rilatoj kun Unesko kaj alispecaj kontaktoj kun UN kaj aliaj organizaĵoj; la aktiva partopreno en multnombraj fakaj kaj alispecaj konferencoj; la intervenoj ĉe diversaj regionaj kaj landaj instancoj; la miloj da artikoloj kaj informoj en la monda gazetaro; la reprezentiĝo de multaj ŝtatoj en la UK de Esperanto kaj, fakte, *ktp.* – ĉu do ĉio-ĉi estis »politiko de izoliteco«? Nur nun, post la evidenta politikiĝo de UEA, necese okazas ankaŭ izoliĝo eĉ sen kia ajn »politiko de izoliteco«.

Tiun tutan interne kontraŭdiran absurdaĵon la aŭtoro bezonis ankaŭ kiel saltobreton por ataki la aŭtoritaton de la Akademio de Esperanto. Por li la Akademio estas »*fiktiva organizaĵo loke nefiksebla, kaj ĝia aktiveco* [verŝajne li volis diri »agado« aŭ »aktivado«] *estas nesentabla*«. Li aŭdacas aserti, ke ĝi »*pretiĝis nenium bazan dokumenton de la lingvo*« kaj »*aldonis nenian sciencan priskribon por la lingvistoj, kiuj jam ege dezirus ekkoni Esperanton, ne ellerni ĝin, pro pure sciencesploraj kaŭzoj*«, *ktp.* Kompatindaj lingvistoj, kiuj devas skribi fantaziaĵojn, ofte stultaĵojn, pri la Internacia Lingvo, ĉar la Akademio ne eldonis por ili »sciencan priskribon« de Esperanto! Kvazaŭ ili ne havus la eblecon aĉeti lernolibron de Esperanto en kiu ajn lingvo (listo en Ĉap. 4.3 de *Esperanto en Perspektivo*) por mem *ellerni* la lingvon kaj, *post tio*, por studi la verkojn de Waringhein, Kalocsay kaj multaj aliaj por pliaj detaloj, samtempe analizante la esperantajn literaturon, gazeton kaj parolan lingvon – ĉio kun la celo »*ekkonigi Esperanton*« eĉ nur por pure sciencesploraj celoj. Cetere, pluraj seriozaj lingvistoj ja agis tiel, ĉar nur tiamaniere oni povas »*ekkonigi Esperanton*«.

Lia plej granda riproĉo al la Akademio estas, ke en ĝia Statuto »*troviĝas kvazaŭ ĵura postulo pri la fideleco* [verŝajne li volis diri »fideleco«] *al la Fundamento*«, kion li rigardas kiel »*sekteman elementon*«, dum fakte ĝuste tio estas unu el la ecencaj taskoj, kiuj pravigas la ekziston kaj la tutan sencon de la Akademio.

Kompreneble, d-ro Szerdahelyi kaj lia Instituto en Budapeŝto ne rekonas la Akademion kaj tial li skribis, ke ĝi »*estas rekonita de neniu scienca instanco*«. Efektive, ĝi tute ne bezonas esti rekonita de kiu ajn »scienca instanco«. Ĝi estas rekonita de la Esperanta lingva komunajo, verŝajne eĉ pli ol la Franca Akademio estas rekonita de la franglingva komunajo. Plue, laŭ lia koncepto, esperantisto ne estas »*ĉiu, kiu scipovas kaj uzas Esperanton, sendepende de formo kaj celo*« [lia citaĵo, simila al tiu de la Bulonja Deklaracio], sed persono plenumanta sep kondiĉojn, inter kiuj la unua estas la opinio de la koncernato, *ke la problemo de lingvokonfuzo estas serioza socia problemo*« [kia »scienca« formulo!], sed inter kiuj ne troviĝas la scio de Esperanto. Alivorte, iu povas esti bonega esperantisto sen kia ajn scio de Esperanto!

Kaj ĉio ĉi estas publikigita ne en iu triarangamalamika nacilingva gazeteto, sed en la organo de la nuna Universala Esperanto-Asocio,

kies laŭstatuta celo estas »disvastigi la Internacian Lingvon« (art. 1) kaj la oficiala lingvo estas »la zamenhofa lingvo Esperanto, kia ĝi estas difinita per sia Fundamento kaj per sia verkaro« (art. 5).

Vere la nuna descenda linio kondukas al katastrofo eĉ por Esperanto, se la sinceraj esperantistoj de la mondo ne unuigas siajn fortojn por daŭrigi la vojon, kiun la hamburgaj disidentoj senresponde forlasis.

7.9.3 Elirvojo

La kaŭzoj de la krizo determinas la elirvojon: strikta observado de la politika neŭtraleco, repekto al la tradiciaj valoroj, al la homo kaj al lia laboro, daŭrigo kaj vastigo de ĉiuj agadoj en la tri ĉefaj branĉoj, nome informado-dokumentado, instruado kaj praktikaj aplikoj. Principe tio eblas aŭ en la kadro de UEA, aŭ ekster ĝi, aŭ kombinite.

En UEA mem la kerna demando estas tiu de politika neŭtraleco. Solvo de tiu demando aŭtomate kontribuas al solvado de ĉiuj aliaj multnombraj problemoj, kiujn frontas UEA sub la nuna gvidantaro. Reveni al la ĝishamburga politika neŭtraleco oni ne povas per malplenaj, sensencaj deklaroj, sed nur per konkretaj agoj konforme al la eksplicitaj preskriboj de la Statuto. Tio signifas, ke la landaj Esperanto-organizaĵoj kun partipolitikaj programoj devus deklari sin politike neŭtralaj kaj rezigni pri tiuj programoj ne nur formale, sed ankaŭ en siaj praktikaj agadoj. Pro la aktuala partipolitika linio de »akriĝinta ideologia lukto« kaj pro la nuna senkondiĉa subigo de la ĉefroluloj en tiuj organizaĵoj al partipolitikaj fortoj, tiu ebleco, kiu devus esti normala en UEA, estas fakte nur pura teorio. La dua ebleco estus, ke la Komitato eksigu la koncernajn landajn organizaĵojn laŭ la art. 20 de la Statuto kaj art. 27 de la Ĝenerala Regularo. Pro la konsisto de la nuna Komitato, grandparte politikiginta, ankaŭ tiu ebleco, klare antaŭvidita en la Statuto, estas provizore pura teorio. Tamen, membroj de aliĝintaj asocioj en demokrataj landoj kaj individuaj membroj de UEA, ankoraŭ fidelaj al la principo de neŭtraleco, povus kaj devus tre laŭte aŭdigi sian voĉon en la landaj ĝeneralaj kunvenoj kaj energie postuli de siaj reprezentantoj en la Komitato de UEA sintenon konforman al la postulato de neŭtraleco. Plu silenti necese signifas konsenti. Se tiel, oni ne miru, ke la ekstera mondo denove rigardas kaj ĉiam pli rigardos la Esperanto-organizaĵojn kiel unudirekte partipolitike orientitajn. La tria ebleco estus, ke la politikaj landaj asocioj kaj instancoj libervole eksigu el UEA, formu apartan internacian Esperanto-organizaĵon bazitan sur la principoj de »proleta internaciismo«, »diktaturo de la proletaro« kaj »klasa koncepto de la mondo«, simile al la iama »Internacio de Proleta Esperantistaro« (IPE). Sen kompromiti sian neŭtralecon, la politike puriginta UEA povus fari kontrakton pri kunlaboro kun tia politika organizaĵo

cele al progresigo de Esperanto, ĉar tion permesas art. 16 de la Statuto. Kvankam ankaŭ tiu ĉi ebleco ŝajnas nur teorio en la nuna momento, tamen ĝi estas racia kaj la malplej malrealeca solvo de la problemo. Eĉ la partipolitikaj gvidantoj de la blokaj landaj Esperanto-instancoj kaj iliaj aliancanoj pro politikaj aŭ nepolitikaj motivoj en la t.n. »okcidenta« parto de la mondo eble fine komprenos, ke la nuna UEA sub partipolitikaj premoj estas absolute malakceptebla por la granda plimulto de esperantistoj en la mondo, inkluzive la blokajn landojn.

Kompreneble, la solvo de tiu problemo estas nedisigble ligita al observado de la aliaj reguloj de la Statuto, nuligo de ĉiuj kontraŭaj decidoj ekde Hamburgo, retiro de ĉiuj kalumnioj kaj ofendoj kontraŭ min kaj aliajn sincerajn batalantojn por la politika neŭtraleco de UEA kun publika pardonpeto al la viktimoj, objektiva prezento de la vero en la organoj de UEA kaj ellaboro de nova, realeca laborprogramo, kiu povus unuigi kaj mobilizi ĉiujn pozitivajn fortojn por plua progresigo de Esperanto.

Ekster la kadro de UEA la neŭtrala Esperanto-movado – ne nova, kiel maliculoj disfamigas, sed tre malnova: ekde 1887 – povas denove publike esprimiĝi pere de *Horizonto*, la laŭtparolilo de la vero, objektiva informado, kulturo kaj partipolitike neŭtrala Zamenhofa humaneca internaciismo. Nuntempe – ĝis la krizo en UEA solviĝos, se entute ĝi iam estos solvita – ĉiuj pozitivaj fortoj kolektiĝu ĉirkaŭ *Horizonto*, abonu kaj abonigu la revuon, diskonigu ĝian enhavon. Krome, oni formadu kiel eble plej multajn agadgrupojn laŭ la saĝaj konsiloj de la Internacia Agadgrupo kaj de la Redakcio de *Horizonto* en n-ro 1 de la periodaĵo (p. 3). Fine la plej sindonaj aktivuloj klopodu partopreni la internaciajn konferencojn kaj diversaj kulturajn aranĝojn de la neŭtrala Esperanto-Movado.

Kombinite oni povas efike agi laŭ la supraj ideoj kaj en la sino de la ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj sur ĉiuj niveloj – loka, landa kaj faka – kaj ekster ili.

Multaj esprimis la deziron, eĉ preman deziron, ke estu organizita nova internacia asocio laŭ la principoj de partipolitika neŭtraleco kaj individua membreco, kies celo estus daŭrigi tie, kie la nuna UEA haltis. Aliaj, same sinceraj, opinias ke en la nuna momento la kontaktoj kaj kunlaborado pere de *Horizonto*, agadgrupoj, internaciaj konferencoj kaj renkontiĝoj prezentas sufiĉe vastan framon por realigadi la programon entenatan en la *Deklaro de Principoj*. Tute egale kion decidis la Dua Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, unu afero estas certa: la ideo unueco esprimita en la *Deklaro de Principoj* ebligas multflankan utilan laboron por Esperanto jam en la nuna stadio de tute elasta kaj neprecizigita organiza strukturo. Ju pli sukcesa estos tiu laboro, ju pli la neŭtrala Esperanto-Movado esprimos sin mem en la ekstera mondo disde la nuna politikiĝinta UEA, des pli granda estos ĝia prestiĝo kaj des pli facile

estos doni al ĝi taŭgan, pli konkretan organizan formon kun Statuto, kiu malebligos politikajn konspirojn kaj puĉojn.

Unueco ja estas forto. Tamen, pure abstrakta-formala »unueco« sen idea unueco, je la kostoj de politika neŭtraleco, ne estas forto, sed falsa slogano de malforto. Nur idea unueco, sur kiu, se nepre necese, oni ĉiumomente povas konstrui partipolitike neŭtralan organizaĵon, donas plenan valoron al la slogano. Nur ĝi estas akceptebla por ĉiuj esperantistoj, kiuj sincere deziras kontribui al la progresigo de Esperanto en la mondo sen altrudado de siaj partipolitikaj konvinkoj al organizaĵoj, kiuj laŭ siaj statutoj devus esti partipolitike neŭtralaj. Tial ĉiuj personoj, kiuj aprobas tiel komprenatan unuecon, devus troviĝi en la vicoj de la neŭtrala Esperanto-Movado, unuigi siajn fortojn kaj maksimume kontribui al la plua disvastigo de Esperanto, kiu urĝe bezonas helpon, antaŭ ol estos tro malfrue. Tio precipe rilatas al vere progresema esperantista junularo, sincere inspirita de la nobla, tuthoma idealo de humaneca internaciismo.

8. LASTMOMENTE

(*Noto:* Inter la finredakto de la manuskripto por tiu ĉi eldono en novembro 1976 kaj la pretigo de la kompostajo por presigo en junio 1977 okazis pluraj aferoj, el kiuj almenaŭ la plej gravaj meritas lastmomentan mencion. Ili estas koncize prezentitaj en la subaj eroj kaj pli detale pritraktitaj en *Horizonto*.)

8.1 Malkreskoj ĉie

Jen kelkaj pliaj informoj aldone al tiuj en 5.4 kaj 02(4):

En *Esperanto* de marto 1977, p. 58, estas publikigita statistika trarigardo pri la membraro de UEA en 1976. Tio ebligas precizan komparon kun la jaro 1973, la laste antaŭ la eventoj de Hamburgo. En 1973 UEA havis entute 33 716 membrojn, en 1976 la nombro estis 31 668; *neta perdo: 2 048 membroj*. En 1973 la Asocio havis 7 302 individuajn membrojn, en 1976 la nombro estis 6 018; *neta perdo: 1 284 individuaj membroj*, do ĉ. unu kvinono. En 1973 la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne vicdelegitoj kaj fakdelegitoj) estis 1 294, kio ebligis la elekton de 6 komitatanoj B, en 1976 la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj 1 194 kaj la nombro de elekteblaj komitatanoj B estis 5; *neta perdo: precize 100 ĉefdelegitoj kaj delegitoj, kaj unu komitatano B*. Interalie tio signifas, ke en la Komitato de UEA la individua membraro (tre la ĉefdelegitoj kaj delegitoj) estas malpli reprezentita ol antaŭe, kvankam estis necese ebligi multe pli fortan reprezentigon per amendo de la koncernaj reguloj okaze de la leĝe postulata revizio de la Statuto. Pri tio mi atentigis longe antaŭ Hamburgo (v. ankaŭ 7.1.7, supre), dum la nuna gvidantaro promesis ĝin per la pompe anoncitaj ŝanĝoj de la Statuto. Fakte, post la forĵeto de kvar statutsanĝaj projektoj, la koncerna komisiono estis malfondita kaj oni fine prezentis al la nederlandaj aŭtoritatoj por aprobo la malnovan Statuton, sen kiaj ajn ŝanĝoj.

Oni komparu la surprajn ciferojn kaj faktojn kun la superece blufa aserto en n-ro 11/1975 de *Esperanto*, ke »la hamburgaj eventoj rezultigis apenaŭ 5 ekziĝojn« kaj ke »la samaj eventoj rezultigis ankaŭ almenaŭ 5 realiĝojn«, kaj kun la impertinenta komento en tiu tuta impertinenta artikolo: »Kaj, kio? Kion oni volas?« Oni bv. ankaŭ kompari kun la antaŭvidoj en la fino de 7.1.4 kaj mem konstati kie troviĝas la vero.

8.2 BEA reŝanĝis sian statuton

En ĉap. 3 estas detale analizita la kontraŭneŭtraleca, partipolitika Programo de Bulgara Esperentista Asocio (BEA). En Aldono 7.3.1 estas menciita la Statuto de BEA, laŭ kiu unu el la celoj de tiu organizaĵoj estas »eduki siajn membrojn en la spirito de patriotismo kaj *proleta internaciismo*, de alligiteco al tendaro de l'socialismo«. La 12-an de julio 1976 BEA amendis sian Statuton. El la teksto de tiu amendita Statuto, ĵus ricevita, vidiĝas, ke la vortoj »proleta internaciismo« kaj »alligiteco al tendaro de l'socialismo« estas ellasitaj. Ne povas esti dubo, ke la faktoj malkovritaj en la unua eldono de *HeR* kaj, poste, en *Horizonto* kaŭzis tiun ellason. Pri tiu formala venketo *Horizonto* certe povas estis kontenta. Tamen, oni ne forgesu, ke unu afero estas ŝanĝi statuton, precipe sub premo elekstere, kaj tute alia afero estas observi la ŝanĝitan statuton. Ankaŭ UEA havas absolute klarajn regulojn pri partipolitika neŭtraleco en art. 4 kaj 13 de la Statuto, sed tamen tiu reguloj estis kaj plu estas krude malobservataj, kiel abunde pruvite en tiu ĉi libro. Nenio ĝis nun indikas, ke BEA fakte ŝanĝis sian partipolitikan agadon konforme al sia Programo. Krome, en paragrafo 2 de la amendita Statuto estas aldonita punkto (h), laŭ kiu »BEA estas kolektiva membro de UEA kaj *apogas Mondpacan Esperanto-Movadon*«, do evidente partipolitikan »movadon«, kiel montrite en 3.3 kaj aliloke en tiu ĉi dokumentaro.

8.3 Soveta jura periodaĵo pri ekkapero de NRO-j

En la ĉefa sovetaj jura periodaĵo *Sovetskoje Gosudarstvo i Pravo* (Soveta Ŝtato kaj Juro), n-ro 10/1976, aperis 10-paĝa artikolo sub la titolo »Internaciaj Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) en Kondiĉoj de Malstreĉiĝo«. En la artikolo estas pritraktita la rolo nur de la plej gravaj NRO-j, nome de la organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj kaj/aŭ Unesko, kiel UEA. En la komenco de la artikolo estas emfazita ilia »kreskanta influo je la monda politiko en la kondiĉoj de malstreĉiĝo«, precipe en ligo kun la Fina Akto de Helsinki (p-oj 94,96). Apartan gravecon kaj influon havas – la artikolo asertas – »la amasaj demokrataj NRO-j«, inter kiuj elstaras la »Tutmonda Packonsilantaro« kaj la »Internacia Konsilantaro por Daŭrigo de la Agadoj kaj Ligoj de la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj«, okazinta en Moskvo en oktobro 1973 (p-oj 95-97). Oni notos, ke la intensigo de la partipolitika komplotado en UEA ekde la fino de 1973 plene koincidas kun la »daŭrigo de la agadoj« formulitaj en Moskvo en oktobro 1973. Inter la »demokrataj« organizaĵoj, menciitaj sur p. 100, troviĝas ankaŭ la »Tutmonda Federacio de Sindikatoj«, »Internacia Demokrata Federacio de Virinoj«, »Internacia Asocio de Juristoj-Demokratoj« kaj la »Monda Federacio de Demokrata Junularo« (MFDJ), kun kiu

TEJO, sekcio de UEA, faris kontrakton pri kunlaboro (v. 4.3. kaj 4.4 de tiu ĉi libro).

La kvintesenco de la artikolo estas formulita sur p. 97: Dum pli frue, en la tempo de »malvarma milito«, »multaj NRO-j estis puŝataj en antikomunisman, antisovetan politikon kaj fakte montriĝis en la servo de NATO« [*Sic!*], nun, dank'al efika agado de la »amasaj organizaĵoj« [menciitaj supre], »pro la malstreĉiĝo kaj malfortiĝo en la gvidantaroj de multaj NRO-j de la pozicioj de la ĝisostaj predikantoj de antikomunismo [plia *Sic!*], tiuj organizaĵoj komencas konduki pli liberan politikon rilate al internacia kunlaborado, precipe per establo de kontaktoj kun la universalaj NRO-j«, t.e. kun la »amasaj, demokrataj, aŭtoritataj« organizaĵoj (ekzemple TEJO kun MFDJ kaj IUS, aŭ tuta aro da landaj organizaĵoj kaj instancoj en UEA mem kun MEM kaj kun ĉiuj, »kiuj subtenas la platformon de la Monda Kongreso de Pacamaj Fortoj en Moskvo (1973)«, kiel informas *der esperantist*, organo de »landa organizaĵo« nun aliĝinta al UEA, en n-ro 6/1976, p. 4).

Ĉiu, kiu ne estas politika analfabeto, bone scias, ke, tradukite el la soveta lingvo en kiun ajn lingvon, inkluzive la nesovetan rusan, la cititaj vortoj signifas: Dum pli frue la gvidantoj de la plimulto de vere demokrate organizitaj NRO-j malebligadis, ke tiuj organizaĵoj estu misuzataj por kies ajn partipolitikaj celoj, inkluzive la sovetajn, nun, dank'al lerta ekkapero de la gvidaj pozicioj en tiuj organizaĵoj, ili estas malfermitaj al senbrida partipolitika propagando kaj utiligataj por apogadi la *sovetan* eksterlandan politikon, bazitan sur la *sovetaj* konceptoj de »kunekzistado« kaj »proleta internaciismo«.

Neniu el la ekkaperitaj NRO-j estas eksplicite menciita en la artikolo, sed ĝia enhavo pli ol klare rilatas ankaŭ al UEA. La artikolo ankoraŭfoje konfirmas la koncizan analizon en ĉap. 5, precipe en 5.1.

Por kompletigi la bildon estas bone memorigi la forgesemulojn, ke en la julia/aŭgusta n-ro de *Esperanto*, 1975, do antaŭ la publikigo de la unua aldono de tiu ĉi libro, ĝia redaktoro impertinente skribis, ke »... la kritikantoj de la nuna gvidantaro sub la etikedo de 'neŭtraleco' propagandas la fakte obskuran makartismon kaj revivigas la fantomojn de 'malvarma milito' ...« [Parenteze: oni komparu tiun lingvaĵon en la oficiala organo de UEA kun la supraj citaĵoj el la ĉefa soveta jura periodaĵo por konstati la esencan identecon]. En la sama artikolo li ankaŭ diris: »Estas jam delonge tempo, ke oni ĉesu blufi kaj misgvidi la honestajn neinformitajn homojn«. Kaj denove: »Oni ankoraŭ blufas pri ekzisto de 'fidindaj dokumentoj', pri onidira 'komploto'«. Kaj li provoke aldonis: »Sur la tablon la atutojn, se oni havas ilin« (ĉio sur p. 163).

Nu, post la publikigo de tiu ĉi verko la »atutoj ja estas sur la tablo«, kiel kartlude esprimas sin la redaktoro de *Esperanto*, kaj ĉiuj »honestaj neinformitaj personoj« fakte povas mem juĝi. Mi mem plu fidus je la saĝo entenata en malnova diro: oni povas trompi la tutan mondon kelkan tempon, oni povas trompi kelkajn la tutan tempon, sed oni ne povas trompi la tutan mondon la tutan tempon.

9. MANIFESTO 77 DE LA ESPERANTO-MOVADO

Por paco en libereco – por libereco en paco

(*Nota: La Manifesto 77 de la Esperanto-Movado estis komplete publikigita en n-ro 2/1977 de Horizonte kaj komunikita al la redakcioj de preskaŭ ĉiuj Esperanto-periodaĵoj, inter ili Esperanto de UEA, kaj al Esperanto-fakoj de radio-stacioj kun propono publikigi, resp. disaŭdigi ĝin. La Manifesto estis aparte sendita al la Estraro de UEA kaj al la Plenuma Komitato de SAT, al ĉiuj landaj kaj fakaj Esperanto-organizaĵoj, ĉiuj komitatanoj de UEA kaj al ĉ. 1 000 aliaj personoj. Malgraŭ la ĝisnuna prisilento de la iniciato en la oficialaj publikajoj de UEA, jam multaj aprobis kaj subskribis ĝin. Nenio malhelpas, ke la nuna gvidantaro de UEA mem apogu la Manifeston kaj proponu ĝin por akcepto ankaŭ al la 62-a UK en Rejkjaviko. Tio ebligus al ĝi almenaŭ tiamaniere, partete, ĝisdatigi la agadojn sur la kampo de homaj rajtoj, krude interrompitajn en Hamburgo, kaj reveni almenaŭ formale al la principo de partipolitika neŭtraleco, kiel formulita en art. 4 de la Statuto. Siavice, tio eble povus signi la unuan paŝon por provi reakiri la rapide perditan prestiĝon en la ekstera mondo, kaj por rekomenci la praktikadon de la homaj rajtoj kaj fundamentaj demokrataj liberecoj interne de la Asocio. Tamen, senkonsidere al la starpunkto, kiun prenos la nuna gvidantaro de UEA kaj aliaj, la Manifesto 77 – konforma ne nur al la Statuto de UEA, sed ankaŭ, pli vaste, al la tradiciaj celoj kaj idealoj de la Esperanto-Movado – estas presita tute en la fino de tiu ĉi verko kiel plia omaĝo de la aŭtoro al la memoro de d-ro L.L. Zamenhof okaze de la 60-jara datreveno de lia forpaso).*

1. Ni opinias, ke la monda paco kaj la respekto de la fundamentaj homaj rajtoj estas nedisigble kunligitaj kaj reciproke kondiĉitaj, kiel rekonite ankaŭ en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj en aliaj gravaj internaciaj aktoj. En la Solena Enkonduko de la Ĉarto la »kredo je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco« troviĝas sur la sama nivelo, kiel la »savo de estontaj generacioj de la plago de milito«. Laŭ art. 1, du el la ĉefaj celoj de UN estas »konservi la internaciajn pacon kaj sekurecon« kaj »antaŭenigi kaj stimuli respekton al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj«. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj emfazas sur la unua loko de la antaŭkonsideroj, ke »agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj

de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco de la mondo.» La fundamentaj rajtoj kaj liberaj homaj kontaktoj estas, same tiel, konsista parto de la integra Fina Akto de Helsinki pri politika malstreĉiĝo, kunlaborado kaj sekureco en Eŭropo.

2. La bazaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas klare listigitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj pli detale difinitaj en la Internacia Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, en la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, en konsiderinda nombro de interŝtataj konvencioj, inkluzive tiujn de la Internacia Laboro-Organizaĵo (ILO) kaj Unesko. La Universala Deklaracio kiel la plej alta morala-etika kodo de konduto – laŭ multaj elstaraj juristoj ankaŭ kiel parto de la nuntempa internacia kutimjuro – devus esti respektata de ĉiuj registaroj en la mondo. Aldone, la du paktoj kaj la menciitaj konvencioj estas kaj morale kaj jure devigaj por ĉiuj ŝtatoj, kiuj subskribis kaj ratifikis ilin. Kune kun la Universala Deklaracio ili prezentiĝas kiel vera Ĉarto de Homaj Rajtoj, certe ne perfekta, sed almenaŭ maksimume kompleta en la nunaj kondiĉoj de interŝtataj rilatoj.

3. La internacia leĝigo de la homaj rajtoj estas rezulto de longaj, insistaj klopodoj, en kiuj elstaran rolon ludis influaj unuopuloj, diversaj premgrupoj kaj neregistaraj organizaĵoj. Inter ili estis ankaŭ multaj Esperanto-asocioj kaj societoj agantaj konforme al la plej ĝenerala celo de la Esperanto-Movado: per simpla, neŭtrale homa lingva rimedo de komunikado plifaciligi ĉiaspecajn senperajn spiritajn kaj materiajn kontaktojn inter la homoj, sen kia ajn diferencigo laŭ nacieco, raso, religio, politika opinio, lingvo, sekso aŭ kia ajn alia stato. Eĉ pli, meze de 1947, do pli ol unu jaron antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio, la Statuto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) – tiutempe reprezenta monda organizaĵo de la partipolitike neŭtrala Esperanto-Movado – estis amendita per jena aldono: »UEA deklaras, ke la respekto de la homaj rajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo«. Efektive, en la periodo 1948–1974 UEA, inspirita de humanecaj motivoj, aktive partoprenis en ĉiuj mondskalaj kampanjoj por la homaj rajtoj laŭ propraj ampleksaj agadprogramoj; en 1954 Unesko rekonis »la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj«; en 1959, laŭ decido de Unesko, D-ro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de la Internacia Lingvo, estis deklarita unu el la »grandaj personecoj de la homaro« ne nur pro la Internacia Lingvo kiel rimedo de komunikado, sed same tiel pro la humanecaj ideoj de internacia kompreniĝo kaj interpopola amikeco, kiujn li ligis al ĝi.

4. Estas konate, ke preskaŭ ĉie en la mondo homaj rajtoj estas malobservataj en pli aŭ malpli alta grado. Tio estas forte malaprobinda. Tamen, necesas klare distingi inter du ĉefaj grupoj

de ŝtatoj. Unuflanke troviĝas la landoj, en kiuj tio okazas sporade, en esceptaj cirkonstancoj, rilate unuopajn rajtojn, kies malobservon la koncernaj registaroj rekonas, kompensas la viktimojn, promesas ne plu permesi tiajn agojn kaj eĉ submetiĝas al juĝo de sendependa internacia kortumo. Ĉe la alia ekstremo estas la landoj, kies registaroj ĝenerale kaj sisteme malobservas la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn, dum personoj pledantaj por la realigo de la formale rekonitaj rajtoj estas ĉiel molestataj, persekutataj, kondamnataj kiel krimuloj al malliberejoj, sendataj en mensajn hospitalojn aŭ ekzilitaj. La amplekso, grado kaj formoj de la malobservoj en la du ekstremaj grupoj estas tiaj, ke ne temas pri iaj relative sensignifaj kvantaj diferencoj, sed pri esencaj, kvalitaj malsamecoj, kiuj dividas demokratiojn kun ĝenerala respekto al la homaj rajtoj disde totalecaj reĝimoj kun ĝenerala subpremado de tiuj rajtoj.

5. Dum en la antaŭaj etapoj la klopodoj estis ĉefe direktitaj al universala rekonado kaj internacia leĝigo de la homaj rajtoj, la jaron 1977 markas potenca moviĝo de la monda publika opinio por la realigo de la jam rekonitaj kaj leĝigitaj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj ĉie, kie ili estas krude piedpremataj. Fidelaj al la humanecaj kaj liberecaj tradicioj de la Esperanto-Movado, ni aldonas nian voĉon de firma apogo al Amnestio Internacia, al ĉiuj aliaj organizaĵoj, komitatoj, grupoj aŭ unuopuloj kie ajn en la mondo, kiuj per pacaj rimedoj, sen apliko de perforto, luktas por la realigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, morale kaj devige jure rekonitaj en internaciaj traktatoj, repromesitaj en la Fina Akto de Helsinki kaj entenataj eĉ en la konstitucioj de la propraj landoj. Ni tion faras, ĉar ni rigardas la respekton al la homaj rajtoj ne kiel malvastan partipolitikan aferon aŭ, eĉ malpli, kiel eblan objekton de partipolitika marĉandado, sed kiel ĝenerale homan valoron per si mem kaj, samtempe, kiel kondiĉon de daŭra paco, je kiuj ĉiu homo estas egale interesita, kaj al kiuj la uzado de la Internacia Lingvo jam konsiderinde kontribuis kaj povas kontribui eĉ pli en la estonteco. Konvinkitaj, ke la plena ĝuado de la homaj rajtoj ĉie sur nia terglobo estas same tiel nedividebla, kiel la monda paco, ni agis kaj plu agos laŭ la principo: POR PACO EN LIBERECO – POR LIBERECO EN PACO.

Iniciatinto

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Profesoro pri Kompara Soveta kaj Orienteŭropa
Juro en la Universitato de Londono; antaŭe
Profesoro pri Internacia Juro kaj Internaciaj
Rilatoj en la Universitato de Zagreb, Jugoslavio.

Notoj:

1. Tiu-ĉi Manifesto estas malfermita por subskribo al ĉiuj Esperanto-Organizaĵoj aŭ instancoj (kongresoj, konferencoj, k.s.) ĉu politike neŭtralaj, ĉu politikaj, kaj al ĉiuj unuopuloj senkonsidere al iliaj politikaj konvinkoj.
2. La apogantoj de la Manifesto 77, kiuj deziras kunsuskskribi ĝin, bv. komuniki tion per simpla poŝtkarto aŭ per aparta slipo en koverto, se iel eble antaŭ la 15-a de junio 1977, al la iniciatinto je la adreso 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio. La organizaĵoj aŭ instancoj bv. indiki preslitere la nomon kaj adreson kun la nomoj de la respondecaj funkciuloj, kiuj bv. suskskribi; la unuopuloj bv. indiki preslitere siajn nomon, antaŭnomon, ev. titolojn, profesion aŭ okupon, adreson, ev. funkcion en la Esperanto-Movado kaj suskskribi. Apogantoj en landoj sen demokratiaj liberecoj povas laŭdezire agi sub kaŝnomo, sed en ĉiu okazo la vera nomo devas esti komunikita al la iniciatinto, kiu promesas striktan konfidencecon.
3. La Manifesto 77 estos ĝustatempe sendita al kompetentaj instancoj. Al ĝi estos donita vasta publikeco ankaŭ en naciaj lingvoj.
4. Kun anticipa pardonpeto la iniciatinto informas, ke pro la antaŭvidita amplekso de laboro bedaŭrindene estos eble konfirmadi la ricevon de unuopaj apogoj, nek korespondadi pri la Manifesto 77. Li nur atentigas, ke li garantias la ĝustecon de la juraj aspektoj tuŝitaj en la Manifesto; pri la moralaj-etikaj ĉiu povas mem juĝi.

Noto de la eldonisto:

jen denove aldonu “10” al la ciferoj.

10. INDEKSO PERSONA

Albault, A. 73, 106
Aleksiev, N. 29, 52, 53, 57, 67, 70, 72, 74, 84, 86
Ambrož, J. 18, 20
Arafat, J. 41
Auld, W. 64, 114, 118
Bakker, H. 44
Barbusse, H. 21
Beaufront, L. de 65
Becker, G. 44, 69
Beethoven, L. van 6
Behrmann, H. 69, 70
Benazet 31
Bernard, R. 1, 72, 106
Bilak, V. 21
Blanke, D. 14, 15, 28, 40
Boersma, T. 61, 68, 72, 73
Bokarev, E. A. 31, 32
Botjan, B. 7
Bormann, A. 57, 68, 123
Bormann, M. 4
Bormann, W. 44, 46, 57, 58, 68, 77, 119
Bourdeaux, A. 72, 73, 106
Bourlet, C. 124
Brandt, W. 100
Brejnev, L. 76, 85
Burda 20
Buřival, Z. 17
Calado, J. 69
Canuto, G. 10, 42, 66
Carlén, E. 39, 69
Cash, R. 38, 42, 93
Connor, G. A. 8, 9, 10, 42, 77, 82, 96
Corsetti, R. 38, 42, 44, 78, 80, 114, 119
Ĉiĉerin 30
Ĉolić, S. 40, 59, 60, 61

Dahl, E. 9
 Dazzini, M. 69, 70, 74
 Denoël, P. 81
 Diaz, A. 63
 Diego, F. de X, 2
 Dobrzyński, M. 37
 Dratwer, I. IX, 6, 31, 79, 128
 Drezen, E. 5
 Dubček, A. 21
 Egami, F. 69
 Eichholz, R. VIII
 Eichhorn, H. 14, 40, 43
 Engels, F. 28
 Epstein, F. 77, 80
 Felsö, P. 59, 60, 61
 Fighiera, G. C. 77, 117
 Gahler, B. 77
 Gastón, I. X, 69, 70, 78
 Gavrilov, P. 5
 Genčev, G. 60, 61
 Goethe, J. W. 100
 González Aboín, J. 72, 106
 Gorkij, M. 21
 Graetz, R. 23
 Grandja 7
 Grattapaglia, U. 69, 115, 116
 Greutert, K. 68
 Gumá, S. IX, 2, 126
 Gurov, J. 5
 Haazen, J. 69
 Halbedl, A. 33
 Haupenthal, R. 128
 Hillová, O. 20
 Hitler, A. 4, 8, 67, 83
 Hodler, H. 92, 124
 Hoggard, S. 32
 Holmes, H. 1, 10, 31, 63, 64, 65, 69, 70, 81, 93
 Holmes, N. 81
 Hoog, H. A. de 95
 Horák 17
 Ĥruščov, N. 49
 Incertov, N. 5
 Isbrucker, J. C. 116
 Izák, L. 18, 20
 Jakob, H. 77
 Jansson, T. IX, 38, 43, 56, 58, 60, 87, 114

Jermář, J. 17, 18, 19, 20
 Jung, T. 21
 Kalocsay, K. 134
 Kautsky, K. 71
 Kawamura, S. 69
 Kilian, T. 17, 18, 19, 20, 21
 Kisházi, Ö. 23
 Kočvara, D. 17, 18, 19, 20, 70
 Konečný, P. 17, 18, 19
 Kořínek, J. 18, 20
 Kühlmann, G. 69, 120
 Lanti, E. 12
 Lapenna, E. 1, 69, 70, 78
 Lapenna, I. 7, 9, 54, 55, 56, 57, 62, 72, 75, 92, 93, 98, 105, 111, 112,
 113, 117, 120, 121, 124, 143
 Lassak, M. 40
 Lehtivaara, O. 68
 Lejzerowicz, I. 6
 Leibniz, G. W. H. 101
 Lenin, V. I. 21, 30, 49, 53, 71
 Leon-Smith, G. 61, 63
 Lewine, J. L. 9, 10
 Lins, U. 3, 7, 8, 9, 36, 53, 69, 70, 74
 Linton, K. G. 39
 Liouville, J. M. 42, 43, 44
 Llech-Walter, R. 73
 Luin, F. 56, 59, 60, 61, 69
 Luin, U. 56, 59
 Luther, M. 100
 Maas, H. D. 128
 Maertens, G. 69
 Maitzen, M. 39
 Malík, A. 15, 16, 17, 18, 19, 20, 21, 28, 83
 Malmgren, E. 9, 10, 66
 Mansfeldová, J. 17, 18, 19, 20
 Marx, K. 28, 49
 Miħalski, E. 5
 Milojević, S. 40, 61, 64
 Minnaja, C. 69
 Molotov 67
 Moritz, U. 10, 40, 46, 56, 57, 59, 60, 61, 69, 111, 114, 115, 130
 Müller, H. 77
 Munniksma, F. 95, 113, 116, 121
 N'Diongue, B. 42
 Neergaard, P. 69, 70
 Nekrasov, N. 5

Nischwitz, H. 46
 Nourmont, C. 69
 Ockey, E. 65
 Parker, H. 32
 Peeraerts, P. 69
 Pettyn, A. 57, 59, 60, 61
 Pickel, L. 57, 58, 65, 68, 77
 Platt, H. 32
 Pool, J. 69, 74, 79
 Popović, B. 119
 Power, C. R. 117, 118
 Privat, E. 124
 Quirke, D. J. F. 57, 63, 64, 68, 79, 114, 118, 119
 Rasmussen, H. V. 61, 110–112, 121, 123
 Régulo Pérez, J. X, 1, 2, 61, 72, 106
 Ribbentrop, J. 67
 Röhl, L. 33
 Rosa, P. 60, 74, 76
 Rytkov, N. 5, 54
 Sadler, V. 32, 39, 41, 45, 61, 64, 81, 115, 117, 122
 Sakellaropoulos, S. 10
 Sapiro, J. 6
 Satrapa 19
 Saudian-Rousseau, J. L. 79
 Schiller, F. 100
 Schleicher, I. 68, 112, 113
 Sekelj, T. 9, 10
 Smart 10
 Söderberg, H. 61
 Solar, A. 64
 Soljenicin, A. 5, 54
 Sonnabend, H. 65, 72, 106
 Stalin, J. V. 4, 7, 13, 16, 28, 42, 53, 67, 85
 Støp-Bowitz, C. 69
 Strönne, J. 59, 69
 Svensson, G. 69, 78
 Sviták, F. 20, 60, 70, 74
 Svoboda, L. 21
 Świstak, S. 57, 70, 71, 80, 131
 Szabó-Felső, F. 40, 43, 56, 68, 80, 87
 Szerdahelyi, I. 133, 134
 Šaponjić, M. 119
 Šaturová, M. 18, 19
 Škararić, A. 7
 Špur, V. 18
 Šustr, J. 20

Thierry, J. X. 1, 61, 63, 72, 73, 78, 79, 93, 128
Tilleman, J. 41
Tito, J. 16, 42
Toczyski, J. 70
Tonkin, H. 35, 36, 37, 40, 74, 79, 80, 103, 112, 113, 122
Trærup, B. 81
Triolle, R. 43, 59, 60, 61, 69
Turković 7
Váňa 76
Vermaas, M. H. 1, 61, 72, 78, 81, 106, 116
Višinski, A. J. 49
Vítek, J. 16, 17, 18, 20, 22, 32, 60
Vogt, A. 6
Waringhien, G. 1, 94, 124, 125, 134
Wells, J. C. 64, 69, 70
Wensing, E. L. M. 45, 57, 61, 67, 69, 80, 81, 94, 110–121
Woessink, E. J. 61, 68, 69, 77, 80, 114, 115, 119
Yagi, H. 66
Zacho, K. 110
Zacho, P. 112, 128
Zamenhof, L. L. 5, 38, 76, 77, 96, 99, 101, 126, 133, 135,
141, 142
Zamenhof, Lidja 6
Zepeda, A. 69, 78
Zapotocký 21
Ziegler, S. 80